

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Meŝter-utca 53. V. 5. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kostas nur 0.30 sv. fr. aŭ egalvaloron. Abonon vidu sur la lasta paĝo.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare • Nro 1. 1934

SALUTO

Pro la pli kaj pli multĝintaj novaj eldonoj la kadroj de la Bibliografia Gazeto iĝis senteble malvastaj, malebligante tiel detalajn kaj elĉerpajn recenzojn, kiajn nepre bezonas la sana evoluo de nia literaturo. Tial ni decidis eldoni ĉi tiun kvaronjaran recenzrevuon. Pri la recenzmaniero en ĝi sekvota vi povas orientiĝi rigardante la enhavon de nia nuna numero. Krome ni volas okupiĝi ne nur pri aperintaj libroj, sed ankaŭ ĝenerale pri nia literatura vivo, pri la laboroj de niaj verkistoj ktp. Tion ni faros en laŭeble interesaj intervjuoj. Krome apartan atenton ni dediĉos al nia

lingvo. Ni volas pritrakti ĉi rilate ne tiom gramatikajn problemojn, kiom demandojn stilajn, krome demandojn pri la speciala strukturo, spirito, evoluo, esprimopovo de Esperanto ktp.

Ni kredas, ke niaj legantoj rekonos la gravecon, kiun tia revuo signifas por la vivo de nia lingvo, kaj ili helpos ĝin per subteno kaj rekomendo. Tion ili povas fari tiom pli, ĉar la prezon de la revuo ni fiksis eksterordinare malalta.

Legantoj, aĉetantoj, kunlaborantoj bonvenon! Ni fosu nian sulkon ĉiam pli vasta!

Pri la „Rezolucio por vere Internacia Esperanto“

I. La rezolucio

La XXI-a Japana Esperanto-Kongreso, la 3-an de novembro 1933, unuanime akceptis la jenan rezolucion:

»La XXI-a Japana Esperanto-Kongreso atentigas pri la reformemo kaj troa neologismemo de »modernaj« Esperantistoj, kiuj konstante malfaciligas nian Internacian Lingvon. Tre ofte oni ne atentigas nin orientanojn ĉe la enkonduko de »internaciaj vortoj« kiuj ne estas komprenataj en la Oriento, same kiel en multaj eŭropaj landoj.

Nia majstro Zamenhof neniam parolis pri Esperanto kiel »la eŭropa lingvo«, sed ĉiam kiel la lingvo »de tuta Homaro«. La japana Esperantistaro konstata, ke se la opinio pri Esperanto kiel »la eŭropa lingvo« estus alprenata de la plimulto de niaj eŭropaj samideanoj, la disvastigo de nia lingvo en la Oriento estus grave endanĝerigata.

Konsiderante tiun ĉi aferstaton, la XXI-a Japana Esperanto-Kongreso deklaras, ke:

I-e. La vortfarado per afiksoj kaj kunmetado estas unu el esencaj karakterizoj de Esperanto; ĝi estas grava plifaciligilo de la lernado;

II-e. La esenco de la lingvo mem kuŝas en ĝia manifestado, kiu realigas ĉefe per la literaturo; konsekvence fako speciale nomata »literatura« en Esperanto ne povas ekzisti kaj oni ne povas formi ian fakon »vortaron literaturan, kiel ekz., maŝinfakan, medicinan, aŭ alian terminaron. Tion ĉi ni asertas spite de la sofismoj de anoj de la tiel nomata »literatura fako«;

III-e. Neologismoj pro bezono de poemfabrikado estas nenio alia ol la degenerado de la arto poezia; plie, en Esperanto ĝi signifas rekte danĝeran ludon kontraŭ la Fundamento.

Konsiderante, ke ni ekstreman orientanojn povas fari pli objektivan juĝon pri la internacieco ol la eŭropanoj, kies lingvoj estas tro proksimaj al Esperanto, kaj gardi severan senpartiecon kaj neŭtralecon, ni, kunveninte en la Laborokunsido de la XXI-a Japana Esperanto-Kongreso en Kioto, energie malrekomendas, pro la bono de nia lingvo, la uzon de neologismoj sen nuanca diferenco aŭ kun perforta nuancigo.

Ni vokas al niaj samideanoj en la Okcidento: la epoko de eŭropa aŭ ali-kontinenta idea imperialismo jam definitive pasis. Vivu la tuthomara solidareco kaj la interkontinenta lingvo Esperanto! Vivu ankaŭ la egaleco de rajtoj de ĉiuj popoloj ankaŭ sur la lingva kampo internacia!

II. Unua respondo

En la decembra numero de La Pirato aperis artikolo el la plumo de la deĵoranta Pirato, kiu pritraktas la rezolucion el pirata vidpunkto. Tiuj pirataj vidpunktoj ĉiam estas tre kleraj kaj instruaj; ankaŭ tiu ĉi artikolo tiel klare formulas la ĝustan vidpunkton pri ĉi tiu demando, ke ni ne povas ne reprimi ĝin tie ĉi kiel objektivan respondon al la rezolucio. Serco ofte pli bone lumigas aferon ol longa serioza rezonado per gravmienaj argumentoj. Jen do:

El Okcidento Luks'!

La neologisma demando neniam ekscitis min. — Se iu ĉielproksima poeto, ŝvebante du mil futojn super la realaĵo de l' terpomkampoj, nepre deziras susuri al anĝeloj, muzoj- & kio la nedifineblajn sentojn de sia labirinta animo, nu bone, li elektu — se necese, eĉ kreu — por tiu ĉi celo taŭgan esprimilon. Kial tio

genus min? Nur tiam mi protestus, se iu aŭtoritato pretendus devigi min partopreni tian stelregionan konversacion.

Aliflanke mi bone scias, ke multaj vortoj, utilaj kaj necesaj, ankoraŭ mankas al ni; ke en ĉiuj lingvoj la poezia radikaro estas pli riĉa, pli altnivela ol la populara. Kial Esperanto ne trairus similajn evolufazojn, kiel naciaj lingvoj kaj kial ni ne lasus al kompetentaj literaturistoj la malagrablan taskon elekti mem siajn laborilojn? — Mi ripetas, ke neniu devigas vin traŝviti la tutan Inferon de Kalocsay. Do kial vi plendas? Kaj, sincere, kiom da Esperantistoj kutimas legi Esperantaj verkojn? La granda armeo, kies ĉefa tasko estas nur aldoni kelkajn nulojn al statistikaj ciferoj, povas senemocie kovri sian literaturbezoon per legado de prospektoj kaj gvidfolioj kaj kontentigi sian artosojfon dum la balvespero de la grupo »Verda Stelo«.

Alia argumento ĵus venis el Japanujo. Niaj orientaj amikoj tute prave asertas, ke la nove kreitaj vortoj tro evidente favoras la Okcidentanojn. Tial la neologismojn elkovitajn en Eŭropo ili konsideras nenecesa lukso kaj dumkongrese ili verkis tre energian cirkuleron kontraŭ tro delikatsentaj nuancemuloj.

Kaj post pripensoj mi alvenis al tiu ĉi dekreto:

»Car Esperanto estas lingvo neŭtrala, ĝi ne prezentu pli da facilajoj al unu nacio ol al la alia. Sekve, nova vorto rajtos de nun eniri Esperanton nur, se ĝi havas absolute nenion komunan kun iu ekzistanta lingvo.« Ĉu ne? *La Dejoranta Pirato.*

III. Dua respondo

Sinjoro Georg Sieche, el Hirschburg, sendis al mi leteron adresitan al la Japana E-a Instituto. Jen ĝi:

NEFERMITO LETERO AL LA REZOLUCIINTOJ DE LA JAPANA ESPERANTO-KONGRESO.

La decembra numero de »Esperanto« diskonigas vian rezolucion kaj E. Privat priparolas ĝin en saĝa artikolo (kiun mi aprobas). Sed via deklaro pri literatura fakvortaro kaj poemfabrikado ŝajnas al mi nemiskomprenbla ofendo kontraŭ la verkintoj de tiu vortaro. Pri unu el ili oni legas en »Historio de la lingvo Esperanto« de E. Privat: »sub lia plumo la lingvo fariĝis vere potenca esprimilo« (dua parto, pĝ. 183) kaj »li ĉefe uzis sian potencon plumon por traduki en majstra formo belajojn el hungara lingvo, kiel Grabowski kaj Kabe el la pola« (pĝ. 184.). Mi kiel simpla e-isto kaj same miaj literaturĝuamaj amikoj esperantistaj, kvankam ĝis nun ni konas nur parteton de lia verkaro, sentas la plej grandan respekton kaj admiron por li. La titolo »fakvortaro« ankaŭ al ni ne ŝajnas bona esprimo, sed kiu estus pli kompetenta proponi uzindajn kaj bezonatajn neologismojn? Nenio estas perfekta en la mondo, kaj erari estas home. Japanaj kaj aliaj kompetentuloj ne nur kritiku kaj kondamnu, sed mem proponu kaj kunlaboru. Neniu deziras novan skismon, do ne malhelpu, sed helpu la kompetentulojn, kiuj povas direkti la evoluon de nia iam artefarita lingvo, anstataŭ lasi ĝin kuri zigzage. Se en la pasinta tempo estus reginta pli bona kontakto inter la E-verkistoj, nun ne trasvarmus niajn presajojn amasego da necesaj, parte eĉ maltaŭgaj neologismoj. Tamen mankas ankoraŭ radikvortoj por malŝargi la trouzatajn malvortojn: *maldeka, malmola, mallonga, malfermi*, ktp. Tiu afero pri *mal* estas en Eŭropo unu el la ĉefaj argumentoj de niaj lingvaj kontraŭuloj, per kiu ili logas al la diversaj t. n. mondlingvoj; jam ĉe la naskiĝo de Ido ĝi havis gravan rolon. Mi scias, ke ankaŭ en

Eŭropo multaj diras, ke novajn radikojn anstataŭ la mal-kunmetaĵoj ni ne bezonas. Sed multaj aliaj sentas, ke ekz. *malmola, mallonga* donas nur similan impreson kiel *nemola, nelonga*, sed neniel montras la necesan esprimforton kiel *dura, kurta*; ke havante tiujn radikojn oni povus eviti la enkondukon de multaj specialaj fakesprimoj; ke en flua parolo oni konstante intermiksas *fermi* kaj *malfermi*, ktp.; ke ĉiukaza tiuj trouzataj mal-vortoj *ĝenas forte la ĝojon pri la lingvo* kaj ofte estas la ekpuŝo al plena malfideliĝo. Nu, ĉar la *sentkapabloj* de la homoj estas *diversaj, ambaŭ partioj certe estas pravaj* kaj oni jam senĝene uzas: *neglekti* apud *malzorgi*, *rifuzi* apud *malakcepti*, *aflikti* apud *malĝojigi*, *kvere'i* apud *malpaci*, *stulta* apud *malsprita*, *timi* apud *malakraĝi*, ktp. Mi eĉ esperas, ke oni uzos ne nur en poemoj, sed ĝenerale la vortojn *dura, kurta* ktp.

Lerno de dudek-kelkaj trafaj kurtaj vortoj ankaŭ por komencanto ne estas malfacila kaj la eternaj komencantoj restus eternaj komencantoj eĉ se nia lingvo enhavus nur 500 radikojn.

Kun plej alta estimo salutas samideane:

Georg Sieche

IV. Doma respondo

Ni konfesas sincere, ke la du supraj respondoj estas la solaj, kiuj al ni favoras. Kontraŭe, amase ekzistas atakoj, pli-malpli akraj, de bonvolaj konsilioj ĝis koleraj insultoj. Eĉ, iu skribis, ke li devas dubi pri nia morala fideindeco.

Nu jes, ĉar la supra rezolucio, kiel divenis s-ro Sieche, direktiĝas propre kontraŭ L. M. kaj kontraŭ Kalocsay. L. M. estas tiu »literatura fako«, kiu argumentas per »sofismoj«, Kalocsay estis tiu homo, en kies manoj »deĝeneras la arto poezia«.

Mi kredis, ke Kalocsay mem respondos al la rezolucio. Sed li preferas silenti. Kiam mi intervjuis lin pri la afero, li ŝultrotiris: »Hm. Oni povas diskuti kun unu homo, kun kelkaj homoj, sed — kun amaso? Amaso ja havas nerefuteblan argumenton: voĉon, krian voĉon, kiu subpremas la parolon de la kompatinda diskutanto. Mi ne emas superkriegi amason. Poste, mi lacigis por plu argumenti. Miajn argumentojn oni nomis »sofismoj«. Jen la ĉiopova amas-argumento. Mi imagas, kiel kriis centoj kaj centoj: »sofismoj, sofismoj!« Kion mi povus fari kontraŭ ili eĉ per la plej trafa rezonado, plej brila ekzemplo. Ili ne aŭdis tion pro sia

Libro vendado fabela:
Ne legendo!
A E L A !

propra voĉo. Kaj vane mi starus sur miaj dektri libroj: ili ne atingas la alton de multe pli facile ĉar-pentebla popoloratora estrado. Ilin, plejparte tradukojn de ĉefverkoj, kiuj postulis de mi kvazaŭ asketan memkoncentrigon dum multaj jaroj, oni simple nomis »deĝenerado de la arto poezia«. Donacon mi volis doni al la e-istaro, kaj jen, ties grava parto oficiale kaj *unanime* kraĉis sur ĝin. Mi estas profunde konvinkiginta, ke tiu laboro, kiun mi faris kaj volis fari, ne estas ebla sen vortara pliriĉiĝo. Neniu eĉ provis min serioze, argumento kontraŭ argumento, konvinki pri la kontraŭo. Tiom malpli oni provis min konvinki per ekzemploj, farante same malfacilan, same aŭdace entreprenitan, same ampleksan laboron kiel mi. Mi, kompatinda praktikulo, batalis kun teoriuloj feliĉaj. Volonte. Diskutojn mi ĉiam amis. Sed nun oni ekcitis

Oficialaj sciigoj de la Akademio

La Akademio ĵus alprenis metodojn por plisimpligi kaj plifaciligi funkciadon de la Lingvaj Institutioj; ili estos aplikataj dum la jaro 1934, kaj, se ili sukcesos, dum la sekvantaj jaroj.

1. La unuaj rilatas la preparadon de la elektoj de la Lingvo-Komitatoj.

a) Dum la tuta jaro, je kiu ajn dato, sed e pli malfrue ol la 1 decembro, rajtos prezenti kandidaton, ne nur, kiel ĝis nun, la propagandaj, aplikaj kaj specialaj esperantaj societoj aŭ grupoj, la anoj de la Lingva Komitato kaj de aliaj altaj oficialaj institucioj, sed ankaŭ kiu ajn Esperantisto plie povas prezenti sin mem.

b) Tiuj ĉi proponoj devas esti sendataj al la Nacia Asocio de propagando de la lando de l' kandidato, kune kun deklaro subskribita de li (ekzemplero de tiu ĉi deklaro estos ricevita laŭ peto adresita al la sekretario de la L. K.-o).

c) La Naciaj asocioj transdonos la ricevatajn proponojn kaj deklarojn al la Akademio, kune kun sia opinio pri ĉiu el ili.

ĉ) La L. K.-anoj, kiuj deziras eksciigi, sciigos pri tio sian nacian asocion, samtempe kiel la prezidanton de la Lingva Komitato.

d) La Universala Esperanto-Asocio, (Sekcio de Eksteraj Aferoj), ludos la rolon de nacia asocio por la landoj en kiuj ne estas tia asocio.

2. — La aliaj metodoj rilatas la prilingvan funkciadon.

a) Dum la tuta jaro, je kiu ajn dato, ĉiu Esperantisto rajtas proponi al la Akademio oficialigon de vortradiko. Tiu ĉi propono devas esti sendata al la Prezidanto, kune kun detalaj sciigoj difinitaj sur tabelo, kies ekzemplero estos ricevebla laŭ peto al la Sekretariejo de la Lingva Komitato.

b) La Akademio starigis Sekcion de Kontrolo, kies tasko estas kontroli evoluciojn de la lingvo. Ĉiu Esperantisto povas kaj devas helpi tiun ĉi Sekcion plenumi ĝian taskon. Detalaj sciigoj estos kiel eble plej diskonigitaj per la gazetaro; kaj plie estos ricevebla laŭ peto al la Sekretariejo de la Lingva Komitato.

La Prezidanto:

M. Rollet de l' Isle

laŭtkrian horon, por ke ĝi sufoku mian voĉon, tondrante: Sofisto, degeneriganto, modernulo, »poeto«, vort-imperialisto! Kaj eĥos ĉiuj gazetoj, aplaudos ĉiuj societoj. Oni jam parolas pri bojkoto. Mi ŝtopas la orelojn kaj rifugas.»

Mi kredas, ke Kalocsay estas prava, kiam li ne volas plu diskuti. Li ja eksplikis sian vidpunkton klare en pluraj artikoloj kaj kun senkompara verve en sia Arto Poetika. Al tiuj eksplikoj vere estas malfacile aldoni ion. Mi volas nur resumi ilin.

1. Tiu poezio kaj alta prozo, pri kiu li laboris, ne estas farebla per la vulgara vorttrezoro. Ne pro tio, ĉar poezio bezonus nepre apartajn vortojn, sed, ĉar la vulgara vorttrezoro estas intence malriĉa.

2. El ĉi tiu konstato sekvas du eblaĵoj:

a) rezigni pri la poezio kaj alta literaturo,

b) riĉigi la lingvon konforme al la poeziaj bezonoj.

3. Ĉar lingvo, kiu deklaras sin netaŭga por pli altaj bezonoj, diras pri si kvazaŭ mortverdikon, oni devas preni eblaĵon b. Sed por ne ĝeni la simplecon de la vulgara lingvo, oni devas apartigi tiujn vortojn, kiujn bezonas nur la poezio. Ĉi tiujn vortojn do devas lerni nur tiu, kiu havas pretendojn pri literatura pluzuro.

Nun ni esploru la suprajn punktojn laŭvice.

Pri 1. Laŭ mia opinio, neniu povas kontesti ĉi

tiun diron de persono, kiu laboris ĝis nun plej amplekse kaj grandskale en la E-a poezio. Li mem diris, ke li estas praktikulo; ĉiu kontraŭdiro, kiun ne apogas same ampleksa laboro farita, estas nur malplena teori-aĵo.

Cetere, ke Kalocsay ne venis al ĉi tiu konvinkigo apriorie, sed ĝin maturigis en li longa kaj malfacila praktiko, tion ni povas klare konstati esplorante la nombron de neologismoj en liaj sinsekvaj verkoj. Komence li uzis nur sporadajn neologismojn, en la Tragedio de l' Homo, Streĉita Kordo ilia nombro estas vere malgranda. Sed en la Eterna Bukedo jam pliigas la nombro, kaj ĉi tiu pliiĝo daŭras en la Infero de Dante. Oni klare vidas, ke lin gvidis la nepra neceso, kunportita de la pli kaj pli malfacilaj taskoj.

Pri 2. Rezigon pri poezio konsilis foje s-ro Benemann. Alia konsilo venis de altestimata samideano, kiu skribis al Kalocsay, ke li ĉesu plu verki, ĉar li nur malutilas al la lingvo. Kaj — ŝajne — al ĉi tiu konkludo venis ankaŭ Kalocsay mem, kiu, post la multaj atakoj, citis el sia rondelo: »Poeto estas orfa birdo, soifas varmon kaj sunhelon« kaj poste diris, ke li eĉ ne povas imagi, ke iam li ankoraŭ entreprenos grandan taskon. Por mi, kaj — mi volus kredi — por multaj, tio estus dolorega perdo. Triumfos nur tiuj, kiuj ne legis la verkojn de Kalocsay. Sed — jen ĝuste la groteska flanko de la afero! Do pri la sorto de la Kalocsay-verkoj decidis tiuj, kiuj ilin ne legis, al kiuj ili ne estas destinitaj? Kaj — mi demandas, kiel povas iu havi la rajton, malpermesi al mi kaj al miaj fratoj en la arto, ke ni havu tian plezuron, kian ni deziras?

Pri 3. Ĉi tiu punkto estas plena validiĝo de la »neceso kaj sufiĉo.« Ĉar E. estas nenies lingvo gepatra, ĝi ne povas al si permesi la lukson de ĝenerala vortriĉo. Tiu vortriĉo do regu nur tie, kie ĝi estas nepre necesa: en la poezio kaj alta literaturo.

Aliflanke, oni devas ne forgesi, ke tiuj novaj vortoj aperas en valoraj verkoj, do la riĉiĝo de la lingvo kaj de ĝia literaturo okazas paralele. La vortoj do ne estas nur »enaeraj«: ilia lerno ne estas »memcela«: ili alirebligas valorajn legaĵojn. Per kvindek vortoj netroveblaj en la Plena Vortaro ni konkeras por ni la perlojn de la Eterna Bukedo kaj Hungara Antologio, per pluaj naŭdek vortoj ni trabatas la pordon de la Infero de Dante. Kaj granda parto de tiuj vortoj eĉ ne estas nova; ili troviĝas en bonaj vortaroj, sed estis ĝis nun neuzataj, ĉar neniu entreprenis taskojn, por kiuj ili estus necesaj. Cetere, same estas pri la Sinjoro Tadeo de Grabowski: por ĝin konkeri oni devis lerni 200 vortojn sisteme ne oficialajn.

Mi kredas, ke la plej granda eraro de la Rezolucio estas ĝia ĝeneraligo. Ne temas pri tiu kaj tiu verkisto E-a, temas nur pri la sola Kalocsay, granda lingvoartisto, eble la plej granda ĝis nun en Esperanto. Temas pri tio, ke ni havas grandan lingvokreanton, kiu per majstra mano forĝas el la kruda ŝtonmaterialo de la lingvo mirindajn monumentojn. Tiajn homojn oni ne povas pesti per strikta mezurilo: oni devas ilin danki. Estas eble, ke Kalocsay eksilentos, ke li ĉesos al ni donaci el sia neelĉerpebla trezorejo. Eĉ tiaokaze, lia merito estas nemezurebla. Li faris ne nur gigantan laboron, sed ankaŭ tutan skolon, ĉiu nova poeto estas, eĉ senkonscie, sub lia influo, kaj ĉi tiu influo estas ne nur neologisma, sed montriĝas precipe en la brila tekniko kaj en la pliiĝinta esprimkapablo de la lingvo. Tion konstato foje la literatur-historio de E., en kiu lia agado estas epokfara.

G. Karczag

Enciklopedio de Esperanto

Intervjuo kun C. Kőkény



De longe min maltrankviligis la afero. Enciklopedio de Esperanto! Kio ĝi estos? Kiel ĝi estiĝas? Kaj precipe — kiam ĝi aperos fine. La scivolo kreskis en mi, kaj ĝin pli kreskigis tiu neorienteco, kiun mi trovis ĉe ĉiuj, kiujn mi demandis pri la afero. Fine, kiel kutime, venis al mi genia ideo — mi demandos pri ĉio ĉi kaj pri ĉio cetera la plej kompetentan personon, la redaktanton de la verko, sinjoron Kőkény.

La ideo, kiel mi jam diris, estis genia. Sed ĝia efektivigo estis tiom pli malfacila. Neniu povus imagi, kiel netrovebla homo povas esti tia redaktanto de Enciklopedio. Du semajnojn mi persekutis lin en lia loĝejo, en lia oficejo, en plej diversaj publikaj bibliotekoj — li ĉiam »ĵus foriris«. Tiu »ĵus foriris« fine sonis jam tiel fatale, tiel malice, ke mi komencis senti sub ĝi mokan subpremaman ridon. Tute senespere mi iris al la Esperanta societo por elverŝi mian plendon al iu kompatema samideano. Kaj jen — kiu prezidas sur la estrado? Sinjoro Kőkény, mia eterna ĵusforirinto!

Embuske mi kaŝiĝis ĉe la elirejo, kaj, kiam sro Kőkény, kun sia grandega kaj plenege akto-sako, volis rifuĝi post la prezentado, mi senindulge atakis lin ĉe la pordo.

— Bonvolu diri — mi frapis lin per fulma demando — kiel estiĝis la ideo pri la Enciklopedio de Esperanto?

Ĉiu alia homo estus surprizita de tia subita demando. Mi mem konsciis, ke mia atako estis iom sentakta. Sed sinjoro Kőkény estas ne nur redaktanto de Enciklopedio: li estas mem enciklopedio vivanta. Se oni malfermas lin ĉe certa paĝo, oni tuj ricevas la deziritan informon. La respondo sekvis senembarase, flue, faktece, precize:

La ideo mem jam naskiĝis ĉe multaj Esperantistoj, eĉ okazis diversaj provoj, ekzemple tiu de *Smurlo*, kiu aperigis sian ANA en 1917, sed tio estis nur mallonga, skemeca, krome la kompilinto uzis ankaŭ kontraŭfundamentajn vortojn, kiel »es« anstataŭ »estas«. La iniciato de nia Enciklopedio estos ligita por ĉiam al la nomo de ruso Ivan Ŝirjaev, kiu dum kelkaj jaroj kolektis diversajn informojn, notis biografiojn de konataj Esperantistoj kaj poste aranĝis ĉion en aboca vico. En 1931 alvenis al Literatura Mondo lia laboraĵo en sep malgrandaj kaj unu granda manskribitaj kajeroj. Komprenoble tiu ĉi materialo estis nur kerno kaj elirpunkto por la tuta verkego, sed mi konservas ĉiam en nia memoro la nomon de tiu simpata samideano, kiu bedaŭrinde mortis aŭtune de 1933, ne ĝisvivinte la aperon de la Enciklopedio.

— Kiun celon havas tiu ampleksa verko? Vi jam promesis, ke la verko ampleksos 800 paĝojn.

— Pri la internacia historio de Esperanto ni jam posedas la bonan poezion verkon de Privat, la interesan analizon verkon de Drezen, kaj aliajn malpli ampleksajn verkojn, sed multaj diversaj terenoj de nia movado ĝis nun ne estas prilaboritaj. La Enciklopedio enhavos ekz. apart-

ajn artikolojn pri la historio de Esperanto en ĉiuj iom gravaj landoj; pri la diversaj fakoj, kiel ekz. Bahaismo, Oomoto, Rotario, Ruĝa Kruco, Polico, Komercio, Medicino, ktp. Nia verko enhavos biografiojn de proks. 1500 Esperantistoj. Ĝis nun, se vi volis legi ion pri Grabowski aŭ pri Cart, vi devis trafolumi la jarkolekton de grava gazeto pri tiu jaro, kiam tiu aŭ alia samideano mortis. Sed pri la plimulto de niaj vivantaj famaj samideanoj vi trovis nenian aŭ tre malkontentigan informon. Ĉu vi volis scii kelkajn informojn pri gravaj libroj? Tio postulis denove multajn penojn, ja vi devis serĉi en diversaj gazetoj recenzojn aŭ reklamojn pri tiu verko. Sed en la Enciklopedio vi trovos la bibliografiajn indikojn kaj diversajn informojn pri proks. 450 verkoj, do pri ĉiuj iom gravaj libroj de nia literaturo. Krome vi trovos prilingvajn artikolojn, historion de la gazetaro, tiun de nia literaturo, notojn pri la kongresuroj, klarigojn de la verkistaj pseŭdonimoj ktp. Kaj jen la plej grava: ĉion en unusola verko, aranĝita laŭ bona ordo, por ke la leganto ne bruu, multe serĉante iun aŭ alian informon.

— Sed mi timas, ke via verko estos tro seka por la plimulto de la Esperantistoj.

— Ne kedu, ke la redaktoroj estas tiaj sekaj branĉoj, kiuj ne povas el si elpremi iom da suko. Estas ja vere ke en la verko ne mankos mallongigoj (HEA, BES, AEA, GEA, SAT, HESL, SFPE ktp.), sed post iom da alkitimigo tiuj litergrupoj facile klarigos al la leganto. Kompense ni ĝojigos la legantojn per la senmallongiga *kaj*, kiu neniam estos skribita *k*. Cetere, enciklopediojn oni neniam ellegas senspire ĝis la fino kvazaŭ aventurromanon. La plejparton de la biografioj legos nur parteto de la legantoj, eble nur mem la koncernatoj, tion ni scias, sed tiuj biografioj okupas nur kelkajn liniojn. Male la biografioj pri la internacie konataj eminentuloj estas multe pli ampleksaj kaj certe ankaŭ pli plezuraj por lego. Ĉu la aliaj artikoloj? Nu, tio dependas de la verkintoj. Kelkaj skribis en iom telegrafa stilo, aliaj pli verve, pli amplekse. Oni ne povis eviti diferencojn, kvankam ni dissendis sep aŭ ok cirkulerojn al la kunlaborantoj. Sed ĉu tio estas malutilo? Multkoloro ja ne estas malavantaĝo.

— Mi supozas, ke vi havis ankaŭ malfacilojn. Ĉu ne?

— Certe. Eble plej dolora estas la multega korespondado, dolorega ankaŭ por la eldonisto pro la postaj kostoj. La redaktoro suferis multe pro teknikaj laboroj. Multaj kunlaborantoj tute malatentis la konsilojn de niaj cirkuleroj, ne uzis niajn mallongigojn aŭ uzis aliajn, ne lasis spacon en la maŝinskribita teksto, do ne havante lokon por enskribo de diversaj mallongoj aŭ ŝanĝoj, ni devis denove maŝinskribi la plimulton de la artikoloj. Sed pri kelkaj landoj ni havas pli gravajn plendojn. Ekz. en Belujo ni havis dekomence kunlaboranton, sed li sendis al ni nenion, malgraŭ lia pluraj promesoj, fine sinofera samideano donis por ni la plej necesajn informojn. En Hispanujo ni havis kunlaborantojn, sed ili sendis al ni nur bagatelon. Ni kompilis apartan cirkuleron, sendis ĝin al ĉ. 50 hispanaj samideanoj, faris ankaŭ aliajn paŝojn, petis, petegis, eĉ kverelis, kaj nun ni jam havas sufiĉe bonan materialon pri tiu lando. Komprenoble: ne ĉiu lando estas kontentige prilaborita, sed ĝenerale ni estas kontentaj.

— Ĉu vi havis multajn kunlaborantojn?

— Pli ol 50. Kelkaj el ili, ekz. generalo *Bastien*, *Bruin*, *Wiesefeld* kaj aliaj laboris tiel multe kaj tiel entuziasme, ke tio estas klarigebla nur per tiu interna forto, kiu ilin kaj feliĉe ankoraŭ multajn samideanojn ligas tiel intime al nia Esperanto, ke ili estas preskaŭ devigataj laboregi por Esperantista afero.

— Sed multaj certe diras, ke ankoraŭ ne alvenis la tempo eldoni tiel gravan verkon. Kion vi opinias?

— Esperanto jam estas pli grava socia faktoro, ol

mem la plimulto de la Esperantistoj supozas. Mi nun ne parolas pri tio, ke Esperanton jam lernis (aŭ eklernis) multaj milionoj, ĝin parolas (aŭ balbutas) eble miliono da homoj, mi nur konstatas, ke ekzistas kelkaj miloj en la mondo, por kiu Esperanto estas la plej amata okupo, ludo, movado, pasio, aŭ idearo. Kaj tiuj kelkaj miloj donas ĉiun sian energion al Esperanto, ilia konstanta laboro movas multajn aliajn milojn; kreigis intensa spirita vivo, aperas gravaj verkoj, kiuj ankaŭ vendiĝas, eĉ kelkaj verkistoj ricevas honorariojn. Jes, la vivo de Esperanto ne estas tiel palpebla, videbla kaj aŭdebla, kiel ekzemple la vivo de nacio, ĉar la adeptoj ne vivas en unu amasego, sed oni ne devas esti spiritisto aŭ simila, por ke oni povu mezuri la pliĝantajn fortojn de Esperanto. Ĉu tia mondskala movado ne bezonus Enciklopedion?

— Mi konsentas.

— Sed urĝas nin ankaŭ aliaj motivoj. Jam pasis 47 jaroj depost la ekiro, kaj post kelkaj jardekoj neniu vivos el la unuaj pioniroj. Estas granda avantaĝo, se ĉe la kompilado ni povas uzi la informojn, rimarkojn, eĉ artikolojn de niaj bravaj pioniroj. Kaj ne pensu, ke ĉio kio estas skribita en la diversaj gazetoj, estis tute vera. La propagando, precipe antaŭ la milito, permesis al si multajn troigojn, ne tute fidindajn informojn. Ne nur la publikon, sed ankaŭ la Esperantistojn multaj fervoruloj (ne ĉiuj) volis stimuli per novaj sukcesoj, per grandaj ciferoj. La redaktoroj volus doni en la manojn de la Esperantistoj tute fidindan verkon, kaj ni instigis tiurilate ankaŭ niajn kunlaborantojn. Malgraŭ la plej forta volo, la verko eble enhavos ja tiajn troigojn, sed ju pli malfrue oni komencus eldoni tian verkon, despli multaj eraroj troviĝus en ĝi.

— Ĉu vi volas diri ion ankoraŭ?

— Entute, la verko estos unu el la plej gravaj verkoj de Esperanto. Ni ne diras, ke ni donos ion tute perfektan, sed ni certe donos ion tute seriozan kaj — oni povas diri — vere grandskalan, kio klopodas esti ankaŭ populara. Tia libro certe pligrandigos la memfidon de niaj samideanoj kaj konvinkos ilin, ke Esperanto jam «elrampis el la vindoj».

— Kaj kiel oni solvis la financon flankon?

— Unu nomo respondu: AELA. Kio estas AELA, vi scias. Unuigo de legemaj esperantistoj kun la celo: ebligi la eldonon de valoraj libroj, kiujn ili elektas mem per voĉdonado. Tiel estas eble fari etajn miraklojn. Eldoni librojn per tiel bagatela prezo, kiun preskaŭ ĉiu povas oferi. Certigi eldonon de libroj, kiuj estus eldoneblaj nur per tia kapitalo, kian ĝis nun ne havis nia movado. Mi estas enciklopedia redaktoro, do la poezio tute ne estas mia kampo. Mi ne fantazias, kiam mi diras, ke AELA, se la esperantistoj ĝin subtenas fortike kaj entuziasme, povas generale triumfigi nian aferon. Kaj mi firme esperas, ke pli aŭ malpli frue, ĉiuj esperantistoj rekonos ĉi tiun veron.

— Prave, prave, mi jam rekonis! — mi diris kintrenate de lia entuziasmo. — Sed fine, finfine, permesu al mi ankoraŭ diskretan demandon. Kiam do aperos ĉi tiu enciklopedio?

— Nu, bone, ke vi demandis. Mi scias, ke oni jam maltrankviliĝas. Sed — rigardu, la afero ne dependis sole de ni. Ni volis aperi la verkon jam en 1933. Kiam ni kalkulis la tempon, ni ne forgesis enkalkuli la atendeblajn malfruojn flanke de kunlaborantoj, la multajn malfacilaĵojn ktp. Sed, mi diras sincere, ni multe eraris en niaj kalkuloj: je tiaj malfruoj ni tute ne estis preparitaj. Nun fine ni havas la kompletan materialon de la unua volumo kaj ĝi jam estas parte kompostita, la presejo laboras pri ĝi «kun plena vapore».

— Kiel? Ĉu estos du volumoj?

— Jes. Denove mi devas konfesi eraron. Ni ne antaŭvidis tian riĉecon de materialo. La materialo kreskis, kreskegis. Ĝi ne estas plu lokebla en unu volumo. Du ampleksaj volumoj eliros. La unua post kelkaj semajnoj, la dua proksimume ses semajnoj post la unua.

— Kaj ĉu la prezo restos malgraŭ la ega pliampleksigo. Ĉu tio ne bankrotigos la tutan entreprenon?

Pri la kritiko de la „Hungara Antologio“ en la „Hungara Heroldo“

Car en B. G. 1933. No. 4. mia kritiko en Hungara Heroldo pri la Hungara Antologio estas kritikita kvazaŭ akra atako kontraŭ la libro, mi, kelkfoje kunlaboranto ankaŭ en B. G., devas peti pri loko por kelkaj vortoj. Mi ne bezonus tion, sed tamen mi ne volas ŝajni nalamiko aŭ malica mankflaranto. Se sro Takács ne estus forlasinta kelkajn partojn el mia kritiko, sdo Karczag estus povinta vidi, ke mi tute ne atakis la libron. Sole, pro la deziro vidi tian verkon kompleta, mi opiniis, ke ĝuste hungara kritikanto devas serĉi, kio devus enesti en verko titolita »Hungara Antologio.« Pri lingvo kaj stilo mi lasis la kritikon al alilandanoj. Sed pri tio, kio enestu en plena Antologio, ne povas skribi alilandanoj, tio estas hungara devo. En la kritiko mi eĉ alvokis la hungarajn legantojn, ke en la intereso de iama kompleta eldono ili komuniku pluajn rimarkojn pri mankoj. (Ankaŭ tiun parton strekis la redaktoro.) Mi estas certa, ke el la verkoj de la aŭtoroj de mi menciitaj oni povas kolekti mallongajn specimenojn, kiuj neniel estus pli malinteresaj ol tiuj, kiuj aperis en la unua eldono. Mian opinion cetere akceptis multaj kun kiuj mi parolis, ili min tute pravigis — eĉ, mi ricevis riproĉon pro la nemencio de kelkaj aferoj.

La eldonon de AELA mi akceptis kun ĝojego kaj ĝin mi laŭpove laŭdis sincere kaj emocie. Mi bedaŭras, se mian bonan intencon, mian entuziasmon por la aperinta bela volumo de AELA la LM-anoj miskomprenis. P. B.

Respondo. Sdo Balkányi permesu al mi diri, ke mi ne povis prijuĝi lian recenzon laŭ la forstrekitaĵ partoj; mi povis paroli nur pri la impresoj, kiun ĝi al mi faris en la aperinta formo. Nin ĝojigas kaj konsolas, ke la kaŭzo de la malagrabra impresoj estis ne vi, sed sro Takács. De li, nin ne surprizas la afero.

Rilate la kompletecon, mi unue citos el eksterlanda recenzo: »Oni ne tiom celis krei dokumenton pri la hungara literaturo, kiom interesan legaĵon — diras la antaŭparolo. Tion memoru la e-istoj, kiuj ankoraŭ projektas eldoni antologion pri sialanda literaturo. Ne preni pedante ĉiun verkiston, kiu estas menciita en literaturhistorio, kaj de ĉiu el ili — same pedante — verkon el tiuj, kiujn oni opinias la plej karakterizaj por la respektiva aŭtoro, sed rigardi redaktante per la okuloj de la nuntempa leganto, por kiu ja estas dediĉita la tuta laboraĵo... La redaktantoj de H. A. iris ĉi tiun vojon. Bonintence — kaj bonsukcese.« (Ondo de Daŭgava).

La demando do estas, ĉu iu verkisto havas valoron nur literaturhistorian (ekz. Kisfaludy) aŭ universallistorian. Poste, ĉu li ne havas nur specialan hungarnacian valoron? Fine, ĉu li vere havas tian signifon, ke sen ĝi estus mankhava la orkestro de la hungara literaturo. Laŭ tia mezuro, mi ne kredas, ke al la redakto oni povus fari gravan riproĉon.

G. Karczag

— Nu, la afero estas iom malagrabra. Por la dua volumo ni devos peti bagatelan superpagon. Sed mi kredas, ke vidinte la unuan volumon, ĉiu volonte oferos du-tri frankojn. Ni kalkulos ĝin tiel, ke ĝi kovru precize nur la eldonkostojn de la libro. Ne forgesu cetere, ke la amplekso de la unua volumo estas preskaŭ tia, kiam ni promesis por la tuta verko! Sed mi vidas, ke vi entuziasmas pri la afero. Ĉu vi ne povus pravi vian entuziasmon per faktoj? Mi urĝe bezonus vian helpon. Venu kun mi eble!

Kion fari, mi iris. Mi iris kun sinjoro Kókény kaj de tiam mi kopias manuskriptojn, elsarkas gramatikajn erarojn, kungluas paperfoliojn, per unu vorto, mi dronis ĝis la oreloj en la Enciklopedio. Terura laboro! Apenaŭ mi povis elrampi el ĝi dum tempeto, por skribi ĉi tiun raporton pri mia fatala renkontiĝo kun mia nova ĉefo, sro Kókény. Mi konsilas: evitu lin, ĝis la Enciklopedio estos preta!

L. B.

Ĉu praktikaj esperantistoj?

La sorto de iu libro

— Otto Ginz, Praha —

Radiisto plej kapabla skribis esperantlingve verkon pri sia fako. Aŭskultu nun pri la sorto de tiu libro, kiel ĝi famiĝis, tramigris la mondon kaj kiel ne sciis la esperantistoj esti ĝiaj voĵfarantoj.

La verko de inĝeniero Eugeno Aisberg (aŭtoro de eminentaj teknikaj verkoj, direktoro de teknika eldonejo kaj ĉefredaktoro de grandaj revuoj pri radio kaj televido): »Fine mi komprenas radion!«, aperanta nun en eldonejo de Literatura Mondo, estis represita en siaj unuaj sep ĉapitroj (Babiladoj) en la bedaŭrinde malaperinta Internacia Radio-Revuo.

Ĉeĥoslovaka leganto, kaptita de la enhavo kaj formo, tradukis la unuajn Babiladojn en ĉeĥan lingvon, prezentis la tradukon al ĉefa institucio faka de la lando: la radiokompanio, kiu senhezite akceptis ĝin por represo en sia oficiala revuo. Tiam Sciemuĉjo kaj Radiulo, la du agantaj personoj de la libro, fariĝis famaj



La verko en diversaj lingvoj

ĉe dekmiloj da legantoj kaj ĉe la eldonkompanio mem. Per klara noto pri sia esperanta deveno ili estis ankaŭ valoregaj propagandantoj de nia lingvo. La direktoroj de la eldonejo konfesis, ke ili scivole atendadas la novajn problemojn naskiĝantajn en la knaba cerbo kaj ĉiam brile solvotajn de la saĝa onklo. Oni atendadis jam pli ol agrable, sed necesis multe da per- kaj insisto flanke de la tradukinto por instigi la aŭtoron, ke li finverku la libron. La tradukanto ja estis en situacio ne enviinda, kiam post la ĉeso de I. R. R. li eksciis, ke ne ekzistas pluj Babiladoj, ĉar ili ja estis preparataj aparte por ĉiu numero de la revuo. Fine ĉkkompatis la aŭtoro la ĉeĥoslovakojn kaj liveris novajn partojn por ebligi la kompletigon de la ĉeĥa traduko. Dum multaj semajnoj ĝojigis la Babiladoj la korojn de la »Radiojournal«-legantoj, poste en kelkiloj da ekzempleroj ili aperis libroforme ĉe la grava eldonejo »Orbis« kaj fine ilin reprenis en siaj kajeroj monata radiorevuo. La kvaran

eldonon ĉeĥan entreprenas la Stata eldonejo en Praha, kiu ĝin disvastigos en luksa aspekto ĉefe en la lernejoj.

Jen evidente unikaĵo, per kiu oni povos fari multe da bono por nia lingvo, pensis tiam la tradukinto kaj en interkonsento kun la aŭtoro li ekstraktis pri eldono en aliaj lingvoj.

Li elektis por la tasko la fakajn eminentulojn en nia movado. En Germanujo li sin turnis al LK-ano, konata publicisto, kiu estas prave fiero pri sia lerto en rilato kun la preso. Kaj ĉefe pri la lasta kapablo temis, ĉar tradukon sciis fari ĉiu bona esperantisto, eĉ nefakulo. Post interŝanĝo de kelkaj leteroj montriĝis tamen, ke eldono en Germanujo ne estas ebla. Komprenoble, aperis ja tiom da radiolibroj en Germanujo, ne eblas eldoni pluan. Simile en Hungarujo. Zorgis pri la afero 2—3 ĉefaj esperanto-laborantoj en tiu lando, inter ili ankaŭ ŝatata kunlaboranto de L. M. Ne ekzistas tie tiom da teknikaj verkoj kiel en Germanujo, sed tamen ne estis eble eldoni tiun ĉi tradukon. Ne estis eble.

Dume venis en la mondon en Parizo eldono franca. Ĝi disvendigis tuj kaj rapide sekvis pluaj miloj. (Hodiaŭ estas jam disrintaj 11 francaj eldonoj.)

Kaj maleblaĵo montriĝis ebla. Grava teknika eldonejo en Stuttgart, kiu eldonas centon da revuoj kaj milojn da teknikaj libroj, petis pri permeso presi la Babiladojn en germana lingvo. En multe disvastigita revuo ili aperis poparte kaj laste venis en niajn manojn la deka eldono libroforma. Kaj simila miraklo ripetigis en Hungarujo. Kion ne sciis plenumi kunigitaj fortoj de eminentaj esperantistoj, pri tio senpene sukcesis larĝvida neesperantisto. Atestas tion la bela volumo hungara »Most már értem a rádiót!«

La sama historio ripetigis en Estonio, lando de cetero plej lertaj esperantistinoj kaj esperantistoj (ho, kiom da leteregoj vane tien direktitaj!), en Jugoslavio pri eldono slovena kaj laste en Latvio. Ankaŭ en Grekio. Greka fakulo kunlaboris en organizo de radio en tiu ŝtato kaj postulis multe da detalaj informoj pri cirkonstancoj en aliaj landoj. La nefacile havigeblaj indikoj estis prizorgitaj ĉe ŝtataj instancoj kaj liveritaj rapide al la greka demandinto. Estus uzita la okazo kaj proponita eldono de la Aisberg-libro en greka lingvo. Ne venis de tie ia respondo malgraŭ denova peto. Ni dirus, ke vana laboro, se ne venus subite en niajn manojn la Babiladoj en la lingvo de Homero. Greko-neesesperantisto sciis fari laŭ franca traduko, kion ne kapablis nia samideano kun originala teksto en sia posedo.

Ankaŭ eldono slovena kun la belsona titolo »Sedaj ven, kaj je radio« meritas specialan mencion. Esperantistoj rifuzis kunlaboron, sed trovis la germanan eldonon profesoro en Ljubljana kaj li lernis esperanton speciale por la celo, ke li povu traduki la verkon el la originalo en sian lingvon gepatran. Ni vidas en li, kiu majstras la lingvon komplete, la esperantiston de nova tipo. De la tipo, kiu estas bezonata por la nuna vivo.

CU VI SCIAS

ke ĝis nun en 32 lokoj ekzistas Zamenhof-stratoj kaj placoj?

CU VI SCIAS

ke pli ol 50 geedziĝoj estas registritaj, kiuj okazis inter diverslingvaj Esperantistoj, ĉu vi volas koni ilin?

CU VI SCIAS

ke la unua radioparolado en Esperanto okazis la 7-an de aprilo 1924 el la sendstacio de Paris PTT?

CU VI SCIAS

ke aperis en Esperanto la fama verko Vivo de Kristo de Renan?

Revuo de Revuoj

— G. Karczag —

Kion faru kompatinda revuanto, kiam ni ne havas sufiĉan tempon por revui? Li prenas ekstrem-orientajn gazetojn, tumultantajn per sia nombro kaj amplekso. Ili ne donas multan laboron, (almenaŭ dum la revuanto ne scias la japanan lingvon). Ili enhavas tekstojn nekompren- eblajn en nekomprenablaj hieroglifoj. Pri la kelkaj esper- antaĵoj en ilin vojerarintaj oni povas facile pretiĝi.

Kaj min gvidis ankaŭ alia motivo. Lastafoje mi promesis recenzi milde en la sekvanta revuo. Nu, por tio donas bonan okazon la ekstremorientaj gazetoj. La tamen- Esperanta parto plejparte estas redaktita en bona stilo kaj kutimè estas ankaŭ interesa kaj valora.

La *Revuo Orienta* enhavas tre seriozan artikolon (N-oj 11 kaj 12) »Pri devi kaj povi«. En la samajn-oj troviĝas tre bonaj klarigoj pri la matematika terminaro de nia lingvo. Decembre aperis krome artikolo pri laŭ- nombra akordiĝo de substantivo kun ĝia apudesta adjek- tivo kun ekzemploj el Eliro (Biblio). La januara numero estas pure japanlingva. La revuo serioze kontribuas al la evoluigo de esperanto.

Esperanta Literaturo hektografita, havas praktikajn celojn. Ĝi sekvas bonan metodon: sama japana legaĵo devas esti tradukata de pluraj entreprenemuloj. La akcep- teblaj estas publikigataj kaj ricevas detalan publikan kritikon. Unu el la plej bonaj rimedoj instrui la lingvon praktike.

En la *Verda Mondo* estas interesa la artikolo »Salutoj de reprezentantoj el Besta Mondo al XXI-a japana kongreso« (No. 11 1934). Sed jen, tie en la nomo de kontraŭneologismuloj parolas sinjoro Porko Grunto. Kvankam mi estas neologismulo, mi ne aprobas, ke ili estas tiel insultitaj. En la batalo oni tamen devus apliki pli delikatajn rimedojn. Sajnas, ke la takto ĉe Verda Mondo malboniĝis. Ni ĝoje salutas s-ron J. Major inter la novaj kunlaborantoj.

Esperanto-Lernanto sekvas samajn celojn kiel la Revuo Orienta. Ĝia januara numero publikigas la kome- can parton de la Zamenhofs Ekzercaro, tre bone analiz- itan (lingve!) anekdoton, parton el la Lingvaj Respondoj kaj kelkajn poeziajn instruojn.

Ankaŭ *Esperanto en Japanujo* estas preskaŭ pure klariĝa gazeto.

Mi diras sincere, ke mi ne tute komprenas la ne- ceson de tiaj klarigaj gazetoj. Ĉu ne estus pli bone kun- meti vastan klarigan libron, eble el la materialo de la ĝis nun aperintaj numeroj diversgazetaj kaj per tio kontentigi ĉi tiun bezonon unufoje por ĉiam? Tiamaniere la gazetoj povus sin dediĉi al aliaj celoj (propaganda, literatura) kaj ne devus ripeti ĉiam la samajn klarigojn kaj koment- ariojn pri centfoje jam klarigitaj kaj komentariitaj aferoj? Mi ne estas kompetenta prijuĝi tion ĉi, mi nur metis demandon, kiu min jam delonge maltrankviligas.

El ĉinio mi mencias la gazeton »*La verda lumo*«.

Kaj la traktinto iĝis nekredema. Li ne kredas plu siajn esperantajn korespondantojn en dudeko da landoj, kun kiuj li rilatis lastatempe sen palpebla rezulto. Li daŭras alte taksi la diversajn bonajn kvalitojn de la honorindaj samideanoj, sed nestas en li forta suspekto, ke la malsukcesintoj ne scias bone adaptiĝi al la nun- tempo. Li ne kredas, ke ne ekzistas eblo eldoni la verkon en la landoj ĝis nun mankantaj, sed li estas konvinkita, ke la esperantistoj, cetere tre eminentaj, ne scias praktike labori. En pluraj lokoj okazos do sendube eldono sen pero de esperantistoj, aliloke la ĝustaj personoj eble estos trovitaj per la helpo de la nova kompleta eldono, nun entreprenata de L. M.

La traktinto, kiu reprezentas la aŭtoron (lia ad- reso: O. Ginz, Stárkova 4, Praha II., Ĉeĥoslovakio;

Novelo »Taglibro de frenezulo« kontentigas enhave kaj lingve. La lingvaj studoj estas verŝajne tre bonaj kaj pri multo min instruus, se mi scius la ĉinan lingvon. Tre plaĉaj estas la bildoj pri diversaj pejzaĝoj de Ĉinio (mi kredas, ke la esperantistoj devus ne neglekti la foto- arton).

La *Mondo* (Sanhajo) meritas mencion pro siaj kur- aĝaj porlaboristaj artikoloj.

La *Suda Stelo*. Estante en la ekstrema oriento, mi decidis fari ekskurseton al Aŭstralio, kie aperas ĉi tiu monata gazeto. Ĝi vere ĝojigis min. La E-a teksto estas tre bona. Studo pri la traduko de Hamleto estas serioza kaj bone farita. La recenzoj, kvankam ne ampleksaj, pruv- as konsciencan enprofundiĝon kaj bonan lingvoscion. La diversaj rubrikoj »Serioze kaj ŝerce«, »Nia poŝto«, »Mal- multe konataj vortoj de Zamenhof« ktp. estas ĉiam freŝaj kaj interesaj. Noveleto »Reveno« en la Septembra numero estas bela malgraŭ la ne tro nova temo. Bona gazeto, pri kiu R. Banham rajtas fieri.

Oomoto Internacia. Kara Major! Kvankam via vaste konata modesteco certe protestas kontraŭ tio, ke vi rolu dufoje en sama revuo, ĉi-foje mi tamen ne povas vin absolvi pri tiu malagrabaĵo. En la julia numero de O. I. vi publike insistis, ke aperu detala kritiko pri via revuo sur la paĝoj de LM. Ĝis nun ni bedaŭrinde ne kapablis ple- numi tiun ĉi peton, sed nun ni volas korekti nian preter- lason, parte pro la intensa, ne plu subpremebla kulposento, parte pro tio, ke la nova formato disponigis sufiĉan lokon vakantan.

Unue mi gratulas vin pro la literatura parto de via revuo. Ĝi estas plejparte tre sukcesa. Fabeloj, kiel »Ko- lektado de glanoj« (junio) kaj »Polpo kaj kato« (julio) forte atribuas al konoj de Eŭropanoj pri japana animo. Kial ili tiom maloftas? (Vere ĉi tiu riproĉo estas iom nemotivita, ĉar kiel havu literaturo vastan lokon en revuo, kia O. I.?) Laŭdinda estas ankaŭ ilia lingvo, ĝi bone imi- tas la fabele naivan tonon de la eŭropaj samspecaĵoj, kaj havas krome apartan ĉarmon, en kiu ni emas malkovri japanajn karakterizaĵojn. Ankaŭ la du »Poemoj en Prozo« de Onisabro Deguĉi en la aprila numero (»Prozo en Po- emoj« en la enhavtabelo; ĉu ironie?) estas interesaj, mal- graŭ la kelkoke kurioza fantazieco. La »Skizoj el la vivo« de sinjoro Simomura agrablas por lego.

Malpli sukcesaj estas ĝenerale la poemoj. Sinjoro Klemens Wiczorek petas en sia poemo »Al sankta sinjoro Onisabro Deguĉi« (aprilo) la helpon de l' supre nomita sinjoro por povi verki la poemon. Sed la vokita sinjoro kredeble estis alie okupita; nur tio povas esti la kaŭzo, ke la poemo tiel malbone sukcesis. Sinjoro Friedrich Hahn ne petis en sia poemo pri helpo, kvankam li estus tion urĝe bezoninta; kun helpo eble pli bone estus suk- cesinta almenaŭ la ritmo.

Transirante al la pli seriozaj aferoj, unue mi mencias

respondan afrankon bv. aldoni) atendas pri tio plezure proponojn de la legantoj.

*

Tamen escepto: Nia itala amiko-esperantisto ne hezitis longe. Trovinte la aferon bona, li tuj faris la tradukon kaj proprariske eldonis. Li konvinkigis, ke li ne agis malsaĝe. Laŭ esperanta originalo eldoniĝis rapide ankaŭ tradukoj bulgara, portugala (en Ameriko) kaj rumana.

O. G.

La verko, pri kiu s-ano Ginz supre parolas, ĵus aperis ĉe Literatura Mondo en formato de 23.5×15.5 cm. sur 144 paĝoj, dukolora kovriĉo kaj preskaŭ 250 ilustraĵoj. Prezo sv. fr. 4.50 plus 10% por sendkostoj. Membroj de AELA rajtas aĉeti unu ekzempleron por sv. fr. 1.80 plus 15% por sendkostoj, de nete por sv. fr. 2.07.

la artikolserion »Kompara religiscienco«, espereble daŭrigota. (Kial ĉesas tiom da serioj?) La ĝis nun aperintaj partoj tre interese kaj serioze traktas la budhismon. Tre taŭga estas la opinio de l' redakcio: en Eŭropo multaj interesiĝas pri budhismo, tamen malmultaj havas ekzaktan konon pri ĝi. (Kial vi uzas jen Budaon, jen budhismon?)

Same interesaj, sed iom strangaj estas la artikoloj pri Oomoto. Necesas ekzemple granda dozo da kredo por englutiti asertojn, kiaj: »akvo bruligas la sunon«, »la tero estas pli glata ol globa«, »aŭ »tago kaj nokto estiĝas pro aŭtomata kliniĝado de la tero«, ktp. Kaj ĉion ĉi kun la serioza promeso ke la scienco baldaŭ koincidus kun la Oomoto-a percepto. (Kion ni faros, se ni atingos tion?)

A l k r i z a d r a k o
S u r p r i z a h a k o :
A E L A !

En la notoj oni insistas, ke ankaŭ la kristanismo havis siatempe malĝustan percepton pri la universo; sed konsideru, ke tio estis siatempe.

Tre-tre plaĉis min la konsciencia laboro farita de sinjoroj Nakamura kaj vi per traduko de Lao-Ce. Tiu via ekzemplo estas nepre daŭriginda kaj de vi mem kaj de aliaj, kiuj komprenas tiel malfacilan traduklaboron. Ankaŭ la klarigoj estas kontentigaj nur en la klarigo pri Ĉapitro IIIa de Etiko vi malatentis la — tre versaĵnan — klarigon, nome ke ĝi estas — sarkasmo. Al vi, sinjoro Major, kiel al insista hungaro, mi rekomendas la libron de Bernát Alexander pri tiu ĉi temo.

Tre interesa estis por mi la artikolo »Moderna Vortaro« de Koogecu Nišimura (decembra numero). El ĝi ni ekscias, ke la japanaj gazetoj, ĵurnaloj, libroj ktp. bezonas por ĉiutaga uzo *mitojn da fremdaj vortoj*, okcidentdevenaj. Tio signifas, ke la neologismoj uzataj de E-aj verkistoj grandparte ankaŭ por la japanoj ne estas tiel fremdaj, kiel oni opinius, almenaŭ ne pli fremdaj ol al hungaroj. Poste, se la japanoj ne protestas kontraŭ la okcidenta vortimperialismo en *sua propra lingvo*, kiel ili povas tion fari en la lingvo Esperanta. Fine, sinjoro Nišimura laŭde mencias la lernemon de la japanoj, kiu donas al ilia intelekto larĝan horizonton. Mi plene konsentas pri tio, mi nur bedaŭras, ke ĝuste la japanaj esperantistoj volis pruvi la malon per sia rezolucio.

Sed solan mian grandan malplaĉon mi ne povas kaj volas prisilenti. Du sinjoroj — Yamato Masaharu kaj iu alia, kiu senbridas sub la pseŭdonimo M. P. (kvankam mi suspektas la samecon de tiuj du sinjoroj, ĉar la stilo kaj aplombo tro similas) — misuzas la lokon al li disponigitan en maniero nepriskribeble sentakta. Ke Yamato Masaharu estus pseŭdonimo, tion mi ne povas kredi, ĉar la sama sinjoro tro akre kondamnas la agadon sub pseŭdonimo en siaj »Konsiloj al Recenzantoj«. Kredeble en la Oomoto-Muzeo de Kameoka estas ekspoziciita la granda kulero, per kiu ĉi tiu sinjoro manĝis la sciencojn. Li superŝutas nin per aro de patrecaj konsiloj, ekzemple li rekomendas ne paroli pri aferoj, pri kiuj oni ne havas kompetentecon. Kaj sian kompetentecon nepran li pruvus per la jena aserto: »en la klasika tragedio (greka) estas neniom da agado; la okazaĵoj pasas kvazaŭ projektitaj (?) sur la inertan animon de l' herooj...« Li nomas la tradukinton de Dante kaj Madáč simple »neresponda elemento« pri Esperanto. Li parolas pri la »triumua abortitaĵo ĝenerale priridata« (lici-darfi-durfi), ne sciante aŭ prisilentante, ke *lici* estis proponata ĝuste kontraŭ la neinternacia *darfi*. Li juĝas pli bona ol ili la radikon *sme* »ĉar ĝi estas almenaŭ vivanta radiko de l' slavaj kaj de l' angla lingvo«, ne sciante aŭ ne volante scii ke *lic* estas unu el la plej internacie vivantaj radikoj (angla *licit*, germana *Lizenz*, itala *licito*, hispana *lecito*, franca *licite*, rumana *licentia*, pola *licencya*, rusa *licencia*), ke ĝi estas bone konata el la latina termino *poetica licentia*, ke la vortaro de Verax enhavas la vorton *licenco* (licaĵo). Post la artikolo de ŝro Nišimura (vd. supre), mi ne estus

surprizita, se ĝi ekzistus ankaŭ en la japana lingvo. Nu, ĉu en la supraj vortoj ne estas pli rekonebla la radiko *lic*, ol en *sme* la angla *may*? Ŝro Masaharu, kiel kompetentulo diras ne. Sed ĉu ŝro Nasamura scias, kiuj estas la oficialaj vortoj? Se jes, estas strange, ke li uzis plurajn neoficialajn vortojn en la frazo, en kiu li anoncas la »puran Zamenhofan stilon«. Tiel simplan aferon om vere estus povinta esprimi eĉ per la Fundamenta vortprovizo. Entute la sinteno de Oomoto Internacia pri la neologismoj estas tute kurioza. En ĝi oni trovas preskaŭ ĉiutage vorton netroveblan en la Plena Vortaro, sed en piednoto estas klarigita, ke ĝi estas nepre necesa. Nu bone. Sed se en L. M. oni trovas nepre necesa novan vorton, la trovanto estas »kompatinda teoriulo«. Ĉu oni scias eĉ Oomoto, kio estas teorio? Jen mi diras: teoriulo estas Kalocsay, kiu verkis siajn 25.000 versliniojn nur en teorio kaj fantazio.

Mi ne havas lokon por karakterizi la »saĝ-rabenadon« de M. P. Mi diras nur: sinjoro Major, vi tre bone agus, se vi ekstermus tiujn du sinjorojn el la redaktantaro; per tio vi konsiderinde altigus la nivelon de la revuo.

Pri la lingvo de O. I. mi ne havas lokon paroli detale. Bedaŭrinde. Mi diras nur, ke mi surprizite legis: »ambaŭ Lao-Ce kaj Konfucio«. Mi vere ne sciis, ke ekzistis du Lao-Ce. Entute tamen la stilo estas ne malbona kaj sentiĝas eĉ evoluo tiarilate.

Ne senpacienca, mi tuj finos. Mi volas nur diri al vi, ke tiun tonon, kiun vi trovas tiel malagrabla en ĉi tiu artikolo, propre vi komencis. Vi inklinis al piketoj, al superemaj konsiloj, al malagrablaj manklaradoj, al ĉionpli-bone-scio. Kaj kiam oni ironie menciis ĉion ĉi, vi lasis libera sron Masaharu, por ke li vomu fajron kaj lafon. Se vi deĉutimigos vin de via ne ĉiam motivita superemo, se vi lernos senti pli da respekto al personoj, kiuj tion meritas — vi certe iĝos tre agrabla persono kaj valora laboranto por Esperanto. Ne koleru pro mia sincereco: min gvidis — por ke mi citu viajn vortojn — nur la sincera volo vidi vian revuon pliboniganta. Kaj vidi vian sintenon pli plaĉa. En ĉi tiu espero ni enfosu la tomahaŭkon kaj fumu la kalumeton. G. Karcajg

Sen literatura gazeto

ne povas vivi iu ajn literaturo


Literatura Mondo

estas la sola pure literatura revuo en Esperanto!

Ĝia enhavo kaj aspekto povas konkuri kun multaj samspecaj naciaj revuoj. — Sed por povi vivi ĝi bezonas ankaŭ vian abonon

Se vi konas ĝin, abonu. Se vi ne konas ĝin, petu tuj senpagan prospekton aŭ specimenon kostantan unu respondkuponon de la administracio
Budapest, XI. Mester-utca 53. V. 5.

R E C E N Z O J



Dante

Lignogravuro de Dezső Fáy

DANTE: INFERO. Tradukis: K. Kalocsay. Budapest, Literatura Mondo, 1933, pp. 288. + 1/4 ilustraĵoj. Form. 23.5×15.5 cm. Prezo broŝ. 8.80 fr. sv. bind. 11.— fr. sv. + 10% por sendo.

Antaŭ dek jaroj, en la antaŭparolo de Esperanta gramatiko por Italoj, montrinte la gravecon de Esperanto kiel traduklingvo, mi tamen deklaris, ke oni devas atendi malpli efikajn rezultatojn en la verkoj, kie la intereso pri la formo superas tiun pri enhavo (do en la pure literaturaj verkoj), kaj mi skribis, ke »estas malfacile havi eĉ nur mezbonan tradukon de la *Dia Komedio*«.

En la lasta eldono de nia gramatiko, mi forstrekis tiun ĉi frazon, ĉar dume aperis la unuaj kantoj de la traduko de d-ro Kalocsay.

La tasko estis malfacilega: esprimi en lingvo simpla kiel Esperanto pensojn kaj sentojn plej diversnuancajn, en ritmo- kaj rimo-sistemo ŝajne glata sed efektive postulanta de la aŭtoro grandan studon kaj penon. Pluaj malfacilaĵoj prezentiĝas kompreneble al neitalo, kiu devas familianiĝi kun lingvo ne sia, antaŭ ol plene penetri en la mondon de Dante. Superi tiujn barojn estis eble nur dank' al interpreto ne tro rigida de lingvaj kaj metrikaj malpermesoj, sed ĉefe dank' al poeta genio. Tial ni havas hodiaŭ ne nur sufiĉe bonan, sed ankaŭ indan tradukon de *Infero*.

Oni pensu, kiajn rimomalfacilaĵojn oni devas superi por uzi la »tercinon« de Dante, ĉiam restante fidela al la teksto: uzi trifoĵan rimon alterne kun alia trifoĵa rimo. Iam la vortoj italaj kaj esperantaj similas, sed plejofte tio ne okazas, kaj jen la tradukanto devas trovi inter la apudaj vortoj aliajn, kiuj permesu tian rimadon.

Jen ekzemplo. Dante parolas pri damnitaj, kiuj transformiĝas en serpentojn, kaj poste ree fariĝas homoj. Dirinte, ke en Libio ne ekzistas tiom da kvalito de serpentoj, li aldonas, ke eĉ ne en Etiopio kaj Arabio:

...Nè tante pestilenze, nè si ree
Mostrò giammai con tutta l' Etiopia
Nè con ciò che disopra il Mar Rosso èe.
Tra questa cruda e tristissima copia
Correvan genti nude e spaventate,
Senza sperar pertugio od elitropia.

Jen laŭvorta traduko:

»...nek tiom da pestajoj, nek tiel malbonajn iam montris (Libio), kun la tuta Etiopio kaj kun tio, kio estas super la Ruĝa Maro (t. e. Arabio). Meze de tiu kruela kaj malagrablega (serpent) aro kuris homoj nudaj kaj timoplenaj, sen espero de (rifuĝ) truo aŭ de heliotropŝtono« (t. e. iĝi nevideblaj helpe de iu smaragdosiĝinta ŝtono, kiun oni kredis havi tian kapablon).

La tradukinto elektis kiel rimvorton en la 2a verso *Etiopio*, kaj jen la neceso trovi du aliajn *-io-* vortojn en la 4a kaj en la 6a verso. Li elektis kiel eble plej bone: la serpent'aro fariĝis *vermlegio*, kaj al la kvalitoj de heliotropŝtono li aludis per *ŝtonmagio*:

*Serpentojn tiel pestajn, tiel fiajn
ne havas kune tuta Etiopio,
nek super Ruĝa Mar' ni trovas tiajn.
Kaj tra ĉi turpa, kruda vermlegio
kuradis homoj, nude, timofroste,
sen la esper' de sav' aŭ ŝtonmagio.*

Tiu lasta estas ne nur bona rimvorto; ĝi havas pluan avantaĝon: ĝi permesas al la leganto rekte kompreni, sen la neceso aldoni noton por klarigi, kio estas heliotropŝtono kaj kiajn kvalitojn oni atribuis al ĝi, kaj samtempe deprenante nenion esencan.

Oni pensu, ke similajn problemojn la tradukinto devis solvi por ĉiu verso, kaj oni vidos, kian akrecon de interpreto kaj juĝo, kian lingvo-majstrecon li bezonis.

Oni ankaŭ komprenas, ke ne estis ĉiam eble resti en la reloj de la perfektaj rimoj, sed ke li devis kelkfoje uzi parenkrimojn, tio estas asonancoj kiel *momento*: *ventro, lange: flanke* aŭ, feliĉe tre malofte, konsonancoj, kiel *senmanke: ronke*.

Kaj, plue, neologismojn... Pri la neologismoj spiras malbona vento ĉe la esperantistaro. Prave, laŭ mia opinio. Se oni proponus al mi por oficiala aprobo eĉ nur unu kvinonon de la neologismoj uzitajn de d-ro Kalocsay en tiu ĉi traduko, mi voĉdonus *ne*. Sed ĉi tiu ne estas la oportuna loko por diskuti la tutan problemon pri la respektivaj rajtoj de la komuna lingvo kaj de la alta literaturo: nun ni devas formi al ni opinion pri la vortoj riskitaj de d-ro Kalocsay en ĉiu unuopa kunteksto, t. e. por traduki iun delikatanuancan italan esprimon en tercino plena de malfacilaĵoj. Tri vojoj estas eblaj: senskrupule malproksimiĝi de la originala teksto — uzi neologismojn — aŭ rezigni pri la traduko. Ambaŭ unuaj vojoj prez-



K. Kalocsay, la tradukinto

entas malbonajn flankojn — la tria ne estas ja elirejo, sed forkurejo...

D-ro Kalocsay al si demandas: »Kion faris Zamenhof?« kaj respondas: »... mi kredas, ke la vera Zamenhofano estas ne tiu, kiu sklave sin tenas al la zamenhofa vortmaterialo, sed tiu, kiu obeas la zamenhofan postulon pri la serĉo kaj solvo de malfacilaj taskoj kaj kiu daŭrigas la pliriĉigon de la lingvo laŭ la zamenhofaj principoj kaj metodoj«.

La samon, ni povus aldoni, faris ankaŭ Dante. Kiam ne ekzistis en la itala vortprovizo la bezonata nuanco, li uzis plej ofte latinan, kelkfoje arkaikan aŭ dialektan formon.

Ke, tamen, la tradukinto ĉiam eluzis ĉiujn eblecojn de la Fundamenta vortprovizo, mi ne kuraĝus aserti (oni ofte rimarkas ian ostracismon pri »mal-« vortoj).

Versoj plibonigeblaj aŭ korekteblaj certe antaŭ ekzistas: kelkaj nekonformecoj al la kritike korektita teksto de Dante, kelkaj diskutindaj interpretoj (*sipa*, XVIII, V. 61 ne estas *jes*, sed dialekta formo de itala konjunktivo, »ke li estu«), kelkaj nekonstantecoj aŭ eraretoj en la grafio de grekaj aŭ latinaj nomoj, kaj en la akcentado kaj silabmezurado de italaj nomoj, ktp. La afableco, per kiu s-ro Kalocsay akceptis rimarkojn kaj konsilojn pri la dek kantoj, kiujn mi povis tralegi antaŭ preso, min bedaŭrigas, ke mi ne povis tion fari ankaŭ por la aliaj.

Kelkaj freŝbakitaj Dante-legantoj certe de tempo al tempo ŝatus pluajn klarigojn (eble piednotajn?). Ekz. kiam Dante parolas pri la Troja-ĉevalo dirante ĝin

*farinta pardon
eliran por la Romaj semoj sanktaj
(XXVI, v. 6o),*

la aludo al la migrado de Eneo kaj al ĝiaj konsekvencoj (interalie la fondo de Romo) estas evidenta nur por spertuloj.

Sed ĉiuj ĉi estas malgravaĵoj kompare kun la tuto de la verko. Se mi volus resumi kelkvorte ĝian gravecon por la esperanta literaturo, mi ne povus tion fari pli bone ol per la verso, per kiu Dante juĝas la gravecon de Virgilio por la latina lingvo kaj literaturo:

*per li,
kion ĝi povas, montris lingvo nia.*

B. Migliorini.

**En la kriza epoko
Jen deviza alvoko
Ribela:**

**Librojn legi necesas,
Eldonegi ne ĉesas
AELA!**

W. J. A. MANDERS ODUSSEIAS DE HOMEROS
Eld. W. J. Thieme & Cie, Zutphen, Nederlando, 1932.

S-ro W. J. A. Manders aperas kiel nova stelo sur la Esperanta ĉielo kaj debutas per la majstra traduko de la libro, kiun germana eldonisto titolas per »Libri librorum« (t. e. libro de la libroj) per la Odisejo de Homero.

S-ro Manders, bonvolu akcepti mian komplimenton. Mi esperas, ke vi ne vane laboris, kaj ke la esperantista popolo jam estas matura ĝui tian verkon, nun prezentitan... kaj la sekvantajn, ĉar espereble vi daŭrigos vian laboron kaj liveros al ni plejble baldaŭ ankaŭ aliajn verkojn el la antikveco. En Esperanto ni ja ne posedas multajn el ili.

Pri la enhavo, preskaŭ ĝenerale konata ĉi foje mi silentu. Versajne post kelka tempo mi donos pli-malpli detalan studon pri la aŭtoro, Homero, kaj lia verko. Krome multaj scias tiun. Por la aliaj mi nur volas diri, ke la Odisejo (Manders uzas la grekan nomon »Odus-

seias«) estas epopeo el la antikva Grekujo. Odiseo (ĉe Manders: Oduseus), reirante post la malvenko de Trojo (ĉe Manders: Troia), travivas multajn okazaĵojn kaj fine atingas sian patrujon Ithaka.

Nun mi parolos nur pri la traduko kaj ĝia lingvo.

Post »Enkonduko« pri Homero (ĉe Manders: Homeros) kaj lia verko, sekvas malgranda ĉapitro pri »La Propraj Nomoj«, kies originalan ortografion Manders konservis. Nu, tio estas principo, kaj kiel tia, akceptebla. Mia kutimo estas plejble transkribi ilin laŭ la esperanta ortografio por eviti misprononcadon. Nun ja multaj homoj, kiuj neniam lernis la grekan lingvon, ne povas laŭtlege la tradukon pro tio, ke ili ne povas prononci la nomojn. Estas vere, ke sur paĝo V. troviĝas kelkaj prononcreguloj, sed tute ne sufiĉaj. Mankas ekzemple la prononco de *th* (t-h), *ph* (f, aŭ eble p-h), *ch* (ĥ; en la verko versajne preseraro), *au* (aŭ), *eu* (eŭ), *ai* (aj), *ei* (ej), *u* (ŭ; mi skribus y por eviti miskomprenon). Krome, eble estus bone ĉiam montri la varian grekan akcenton per akra superstreko (Antinoos).

Sekvas ĉapitro, nomata »Klarigoj«. Sed 4½ paĝoj, maldense presitaj, kompreneble ne sufiĉas por klarigi la Odiseon al homoj, kiuj ne estas »en« tiu afero. Kiuj lernis la grekan lingvon, tiuj eĉ sen la »klarigoj« komprenas la verkon; ili per si mem scias, kio estas la *tertremitigulo*, kaj kio estas *lotoso* kaj *grandbula*. Mi dezirus *kelkpaĝan klarigon pri la tuto kaj piednotojn al ĉio, kio nur iel povas esti neklara* al ne-grekistoj. Ĉu ne-grekisto, por preni ekzemplon, scias, kial oni tri fojojn alvokas la mortintojn (pĝ. 96—31)? Estus tre bone, miaopinie, verki sufiĉe detalan komentario al tiaj libroj kaj nur kune kun tiu komentario eldoni ilin. Eble, se s-ro Manders eldonos ankaŭ la Iliadon, li povus verki aparte eldonotan kunan komentario pri ambaŭ.

Sekvas la traduko mem, kaj tuj oni rimarkas, ke la tradukinto trovas unuan lokon inter la esperantistaj tradukistoj. Li majstras la lingvon *el stila vidpunkto*. Lertega li estas en la kunmetado de la »epitheta ornantia« (ornamantaj epitetoj). Estas ĉiam amuze renkonti novan el ili. Efektive, la tradukinto pravus skribante sur pĝ. IV: »Esperanto montriĝis mirinde taŭga lingvo por la tradukado de la diversaj »epitheta« (klarigaj adjektivoj)«. Certe tio estas avantaĝo de Esperanto, kiu tiel »povas konservi la plej karakterizan econ de la lingvo de Homeros« (pĝ. IV—6).

La traduko, tra la tuta verko, estas klara kaj bela, kvankam oni devas iom kutimiĝi al la iom stranga vortsinsekvo. Esperanto ankaŭ tie montriĝis vere genia verko, ĉar eĉ la treege liberan vortsinsekvon de la greka lingvo antikva ĝi povas senpene adapti. Evidente la tradukinto klopodis plejble konservi la vortsinsekvon de la originalo. En tiu klopodo tamen li faris kelkajn eraretojn. Ĉar, kvankam tio ne estas fiksita en gramatika regulo, la lingvo-uzo ne permesas diri »en kies urbon kaj landon ajn« (pĝ. 109—22). Tiun strangan lokigon de la vorteto »ajn« ni tre ofte renkontas en la libro. Same »rakontinta estos« (pĝ. 93—3/8) ne estas la kutima maniero, kaj ĉi tie ne instigas al tio la vortordo de la greka originalo. Sed feliĉe tiuj figuroj nur restis relative malmultaj en la preskaŭ 300-paĝa verko.

Foje mi eĉ konjektis, ke la tradukinto skribis tiel por vekti la impreson pri antikveco. Sed por tio oni pre-

CU VI SCIAS

ke en Francujo pli ol 500 instruistoj parolas jam Esperante?

CU VI SCIAS

ke okazis Esperanto-Kongreso, kie la kongresanoj vojaĝis kaj restadis je la kosto de la ŝtato?

fere sin turnu al aliaj parolturnoj, ĉar nepre oni devos konsenti, ke Manders sukcesis en tio. La *atmosfera de la libro* en ĝia esperantlingva traduko certe estas *el la antiveco*. Kelkaj (mi nur citas malmultajn por ne troampleksigi mian studon) tre sukcesaj estas ekz. du kaj kvindek (anstataŭ la moderna »kvindek du«; la saman figuron ni renkontas en kelkaj naciaj lingvoj, ekz. en la angla »two and fifty« anstataŭ la ordinara »fifty-two«; vd. pĝ. 82—3/9); frenezi de ĝojo (Zamenhofs uzo de la prepozicio »de«, i. a. en la Maln. Test., multloke); »mi estas memora pri tio (anstataŭ la mallonga moderna »mi memoras«; pĝ. 250—16), kuŝantaj urboj (anstataŭ »situantaj urboj«; pĝ. 94—35/8, ktp.)

Kvankam *stile* la verko estas eminenta, *gramatike, lingve* ĝi enhavas kelkajn negustajojn.

Ĉu estas nura komposteraro la vorto »precisa«, kies ĝustan ortografion mi nenie trovis en la verko? Same la vorto »urugano« ne estas esperanta, 5 fojojn en la verko; ĝusta ortografio nenie.

En Esperantujo oni ne *alhas* la vestojn, sed surhas. »Al« ĉiam havas en si iomete la sencon de direkto.

Se du batalas, unu estas la *pli forta* (kaj ne *plej*, 218—19/12; kp. la grekan »*ferteros*« kaj ne »*fertatos*«).

Escepte vi (do ne »vin«) verŝajne estas skrib-aŭ komposteraro, ĉar aliloke troviĝas la ĝusta akuzativo.

Sed post la prepozicio »post« oni tute ne bezonas, nek povas uzi la akuzativon. Vidu sur paĝo 128—15 kaj 21 kaj aliloke ekz.: »Post ŝin mi vidis...«; »post lian revenon« (2—3/6).

Strangan esprimon mi trovis sur paĝo 288—35/4: »Mi mem *ĝin* estas« kaj sur paĝo 287—42: »Iam li *ĝin* estis (la lasta frazo ne estas komprenebla en la originalo).

Por la ofta vorto »amantoj« eble pli taŭgus la zamenhofs »amisto« (kp. ekz. Maln. Test., Hoŝea II, 5).

Virinoj ne *prostituas kun* viroj (238—15/4), sed estas prostituataj de ili.

La formo »*returnen iri*« k. s., kiun feliĉe nur du fojojn mi trovis (79—23/6 kaj 88—15/7) ne estas bona. Oni ja ne iras »al la returno«, sed »laŭ returna maniero«. Multloke la esprimo estas en bona ordo. Ilustras bone la sencan jena esprimo: »ŝi iris returne supren« (196—20/4).

Pri la ortografio de la *numeraloj* Manders tute scias nenion. Jen li skribas »dekdu«, k. s. Mi klopodis trovi certan unuecon aŭ disvolviĝon en tiu uzado, sed vane. Ankaŭ la ortografio de aliaj numeradoj estas tre neregula (tricent kaj tri cent; deksep kaj dek sep, ktp.)

Same neregula estas la ortografio de *depost* (tri fojojn) kaj *de post* (12 fojojn). La antaŭa formo jam tiel enradikiĝis, ke oni ne povas ĝin nomi eraro, sed oni estu konsekvenca. Notinde estas ke ĉe *depost* la akcento estas sur de. Laŭ mia sento tio estas tute plaĉa, mi ĉiam parolas tiel.

Nepre eraro estas tia uzado de *da*: *preni da la nutraĵo, kiu da tio trinkis, da tio plenigite, da kiuj troviĝis* ktp.

Konklude, tamen, mi povas nomi la aperon de ĉi tiu bela verko grava okazaĵo en Esperantujo. Ni nur esperu, ke baldaŭ aperos pli da tiaj. *Joh. Hartog*

CU VI SCIAS

ke la siatempa fondo de la Lingva Komitato ne estis unuanima kaj batalis per interesaj argumentoj partio kontraŭ ĝia starigo?

CU VI SCIAS

ke la unua ŝtato, kiu deklaris Esperanton klara lingvo en la telegrafa servo, estis Brazilo?

JULIO BAGHY, VERDAJ DONKIHOTOJ. Eldono de Aleksandro Szalay, Budapeŝt. Paĝoj 221. Formato 15.5×13.5 cm. Prezo broŝ. 2.— duont. bind. 3.—, tole bind. 5.— fr. sv. afrankite.

La libro konsistas el du partoj: el romano titolita »Paŭlo Paal« kaj el naŭ malgrandaj humorajoj satirantaj la E-movadon.

La Esperanta legantaro jam delonge atendas romanon (originalan kompreneble) pri la esperantista vivo. Ni jam tiom alkutimiĝis al la ideoj de E-popolo kaj E-lingvo, ke konsekvence la konscio pri esperantista vivo iĝas por ni tute klara. Ni sole ne scias klare, kiaj estas la fenomenoj de tiu esperantista vivo, en kaj per kio ĝi riveligas, kian

Kelkuloj miras: Donaco!
Kalkuloj diras: Sagaco!
A E L A !

formon kaj karakteron ĝi havas. Sendube nur ia kolektivo povas krei tiun vivon aŭ pliĝuste la grundon aŭ bazon por tia vivo, kaj tio nature estas ebla nur tie, kie iun kompaktan amason kunligas ia ĝenerala ideologio, ia komuna vivocelo. Ĝis nun, bedaŭrinde, ne ekzistas kolektivo esperantista kaj malofte, nur unu fojon en la jaro, trafulmas la verdan mondon brilsajno de »popola« vivo, nome dum la universalaj kongresoj. Tial oni povas pli malpli trafe priskribi la vivon kongresan, tial oni povas pli malpli lerte verki rakonton pri esperantisto, sed priskribi la »esperantistan vivon«, la »vivon de unu el ni« — kaj sub »ni« ni komprenas: ni esperantistoj — estas almenaŭ afero tute nereala.

La esperantismo suferas nun pli ol ĉiam antaŭe fortan krizon ideologian. La noblaj ideoj de la Majstro ne estis konkretaj, sed nur — kiel li mem diris — sentblaj. Nu, la sentkapablo de homoj estas tre vasta kaj ĝenerala. Ni mem hodiaŭ atestas tre grandan metamorfozon de homa sentemo. Baghy, kiu estas pasia apostolo de homeco, konscias la nunan idean palecon de l' esperantismo, kaj li penas prezenti al ni modelon de vera esperantista ideo, sed li ne konkretigas tiujn ideojn. En la libro svarmas noblaj sentoj, profundaj aspiroj kaj ne findiritaj ideokonfeso. Se Liza Berkes estas tiu, kiu reprezentas la esperantistan ideologion, mi devas konfesi, ke mi tre malmulte lernis de ŝi. Tiu ĉi blindulino estas treege simpatia kaj aminda tipo, sed tiaj ideoj deklaroj estas tiom nebulecaj, ke estas malfacile konjekti ilin. Fine, el la sinsekvaj okazaĵoj oni ricevas la impreson, ke la ĉefa trajto de l' esperantismo estas ia bonfaremo mezkvalita.

Jes, la romano »odoras« filantropion. La tuta »kariero« de Paŭlo Paal sekvis el kelkaj bonfaroj de kelkaj mildkoraj geuloj. La sana, kvankam malforta, kaj malriĉa terlaboristo Paŭlo Paal sukcesas esti akceptita en sanatorion de tuberkulozuloj dank' al la mildkoreco aŭ kompatemo de kuracisto. La blinda sinjoridino Liza Berkes, tre sentema pro sia malfeliĉa sorto, montras vere filantropian geston: ŝi ofertas multe da interesiĝo al la malriĉa laboristo, kiun ŝi »civilizas«. Dank al ŝi Paŭlo Paal komencas lerni Esperanton, faras tre rapide gravajn progresojn en nia lingvo ĝis tia grado, ke li baldaŭ kapablas oratori en malgranda E-rondo, li estas delegita al la nacia E-kongreso ktp. ktp. — kaj ĉion ĉi Baghy priskribas kiel veran karieron. Certe ni povas respekti homon, kiu iun fremdan lingvon funde ellernis, sed entuziasmon tio ne povas vekti en ni. Estus multe pli trafe satire priskribi la »karieron« de Paŭlo Paal, sed ĉi-okaze Baghy tute ne ŝercis, kontraŭe li tute serioze

traktis la aferon! Ŝajnas tamen, ke en la fino la aŭtoro rehonorigas sian heroon, al kiu li malfermas la okulojn kaj ordonas serĉi solvon de premantaj lian cerbon sociaj problemoj en la nemiskompreneblaj laboristaj deziroj. Oni povas pri tiu pensmaniero konsenti aŭ ne konsenti, sed certa estas tio, ke ĝi estas pensmaniero, eĉ tre grava, ĉiokaze absolute konkreta, kaj ne tiel sfinksa, kiel la nebulcaj aferoj de la sentimentala kaj cetere nesperta, ĉar nur 15-jara, knabino Liza Berkes. Jes, Paŭlo Paal kaj la aliaj gravaj agantoj en la romano estas esperantistoj, eĉ tre amindaj individuoj, sed, kio estas la esperantismo, ili ne diras al ni. Ja, en la nuna tempo estas generale necble difini la esperantisman ideologion.

Tre spritaj karikaturoj estas la satiraj noveletoj, kolektitaj en la dua parto de la libro sub titolo *La Rondo Familia*. Tie Baghy kun majstra lerteco pentras la klasikajn verdajn tipojn tiom de ni ŝatatajn malgraŭ la groteskaj detaletoj kaj trajtoj, kiujn ĉiu el ni en pli aŭ malpli alta grado ja posedas.

Kion diri pri la lingvaĵo de Baghy? Bona, vigla, flua, kvankam ne sen cetere negravaj eraretoj kelkloke, kiuj supozeble koruptis la atenton de l' aŭtoro. Ekz. »injekte plilongigi la vivon« (paĝo 25) estas ne tute klara frazo. Mi preferus »per injekto«. Kelkloke mi trovas »sakrestiestro« anstataŭ »sakristiestro« (versajne nur preseraro). Sed kion signifas »filigranaj fingroj« (paĝo 37)? Ĉu la aŭtoro ne pensis simple pri »delikataj fingroj«? Ĉu vesto »decas« al la staturto, aŭ pli ĝuste »konformas«? Plue: La akvo (aŭ vino) estas »boligita«, ne »bolita«; »Dio donis kornojn al la bovo«, ne »la Dio«; »mangigi«, ne »mangantigi«.

Tre trafa estas la vorto »mortantadi«, ĝi estas disvastiginda.

Certe la libro, en kiu denove pruviĝas la freŝeco de la talento de Baghy, estas leginda, kaj neniu leganta esperantisto prokrastu la plezuron, kiun havigas al li la tralego de tiu ĉi interesa verko. J. Lejzerowicz.

F. AZORIN: UNIVERSALA TERMINOLOGIO DE LA ARKITEKTURO. (Arkeologio, arto, konstruo kaj metio). 215 paĝoj. Prezo 8.— frsv. inkl. sendkostoj.

La verko enhavas ĉirkaŭ 2000 fakvortojn kaj 2000 desegnojn, ĉiu radikvorto estas tradukita en 6—8 lingvojn. Do ĝi estas gravega gajno en nia fakvortara literaturo. Ne nur verkantoj aŭ tradukantoj de fakverkoj ĝin povas uzi kun granda utilo, sed ĝi estas plezura legaĵo ankaŭ por nefakuloj, donante al ili bonan enrigardon al la historio de l' belaj artoj, precipe de l' arkitekturo. La desegnoj ĝin faras kvazaŭ atlaso de l' arhistorio. La plurlingvaj tradukoj kaj la etimologiaj klarigoj ĉe ĉiu radikvorto certe interesos ĉiun lingvistikemulon; por ili estos tre interese eksciĝi, kiel multe atribuis la sanskritaj, keltaj, arabaj lingvoj al la internacia terminaro de l' artoj. Esperanto ree ekhavis verkon, pri kiu ĝi rajtas fieri.

Bedaŭrinde, ne ekzistas rozo sen dornoj: la fervora laboro de l' verkinto multe pli ĝojigus nin, se ĝi estus pli korekta lingve. Mi notas tie ĉi la lingvajn malkorektaĵojn de mi rimarkitajn; estas vere ĉagrene, ke ili restis en la libro, ke la verkinto ne reviziigis sian libron per lingve kompetenta persono.

Rilate al la elektitaj vortradikoj, mi havas malmultajn rimarkojn. Anstataŭ *arkitrabo*, mi nepre preferus *arkitravo*, kiu troviĝas en la Plena Vortaro. Anstataŭ *dekalki*, multe pli bona estus *paŭsi* (Verax), ĉar *dekalki* maloportune memorigas pri *kalko*. Anstataŭ *detrempo*, multe pli konformas al la origina vorto la radiko *temp*, krome ĉe *detremp* oni memoras pri *trem*; *tempra* (tempera) estas uzata en la itala lingvo. Anstataŭ *lazaredo*, en Boirac

troviĝas *lazareto*; nenia kaŭzo ekzistas ĝin ŝanĝi. *Pario* ĉsajnas al mi tre malbona vorto, ĉar ĝi signifas laŭ mi hundan apartigiton (*pariao* estas neakceptebla monstro). La Plena Vortaro registras la vorton *vando*; mi opinias, ke ĝi povas perfekte anstataŭigi la vorton *pario*. *Limbo* laŭ mia opinio ne signifas lumkronon (nimbo, aŭreolo); ĝi signifas la infervestiblon, lokon de nebaptitaj senpekuloj. Anstataŭ *okastilo* pli ĝusta ŝajnas la internacia *oktastilo*, ĉar ĝi ja ne estas *oka stilo*. Anstataŭ *retablo* mi preferus *ritablo*, ĉe kiu oni ne pensos je la E-aj elementoj *re* kaj *tablo*. Anstataŭ *visgota* multe pli taŭgus *vizigota*, kiel pli konforma al la internacia formo kaj prononco. Anstataŭ *sfumi* pli bona ŝajnas la Boirac-a *stompi*. Anstataŭ *iso* en kunmetoj, oni devas uzi *izo* (Boirac, Verax, Wüster, Plena Vortaro.)

Mankas nun tempo kaj loko por paroli pri la propraj nomoj. Sed *Herkuleso* ŝajnas al mi tute superflue longa anstataŭ Heraklo aŭ Herkulo. La specialan statuotablon mi nomus *hermo*, ne *hermeso*.

Inter la klarigoj estas uzataj kelkaj vortoj, kiuj estas nenie klarigitaj, kvankam ili apartenus al la fakterminaro. Mankas ekzemple la klarigo de la vorto *afuri*. Mankas la klarigo de *skalena*, *isocela*, *ekilatera*. Cetere, el ĉi tiuj la dua devus esti *izocela* (Boirac kaj Wüster) kaj la tria estas tute superflua, ĉar ĝi estas nenio alia ol *egilatera*. Mankas la klarigo de *smalto*, cetere same superflua (emajlo). Mankas la klarigo de *dekstrorsa* kaj *maldekstrorsa* (de maldekstre al dekstre kaj inverse), por kiuj cetere en Verax staras *dekstruma* kaj *maldekstruma*: multe pli konsilindaj, ĉar ili ne necesigas novan elementon *ors*.

Mi ne trovis en la libro la vorton *pitoreska* (kiu ne estas tradukebla per simpla *penrinda*) kaj la pentranskulptan terminon *kontraposto* (tia movo de korpo, ĉe kiu la korpopartoj (gambo kaj trunko aŭ kapo kaj trunko) direktiĝas kontraŭflanken.

Laŭ mia opinio, *terakoto* ne signifas skulptaĵon el kuirita argilo, sed mem la kuiritan argilon. Cetere, ĝin uzas tiel ankaŭ la aŭtoro; sub *koroplasto* mi legas: *terakota statueto*, do statueto el kuirita argilo.

Kelkaj malĝustaj vortoj: *armuro* (armaĵo); *konsakri* (konsekri); *destili* (distili). *Kamposankto* estas superflua, ĉar ĝi ja estas simple: *kampo sankta*.

Estas kurioza eraro, ke ĉe *kruc*, *tegmento* kaj *volbo* la bildoj estas numeritaj, sed la klariga teksto ne, aŭ la numeroj de ĉi lasta ne konformas al la numeroj de l' bildoj.

Jen ĉiuj miaj rimarkoj pri la esenca parto de la libro, pri la vortoj prezentitaj. Ili estas vere malmultaj rilate al la grandeco de l' materialo.

Sed nun mi venas al afero, pri kiu mi jam supre esprimis mian bedaŭron: la lingvaĵo enhavas tro multe da gramatikaj kaj sintaksaj nekorektaĵoj. Mi grupigas ilin sub 6 punktoj.

1. Neĝustaj kunmetaĵoj: anglestila, sameskala, diversecela ktp. Ili pekas kontraŭ la lingva logiko, ne konformante al la interna strukturo de l' vortkunmeto. Ĉar, ni vidu ekzemple la unuan vorton: en ĝi *angl* rilatas ne adverbe al la adjektivo *stila*, sed adjektive al la substantivo *stilo*, ĝia analizo do estas (angla stilo)a: karakterizita de angla stilo, apartena al angla stilo. La radiko *angl* do

CU VI SCIAS

ke la Societo Franca por Propagando de Esperanto havis jam 10.000 membrojn en la jaro 1903-a?

CU VI SCIAS

ke la unua senfadena interparolo en Esperanto okazis inter samideanoj Fernandes (Brasilo) kaj Houharr (Paris)?

devas konservi sian adjektivan finajon. La ĝusta formo de l' supraj vortoj estas: *anglastila, samskala* (samiaskala), *diverscela* (diversacela). Same malĝusta estas la ofte renkontebla *dubesenca*, kiu devas esti *dubsenca* aŭ *dubasenca*: (duba senco).

2. Malĝustaj vortaplikoj: *foje* (kelkfoje); *amplekse* (pli vastsence); *elvolva* (volba); *elkvarpinta* (kvarpinta); *elstarebla* (elstara); *ree* (ripete aŭ ree kaj ree); libro *iluminita* (ilustrita); *terkuirita* (el kuirita tero); *terkuirita* signifus: kuirita per tero aŭ en tero); *palaco de sinjoreco* (sinjoraro aŭ sinjorio); *banistoj* (baniĝantoj).

3. Neĝusta uzo de *ata* kaj *ita*: monaĥejo *regita* (regata) de abato; volbo *retata* (retita); verko *improvizata* (improvizita).

4. Sintaksaj nekorektaĵoj ofte tute kuriozaj: akvujo por kulturi fiŝojn kiel *amuzo, lerno aŭ industricelo* (por amuzo, lerno aŭ industricelo); *naskita el Latona kaj Jupitero* (generita de Jupitero al Latona); *por nudigi banistoj kaj ludantoj* (por senvestigo de baniĝantoj kaj ludantoj); arto *el* (de) la araboj; *ilo por mezuri diedrojn la ŝtonistoj kaj ĉarpentistoj* (ilo per kiu masomistoj kaj ĉarpentistoj mezuras diedrojn); ktp.

5. Nekorektaĵoj pri *ig* kaj *igi*: *logi* turistojn (logigi); *izoligi* (izoli); *naskigita* (naskiginta aŭ naskita); *diferenciigi* (diferenci); fero *fundanta* (fandiĝanta).

6. Akuzativo!!! Jen la plej malforta flanko de l' aŭtoro; liaj eraroj estas ne nur kuriozaj, sed kelkfoje vere fantaziaj. Jen: kiu formas *la hinda triunuvo*; ĝi ŝajnas *gigantan altaron*; dediĉita *gloran personon* (al glora persono); fari ilin *brilantajn*; lasi *loĝeblan la internon* (loĝebla la internon); ĝi similas *urbo de mortintoj*; loko kie ludas *aktorojn*; kavajo *por mortinton*; oni uzis ĝin kiel *notlibro* (notlibron); ktp. Vere apenaŭ ekzistas eblaĵo de eraro pri akuzativo, kiun la aŭtoro ne elĉerpis.

Kompetenta persono dum unu horo estus povinta ekstermi ĉi tiujn erarojn; estas preskaŭ dolorige, ke tio ne okazis kaj ke ĉi tiu bela, grava kaj valora verko devis aperi kun tiaj makuloj. Ili ja ne malgrandigas la gravecon de l' libro, sed la plezuron de l' leganto kaj uzanto konstante ĝenetas per pli-malpli malagrablaj pulopikoj. Kaj precipe malagrablaj ili estas por la recenzanto, kiu volus ĝoji, entuziasmi kaj laŭdi kaj anstataŭ tio li devas diri riproĉojn pri libro, kiu, malgraŭ ĉio, li amas kaj alletaksas. (y)

W. G. VAN DE HOLST: JACJO HOLM KAJ LIAJ AMIKOJ. Romano, tradukita el la nederlanda originalo de H. C. van Leeuwen. Ilustrita de Isings. 235 paĝoj. Eldonis G. F. Callenbach, Nijkerk, Nederlando. Prezo: tuttote bindita 2.50 nederl. guldenoj.

Ĝarma libro pri knaboj, destinata precipe por junuloj, sed pro la interesa karakterpentro de knab-animo certe leginda ankaŭ por plenkreskuloj, kiuj dum la legado povas bone refreŝigi siajn knabagajn rememorojn. En la romano temas precipe pri du knaboj, Jaĉjo kaj Kes, bonaj amikoj kaj bonaj knaboj. Kes estas brava knabo, filo de bonhavaĵa gepatroj; li kortuŝe helpas laŭeble sian malriĉan amikon, kiu sentas al li sindonan dankemon. Sed la ĉielo de ĉi tiu amikeco nubigas. Senpripensa ago de Jaĉjo metas lin en suspekton de ŝtelo, grave suspektata ĝas ankaŭ lia patro kaj inter tiaj cirkonstancoj eksance-

CU VI SCIAS

ke s-ano Grosjean Maupin, la ĵus mortinta prezidanto de la vortara sekcio de la Akademio estis plej akre anatemitita de la grupo el redaktoroj kaj kunlaborantoj de Lingvo Internacia (inter ili Cart) pro la granda kvanto da neologismoj en sia vortaro?

ligas la fido de Kes. Ankaŭ la aliaj knaboj rifuzas al Jaĉjo la amikecon, lin evitas ĉiu, li estas repuŝata de ĉiu kiel ŝtelisto. Hejme granda mizero premas lian familion. Sed la nuboj baldaŭ forpasas. Jaĉjo kurage savas la vivon de Laŭ, kiu estis ĝis tiam lia malica kontraŭulo. Per tio li reakiris la amon de Kes; la suspekto de ŝtelo ĉesas, ĉar oni kaptas la veran ŝtelinton. Ĉio iĝos ree bona, kaj la malnova amikeco daŭras plu senembarase.

Ĉi tiu historieto estas tre bone rakontita. Precipe restis en mia memoro la nokta vagado en la arbaro kaj la drama okazaĵo, kiam Jaĉjo savas la malican Laŭ el la glaci-truo de l' rivero. Ne mankas ĉarme rakontitaj scenoj, ekzemple kiam Jaĉjo luktas kontraŭ la tento manĝi la sekvinberan kukon aŭ kiam li rabas de hundo viandon por nutri la malsanan katon. Entute la libro estas valora riĉigo de l' E-a junulara literaturo.

Rilate la tradukon, unue mi devas ĝoje mencii rean plinombrigon de l' tradukista gvardio en la persono de van Leeuwen. Sajne la nederlanda movado preparas por ni ankoraŭ multajn tiajn agrablajn surprizojn. Li estas bona esperantisto, certe evoluokapabla: li akiris por si tiun gradon de perfekteco, de kiu eblas pluleviĝi ĝis konsiderindaj suproj. Tio estas, gramatike kaj sintakse li alproprigis la lingvon ĝis preskaŭna perfekteco kaj montrigas certajn signojn ankaŭ pri tio, ke li multe studis la literaturan lingvon kaj klopodas je l' validigo de l' lingva spirito propra. Sed tie kaj tie ĉi li ankoraŭ stumblas (li dirus: faletpaŝadas) ĉi-rilate, tio estas tute komprenebla: se mi nun trarigardas miajn unuajn tradukojn, mi urĝe deziras ilin multloke korekti.

Unue mi riproĉas la troan emon al longaj kunmetaĵoj: *singultploradi* (plorsingulti) *uzofini* (?), *pezmarŝadi*; *indulgokovri*, *malŝatafakti*, *ekfortiri*, *ektirliberigi*, *trenkureti*. Ĉi tiuj vortoj certe respondas al radikvortoj en la originalo, tial la tradukinto ne uzis anstataŭ ili du vortojn (*singulte ploradi*, *peze marŝadi*, *indulge kovri* aŭ *kaŝi*, *ŝire* aŭ *tire liberigi*, *piedtrene kureti*). Sed tiuj kunmetaĵoj tute ne donas la efektan de la originalaj vortoj! Ĉi tiuj estas forte esprimkapablaj, dum la kunmetaĵoj estas pezaj, deĉifrendaj, eĉ malklaraj. En tiaj okazoj do oni devas aŭ kontentigi je ĉirkaŭskribo, aŭ uzi neologismon (jen kion multaj, kiuj neniam tradukis, ne komprenas), aŭ trovi taŭgan malpezan esprimon en la ekzistanta vortmaterialo. Jen ekzemple frazo sur la 125-a paĝo:

«Knabo, momenton tenadu la brunulon, alie ĝi *trenmarŝos* plue...» ĉi tie en la originalo certe troviĝas sinonimo de *marŝi* aŭ *iri*: ia popularoma vorto kun iom da aĉ nuanco. Tie ĝi efektas nature, ĉar ĝi *ne akcentas* la trenadon de paŝoj, tiu trenado estas esprimita nur flanke. Male, en la kunmetita vorto *trenmarŝi* la radikvorto *tren*, ĝuste ĉar ĝi estas aparte esprimita, ricevas tro fortan akcenton, kio efektas ne nature, ĉar en tia okazo oni ne kutimas speciale karakterizi la irmanieron de la ĉevalo (la «brunulo» estas ĉevalo). La originala vorto certe respondas al la germana *schlarfen* kaj angla *scuff* (en la franca kaj itala lingvoj, laŭ mia scio, mankas por ĝi aparta vorto). Nu, mi do dirus: «alie ĝi *rampos* plue». Per tio mi esprimus tute bone la deziritan aĉ-nuancon, ne tro akcentante tamen, ke la maljuna ĉevalo trenas siajn piedojn.

Anstataŭ *malteni* mi dirus *delasi*.

Alia riproĉo estas pri la trouzo de la kompleksaj verboformoj. Vidu, kiel malofte ilin uzis Zamenhof kaj Kabe!

Kion mi diris pri la superflua akuzativo en mia recenzo pri «La viro en Francujo», tio validas ankaŭ ĉi tie. Ekzemple, sur pĝ. 98:

Furiozan salton! Jaĉjo kaptis la vitran globeton . . .
ĉi tie tute nenio motivas la uzon de akuzativo.

Pri la ĝusta lokigo de »ankaŭ« temas artikoleto en »Lingvo Stilo Formo«; mi ne volas ĝin ripeti ĉi tie.

»Vi« apud ordona verbo estas superflua.

»Liaj malamo kaj sufero« — Zamenhof ne uzas pluralon ĉe posedaj pronomoj, kiam ili rilatas al pluraj substantivoj.

Oftaj estas la eraroj pri la transireco de verboj: ruli (ruliĝi); ruliĝi (ruli); sovigita (?); ĉagreniĝi (ĉagreni); ekĉesi (ĉesigi sian fervoron); naŭzi (naŭziĝi); rompi (rompiĝi); mallevigi (mallevi).

Fine, la tradukinto estas iom malcerta pri la verbo-modoj. Post kvazaŭ li uzas jen kondiĉan modon (gratulon!) jen indikativon (kial la escepto?). Post *permesi* mi trovis indikativon (ĝi ne permesos, kĉ oni forprenos), post *esperi* kaj *timi* subjunktivon (esperante, ke li premu . . .; kvazaŭ li timus, ke Kes forkuru): devas esti ĝuste male. Post *timi* nenio motivas la subjunktivon, timo ja estas nek celado, nek malhelpo. Ĉe Zamenhof oni kelkfoje trovas ja subjunktivon, sed kun *ne* (li timis, ke li *ne* forkuru): ĉi tion oni povas pravigi per la subkompreno de *deziri* (li time deziris, ke li *ne* forkuru); sed en *ne* oni nenion povas subkompreni.

Strangaj frazoj: »se la knaboj nur rimarku«; »se nur neniu eniru«. Devas esti: »ke nur neniu eniru« aŭ »se nur neniu enirus«.

Kelkfoje tute neatendite frapas nin kondiĉa modo tute nemotivita. Ekzemple: ne eble kredi, ke li *forŝtelus* (anstataŭ *forŝtelis*; temas pri pasinta ago!).

Kvazaŭ kiel estas stranga aglomero de konjunkcioj.

La libro estas tre bele eldonita, tre bele bindita, ĝi aspektas vere impone. La abundaj ilustraĵoj estas tre plaĉaj. (y)

P o r e t k v a n t a m o n s u m e t o
P l e n i ĝ a n t a l i b r o b r e t o !
A E L A !

MOLIÈRE: LA MIZANTROPO. Komedio en kvin aktoj. El la franca lingvo tradukis *Prof. H. Boucon*. Paris, Esperantista Centra Librejo, 51 rue de Clichy, 1930. 104. pĝ. Prezo: fr. fr. 10.

La Mizantropo estas profunda satiro pri la societo; en ĝi la sincera, verdirema Alceste staras kontraŭ la mensogema, facilanima, eleganta mondo. Laŭ kelkaj biografoj de Molière, li aludas en ĝi pri siaj animsuferoj sentitaj pro la facilnimeco desia edzino. Pentrante la figuron de Alcesto, Molière tuŝas la limojn de l' plej profunda tragikomedio; la verko kaŝas tiel profundan tragedian kernon, ke nur draste aplikitaj farsaj elementoj povas en ĝi ekvilibri la komikan efekton. Kiel en ĉiu komedio de Molière, ankaŭ tie ĉi la rolantoj moviĝas plejparte en agoj abstraktaj, pentrantaj animajn kvalitojn. Kaj kvankam la temo mem estas reala, tute mankas »viv-aromaj« situacioj. La realo estas kvazaŭ skemigita, tiel ke nenian pli intiman viv-informon ni ricevas pri la personoj, kvankam ili nudigas antaŭ ni siajn animojn, kaj ni bone konas iliajn pekojn kaj virtojn. Jam la titoloj de la komedioj (Mizantropo, Avarulo, Malsanulo pro imago) montras ĉi tiun abstraktecon, same kiel la italaj aŭ grekaj nomoj de l' personoj. Tiel la dramarto de Molière estas laŭforme senmanka kaj fidela esprimiĝo de la galla spirito, kiu, per la sistema trapenso de l' aferoj, klopodas je la prezentado de l' *eseneo*. Kaj laŭ la enhavo, ĝi estas komuniko de plej universale eternaj homaj temoj.

Molière propre estas tre amara spirito. Li vidas la

erarojn, pekojn, difektojn de l' homoj, li senindulge vipas ilin, sed interne li estas konvinkiginta, ke tiuj eraroj, pekoj, difektoj estas eternaj, ke kontraŭ ili vana estas ĉia batalo. Sur ĉi tiu ĉefmotivo bazas lia tuta arto, kio lin tiom proksimigas al la grandaj satiristoj del nuntempo.

La traduko de la komedio estas ĝenerale tre bona kaj laŭdinda. Ĝi estas farita ne nur en senerara Esperanto, sed ĝi havas ankaŭ bone ekvilibritajn frazojn, per kio la esprimoj ricevas la necesan efektforton. Kelkaj nekutimaj devenas de la versa formo; la tradukinto mem petas indulgon pro ili.

Sed la versformon mem mi opinias malfeliĉe elektita. La tradukinto uzis pure amfibran skemon:

He kio? Nu, kial vi estas ĉagrena?

mi opinias, ke la francan aleksandran verson oni devus transmeti per la kromsilaba aleksandro:

He kio? Diru, kial vi estas ĉagrenita?

Tio havus plurajn avantaĝojn. Unue, la kromsilaba aleksandro estas iom pli longa ol la franca aleksandro, do ĝi bonvene helpas pri tio, ke la franca lingvo estas iom pli konciza ol la Esperanta. Per ĝi do oni estus povinta ne rezigni pri la laŭvorta fideleco. Due, ĝi estas pli facila verso, ol la amfibrika. Nome, estas ja vere, ke Esperanto estas kvazaŭ amfibrika lingvo, en ĝi oni povas tre facile ĉarpeni amfibrikajn versojn. Sed aliflanke, tiu skemo estas tiel rigida, ke frazon, kiu ne adaptiĝas memvole, oni apenaŭ povas al ĝi fleksi sen malagrablaj fraztordoj aŭ kejoj. Tio kulpas pri pluraj sintaksaj licencoj de l' traduko, kiuj kelkfoje jam tuŝas la limon de eraro.

Kaj fine, la amfibrika skemo, per sia sencesa, seninterrompa eterna ondado, en tiaj longaj verkoj estas rekte teda. Vere, dum la lego mi sentis kelkfoje preskaŭ kapturnon, kvazaŭ mi sidus sur karuselo.

La tradukinto parolas en la antaŭparolo pri multaj aliaj tradukoj kuŝantaj en lia tirkesto. Mi tre petas lin, ke li bonvolu en ili ŝanĝi la amfibran skemon en kromsilaban aleksandron. Tio tute ne estos malfacila laboro kaj valoros la penon. (y)

H. SIENKIEWICZ: QUO VADIS? El la pola: Lidja Zamenhof. Du volumoj po 272 paĝoj. Eldonejo: Populara Esperanto-Biblioteko, Amsterdamo. Elandstraat 177. 179. Prezo de unu volumo guldbindita 2.50 + sendkostoj.

Eksterordinara sukceso sekvis siatempe la aperon de ĉi tiu romano; ĝi estis tradukita en preskaŭ ĉiujn kulturlingvojn (se mi bone memoras, en 40 lingvoj legeblas ĝiaj tradukoj), oni dramigis ĝin, oni filmigis ĝin plurfoje. Ĉi tiu elstara populareco certe kunefikis, ke la aŭtoro ricevis en 1906. la Nobelpremion. Se oni serĉas la motivojn de ĉi tiu frapa sukceso, ne pre unuavice oni devas mencii la romantikeman inklinton de la legantaro, kiu en la tempo de la apero de l' libro volonte entuziasmis kaj plezuris pri historiaj temoj. Kaj vere, ne estas grave, ĉu la aŭtoro prezentas la pasinton tia, kia ĝi vere estis, aŭ li rekreis imagitan Romon el sia fantazio; gravis nur, ke la romano estas plena de interesaj kaj atento-streĉaj okazaĵoj konforme al la pursanga roman-

CU VI SCIAS

ke la diskuto pri enkonduko aŭ reenkonduko de la vorto heziti bezonis la spacon de almenaŭ plena numero de Lingvo Libro?

CU VI SCIAS

ke tiuj kaj multaj miloj da aliaj respondoj el la plej intima plej malnova aŭ plej nova partoj de la Esperantista vivo estas troveblaj en la granda Enciklopedio de Esperanto?

tikismo, ke ĝi estas riĉa je surprizaj turnoj, je personoj vekantaj simpatian aŭ antipatian. Volante plene kompreni la faktorojn de tiu amas-sukceso, oni ne forgesu, ke tiutempe, kiam Quo Vadis forlasis la presejon, triumfe regis sur la scenejoj la opero, kaj Quo Vadis estas vere opereca, grandioze vidiga panoramo kun amasscenoj, potencaj horoj kaj kortuŝaj duetoj. Kaj, krom tio, en ĝi abundas drama streĉo; ofte vere konsterna estas la forto de l' prezentado montranta la lukton inter la kristana kaj pagana Romo. Kaj la karakterpentro estas majstra: la figuro de Nero, la figuroj de Ursus, Petronius, kaj multaj aliaj, estas grandioze vivplenaj. La stilo estas majstra, glata, flua, pitoreska, facile lasas sin legi.

La Esperanta varianto de la romano estas plej varme salutinda. Ĝi donas bonegan legmaterialon por tiuj, kiuj volas sin ekzerci en la literatura lingvo, sed ankoraŭ ne volonte legus verkojn, kiuj prezentus al ili tie kaj tie ĉi malfacilaĵojn de kompreno. Quo Vadis estas tiurilate ne nur ekzercilo, sed ankaŭ nobla materialo. Vere, apenaŭ mi povus rekomendi pli bonan verkon por esperantisto, kiu bone lerninte la lingvon, volas literature ekutiligi siajn konojn. Precipe, ĉar la romano legeblas en preskaŭ ĉiu lingvo, do oni povas sin helpi neces-okaze per la naci-lingva traduko.

La traduko de Lidja Zamenhof montras al ni la samajn bonajn kvalitojn, kiujn ni ĝis nun trovis ĉe tiu ĉi eminenta tradukintino. Ĝi estas glata, facilflua, bonege ekvilibrita, kristale klara. Solan riproĉeton mi faras: ŝi tro ofte uzas la sufikson *ad*. Mi scias, ke tion faris ankaŭ Zamenhof mem, volante per tio anstataŭigi la imperfekton mankantan en Esperanto. Sed, laŭ mia opinio, tia distingo plej ofte estas superflua. En la hungara lingvo same ne ekzistas imperfekto; iam ĝi ekzistis, sed en la pasinta jarcento ĝi iom post iom tute malaperis el la literatura kaj parolata lingvo. Tamen, la lingvo tute bone prosperas sen ĝi. Do ankaŭ Esperanto povas malhavi ĉi tiun tempoformon kaj en okazo de neceso ĝi povas sin helpi per aliaj rimedoj. Cetere la superfluecon de ĉi tiu ad-ado plej bone montras tiuj paĝoj, kie la tradukintino forgesis ĝin apliki: ili estas neniom pli malklaraj ol la ad-ozaj frazoj. Ni rezervu la sufikson *ad* por la markado de longa daŭro kaj ripeto. Tiel ni ne estos ĝenataj de la tro ofta ripetigo de l' sama elemento.

Pro la impona eksterajo (bonega papero, bona preso, bona bindo) la libro estas ankaŭ bona propagandilo. (t)

SELMA LAGERLÖF: LA MONO DE SINJORO ARNE. El la sveda: Stellan Engholm. 110 paĝoj. Eldonejo: Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm. Prezo 1.50 sv. kr.

La arĝenthara aŭtorino estas eble la plej populara inter la Nobel-premiitaj verkistoj. Kaj en ĉi tiu kazo la atributo »populara« havas nenian diminutivan flanksonoron; estas vere, ke ŝiaj verkoj multfoje tre proksimiĝas al la limo de la sentimentala »kico« (kelkfoje eĉ transpaŝas ĝin), sed estas vere ankaŭ, ke ŝia amo al la homoj, precipe al la simpluloj, ŝia indulga sinteno kontraŭ la homaj malfortoj (sed la indulgo neniel nebuligas ŝiajn okulojn, ĉi tiujn atentajn, malgaje severajn, bonece pardonemajn okulojn), ke ĉiu ĉi amo, bono kaj mildo, kiu disradiiĝas el ŝiaj verkoj, ne estas falsa ornamaĵo de

CU VI SCIAS

ke la libron kun multaj mi'oj da tiaj informoj vi povas plej facile havigi al vi aliĝante al Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj? Se vi scias, kial vi ne aliĝis ĝis nun? Se vi ne scias, postulu tuj prospekton de Literatura Mondo.

ATENTIGO

La redakcio, kaj la administracio respondas lun ajn demandon aŭ informpeton pri Lingvo Libro nur, se ĝi estas akompanata per respondkupono. Neniu atendu respondon je letero, ne tiel ekipita.

profesiaj hom-amantoj; ŝiaj panegiraj himnoj pri la vivo kaj morto estas liberaj de kav-resonaj recitadoj de multbruaĵaj pseŭdprofetoj. Ŝiaj figuroj vivas en la imago de la leganto, post la demeto de ŝiaj libroj ankoraŭ longe vibras la emocioj, kiujn vekis la sorto de ŝiaj herooj. Apartan landon ŝi kreis en siaj libroj: landon, kies pejzaĝoj kaj loĝantoj estos por ĉiam fermitaj en la koron de tiu, kiu foje konatigis kun ĝi.

Mi tute ne povas kompreni, kial elektis la tradukinto ĝuste ĉi tiun libron el la Lagerlöf-trezoraro. Ja estas konsiderinde, ke pro la tre interesa, preskaŭ detektivromaneca historio ĝi altiros vastan legantaron, verŝajne tio estas la ĉefa motivo, sed kiam netradukite kuŝas perloj, kiel ekzemple la Kristo-legendoj, certe ne ĉi tiun libron mi elektus, se mi estus svedo... Nu, la temon mi ne rakontas, mi ne volas kolerigi miajn legantojn, ke mia maldiskreteco rabos de ili la ĝuon de tiaj specaj libroj, mi volas aldoni nur, ke la verkista rutino ne mankas eĉ en ĉi tiu malpli sukcesa libro de la granda verkistino.

Rimarkoj pri la traduko: mi ne uzus »ĉio tio« anstataŭ »ĉio ĉi«. En la frazo: »Li ne permesas, ke lia servisto pereos.« Mi trovas nepre necese uzi la u-modon. Etaj stilmakuletoj de la vortordo ne mankas, ekzemple: »mi nenion malbonan faris«, kiel alie sonus la frazo: »mi faris nenion malbonan« aŭ »nenion malbonan mi faris«. »Petis pri dungigon« ĉu prezeraro? Kaj kial forlasi la komon antaŭ »ke«? (t)

THE TENTH BOOK OF HOMER'S ODYSSEY. Translated into Esperanto Hexameters by Giles Dixey. Eldonis Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, London, W. C. 1. 24 paĝoj. Prezo: unu ŝilingo, aŭfranko 1 p.

En la antaŭparolo anglalingva, do certe intencita por propagando, la tradukinto rakontas, ke la tradukadon de la deka kanto de l' Odisejo li komencis du horojn post sia unua paŝo en Esperanto kaj finis ĝin, kun tre malmultaj eraroj, dum unu monato. Nu, tio pruvas vere admirindan lingvosenton kaj senkomparan lertecon, ĉar la traduko estas lingve korekta kaj ne malhavas eĉ poeziajn valorojn.

La heksametro de la traduko ne estas ĉiam kontentiga, ofte stumblas la ritmo, la spondeoj estas neapogitaj konsonante, la klasika cezuro mankas. Sed kion oni pretendu de unumonata esperantisto? Ni ĝoju, ke ni povas legi ĉi tiun parton de la Odisejo en agrable flua lingvo, kiu ofte aspektas, kvazaŭ la tradukinto estus traleginta ĉiujn verkojn de niaj plej bonaj stilistoj. Ni salutu mirindan talenton, kiu aperis sur nia literatura horizonto; ni salutu lin ne tiom pro ĉi tiu frua ĝermeto, kiom pro la grandaj espero, kiujn pri li ni havas post tiu ĉi debuto. (y)

KOREKTO. En la recenzo pri la MODERNA VORTARO de ISIGURO (Bibliografia Gazeto, 1933, pĝ 50) ni riproĉis la vorton »sukro«, kiun ni opiniis varianto de »sukero«. Nun, laŭ la informo de s-ano Iŝiguro, ni korektas, ke nekomprenante la japanan tekston ni mistrafis. »Sukro« ne volas anstataŭi »sukeron«, ĝi estas nomo de ia monero. (y)

Informoj al membroj de AELA

Kune kun tiu ĉi numero de *Lingvo Libro* ni sendas al ĉiu membro, paginta la kotizon por 1934-a jaro: la romanon de H. Weinhengst kiel unuan libron de la serio Novelaron de Karinthy Radioverkon de Aisberg.

La unua verko estas sendata kiel unua libro de 1934-a jaro. La du aliaj kiel ekstervicaj libroj por 1933—34. La Karinthy libro estas havebla nur broŝurita kaj ĝi kostas anstataŭ la vendoprezon de sv. fr. 1.20 plus 10% nur 0.50 sv. fr. plus 0.10 per sendkostoj, do entute 0.60 sv. fr.

La Aisberg libro kostas al AELA-membroj broŝurita 1.80, bindita 2.80 sv. fr. t. e. 40% de la vendoprezon kaj 30 centimojn por sendkostoj.

Pagante, bonvolu tion fari plej malfrue ĝis 1-a de aprilo, laŭ la kutima enpagvojo. Librojn, resendatajn post tiu dato ni ne akceptas. Resendantoj bonvolu afable atenti la duonprezajn tarifojn por libroj en siaj landoj al Hungarujo. Al resendantoj ni repagos iliajn sendkostojn.

Kiel pagon ni akceptas ankaŭ internaciajn poŝtajn respondkuponojn en la valoro de 0.30 sv. fr. po unu.

Antaŭ la pago aŭ resendo de la libro ni ne ekspedas novan libron al la koncerna membro.

Al la membroj, plenpagintaj por 1933, inkluzive Dante-verkon, ni sendas samkondiĉe la du lastajn.

Kompreneble, tiuj, kiuj petis nin ne sendi libron sen speciala mendo ni ne sendas la ekstervicajn librojn.

Landoj kun favoraj tarifoj estas la jenaj:

Belgujo, Francujo, Francaj Kolonioj, Latvio, Nederlando, Nederlandaj kolonioj, Germanujo, Hispanujo, Svisujo, Estonio.

Abesinio, Argentino, Belgaj kolonioj, Egipto, Kolumbio, Luksemburgo, Maroko, Sovetio, Paragvajo, Portugalio, Rumanio, Saarteritorio, Dancigo, Turkio kaj Tuniso.

Enciklopedio de Esperanto

estas plenvapre kompostata. Kiel ni jam menciis, la libro fariĝis proksimume 30—40% pli granda, ol ni antaŭkalkulis. Tial ankaŭ la apero prokrastiĝas kaj ni povos liveri ĝin nur en du volumoj, unu post la alia. La unua aperos komence de aprilo, la dua proksimume dek semajnojn pli malfrue. Memkompreneble ĉiu membro rajtas ricevi la verkon sen ia superpago. Sed ĉar la verko fariĝis tiom pli ampleksa, ni faras du eldonojn:

unua kun ilustraĵoj de proksimume 250—300 paĝoj kaj teksto de 6—700 paĝoj, dividita en du volumoj. De tiuj, kiuj deziras ricevi ĉi tiun duvoluman, ni devos peti minimuman superpagon, por ke la propraj kostoj almenaŭ revenu. Tiu superpago neniuokaze superos la 2—3 sv. fr. ĉe broŝurita ekzemplero kaj unu frankon pli ĉe bindita,

dua konsistos nur el unu volumo, enhavas la plenan tekstoparton sen ilustraĵoj kaj sur malpli kara papero, ol la unua. Tiun duan specon en unu volumo povas ricevi ĉiu AELA-membro sen ia ajn superpago, kvankam ankaŭ la komposto estas multe pli densa, ol ni tion antaŭkalkulis. Ĉi tiun duan specon ni povas dissendi nur kiam la tuta Enciklopedio estos preta, do proksimume en junio ĉijara.

Ĉar ni intencas la unuan volumon dissendi al ĉiu AELA-membro, ni petas tiujn, kiuj neniuokaze volas superpagi, sendi al ni simplan karton, deklarantan, ke ili ne deziras superpagi, por ke ni ne sendu vane la unuan volumon. La koston de la karto ni rekompencos.

Kvina libro de 1933

Febro de Jean Forge definitive ne aperos pro la nelivero de la aŭtoro. Ni petas ĉiujn membrojn, ĝis nun ne elektintaj anstataŭanton, bonvolu afable fari tion plej baldaŭ laŭ Bibliografia Gazeto nro 3 en 1933.

Premio por varbado

La pasintjare anoncintaj premioj por varbo de novaj membroj validas ankoraŭ. Ĉiu malnova membro, varbinte novan, ricevos libron en la vendoprezon de 3.— sv. fr. el nia katalogo. Ne forgesu, ke krom la rekta profito vi havos ankaŭ malrekta: havante 1500 membrojn, ni donos al ĉiu membro senpage ankaŭ la duan volumon de la Arthistorio de Hekler.

Premion ni sendas nur por membroj ricevitaj de ni rekte.

Abono kaj prezo

Pri la celoj de L. L. ni jam parolis al vi sur la unua pago. Ĉi tie aldonu nur la administracio kelkajn vortojn. Ĉar nia celo estas konatigi la novajn kaj malnovajn esperanto-verkojn ankaŭ al la komencantaj legantoj, ni klopodas doni krom la facila lingvo ankaŭ minimuman prezon. Tial ni decidis akcepti ĉefe mendojn por po tri ekzempleroj de ĉiu numero. Sed mendante tri ekzemplerojn unu numero kostas malaltegan tarifon jene:

Aŭstrio 10 groŝojn, Belgujo 60 centimojn, Britujo 1 penny, Bulgarujo 2 levojn, Ĉeĥoslovakio 0.60 helerojn, Francujo 0.50 centimojn, Germanujo 8 fenigojn, Hispanujo 20 centim., Hungarujo 10 filerojn, Jugoslavujo 1 dinaron, Latvolando 0.10 laton, Litvujo 0.10 litovan kronon, Estonujo 0.10 kronon, Danio 10 ŝre, Nederlando 5 cendojn, Norvegujo 10 ŝre, Polujo 10 groŝojn, Rumanujo 3 leojn, Svedlando 10 oerojn, Svislando 10 centimojn, Usono 3 cendojn, Italujo 0.30 liron.

Tiuj prezoj validas nur, se oni mendas kaj pagas samtempe almenaŭ 3 ekzemplerojn. Mendante nur unu, oni devas sendi duoblan sumon, ol la supre menciitaj. Ni akceptas respondkuponojn el kiu ajn lando, kiam unu respondkuponon egalvaloras la koston de kunaj tri ekzempleroj, aŭ por respondo afrankitan eksterlandan poŝtkarton (neadresitan) por la pago de unu ekzemplero.

Abonojn por unu jaro ni akceptas por la kvaroblo de la supraj sumetoj.

Ĉi tiun unuan numeron ni sendas al multaj de ni konataj adresoj. Kiuj ne volas sendi la monon por la senditaj ekzempleroj, bonvolu remeti en la banderolon surskribi: «retour» kaj enŝeti en iun ajn poŝtkeston.

AELA

1934

Dek libroj kun 2500 paĝoj estos pri surpriza, pli granda kaj ĉe pli interesa, ol estis AELA 1933. Por kotizo de sv. fr. 17.—. Pri send- kaj bindkostoj, pri la donotaj libroj petu nian detalan prospekton. Krom la serio AELA eldonos en la jaro 1934, interesegajn librojn, haveblajn per tre malalta prezo. — Prospektojn sendas: LITERATURA MONDO Budapeŝt, IX., Mester-u. 53. V. 5.

Ĉiu inteligenta esperantisto aliĝas al A. E. L. A.!

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapest IX. Mes-
ter-utca 53. V. 5. Hungarujo.
Aparte aĉetebla. Unu numero
kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron.
Tri numeroj kune ekspedataj
kostas nur 0.30 svisaj frankoj
aŭ proksimuman egalvaloron.
Abonon vidu sur la lasta paĝo.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare • Nro 2. 1934

Influo de la angla, franca kaj germana lingvoj sur Esperanton

— D-ro Emil Pfeffer —

La statistikaj indikoj pri la influo de la ĉefaj vivantaj lingvoj sur E-n diferencas tre forte unu de la alia. En kelkaj lokoj oni asertas, ke 40% de E-aj vortradikoj estas elprenitaj el la lingvoj germanaj, 40% el la latinidaj kaj la resto el la slavaj. Aliaj fontoj indikas nombrojn ne konkordajn kun la ĵus cititaj.

Por ekzakte esplori tiun ĉi demandon, ŝajnis unue plej simple, konstati por kiel eble plej granda nombro da E-radikoj, el kiu lingvo ili estas prenitaj. Tiam jam ĉe la unua vorto *abato* (angle *abbot*, france *abbé*, germane *Abt*) montriĝis la granda malfacilaĵo. Ĉar kvankam la nomita E-a vorto estis laŭlitere identa kun neniuj el la cititaj naciaj tradukoj, tamen ĝia parenceco kun ĉiuj tri estis nekontestebla. Same okazis ĉe granda nombro da aliaj vortoj en E-o. Tio montris, ke la respondo al la prezentita demando devas esti akirita sur alia vojo.

En kontraŭo al tiu ĉi unua provo oni povis nur konstati, en kiuj (aŭ en kiu) el la vivantaj lingvoj oni povas elmontri ekkoneble la koncernan E-an radikon. Tio estis do precize la inversigo de la origine provita vojo.

Sisteme tiu ĉi demando estis unue esplorita sur la bazo de la Esp-a-germana poŝvortaro de Dro L. L. Zamenhof por 2704 E-radikoj, kaj nome rilate al la lingvoj angla, franca kaj germana. La esploron faris dro *Fr. Francke*.

Atribuo (alkalkulo) de iu esp-a vorto al unu el la nomitaj lingvoj okazis nur tiam, se por klera lernanto de l' koncerna nacio la parenceco de l' nacia radiko kun la esp-a estis klare ekkonebla. Ekzemple *ne* plu estis konsiderataj kiel parencaj la angla »*grow*« kun »*kreski*«, la germana »*Schwelle*« kun »*sojlo*« malgraŭ ke sendube en ambaŭ kazoj la nomitaj vortoj havas unu komunan praradikon. Kontraŭe estis akceptita la ekkonebleco de la lingva rilato ekzemple inter la franca »*naitre*« kaj »*naski*«.

Ankaŭ la nomataj *fremdaj vortoj* de iu lingvo konigas senpere al la koncerna nacio la konforman esp-an vorton; tial ankaŭ la »*fremdaj vortoj*« en la nomitaj tri naciaj lingvoj devis esti konsiderataj.

El la nomita nombro da esp-aj radikoj estis trov-
eblaj almenaŭ en unu el la tri esploritaj lingvoj: 2527.
En la *germana* lingvo kaj germanaj »*fremdvortoj*«
konataj al klera germano estis elmontritaj: 68, 16%,
en la *angla* kaj ĝiaj fremdvortoj: 75, 26%, en la
franca: 79, 69%.

La ĝenerala sumo devis kompreneble rezultigi multe super 100, ĉar tre granda nombro da internaciaj radikoj estis trovebla en ĉiuj tri naciaj lingvoj kaj ankaŭ en E-o, ekz-e: gramatiko, grafito, temo, revolucio, principo.

La diverseco de l' influo de la tri esploritaj lingvoj estas do entute tre malgrava. La minimuma superpezo de la franca lingvo devehas antaŭ ĉio de la fakto, ke ĉe botanikaj, zoologiaj, mineralaj nomoj preskaŭ ĉiam en E-o la *latinaj vortradikoj* estis akceptitaj. Tiu ĉi vortradiko vivas ankoraŭ tre ofte en la franca lingvo, sufiĉe ofte en la angla, sed nur tre malofte en la germana, ekz-e: *tilio* — lat. *tilia* — france *tilleul* — germane *Linde*; *hirundo* — lat. *hirundo* — france *hirondelle* — germane *Schwalbe*; *argento* — lat. *argentum* — france *argent* — germane *Silber*.

Plue la germana lingvo enhavis multe pli grandan nombron da vortoj (vokabloj), kiuj nur kun peno estas prononceblaj por la fremdaj nacioj, ol la franca lingvo.

Per tio ĉi la minimuma superpezo de la franca lingvo estas sufiĉe klarigita.

Kiel rezulto de l' tuta esplorado povis esti konstatite: E-o estas nek angla, nek franca, nek germana lingvo; ĉiu el la tri lingvoj estas preskaŭ egale konsiderita, ĉar en ĉiu el ili troviĝas preskaŭ $\frac{3}{4}$ de la plej uzataj E-radikoj. Tio estas tia rezulto, ke oni entute ne povas imagi al si pli favoran por internacia lingvo.

Librovendo fabela:
Ne legendo!
AELA!

Inter la dentoj de Sturmer

Intervjuo de Alec Venture kun la konata literaturisto



Petite de la redakcio de *Literatura Mondo* intervjui sinjoron Sturmer pri lia nova verko, *El Notlibro de Praktika Esperantisto*, kaj pri lia verkado ĝenerale, mi antaŭ kelkaj vesperoj trovis la vojon al la Londona kvartalo Haggerston, laborista kaj etindustria kvartalo, kien ankoraŭ malmulte penetris la grandskala komerco, la grandega fabrikejo, kie la etoso de tiu Londono, kiun priskribis la angla verkisto Charles Dickens, ankoraŭ ne cedis al la usoneca moderna postmilita. Sinjoro Sturmer petis pardonon, ke li devas unue akcepti min dum laboro en sia dentista metiejo.

»Mi akceptas vin en mia metiejo, kaj petas permeson paroli dum mi laboras, malpli pro la kredo, ke tiel mi donas originalan fonon al la intervjuo, ol pro la fakto, ke nuntempe mi ja havas tre multe da laboro. Tiel mi povas aldoni iom da marmelado al la ĉiutaga buterpano, ĉu ne?!«

»Ĉu vi ne trovas malfacila la dumlaboran parolon?«

»Kelkfoje, sed ne ofte. La fakto estas, ke mia laboro vole-nevole lasas mian menson parte tre libera, kaj ĝuste tiu cirkonstanco multon klarigas pri mia nova libro. Vi komprenas, ke dumtage venas en la menson tre multe da pensoj pri tio kaj tio, multe da rememoroj, multe da diversaj konceptoj pri etaj spertoj kaj rimarkoj. Kaj se mi ne tuj notas ilin por posta priskribo, ili tre ĝenas, kvazaŭ ili estus infanoj kiuj krias por nasko!! Nu, daŭrigante tiun metaforon, mi konfesu, ke mi neniam estas kontenta, se mi ne sukcesas naski ilin, kaj tion mi plej ofte faras tiel, ke mi metas ilin en koverton al iu amiko aŭ amikino montrinta intereson pri aliaj idetoj de mia intelekto! Fine de 1931, tamen, mi provis alian naskmanieron, mi komencis fardi de tago al tago sur mia skribmaŝino diversajn rimarkojn kaj notojn, pri pensoj dumtagaj, kiujn mi krajone notis sur paperpeco, kiel ankaŭ pri pensoj, kiuj fluis en la menson dum mi maŝinskribas — tiurilate mi ŝajne similas al mia amiko Stellan Engholm, kiu diris al mi, ke la pensoj kaj konceptoj venas, dum li skribas; ke li kvazaŭ devas verki por verki. Nu, do, mi faris samtempe kelkajn kopiojn, kaj sendis ilin al diversaj amikoj, inkluzive de amikareto en Budapeŝt. Kaj el Budapeŝt venis la opinio, ke tio estus tre taŭga materialo por eldono en libro, tial mi daŭrigis mian kutimon dum sufiĉe longa tempo — fakte mi ankoraŭ ne por

ĉiam forlasis ĝin. Konfeson mi faru al vi. Mi konfesu, ke mi vidas ĉiujn motivojn por ne verki; jam ekzistas tro multe da libroj, ĉio eterne valoras, kiun povus diri unuopa homo, estas jam dirita en la Biblio, aŭ de iu greka aŭ latina verkisto, kaj tiel plu kaj tiel plu. Tamen mi ĉiam ankoraŭ trovas la vivon tiom ege interesa, en ĉiuj ĝiaj faktoj, ke mi ne povas deteni min de la tento surpaperigi kaj, se eble, eldonigi miajn notojn kaj impresojn; en la kredo, ke eventuale ili havos por aliaj la intereson, kiun ili havis por iuj privataj amikoj miaj.«

»Interese. Kaj kiuj estas la ĉefaj temoj de la eldonota libro?«

»Esperanto kaj la esperantistoj, la religio, la politiko, la sekso kaj la literaturo, ĉiuj rigarditaj laŭ la humoro de la momento — mi rajtigis la amikojn en Budapeŝt laŭ sia propra prefero elekti la materialon, nepetante mian opinion; negrave, ĉu la rezulto montras min en humoro religia, obscena, naiva, gaja aŭ alia, aŭ en ĉiuj humoroj kune. En unu parto mi eble montras la admiron kaj respekton por la katolika religio, kiun mi ĉiam havis kaj havas ankoraŭ, en alia eble la skeptikan vidpunkton kiu neniam estis fremda al mi, en alia konsentemon kun la klasbatalo, kiun mi jam de kelka tempo praktike elmontris. Troviĝas notoj pri lingvaj punktoj, kaj notoj pri seksaj kutimoj. Entute sufiĉe varia sortimento — rubaĵo ĝin nomos personoj, por kiuj mi ne estas simpatia!«

»Ankoraŭ pli interese. Kaj ĉu la elekto, kiun oni faris en Budapeŝt, plaĉas al vi?«

»Jes, ĝi entute kontentigas min, kaj kelkfoje surprize plaĉas min per sia malprudemo. Ekzemple mi kredis, ke certe oni forlasos la noton, en kiu mi faras komparon inter la Esperanto-movado kaj iu alia movado, pri kiu oni apenaŭ parolus en konvenaj burĝaj rondo. Sed mi eraris — tion oni enpresis!

»Ĉu eble la verko ŝokos la esperantistan publikon?«

»Eble kelkajn partojn kaj individuojn. Necesas konstati tamen, ke la esperantistaro multe ŝanĝiĝis en karaktero dum la lastaj jaroj, mi mem povis bone rimarki tion eĉ dum la propra esperantista vivo. La malnovaj esperantistoj, kiuj restas ĉe la lingvo, estas precipe tiuj, kiuj havas ne malvastan menson, kaj orientiĝis al la novaj pensoj kaj moroj de la lastaj jaroj; kaj venis en la movadon ĉiam pli multe da mondumaj tipoj. Jen mia propra impresio, kaj mi povas pretendi, ke mi havis preskaŭ ĉiujn eblajn okazojn por senti la etoson de la movado, en kiu mi unuflanke estis longatempe simpla ano, kaj aliflanke en kiu mi plurjare okupis altajn oficojn en unu el la ĉefaj naciaj asocioj. Tamen, lasu momente mian personon: konsideru iun esperantistan klubon, kiun ni ambaŭ konas, kie antaŭ dek jaroj, kredis min, troviĝis preskaŭ nur seriozaj ismuloj, kaj kie nuntempe la aferoj estas en la manoj de junuloj liberparolaj kaj gajaj. Konsideru, ke, kiam mi eklernis la lingvon antaŭ dek-du jaroj, la nomo Raymond Schwartz estis apenaŭ konata! Per mia titolo mi nomas min »praktika esperantisto«, sed certe ekzistas aliaj kaj ankoraŭ pli praktikaj, kaj dumparole mi memoras pri pola esperantisto, kun kiu mi konatiĝis dum la Postkongreso en Varsovio en 1931. Li estis proksimume de mia aĝo, diru tridekjara, ankaŭ fraŭlo, ankaŭ havanta viglan intereson pri ĉiuj vivofaktoj, kaj

ni multe kunestis en diversaj kafejoj de Varsovio. Subite, dum unu manĝo, li diris: «Sinjoro Sturmer, permesu al mi rektan demandon' kaj al mia jeso li ŝetis: »Kiamaniere vi aranĝas vian seksan vivon?« Nu, la demando donis al mi fortan deziron rideti, sed samtempe mi perceptis, ke jen plej praktika uzo de Esperanto por vera internacia kompreno inter polo kaj anglo, kaj mi respektis la amikon kiel vere praktikan esperantiston! Se lia okulo trafos ĉi tiun tekston, mi petas lin alsendi sian adreson, por ke mi povu sendi al li kopion de libro, kiu lin certe interesos, kaj ne ŝokos!»

»Se do la verko prezentas diversajn humorojn, ĝi enhavas nenian definitivan mesaĝon?«

»Mi ne havas definitivan mesaĝon por la homaro, krom tiu, kiun mi donis en konciza frazo antaŭ kelkaj jaroj en libreto eldonita ĉe *Literatura Mondo* je plej malkara prezo. La homaro ne akceptis mian konsilon, same kiel mi mem ne konsekvencis al ĝi — mi ankoraŭ ne mortigis min, kion vi nun propraokule observis. Mia utilo, se mi havas utilon, estas pure stimula. Ido de malnova kulturburga familio, tamen proleto ekde la aĝo dek kvar, mi nature akiris vidpunkton nebanalan. Jam servinte kiel stimulilo al la intelektoj de pluraj geamikoj, mi dank' al la eldonejo *Literatura Mondo* eventuale stimulos kelke da aliaj personoj. Eble mi eraras tamen, kaj sukcesos nur oscedigi ilin. Kaj povas esti, ke la esperantistoj ne havas sufiĉe da intereso pri la lingvo kaj ĝia literaturo por deziri miajn notojn tiurilatajn. Cetere, mi povas aldoni nur, laŭ la vortoj de fama angla verkisto: «Mi diris tre multon, kio ne direndis, kaj mi evitis diri multon, kio tre direndis — kaj entute mi tre bone fartas, dankon!» Kaj nun mi faros al vi mallongan klarigon pri la metio de artefaritaj dentaraĵoj, vere tre interesa kaj utila temo...«

»Unu demandon ankoraŭ: kiajn opiniojn vi jam havis de legintoj pri la libro?«

»Mia plej malnova amiko, sinjoro J. J. Sullivan, kiu estas iusence la ĉefa kunaŭtoro, preferas ĝin al *Por Recenzo!*, kaj ĝenerale tre laŭdas ĝin. Tiu amikino, kies opinio en tiaj aferoj mi plej alte taksas, resume kritikis ĝin per la frazo: »Rudolfo, vi estas vere hipokritulo«. Mia amiko Raymond Schwartz, se mi ĝuste memoras, alte taksis kelkajn pecojn, kiujn li vidis — almenaŭ mi juĝas laŭ tio, ke li petis ion similan por *La Pirato!* Mi konfesu, ke la bona opinio de sinjoro Sullivan precipe kredigas al mi, ke la verko havas valoron; li estas unu el tiuj maloftaj literaturemuloj, kiuj ne perdis la kontakton kun la sociologiaj realoj, li kapablas doni ĝustan aprezon al lirika poemo kaj al studo pri la portugaliaj kolonioj... sed mi evitu en la nuna momento komenci panegiron pri lia intelekto. Iam mi diris rekte al li, ke lia nesindediĉo al la kulturo de Esperanto estis samtempe granda perdo por la kulturo de Esperanto kaj granda perdo por lia intelekto, kaj mi ankoraŭ bedaŭras, ke ili ne reciproke povis riĉigi unu la alian. Nu, lia nomo tamen aperos plurfoje en tiu ĉi nova libro en Esperanto, kaj iusence la lingvo kaj li ne estas fremdaj unu por la alia. Fakte, la libro enhavas multe da nomoj esperantistaj ankoraŭ ne aperintaj en libroj ĝis nun, tial ke tre ofte miaj notoj tuŝas aktualaĵojn de la esperantista vivo aŭ rememorojn pri vojaĝoj en aliaj landoj. Ekzemple, via propra nomo, kiu ĝis nun ornamas nur legolibron, kies unu parton vi afable redaktis por mi, nun aperas en vera libro, kio espereble instigetos vin sekvi mian sinceran konsilon, ke vi mem verku en la lingvo. Kaj nun mi sugestas forlasi la intervjuon por viziti apudan biertrinkejon...«

Tra kaj laŭ.

Ni ricevis la sekvantan leteron:

»En la septembra numero de L. M. troviĝas rakonto de Sirjaev: »Mi ne ŝatas la printempon«. En ĝi troviĝas frazo, kiun mi absolute ne komprenas. Nome, sur la 137. paĝo la lasta frazo: »Larmoj torente fluis tra ŝiaj vangoj.« Kiel larmoj fluas tra la vangoj? Ĉu la vangoj havas truojn? Kaj ĉu ĉi-okaze la larmoj fluas tra la truoj en la buŝon? — Sed en la sama frazo estas dirite, ke ŝia vizago estis bela — do povis esti nenia truo! En mia vivo mi vidis nur unu homon, kies vango estis detruida de kancero kaj en tiu ĉi okazo oni povis rigardi la gorĝon tra la vango!

Ĉu vi estus tiel afablaj kaj klarigus al mi la frazon, aŭ eble Sirjaev mem faros tion?

Via scivolema:

Agnès Nii, Tallinn«

Nu, mi sincere konfesas, ke leginte tiun frazon, mi eĉ dum momento ne pensis pri truaj vangoj. Ja »tra«, laŭ la Plena Vortaro kaj ankaŭ laŭ la vortaro de Kabe, signifas »movon de unu ekstremo ĝis la alia«. »Tra la vangoj« do signifas, ke la larmoj fluis de la supra ekstremo de l' vangoj ĝis ilia malsupra ekstremo. Tio estas la pli verŝajna, pli ĉiutaga eblaĵo, do nepre oni pensas unuavice pri tio.

En tiu ĉi senco ofte estas uzata ankaŭ »laŭ«. Sed ĝi ne plaĉas al mi. Laŭ mia opinio, »laŭ« montras *direkton*, kaj direkton povas difini nur linio, ne ebena. Iri laŭ rivero, laŭ vojo, laŭ reloj estas ĝusta, sed iri laŭ kampo, laŭ kanejo, laŭ planko, rubiĝi laŭ la tablo ŝajnas al mi malĝustaj, nekutimaj.

La konfuzo pri la afero devenas el tio, ke per »tra« ni signas plejofte movon en spaco. Kiam ni diras iri tra la dezerto, ni esprimas, ke la movo okazas en la spaco sur la surfaco de l' dezerta sablo. Tio estas nemiskomprenbla. Sed estas vere, ke dum »dezerto«, »kampo« ktp. signas ne nur la surfacon sed ankaŭ la spacon super ĝi, »vango«, »planko« »tabulo« ktp. signas sole la surfacon mem. Do »tra« ĉi-okaze estas dusenca, signante ne nur »de unu ekstremo al alia«, sed ankaŭ »de unu surfaco vertikale ĝis la alia (kaj eble plu)«.

Ĉi tiun dusencecon oni povas eviti, se la movon oni fiksas al la surfaco. Tio povas okazi per la prepozicio »sur«. La solvo do estas »tra« kaj »sur« kune. Por eviti la duoblan prepozicion »trasur« oni povas glui la prepozicion »tra« prefikse al la verbo. Do: »larmoj trafuis sur la vangoj«, »li trairis sur la planko«, »globeto traruliĝis sur la tablo«. Tio signifas, ke la movo okazis tra la spaco super la surfaco, sur la surfaco.

Regulo: por signi, ke la movo okazas sur ebena, de ĝia unu ekstremo ĝis la alia, oni uzu »sur« prepozicie kaj »tra« prefikse.

Mi kredas, ke ĉi tiu solvo estas akceptebla de ĉiu.

(y)

»Unu lastan demandon. Ĉu vi jam prilaboras novan verkon en Esperanto?«

»Jes, malgraŭ, ke jam ekzistas tro multe da libroj en la mondo, kaj malmulte da legantoj por libroj en Esperanto, tamen la juko verka estas ĉe mi tiel forta, ke mi ja projektas tiun romanon pri la esperantista movado, kiun amiko Totsche erare aŭdis esti jam verkata. La temo estos ekskluzive esperantista, la Londona fono enhavas ankaŭ iun mondon de stratulinoj, kaj ne mankos tiu socialisma vidpunkto, kiun mi kredas venkonta en la mondo... vi aŭdis min ofte diri, ke mi sentas, kvazaŭ mi vivus en la dekadenco Romo, kiu,

Hans Weinhengst pri si mem



Hans Weinhengst, la aŭtoro de l' antaŭ nelonge aperinta romano »Tur-strato 4«, demandite de ni pri siaj cirkonstancoj, laboroj, opinioj, pri ĉio, kion li juĝas inde pritrakti pri si kaj sia vivo, sendis al ni la jenan respondon:

»Mi estas esperantisto ekde 1927. Mi loĝis en Laborista Hejmo. Iutage mi legis tabuleton: Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, Grupo Vieno X. — kunvenoj ĉiuvendrede de la 19-a — 21-a horoj en ĉambro 5 de ĉi tiu domo. La teksto estis germanlingva. Jam pli frue mi aŭdis pri Esperanto. Mi legis artikolojn pri »mondlingvoj«, Volapük, Ido, Esperanto, Occidental, Novlatin ktp. Nu, mi deziris jam kiel knabo fariĝi poligloto, multlingvu'o. Dum la milito mi rilatis pli ol estis permesite kun kaptitaj »malamikoj« por lerni la rusan, italan kaj serban lingvojn. Kaj mi rapide progresis, sed baldaŭ poste, ne plu havante okazojn por ekzercadi, mi forgesis preskaŭ ĉion lernitan. Pliiĝa mi lernis iom la latinan, italan, hungaran, hollandan kaj precipe la anglan lingvojn. Kiel multaj veraj kaj speciale pseŭdaj »poliglotoj« ankaŭ mi malestimis la ideon pri »artefarita« lingvo kaj eĉ »mondlingvo«. Tamen mi deziris foje vidi tiajn strangulojn, kiuj studas kaj batalas por tia absurda ideo, kaj pli mi scivolis eĉ, ĉu tiaj esperantistoj, idistoj aŭ aliaj -istoj vere kapablas paroli kaj interkompreniĝi per sia »lingvo«. Tial mi tuj post lego de la menciita tabulo decidis viziti klubvesperojn de la esperantistoj. Kaj mi estis surprizita. Komence mi ja ofte disputis kun esperantistoj pri la taŭgeco, perfekteco kaj estonteco de la lingvo, sed mi tamen eklernis ĝin, enviviĝis en la Esp.-movadon kaj versence pliriĝis tiel mian vivon. Mi kon-

simile al la hodiaŭa Londono, tamen ne estis tiom morale dekadenca, kiom kredigis la surfaca rigardo aŭ la anoj de nova kaj fremda religio. La temo, la prostituitino, kompreneble sorĉas min, kiel ĝi sorĉas ĉiun, kiu senkondamne kredas la gravecon de ĉiu individuua animo egale; la virino, kiu elektas tiun metion, ilustras plej reliefe la eternan strebon de l' individuo al sinvalidigo en premanta socio. Nu, eble mi sukcesos fari la verkon, eble ne, oni vidos. Cetere, mia lasta aludo retiras min al la temo, mia notlibro, ĉar en ĝi mi notis, ke io denaska malhelpas min esti en rilato kun virinoj de tiu metio. Almenaŭ tiu unu noto iĝis malaktuala, ĉar okaze de ioma pristudo en iu rondo da

fesas, ke, kiel aliaj, mi komence ĉiam pensadis pri »plibonigo«, rekreo kaj »perfektigo« de la lingvo, kiu ŝajnis al mi longe iom infana kaj barbara. Sed pli enprofundiĝinte en la lingvon kaj ĝian spiriton, mi kutimiĝis al ĉio »stranga« kaj konsciigis pri io, kio plene kuracis min de »reformemo«, nome: mi mem ekkoleris ĉiam, vidante, ke iu volas reformi, ŝanĝi ion en Esperanto, trudi al la aliaj siajn »perfektigojn« kaj plimalfaciligi la lingvon.

Baldaŭ mi vigle partoprenis en la distrikta kaj tutviena laborista E.-movado. Mi kunlaboris kiel funkculo en loka grupo kaj en la centro de ALLE. Mi komencis verki poemetojn kaj rakontetojn, el kiuj kelkaj estis publikigataj en E.-gazetoj laboristaj. Parolhorojn kaj scenojn mi skribis ĉefe laŭ petoj de festkomitatoj, kiuj bezonis materialon por prezentadoj. Pri mia agado en ISE, kiun mi helpis fondi, vi certe scias. Mi tute ne volas esti »poeto aŭ verkisto«; se mi sentas en mi deziron, ion elparoli aŭ rakonti, tiam mi diras aŭ skribas ĝin. Kaj ĉar oni povas paroli al pli multaj, se oni prese publikigas tion, kion oni volas rakonti, tial mi do klopodis publikigi iafoje ion, kiel ankaŭ la rakonton »Turstrato 4«, kiu estas mia unua pli longa verkaĵo.

La temo? De kie mi ĝin prenis? Nu, de la vivo mem. Kelkaj legintoj de la libro jam riproĉis al mi, ke ĝi estas tro nigre-pentra, malgajiga. Iuj asertas eĉ, ke ĝi apelacias al la larnglandoj. Nu, tiuj homoj ŝajnas feliĉe ne koni la malhelan flankon de la vivo, de nia socio. Ili iru en mian vivmedion kaj ili trovos eble multe pli »malgajigajn« aferojn. Tro multe estas jam skribate pri reĝoj, krezusoj (Krösus, fame riĉa reĝo de Lidio) kaj aliaj »feliĉuloj« de sunflanko de la vivo. Sed neniam sufiĉos skribi pri tiuj de la alia. Mi ne verkos por simple verki, sed por kunhelpi laŭ mia modesta eblo ekskui, pliraciigi kaj plijustigi la mondon.

Jes, ankaŭ nacilingve mi jam provis verki. Sed mi baldaŭ ĉesis pro malbonaj spertoj. Rericevoj de manuskriptoj de redakcioj tute ne legitaj (pri tio mi havis pruvojn; ekz. mi kungluetis la paĝojn kelkloke kaj rericevis ilin nedissiretitaj), do tiaj rericevoj tuj diris al mi, ke oni ne bezonis min. Tamen mi iafoje verkadis por mi mem kaj miaj amikoj.

Pri la esperanta stilo? Nu, mi opinias, ke ĝi estu kiel eble plej simpla, internacia, t. e. racia, klara kaj libera. Estus malfeliĉo, se ĝi tiel rigidiĝus kaj malsimpliĝus, kiel tiu de diversaj naciaj lingvoj.

Kontraŭ iom-post-ioma pliriĝo de la vortrezoro mi certe ne estas. Sed ĝi okazu vere iom post iom precipe en la nuna stadio de la Esperantomovado. Se

tiaj knabinoj, mi orientiĝis fine al tute natura sinteno, kaj akiris jam grandan respekton por Baghy kaj Schwartz, jam montrintaj pli sagacajn vidpunkton. Kaj nun mi sentas, ke por la momento mi sufiĉe parolis pri mia persono, kaj notlibre kaj intervjuje! Vidu tiujn dentojn lerte mutitajn sur tiu buŝmodelo, kaj konfesu ke almenaŭ mia laboro en unu metio estas utila! Dume mi metos la palton, kaj apud glasoj en bierejo Londona ĉi martan vesperon vi rakontos pri la propra farto, de tiam, kiam ni ofte kunlaboris ĉe plenaeraj kunvenoj en la parko Hyde. Puf! Jen impona frazo por fini intervjuon! Private mi diros al vi frazojn pli koncizajn, sed tro »sukajn« eĉ por notlibro mia!

Revuo de Revuoj

— G. Karczag —

Enkonduke mi petas la legantojn ke ili relegu parton el mia pasinta revuo, sed anstataŭ »Suda Stelo« ili bonvolu kompreni »Suda Kruco«. Kvankam ambaŭ meritas la tutan laŭdon, kredeble neniu el ili volas esti la alia. Pardonon pro la eraro.

Renobasió (*escribir como se abla*) monata organo revoluciista, aperas en Meksikio en hispana lingvo. En la unua numero la redakcio promesas doni esperantan kurson kaj samtempe publikigas nian alfabeton kaj longetan artikolon en esperanto kun hispana traduko.

Kiel videblas el la subtitolo, la skribmaniero estas fonetika (nome tiu de la hispanaj partoj). Tamen, mi pensas ke la »mizero de l' latinida alfabeto«, la »c« ne estas arangebla per simpla anstataŭigo per »k«, resp. »s«. Se la unua ja estas allasebla, la dua efikas almenaŭ strange. Estigas jenaj vortoformoj: ebolusió, priñsipio, fasilidad, Serbantes! (Cervantes) (Idiom neutral). Krome, en tiu Ortografio racional de s-ro A. M. Brambila ne estas solvita la problemo de »b« (ĝi legiĝas jen »v«, jen »b«). — Pro la bona enhavo kaj pro la simpatio al E., la gazeto meritas nepran subtenon ĉe niaj hispanlingvaj samideanoj. Estus inde dediĉi pli da atento al la lingvo de la E-aj pecoj.

Scienca Gazeto ĉiam pli kaj pli evoluas. Tre interesa enhavo kaj abunda materialo ĝin distingas. Ke la stilo iom pliboniĝu!

Svenska Esperanto Tidningen kutime bona. En la januara numero (pĝ. 8.) estas publikita la japana rezolucio kun la rimarko: »Al mi ŝajnas, ke tiu rezolu-

cio ne venis eĉ unu tagon tro frue.« Mi kredas, ke ĝi tre oportune malfruis ĝis la pretiĝo de la Dantes-traduko.

Car Nia Gazeto (pri kiu mi parolos poste) denove altiris la atenton de l' mondo esperantista al la akuzativò, mi rapide trovis en la Svenska E. Tidningen kelkajn »sisteronaĵojn« (teknika termino de »la Pirato«). Ekzemple: martò, pĝ. 38.: »... la nomojn de la tradukintoj ne aperos tie.« aŭ »... sur kiu ofte staras proponojn«.

Esperantobladet iom multigis la esperantajn tekstojn, tamen ĝi eĉ nun estas pli norvega ol esperanta.

Ondo de Daŭgava estas, en sia nova formo, pli kaj pli interesa. Mi notis la artikolon de N. Kurzens pri la neologismoj. Ĉi tiu Kurzens estas vera heroo. Li kuragas eldiri tion, kion volonte eldirus ĉiu verkisto, se ili ne timus unu de l' alia. Mi citas tie nur la titolon: »Ne falu en la malan ekstremon«.

Informoj de Esperanto Asocio de Estonio, organo bulteneca, verkita preskaŭ tute de s-ro A. Seppel. Ĝi bonege servas la celojn fiksitajn al si.

Pri *Pola Esperantisto* mi jam kelkfoje skribis. Ĝi estis kaj restis tre bona. La atakoj kontraŭ Germana Esperantisto donas al ĝi specialan intereson. La rubriko »Lingva Esploro« de s-ro L. Dreher devas esti sincere laŭdata, ĉar ĝi havas multajn meritojn rilate al ĝuste tiuj gramatikaj duboj, kiuj nestas ankaŭ en kelkaj lertaj-spertaj esperantistoj. Bonas precipe la artikolo pri -ata kaj -ita (en la aprila numero). Domage, ke tia klerkapulo sentas sia devo uzi la »okazon« de l' arti-

ni ekz. tro senbride enkondukus neologismojn por ĉiu »mal«-vorto, tiam ni ne nur endangerigus la disvastiĝon de Esperanto, sed ni rapide arkaigus ĝis nun aperintajn verkojn. Tio estus lukso, kiun ni ankoraŭ neniel povus permesi al ni. Cetere mi ne komprenas tute la plendon kontraŭ la mal-vortoj escepte en kelkaj kazoj, kie tiaj vortoj estas tro longaj, pezaj aŭ senfortaj (ekz. malmola, mallonga, maldiligenta, malbonodora k. a.) precipe en poezio. La argumenton de iuj uzatan, ke mal-vortojn oni facile miskomprenas, mi tute ne agnoskas. Por esperantisto, en kiu Esperanto jam viviĝis, mal-fermi estas io tute alia ol fermi, malbona ol bona ktp. Se mi aŭdas: malriĉa, tiam mi apenaŭ memoras pri »riĉa«. *Malriĉa* estas por mi vorto kun propra signifo, hazarde iel simile sonanta kiel *riĉa*. Komparu angle: appear kaj disappear, obey kaj disobey; germane: recht kaj unrecht, zumachen kaj aufmachen, ktp.

Ĉu mi nun verkas? Jes, certagrade mi preskaŭ ĉiam verkas, sed mi ne scias, ĉu kaj kiam mi ion publikigos. Mi ofte detruas, kion mi faris, pli poste konstante ke ĝi nenion taŭgas miaopinie. Mi nun skribas romanon aŭ ion similan pri knabo. Sed ĉar mi ne scias ĉu ĝi iam aperos, mi ne volas paroli pri ĝi. Mi ne ŝatas paroli pri propraj laboroj; ne pro modesteco, sed ĉar ne utilas paroli dum la plenumo de ĝi, ne sciante ja la sukceson, kaj ĉar post fino de laboro superfluas. Tiam parolos ja pri ĝi la aliaj, kiuj ekzamenas kaj juĝas ĝin.

Kion mi sentis vidante mian unuan verkon presita en la mano? Nu, sincere, komence certe ian ĝojon. Poste, mi ne scias, kvazaŭ ian bedaŭron. La verko fremdiĝis al mi, ne plu apartenis al mi.

Miaj privataj cirkonstancoj? Plurfoje, nune jam

de jaroj senlabora, mi jam kiel milionoj da samsortaj fratoj spertis malsaton, rezignadon je la beloj kaj agrabloj de la vivo kaj animvenenan senton pri superflueco. Mi loĝas mem en tiu »Turstrato 4«. Mia loĝejo konsistas el malluma, kvinangula kuirejeto kaj malgranda ĉambro ampleksanta ne pli ol 4.20 m × 2.40 m (planka spaco). En ĉi tiuj ejoj mi vivas kune kun mia familio, mia edzino kaj kvarjara filino, vigla, saĝa knabineto, kiu estas kvazaŭ la suno de mia malhela loĝejo. Mia edzino estas ankaŭ esperantistino, mi ja konatiĝis kun ŝi en Esperanto-grupo. Al tiu bona, komprenema viriĉo mi laŭtleĝas unuavice ĉion, kion mi skribas, kaj pri ŝia konsento aŭ laŭdesprimo — nur ridu, vi »fortaj« kolegoj edzoj — mi ĝojas pli ol pri tiu de kleraj kritikistoj kaj redaktoroj. Mia edzino feliĉe ankoraŭ havas laboron kaj dum ŝi en malfacila, nervdetrua laboro perlaboras nian vivon kaj suferadas pro sopiro patrino al sia filineto, fore de kiu ŝi devas pasiĝi tagon post tago, mi ofte sidas ĉe neproduktivaj okupoj: ĉe por-kaj per-esperantaj laboroj. Kaj dank' al la stulta aparta eduko, kiun ricevas nuntempe la knaboj, mi kiel multaj edzoj en sama stato, eĉ ne bone prizorgas la loĝejon, tiel ke ofte la edzino devas perdi sian liberan tagon en la semajno per domaj kaj vestriparaj laboroj.

Kiam mi foje estas tute deprimita, senkuraga kaj eĉ vivolaca, tiam estas antaŭ ĉiuj mia filineto kun siaj bluaj okuloj kaj blondaj bukloj kaj la pacienca, senriproza edzino, kiuj unuavice konsolas kaj rekuraĝigas min. Kaj dum mi iaforte nervozigas kaj fariĝas eĉ malĝentila kontraŭ edzino kaj filino, mia edzino estas ĉiam oferema kaj trankviliga kaj patrinojn mi ne konas multajn, kiuj egalus ŝin.«

kolo »Volapük kaj Esperanto« por ioma ortodoksado.

Tutsame staras la afero kun dr-o Pitlik, kiu ton-
dras en *Ligilo* kontraŭ la neologismoj. Li atentigas
nin pri la lumo el oriento; bedaŭrinde tiu lumo konsis-
tas plejparte — el eŭropano.

Sur la 18-a paĝo de l' februara numero troviĝas
tre bona artikolo pri -ata kaj -ita.

Montriĝas saĝa malico en tio, ke la bildo repre-
zentanta nian movadon montras limakon.

Svenska Arbetar Esperantisten enhavas artikol-
serion de nia holanda s-ano, s-ro Simon Aarse: »Tra-
lingvaj promenadoj«. Kiu lude kaj tre distriĝe volas
sciigi pri kelkaj etimologiaj kaj morfologiaj atentin-
daĵoj, nepre tralegu la serion.

En la januara numero de l' sama revuo ankaŭ
troviĝas peketo kontraŭ la akuzativo: »La historia pri-
skribo de Weinhengst pri SAT objektiva homo devas
kontraŭi.«

Samloke samideano 13131 laŭdadas la »Inferon«,
li opinias nur kontraŭfundamentaj la neologismojn.
Nu, oni povas argumenti kontraŭ la neologismoj divers-
maniere, sed nepre ne per tio, ke ili estas kontraŭ-
fundamentaj. Pripensu, se tiel estus, la plej granda
fundament-rompisto estus Zamenhof mem, kaj konkurus
kun li — nur la Akademio, kiu eĉ oficialigis »funda-
ment-rompajn« vortojn amase.

Aldono al la marta numero »*La lernanto*« enhavas
ĉarman kaj freŝan poemon de Migrat esperantigita
de F. Ĉutak. Jen la tria strofo:

Cu la popolo, la maljuna
Verdas aŭ velkmortis,
Cu por kampo leontodojn
La printempo portis?
Kiujn mi nun memor-tenas
Ludkunuloj — kie penas?
Cu sulkiĝis via vang'...?
— Rozo, rozo, iŝpilang.

Bulteno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kon-
science bultenas.

Aŭstria Esperantisto (inter pluraj) represas el
Hispana Esperanto-Gazeto la unuarangan poemon de
Ferdinando Redondo: »La misvojo. Himno de la pesi-
mistoj«. En la sama numero (februara) ĝi Esperante
(por ke la tuta mondo komprenu) diras dankon pro
la »Savo de l' patrujo«.

Bulgara Esperantisto ne enhavas tro multon in-
teresan.

Diethnés Glossa plejparte greka, verŝajne bona
(bedaŭrinde mi ne multon komprenis).

Al *L'Esperanto* ni jam delonge ŝuldas rekonon.
Mi tion nun plenumas, kvankam mallonge pro manko
de loko, sed neniel malpli sincere. Artikoloj freŝaj,
aktualaj, la stilo de la italaj (kaj kun vere malmulte
da escepto ankaŭ de la esperantaj) pecoj senriproĉa. En
la januara numero aperis traduko de l' publika letero
de Waringhien pri Basic English; la itala lingvo de l'
traduko kaŭzis ververan ĝojon por mi.

Por esti kompleta, mi riproĉas la lingvon de l'
novelo »La nokta vagonaro« (el la germana tradukis A.
Baur).

Ankaŭ *Esperanto* delonge atendas esti menciata.
Sed, mi opinias, estas preskaŭ superflue ĝin mencii:
kiu ja ne konus nian oficialan organon? La saĝaj kaj
objektivaj ĉefartikoloj de Privat impresas min, kiel
avertoj de l' avo al la malordemaj, fuŝemaj infanoj.
Rigardu ekzemple, kiel instruan konsilon li scias doni

pri la neologismoj en sia artikolo »Poetoj kaj novaj vort-
oj« (majo).

La cetera enhavo de la gazeto lastatempe tiel pli-
vigligis, ke tio vere mirigas ĉe organo, kiu devas porti
sur si la ŝargon de oficialeco. Novaj rubrikoj, bild-
paĝoj multkolorigas la gazeton; ankaŭ la literaturaj
pecoj estas tre bone elektitaj: la Dickens-traduko de
Privat »Dangere rajdi amatore« estas perlo en sia
speco. S-ro G. S. recenzas tre konsciencie kaj larĝ-
vide. La esperantistaj problemoj de Hans Jakob mon-
tras la kutiman klarvidon de sperta gvidanto.

Jen *Heroldo de Esperanto*, kiu lastatempe rolas
kiel konkuranto de »Esperanto«. Mi enkonduke konfes-
as, ke tiun »oficiala — duonoficiala«-diskuton mi ne
komprenas kaj eĉ ne emas miksiĝi en ĝin. Male, mi
forte miras, ke tiu afero vekis tiel fortan eĥon en la
esperantistaro. Estas ja tute egale (laŭ mia laika vid-
punkto), ĉu iu gazeto estas oficiala aŭ ne. Kiu ĝi ŝatas
»Heroldo«-n, legos ĝin, kiu ĝi ŝatas »Esperanto«-n, legos
»Esperanto«-n, kiu ĝi ŝatas ambaŭ, legos ambaŭ.
Oficialeco certe nek beatigas, nek damnas. Cetere, estus
domaĝe perdi »Esperanto«-n. Kaj demando: ĉu
Heroldo povus havi la nepran senpartiecon en lando
kun diktatora registaro?

»Heroldo« cetera senriproĉe plenumas sian taskon.
Al la esperantistaro mankas ĉiutaga gazeto (kaj ĝia
kreo — pro nia diseco — estas malebla) kaj estis
Heroldo kiu surprenis la devon anstataŭi ĝin. Mal-
facilega tasko! Sed Heroldo majstre solvis ĝin kaj
konstante pli bone ĝin solvadas.

Baghy (25. februaro) pritraktas la problemon
eble plej gravan kaj aktualan de nia movado, sub la
titolo »Kvaliton al la kvanto«. Precipe la literaturo
urĝe bezonas pli vastan esperantistan kvaliton.

Parenca estas la temo de la artikolo de Brian Pri-
ce Heywood: »Esperanto, ĉu ludilo aŭ kulturfakto-
ro«, kiu elvokis vastan diskutadon en la postaj nu-
mero.

Komprenable mi ne povas raporti ĉi tie pri la
multaj interesaj artikoloj, sciigoj, informoj, instigoj
kaj sugestoj, kiuj svarmas disŝutitaj sur la belaj paĝoj
de Heroldo, sed ne havas rilaton al la literaturo. Mi do
mencias nur la tre lertan kaj erudician recenzon de G.
Eckelmann pri la traduko de l' Infero.

La aldonoj interese varias: La strigo (literatura
kaj arta), La bela mondo (turistika), Lingva kritiko
(lingvistika), ktp. Atentindaj estas la leteroj el la div-
ersaj landoj.

Apartan mencion meritas la belegaj ilustraĵoj kaj
fotoj, kiuj forte atribuas al la rekomendindeco de la
gazeto.

Nun mi transiras al la preparolo de l' junega *Nia
Gazeto*, kies abonprezo estas 10, 12 respektive 15
frankoj jare. Tiu simpatia ĵurnaskilo montras mirindan
evolukapablon: apenaŭ trimonata ĝi jam havas dent-
ojn. Kaj kiel akrajn! Ĝi konstante mordas, foje la Aka-
demion, alifoj la Akademion, denove alian fojon
la Akademion. Tial ĝi certe ne populariĝos en Japan-
ujo, kie la estimo de l' prapatroj estas nepra devo.
Pli da ŝanco ĝi povas esperi en nia senidola kontinento.
Kaj ŝajne ĝi meritos tion. Se mi mencias la »Mian An-
gulon« de Baghy transplantitan el Literatura Mondo
(kaj en kiu la aŭtoro daŭrigas la eksplikadon de sia
vivofilozofio), la lingvajn artikolojn de W. E. Collin-
son, la interesajn informojn de Glück pri la vortaro de
Wüster, kaj aliajn viglajn artikolojn pri politiko, kul-
turo, pejzaĝoj, ktp., oni havos klaran percepton pri

Nia Gazeto, kies abonprezo estas 10, 12 respektive 15 frankoj jare.

Nia Gazeto, kies abonprezo estas 10, 12 respektive 15 frankoj jare, certe plenumas la saman taskon kiel Heroldo, sed, ĉar ĝi estas monatulo, ĝia tasko estas kvaroble pli malfacila. Ĉu la kapabloj kvaroble pli grandaj? Tion ni vidos.

La preso kaj la bildoj — pardonon pro la sincereco — estas tre primitivaj. Vere, rotacia papero kun esperantlingva ŝmirajo estas kara, malofta kaj kunksola vidaĵo por esperantisto, — sed kio esta celata per tio? Esperantistoj ja komprenos la surskribon »Monata eldono de L' Éclairer de Nice«; neesperantistoj eble ne komprenos ĝin, sed al tiuj aĉuloj en la lastaj tempoj eĉ ne venas en kapon rigardi esperantajn gazetojn!

Principe kaj tre laŭdinde Nia Gazeto, (kies abonprezo estas 10, 12 respektive 15 frankoj jare) insistas pri korekteco de la lingvo. Praktike, tamen, tio ne ĉiam sukcesas tiel bone. Ekzemple: (marto, paĝo 7) »...kiujn fervoraj kaj sindonaj propagandistoj aperigas ofte, je turista ĉu alispeca monsubteno.« Mi urĝe trarigardis la gramatikon de Fruictier-Grenkamp, por trovi la pravigon de tiu »ĉu«, sed mi ĝin ne trovis.

Pri ĉi tiu manko de sia gramatiko estu atentigata s-ro Grenkamp, redaktoro de Nia Gazeto, kies abonprezo (nome tiu de la gazeto) estas 10, 12 respektive 15 frankoj jare.

Plie, mi ne povas ne rimarki la du beletajn vortomonstrojn »postulino« kaj »kontraŭsemido«. Precipe la unua sugestas aĉajn miskomprenojn en nia senmoxrala hodiaŭo.

Plej ĉarma, tamen, estas la granda fervoro rilate la akuzativojn, oni legas solenan promeson, ke akuzativoj de nun ne mankos en la ĉefartikoloj. Tamen, tamen — »okazas« la jena frazo: »La milito ekstermis ne sole milionoj da homoj.« Sed neniu plendu! Baldaŭ oni kompensas tiun ĉi preterlason, skribante: »sed ni petas... ne forgesi citi niajn abonprezojn (mi ne forgesis)... kiel afable faris la simpatian kaj bonegan »La Praktiko«. » — Kompenso, eĉ se malĝustloke, ĉiam estas laŭdinda.

Kompreneble, ĉio ĉi ne estas tiel ege grava, ke mi devus pro ili retiri tiujn laŭdajn vortojn, kiujn mi eldiris komence kaj ke mi ne povus havi la plej belajn esperojn pri la evoluo kaj prospero de la gazeto kaj ankaŭ plej sincerajn dezirojn ĉirilatajn. Mi ja ne estas unuigisto kaj malriĉigemulo, mi konfesas, ke Nia Gazeto jam igis mia bezonaĵo, kiun mi atendas scivole, pri kiu mi ĝojas kore. Ĝi certe sanigos baldaŭ el ĉiuj infanmalsanoj. — Mi eĉ ne estus farinta tiujn suprajn piketojn, se Nia Gazeto (kies abonprezo... ktp.) ne estus min infektinta. — Sed ankaŭ ĉi koncerne mi faros du rimarkojn: Unue: La malicaĵoj de Nia Gazeto ofte malplaĉas, ĉar anstataŭ sprita ŝerco ili enhavas nur krudan insulton (ekz: »fuŝfirmo Privat kaj Jung«); kaj ofte ili sonegas kiel kartoĉo ne havanta kuglon. La Pirato multe pli bone ŝargas pafilojn — kaj kanonojn. Due, kiel celi konstante kontraŭ la akademio? Estas ja pripensinde: ataki institucion, kies ĉefa valoro estas ĝia netuŝebla aŭtoritato.

Kataluna Esperantisto en sia 1933 septembra — oktobra numero enhavas strangan recenzon pri »Lingvo, stilo, formo«. S-ro J. G. C. ŝajne volas montri, kiel oni kritikas — subjektive. Afabla interjekcio el la recenzo: »Kaj mi ne havas eldoniston, nek estas ĉiel favorato de l' sorto, kiel Kalocsay.« La lastaj 17 linioj de la recenzo temas ekskluzive nur pri la propraj

Batalo en mallumo

En kelkaj varmsangaj landoj estas kutimo inter la batalema kampara junularo, ke volante interbati kun plena plezuro kaj sengenon, oni disrompas la lampon per trafe direktita vinbotelo. Estigas plena mallumo. Tio estas tre oportuna, ĉar ĝi certigas absolutan senpartiecon. Neniu scias, ĉu tiu, kiun oni batas, estas amiko aŭ malamiko.

En nia Esperantujo unu el la plej taŭgaj batalokazoj estas la neologisma demando. Kaj — ŝajne oni jam disrompis la lampon, ĉar alie oni ne povus kompreni, ke sampartianoj batas unu la alian.

Unue mi mencias s-rinon *Emma L. Osmond*. Kompreneble, ŝi, kiun ja ĉiuj konas kiel plej mildkoran kaj kompateman sinjorinon, ne povus ofendi vitan estaĵon. Do — kuntrenita de batalema — ŝi tradraŝas la Fundamenton kaj la Oficialajn Aldonojn. En la Lingva Kritiko (prilingva aldono de la Heroldo de Esperanto, kiel ĉiuj scias), ŝi atakas eĉ longbarbajn fundamentaĵojn kaj oficialaĵojn (ekz. deklari, solidara, spiti, ignori, pluraj), kiuj ĝis nun trankvile ĝuis la respekton de ĉiu ortodoksulo.

En la Lingva Kritiko oni povis legi kontraŭneologismajn artikolojn de *I. Lejzerowicz* kaj *Stellan Engholm*. Kaj nun — mi ne povas kredi al la okuloj, ili estas unu post la alia tradraŝataj en diversaj recenzoj pro uzitaj neologismoj.

Unu el la plej decidaj kontraŭneologismuloj estas nia amiko *Salo Grenkamp-Kornfeld*. Eĉ en sia libro »Pri l' moderna arto« li enmetis averton kontraŭ novaj vortoj, kio montras ne nur lian fidelecon, sed ankaŭ lian eksterordinaran lertecon. Kaj — li estas haŭtbluigita per la kruelaj batoj de *Jozefo Major* — pro vortoj neologaj.

Julio Baghy pruvis sian ortodoksecon per longega artikolo, kiu, sub la titolo »Dangera Vojo« aperis en la Lingva Kritiko kaj ankaŭ en la Oomoto Internacia. Eble plej akre li kondamnis tie la vorton *prestidigiti*. Kaj jen, kio okazis? En »Nia Gazeto« aperis artikolo el la plumo de *Pierre Corret*, jes, de PIERRE CORRET, kaj tiu ĉi artikolo, tiu ĉi artikolo, tiu ĉi artikolo

enhavas la vorton *prestidigiti*.

Mi tremas, imagante la batalon, kiu nun sekvos. Ĉar se Julio Baghy batos por venĝi pro *prestidigiti*, Pierre Corret rebatos por venĝi pro *pimpa, eskapi, nupto, morna, ĉekano* ktp. Ĝi estos batalo, pro kiu nia lingvo ŝanceliĝos ĝis sia Fundamento.

Dume, mia amiko, dangera neologismulo, prenas sian skribmaŝinon kaj komencas febre labori.

— Kion vi faras? — mi demandas.

— Neologismojn! — li respondas rikane. — Jen la ĝusta momento. La ortodoksuloj ne havas tempon por min bati, ili nun draŝas unu la alian.

M. Alice Pit.

meritoj, verkoj kaj travivaĵoj de l' recenzisto. Kritiko ja estu severa, sed okupiĝu pri la verko, eble pri la verkisto, — sed pri la recenzisto?!

Hispana Esperanto Gazeto forte surprizis min. En la malgranda formato, malgraŭ societaj informoj, ktp., tiom da legindaĵo! Tradukitaj poemoj tiom delikataj! La elegio »Vulzio« de H. Moreau en la traduko de Amalia Numez-Dubus. La hispana popolkanto »La Gepilgrimantoj« tradukita de Julio Mangada Rosenörn! La tuta gazeto tiom impona en sia eteco. Naciaj gazetoj, lernu de Hispana Esperanto Gazeto! —

DR. STAN KAMARYT: FILOZOFIA VORTARO. Eldonis: Moraviaj Esperanto-pioniroj, Olomouc. CSR. 1934. 170 pĝ. 12×17 cm. Bind. 3o ĉk. afrankite.

La filozofio, en la fluo de l' historio, estis dorlotita infano de la lingvo internacia. Ni parolas kompreneble ne pri lingvo artefarita, en la nuna senco, sed pri la lingvo de kleraj popoloj akirinta la funkcion de internacia komunikilo. Tia estis la antikva greka lingvo, kiu trarompis la barojn interpopolajn kaj iĝis kulturlingvo eĉ ĉe la venkintaj romanoj. Tiun ĝeneralan uzon profitis unue la filozofio greka, kiu disvastiĝis per ĉi tiu helpilo kaj iĝis komuna homara trezoro. La greka penso restis vivanta eĉ kiam la greka popolo tute perdis sian gvidlok- on en la historio.

La rolon de la greka lingvo poste transprenis la lingvo latina. Ĝi fariĝis internacia helplingvo, ĝuste kiam la granda mondimperio ruiniĝis. Kiel la latina lingvo, tiel ankaŭ la filozofio de ĝi perata iĝis komuna havaĵo de ĉiuj popoloj.

Tamen, la latina lingvo iom post iom perdis sian signifon, ĝuste en la tempoj, kiam la scienco pleje ek- evoluis. Ĉe la tagiĝo de la nova epoko, ĵu pli elkreskis la moderna kulturo, des pli la lingvo latina retiriĝis de la praktika uzado.

Kaj la filozofio, kiu ĝis tiam profitis per la an- tikva internacia lingvo, iĝis iniciatinto de nova lingvo in- ternacia. Descartes, patro de l' moderna filozofio, jam proponas anstataŭ la tro malfacila latina lingvo lingvon artefaritan, simpligitan. Post li, Leibnitz revis pri filozof- ia lingvo, farebla baze de la kombino de fundamentaj ideoj. Tricent jarojn oni serĉadis sur la vojo montrita de Descartes kaj Leibnitz, ĝis fine Zamenhof sukcesis ple- numi la postulon de filozofoj kaj scienculoj.

Tamen, vere strange! Nun, kiam oni havas la inter- komunikilon internacian, ĝuste la filozofoj sin montras

plej indiferentaj al ĝi. La filozofoj, kiuj abunde uzis la malnovan lingvon internacian, kiuj ekpensis la ideon de la lingvo nova, artefarita, nun kiam ĝi fakte ekzistas, ne interesiĝas pri ĝi.

Tiom pli ĝojege ni devas saluti nun la unuan herol- don de la filozofio, Dron Kamaryt, kiu surprizas nin ne nur per filozofia traduko (Boirac jam provis tian), ne nur per originala verko, sed tuj per taŭga, bona vortaro filozofia.

Dro Kamaryt celas klarigi antaŭ ĉio la plej oftajn fakajn terminojn kaj nociojn de l' filozofio kaj filozofiaj sciencoj. Li volas helpi la nefakajn scienculojn kaj kler- ulojn en la ekrigardo al la vasta regno de la homa pens- aro. Sed samtempe li intencas precizigi, eĉ samsencigi la signifojn de la terminoj filozofiaj uzataj en Esperanto.

La unua tasko de la aŭtoro ne estas tiom facila, kiel ŝajnas ĉe supraĵa rigardo. Estas ja nepra vero, ke la filozofio estas la esprimmaniero de ĉiutempaj homoj. Sed la homoj de ĉiuj epokoj ŝanĝadis siajn opiniojn, siajn ideojn kaj mondkonceptojn. Ne mirinde do, ke la ideoj kaj teoremoj de la filozofio ne estis ĉiam la samaj kaj identaj. Tiun malhelpon Kamaryt mem sentis, kaj penis ĝin solvi donante preskaŭ ĉiam diversajn, pli taŭgajn, pli signifajn nociojn de la sama termino. Tie kaj ĉi tie li donas ankaŭ la sian, aŭ la ĝenerale akceptatan enhavon de la termino. Entute ni povas aprobi lian procedon. Se ni preferus kelkloke alian difinon, aŭ malan komprenon de iu termino, tio ne malpli altigas la ĝustecon de lia princ- ipo. Generale la taŭga verko donas tre precizan klarigon kaj ĝustan ideon pri la filozofiaj terminoj kaj filozofiaj sistemoj.

La belformata verko ne estas ampleksa. Ĝi havas en- tute nur 170 paĝojn. Tio devis fiksi ankaŭ la amplekson de la materialo. Tial ni ne povas malkontenti pro la manko de kelkaj filozofiaj vortoj, kiujn oni aŭdas, ja

Aparte estu menciata la »Provo pri Idearo« de Fer- dinando Redondo, kie la kompilinto grupigas la vort- ojn samrilatajn ĉirkaŭ antaŭelektitajn centrajn ideojn. La verko ne estos granda, tiel kompreneble malprok- sima de perfekte; tamen, kiel komenco kaj sugesto al granda idearo, ĝi estas — kaj estu! — signifega.

S-ro Mangada Rosenörn publikigas la japanan rezolucion kaj samopinias kun ĝi; — post kvin paĝoj: listo de bestovoĉoj kun 6 neologismoj.

The British Esperantist tag-al-tage sekigas kaj alpaŝis la vojon fariĝi bulteno.

Germana Esperantisto, kiu nun ĉefnomigas »Der deutsche Esperantist« (tempora mutantur) anoncas laŭ artikolo el Dagens Nyheter eŭropan rondvojaĝon de l' reĝisoro Malmquist kun 15 aktoroj ludontaj Shakes- peare-ajojn en Esperanto. Ni senpacience atendas ilin.

En la sama (aprila) numero estas publikigata la parolado de s-ro Schumacher »Disvastigo de Espe- ranto pere de la gazetoj« kun la fino »Heil Hitler«.

La Interligilo de l' P. T. T. enhavas viglajn in- formojn fakrilatajn.

Paris Esperanto estas bulteno de l' Grupo Es- perantista Pariza.

La proksiman fojon mi raportos pri Espero Ka- tolika, Bulteno de ISAE, Flandra Esperantisto, Belga Esperantisto, Franca Esperantisto, Sennacieca Revuo, Laborista Esperantisto, kaj nun mi finas per raporto pri *Nederlanda Esperantisto*.

Tiu ĉi gazeto konkuras laŭ bono kaj intereseco kun Hispana Esperanto Gazeto. La milda artikolo de Baghy »La granda digo« atestas pri fido de l' aŭtoro pri la estonto de la homaro. La vervaj, altastilaj, larĝvidaj kaj distraj artikoloj de J. Hartog montras francan ĉarmon. La nova rubriko »Pripensindaĵoj« de s-ro Jong estas interesa kaj leginda. Kaj por ag- rabla fino, jen el ĝi la bela soneto de *Juliette Baudin*:

»Skiado.«

Libere gliti, gliti, kun ĝojo korsarena,
Nun, fine, spiri puran aeron de l' ekzil'
Sur la blindiga blanko, en la blindiga bril'
De l' neĝo senmakula kaj de la sun' matena.

Nenia bru' profana, nenio prema, ĝena,
Neniu hom' je vido kaj eĉ ne la babil'
De kara kunguanto je belo kaj trankvil'
Kaj tamen ĉie vibro, kares' mistera, bona.

Unusekunde, vortoj eliĝas el memor':
— Civito, Civilizo, porpana taglabor' —
Kaj ree la forĝeso! Libere gliti, gliti!

Pri l' vivo senkompata ne pensi ne mediti!
... Sed kial nun ekpremas la koron tiu hel'?
Ĉu pro tro da libero? tro grandioza bel'?

eĉ uzadas ie kaj tie. Vere, ni devas kontentigi je la laŭplaĉa elektado de la aŭtoro, tamen ni estus pli kontentaj, se li estus anstataŭiginta kelkajn terminojn tute maloftajn, eĉ apenaŭ konatajn, per aliaj pli uzataj kaj necesaj. Oni povas rimarki, ke li lasis sin influŭi per la vortaroj esperantaj, jam pretaj, kiel la *Teknika vortaro de Pedagogio*, *Logiko kaj Psikologio* de Trarbach, kaj la *Provo de esperanta terminaro pedagogia kaj psikologia* de Benemann. Tio estas la kaŭzo, ke terminoj metafizikaj, kosmologiaj kaj etikaj ne troviĝas samkomplete en la vortaro, kiel logikaj, psikologiaj aŭ pedagogiaj.

La alian taskon, la unuigon de la sencoj terminaj, ege helpis nia aŭtoro, eĉ se li ne atingis ĝin ankoraŭ plene. La diversaj filozofiaj sistemoj, skoloj kaj tendencoj malfacile renkontiĝas en la granda batalejo de la ideoj, kie unu luktas kontraŭ la alia. Tamen, kiel la interna ideo de Esperanto celas la fratiĝon de la homaro, tiel la internacia lingvo, ni esperu, helpe helpos al la filozofoj de diversaj skoloj, kompreni unu la alian kaj kunlabori por la granda bono kaj perfekteco de la homa pensaro kaj kulturo. El tiu ĉi vidpunkto estas vere ŝatinda la nobla tasko de nia aŭtoro.

Tiu tasko, kaj idealismo tamen malhelpas lin tie kaj tie enprofundiĝi en kelkaj problemoj, multe diskutataj de kontraŭstarantaj sistemoj. Ne gravas, se la aŭtoro intencas eviti konfliktojn, kaj vanajn, ampleksajn pritraktadojn. Tamen tiam li devas esti pli konsekvenca en sia neŭtraleco; ekzemple en la demando de abstraktado; deveno de l' homoj el simio, aŭ en la klarigo de la animeseneco k. a. Mi ne komprenas interalie, kial li diras: »pri l' senmorteco de la animo la scienco povas doni nenan klarigon.« Kial ne? Ĉu la historio de la filozofio ne konas klarigojn, sufiĉe taŭgajn? Aŭ eble li volas subteni la instruadon de Kant? Sed tiokaze li devas menciigi, ke la tezo de senmorteco estas scienca postulato. Krom la opinio de Kant, aliaj filozofoj taŭge argumentadas por la senmorteco, sed iliaj argumentoj estas metafizikaj, do pli malfacile kompreneblaj por la nefakanoj. Krome ĝuste ĉar la problemoj interligiĝas kun la doktrinoj de pluraj religioj, oni devas esti pli singardema pri tiuj tezoj filozofiaj; por ne kaŭzi ankoraŭ pli grandan konfuziĝon anstataŭ la unuigo kaj kompreniĝo alcelata.

La stilo de la aŭtoro estas, laŭ la spirito de la filozofio, simpla kaj klara. Preseraroj troviĝas relative maloftaj; ne sufiĉe klarajn frazojn mi trovis entute nur du en la paĝo 92.: »lernigi arton ĝuste tiujn leĝojn apliki por serĉado kaj pruvado de la vero« kaj en la p. 104. »Baza ideo de la formala logiko: ideo posedanta ĉiujn signojn bezonajn por esti bone priskribata kaj ekskluzive tiujn ĉi signojn.« Pri la neologismoj oni ne rajtas esti tiel severa kaj ekskluziva en tia libro kiel ĝenerale. La fakscienco bezonas novajn esprimilojn por novaj ideoj, kiuj ne troveblas en la ĉiutaga lingvo. Tamen, kelkaj vortoj ŝajnas al mi ne tute akcepteblaj, kiel ekz. *aktualeco* anstataŭ *aktualeco*, p. 18.; *intua* anst. *intuicia*, p. 56.; *noumenon* anst. *numeno* (Ding an sich de Kant) p. 106.; *trilemo*: arhaiĝinta vorto p. 108; *antikaj* anst. *antikecaj* p. 112.; *rezuluto* anst. *rezulto* p. 132.; Mi ne povas preterlasi la rimarkon, ke ĉi tiu titolojn de verkoj alilingvaj oni devas ĉiam en la originala lingvo, ĉar se oni tradukas la titolon, oni erariĝas la leganton, kiu povas kredi, ke la verko estas tradukita en Esperanton.

Ne volante enprofundiĝi en kelkajn problemojn tute fakajn, mi devas resumi ĉiujn miajn rimarkojn per la konstato, ke la apero de la verko de Kamaryt estas granda fakto en nia lingvo. Ĉi tiuj malgrandaj rimarkoj, bagatelaj mankoj, ne malpliigas la grandan valoron kaj internan bonecon de ĉi tiu bonaspekta libro. Ni devas saluti en ĝi

la alproksimiĝon de la filozofio al nia lingvo internacia, kaj praktikan kondukilon en la profunda studado de la filozofio en Esperanto.

Dro. Prof. F. Erdey

JANIS RAINIS: AMO ESTAS PLI FORTA, OL MORTO. Tragedio de »Turaidas Maija«; tradukis el la latva: Ints Caĉe, Eld. Latva Esp. Societo, Riga. Formato 21×14 cm, 108 paĝa, Prezo 3.— svfr. broŝ.

Okazas sufiĉe ofte en la Esperantlingva literaturo, ke aperas naciaj ĉefverkoj en la internacia lingvo kaj pro diversaj kaŭzoj, ili ne povas doni plezuron al alilingvaj legantoj. Ofte, eĉ plej ofte, tiuj verkoj estas tro saturitaj de tiaj naciistaj detaloj kaj karakterizaĵoj, kiuj malfaciligas la universalan intereson kaj tre ofte mem la tradukistoj estas malkuraĝaj, kiam temas pri tia ĉefverko. — Vole-nevole oni havas iom da antaŭjuĝo, kiam oni eklegas nacian ĉefverkon kaj ankaŭ la subtitolo — kvinakta tragedio — ne estas tro oportuna vekti tro grandan konfidon en la animo de la leganto, kiu kutimiĝis al la triaktaj dramoj.

Post tiuj rimarkoj ni devas ĝoje noti, ke tiu ĉi belaspekta libro ne apartenas al la supre karakterizitaj verkoj, sed ĝi meritas la plej grandan atenton de la internacia legantaro; neniu devos penti pro la tempo oferita al ĝia tralego.

La kerno de la dramo estas historia fakto, kiu okazis antaŭ 300 jaroj. Estas plej oportune, se ni citas la rakonton de rolanto, kiu en la lasta sceno resumas la tutan tragedion:

»La rakonto estas preskaŭ ne kredebla kaj mi mem ne kredus ĝin, se mi ne estus vidinta la konsciencur-

Mallonga korekto

En la iama Bibliografia Gazeto (pĝ. 60), sro Waringhien, en sia kritiko pri la Homero-traduko de Manders, skribis, ke li »opinion utila distingo la formon Odisejo (poemo) elde la nomo de la heroo Odiseo aŭ Uliso«. Versajne sub lia influo, la redakcio de L. L. faris tian ŝanĝon en mia manuskripto. Pro diversaj kaŭzoj, ne detaligeblaj tie ĉi, mi absolute ne povas samopinii kun sro Waringhien ĉirilate.

Mi ja samopinionas kun sro Waringhien en tio, ke oni devas transskribi la grekajn nomojn, sed en mia manuskripto mi skribis ĝuste *Odiseo* (la poemo: la greka *Odusseias*) kaj *Odiso* (la heroo). Ĉar, se oni agas kiel sro Waringhien, la *originala akcento* devas tute ŝanĝiĝi. Malgraŭ la valoraj vortoj de sro Waringhien pri ĉi tiu traduko en la nomita artikolo, mi opinias necese atentigi ĉi tie pri la de mi malaprobata ŝanĝo.

Uzante la okazon, mi atentigas, ke pli kompleta studo pri ĉi tiu verko aperis el mia plumo en la revueto »Utrechta Esperantisto« (aŭg., sept., okt., kaj nov.-dec. 1933). La kajeroj estas haveblaj ĉe sro H. A. Korthals, Vleutensche weg 285 bis A, Utrecht, Nederlando. Joh. Hartog.

*

Publikigante la supran korekton, ni petas pardonon, sed samtempe ni esprimas nian dubon pri la taŭgeco de la formo *Odiso*. En Esperanto ja la transskribo de la greka finaĵo *eus* okazas ĉiam per la finaĵo *eo*, kiel montras la Zamenhofaj *Atrco* (Atreus), *Tezco* (Theseus), *Prometeo* (Prometheus), *Pireneo* (Pireneus), *Orfeo* (Orpheus). Kiel ni vidas, la originala akcento tute ne estas atentata. *Wuster* deklaras tiun ĉi transkribmanieron kiel regulon en sia Enciklopedia Vortaro.

Aliparte, eble la formo *Odisejo* estas diskutibla. Ni kredas, ke eventuale pli taŭgus *Odiseado*: vorto pure esperante derivita el la vorto *Odiseo* per la sufikso *ad*. (Red.)

mentojn de Skudritis (servistsoldato, kiu nevole partoprenis la priskribotan murdon.) Standardjunro Adamo Jakubovski havas senbridan naturon, li estas fortulo, drinkulo, deloganto de virinoj, rapidaga... kun malluma pasinto. Estinte ĉe poloj, li pro ia riproĉo estis batinta sian estron; tiam li kuris al mi... Nu... li deziris delogi ankaŭ Maija-n Greif; kiam ŝi kontraŭstaris, tiam kun helpo de Skudritis kaj iu virino forlogis Maija-n al la groto, kie li deziris perforte atingi sian celon... Sed tiam okazis io tute ne kredebla: Maija promesis al li tukon, kiu... havas tian sorĉforton, ke ĝia uzanto iĝas ne vundebla... Li estante superŝtiĉa, kredis tion — tiom multe pli tiam, kiam Maija proponis, ke li elprovu tion ĉe ŝia kolo. Maija klinis la kapon kaj Jakubovski hakis per la sabro kaj tiel li mortigis ŝin. — Maija pli bone (? preferere) perdis la vivon, ol sian virgecon.»

Cirkaŭ tiu ĉi historio plektiĝas la majstre verkita tragedio, kiun la antaŭ nelonge mortinta latva poeto kolorigis per subtila mano. Jam en la komenco surprizas nin freŝa naiveco, kiu rememorigas la stilon de la antaŭrafaelaj italaj pentristoj kaj la sama atmosfero ŝvebas super la tuta dramo sen tio, ke ni sentus tiun ĉi kortuŝan naivecon kontraŭnatura. La arkitekturo de la dramo estas perfekta, la sola riproĉo, ke en la kvina akto la zorgemo de la aŭtoro iom transiras la limon, kaj la tragedio iom lacigas. La supre citita zorgema resumo, ekzemple, estas tute superflua al la leganto kaj rigardanto, ĉar oni ja vidis antaŭe la klarigitajn detalojn, sed tiu ĉi bagatelo ne povas difekti la laŭrokronon de la verkisto, kiu donis al la mondliteraturo vere klasike belan verkon. Kaj la amromano, aŭ romanoj, per kiuj li ornamas la supran historion, senmanke respregulas la saman stilon kaj pentras neforgeseblan bildon pri la virgino, kiu volas dediĉi sian korpon nur memvole al sia elektito. Tri figuroj elstaras, la aliaj iom paliĝas, sed ankaŭ tiu paleco ŝajnas esti tute konscia kaj nur pli akre konturigas la figurojn de la virgino kaj la du rivaloj, unu, kiu havas la amon de la knabino kaj la alia, kiu malfeliĉiĝas pro sia blinda pasio kaj ricevante pardonon de la mortinta virgino, mortigas sin.

La sonĝa figuro de la virgino regas la scenejon, ĉu ŝi estas tie, ĉu ne; kaj la peniko de la verkisto pentras tre subtile. Ni citu nur kelkajn frazojn, per kiuj Maija deziras tranĉviliĝi la angor-premitan fianĉon; kiŭ volas tuj edziĝi kaj per la leĝo defendi sian rajton al ŝi: »... Tiel timema estas, kiu min gardas kaj defendas. La sankta leĝo. — Ho, mia vorto, mia koro, mia amo... estas pli sanktaj, ol ĉiuj leĝoj... Mia amo defendos vin pli multe ol ĉio. Se ĉiuj leĝoj estus sur via flanko kaj mia koro tie ne estus, tiam vi estus sola kaj restus sola. Sed mi vin ŝlosis en mia koro de la unua momento, kiam ĝi malfermis siajn pordetojn kaj fenestretojn, por enlasi suneton, por enlasi vin. Ho kian timon mi havis, kiam la unuan fojon malfermiĝis la fenestreto...» Tiel pentras la verkisto en strange konscia revemo kaj kun la sesa presento de la plej ĝusta paŝo.

Jam ni ne devas akcenti, ke ni opinias la verkon grava pliriĉigo de la Esperanto-literaturo kaj ankaŭ la tradukinto meritas laŭdon. Kiam ni tamen notas kelke da strangajoj, ni volas nur utili al la lingvounueco kaj absolute ne senhumorigi, aŭ mallaŭdi la talentan tradukinton. Sur la kvina paĝo mi trovis la frazon, kiu certe estas laŭvorta traduko de la originalo: »Kia li estas al mi amiko? — en la senco: »Ĉu li povus esti mia amiko? — Aliloke:... parolu tiel, ke ankaŭ la infano povus (anst. povu) aŭskulti. — Stranga estas la esprimo: ni ĉiu (6-a p.), devas esti: ni ĉiuj. Kelkfoje la ŝanĝo de la vortordo donus pli belan formon. Ekz. Vi mem ja de mi eksciis...

(Vi mem eksciis ja de mi...) Maijaparolas jene sur la 11-a p.: Mi faris nenian malbonon, antaŭ kiu mi devus honti. (Pro.) Sur la 14-a p.:... nur iafoje vi malsereniĝas. (Kelkfoje.) Samloke: »Mi prokrastas ĝin pro tio, ke mia doto ne estas preta. (Pli bele kaj mallonge: ĉar...) Bona mi estas kontraŭ vi. (15-a p. Prefere: al vi.) Anstataŭ vipuro, ni vidis la vorton: vipero. (58-a p.) — Ne klarigita neologismo estas la vorto: flako (sangflako 67-a p.)

Sed kompare al la tuta bela laboro, tiuj estas nur bagatelaĵoj.

La bela eksterajo de la libro laŭdas la Latvan ŝtatan monpresejon.

F. Szilágyi.

FUSAO HAJASI: BILDLIBRO SEN BILDOJ. El la japana: Hirokazu Kaji kaj Hajime Suto. Biblioteko de japana literaturo, vol. 8. Esperanto Kenkju-ŝa, 1933. 36 paĝoj.

Laŭ la antaŭparolo, Fusao Hajaŝi estas unu el la plej elstaraj pro'e'aj verkistoj de la nuntempa Japanujo.

La libro konsistas el dek ĉapitroj (dek noktoj), kiujn la Luno rakontas. La Luno nin gvidas per siaj rakontoj al Cinujo, Berlino, Novjorko, Hindujo, Romo, Parizo, Londono, Finnlando, Rusujo. Ĝi rakontas pri tre malĝojaj aferoj: sensenteco, mizero, hipokrito, mistifiko, nacia ribelo, militkriplulo, striko, senorienteco kaj spirita mallumo, venkita batalo, kaj nur je la fino li ĵetas lumon de espero. La rakontoj estas tre impresaj eĉ per si mem kaj ankoraŭ pli interesigas ilin la speciale orienta vidmaniero.

La traduko estas ĝenerale bona. (xy)

LA PROFETO. Paĝoj el la hungara laboristtendenca belliteraturo. Redaktis kaj antaŭparolis Baranyai. Eldonis SAT. 32 paĝoj. Formato 12x15 cm.

La verketo enhavas poemojn de Petőfi, Ady, Gyoni, Tereza Nagy, Johana Várnai, Karlo Tuba; prozon de Antono Farkas, Adalberto Bacsó, Adalberto Révész.

Rilate la elekton, la poemoj estas pli sukcese elektitaj ol la prozo, sed tion kaŭzis certe la amplekso de la libreto, kiu ne ebligis ĉe la prozo la elekton de same reprezentaj pecoj, kiel ĉe la — pli mallongaj — poemoj. Tamen, Farkas kaj Révész estas ne malinde reprezentitaj.

La traduko estas ĝenerale bona. Spierer sin montras tre evolukapabla tradukanto. Emba kaj Csütak lertas en traduko de versoj. Precipe eminentas Emba en la traduko de la poemo de Tereza Nagy. Jen unu strofo:

Kaj kie la korvoj diboĉis kun krioj,
Jam maro kunfluis el ruĝaj sangstrioj,
En ŝtormo de ĝemoj kliniĝis la pinoj
Ve, ploris vidvinoj kaj ploris patrinoj.
Ve, ploris vidvinoj kaj ploris patrinoj,

Mi kredas, ke la verketo akiros por si amikojn en la medio, al kiu ĝi estas destinita. (xy)

DRO S. CHAZAN: SOCIALISMO, ĝia ideologio kaj religio. Eldonis N. Szapiro, Warszawa. 48 paĝoj. Prezo 0.70 svfr. + 10%.

La aŭtoro, pripentrante la idealan socialan regnon, serĉas la vojon de ĝia efektivigo. Kontraŭ la revolucia socialismo, li estas adepto de la evoluismo, emfazante, ke la socialismo estas ne nur ekonomia, sed ankaŭ morala problemo, por ĝia efektivigo oni bezonas ĝeneraligon de l' altruista moralo. Por disvolvi tiun moralon, li montras kiel rimedojn la respekton de l' leĝoj, la asketismajn ordonojn de l' religioj, la familiajn sentojn, la profesiajn kaj kooperativajn movadojn, solidarecon, artojn kaj sciencojn.

La libro legiĝas facile. (xy)

300

BILDOJN KAJ

1100

TITOLVORTOJN

Pagi oni povas nur:
PAGO DE LA KOTIZO OKAZAS PLEJ FACILE
 al la konto de la pola poŝtsparko sub la nomo
POCZTOWA KASA OSZCZEDNOSCI-WARSZAWA
 sub jenaj numeroj en jenaj landoj:

Austrio; Wien	— — — — —	No	79.500
Belgiujo; Bruxelles	— — — — —	No	244.200
Cehoslovakio; Praha	— — — — —	No	89.600
Danujo; Kjöbenhavn	— — — — —	No	14.972
Francujo; Paris	— — — — —	No	600.12
Nederlando; s' Gravenhage	— — — — —	No	145.510
Jugoslavujo; Beograd	— — — — —	No	65.049
Latvujlo; Riga	— — — — —	No	4.030
Svislando; Bern	— — — — —	No	III.6.500
Svedujo; Stockholm	— — — — —	No	4.312
Italujo; Roma	— — — — —	No	1/10110

SUR ĈIUJ ENPAGILOJ DEVAS ESTI LA JENA TEKSTO:
 ADM. LITERATURA MONDO KRAKOW NR. 403.148

EN ALIAJ LANDOJ ONI PAGU:

AUSTRALIO: L. E. Thomson, Esperanto & Commonwealth Government
 Savings Bank Account, Nro 498.567
 ESTONLUJO: Hilda Dreesen, Tallinn, Poŝtkast 6
 HUNGARLUJO: Poŝtkonto de Bleier Vilmos nro 55168
 POLUJO: Administracia Literatura Mondo, Krakow nro 403.148
 RUMANLUJO: Rumana Esperanto-Instituto, Cluj str. Bravilor 15
 JAPANLUJO: Japana Esperanto Instituto, Tokio, Hongoo-Motomaci I.
 kaj Tokio-Do, Esperanto Fako, Tokio, Kudan, Koojimači

El ĉiuj aliaj landoj oni sendu poŝtmandatojn al Pocztaowa Kasa
 Oszczednosci, Krakow, kio Adm. Literatura Mondonr 403.148 Polujo.

Ni akceptas ankaŭ internaciajn respondkuponon poŝtaje en
 la valoro de 0.30 sv. fr po unu.

Aliĝojn kaj pagojn cetere akceptas la reprezentantoj de Literatura
 Mondo kaj plejparto de la esperantistaj librovendistoj.

en la montrata densega komposto prezentas al vi la

UNUA VOLUMO

de

Enciklopedio de Esperanto

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj grandformataj.

La dua volumo ampleksos proksimume 540 paĝojn.

Prezo 30.— frankoj svisaj broŝurita kaj 34.— frankoj svisaj bindita.
 Aldonu 10% por sendkostoj

LA PREZO ESTAS PAGEBLA EN ĜU EGALAJ PARTOJ

Tuj post pago de la unua duono ni ekpedas la unuan volumon.

El landoj, tie ĉi ne menciataj: per bankĉekoj, Postal Orders, aŭ poŝt-
 mandatoj al

P. K. O. Kraków, Polujo, Adn. Literatura Mondo, Nro 403.148

aŭ per internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Unu kuponon ni akceptas en
 la valoro de 0,30 sv. fr.

Eidonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-
 Amikoj Budapeŝt, IX, Mester ucca 53. V. 5. Hungarujo

Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan

Novaliĝantoj al Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj rajtas ricevi ambaŭ
 volumojn por 14 — sv. fr.

LADISLAV VLADYKA: MI EN LI. Romano. Tra-
 dukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc.
 191 pĝ. Prezo: broŝ. RM. 4.

Ekleginte la romanon, ni kredas, ke ni denove havas
 antaŭ ni produktajn de la kutima detektivliteraturo.
 Nenio kondamna estas en tiu kredo (mi neniel volus
 ofendi nian Forge, kiu levis en E. tiun artspecon ĝis arta
 nivelo, por ke mi ne parolu pri E. A. Poe, patro de l'
 tuta tia literaturo).

Poste ni vidas, ke ni eraris. La romano, el la krimi-
 nala ŝajno transglitas al reloj misteraj, okultaj; ĝi estas
 romano fantazia, tuŝanta transcendantajn regionojn. Temas
 pri interŝanĝo de animoj kaj pri la konsternaj amaj kon-
 fliktoj, kiuj rezultas el ĉi tiu ŝanĝo.

Kaj ankoraŭ io. Tiu fantazia transcendo estas nur
 fono. Oni sentas, malgraŭ la ekscitiĝo, kiun la turnoplene
 kondukita rakonto estigas en ni, ke ĝi estas nur okazo
 por profunda kaj majstra animpentro. La aŭtoro pentras
 la animdisecon, spiritan kaoson, sencelecon, amuzomanion
 de nia tempo, kaj ĉio ĉi tiel akre reliefigas antaŭ ni ĝuste
 per la animpreme fatala okulta eksperimento, ke ni sin-
 cere ekaŭziĝas pri nia mizera, vojperdinta epoko. Mi ne
 scias, ĉu tio estis la vera intenco de la aŭtoro, mi parolas
 nur pri miaj impresoj.

La antaŭparolo de la libro prezentas al ni la aŭtoron.
 Tie ni legas inter aliaj: »Vladyka estas antaŭ ĉio stilisto«.
 Poste: »Lia verkado estas unuvorte virtuoza... Tiu lia
 ĉarmo de bonodora kaj malpeza frazo, kiu fajrerante kaj
 fugante tamen enhavas tiom da pezaj faktoj kaj tiom da
 bone kaŝita psikologio, imagas rekte virinece.« Kompre-
 nble mi tute ne kontestas, ke ĉi tiuj bele esprimitaj karak-
 terizoj de la antaŭparolo estas pravaj, sed — mi devas
 diri, ke la traduko, malgraŭ siaj bonaj ecoj, ne mani-

festas al ni la aŭtoron tia stilisto, kia lin prezentas la
 supraj frazoj. Evidente, la tradukintoj bone interpretis
 al ni la pensojn de la aŭtoro, sed pri tiu »speciala ĉarmo
 de bonodora kaj malpeza frazo« ili restis al ni ŝuldantaj.
 Mi ne riproĉas ilin pro tio. Eble la stilo de l' aŭtoro
 estas ne redonebla fremdlingve, aŭ eble, por ĝin redoni,
 oni devus esti same granda stilisto kiel li mem.

Cetere, ankaŭ sen tio, la libro estas sufiĉe interesa,
 atentkatenanta kaj originala, por eksciti kaj absorbi la
 leganton.

Rilate la lingvaĵon, mi notis plurajn malkorektaĵojn,
 kiuj iom mirigas en traduko farita de pluropro kaj korek-
 tita de kvar personoj. Jen ekzemple eraroj pri la transir-
 eco de verboj: konfuzigi (konfuzi), inci'igi (inciti), ekscit-
 igi (eksciti), ravigi (ravi), moviga (mova), konsterniga
 (konsterna), indignita (indignigita), terurigi (teruri). Oni
 trovas jen *elektri* jen *elektrigi*.

Kromordinara anst. *eksterordinara* ne ŝajnas ĝusta.
 Ĝi ja signifas: io krom la ordinara, dum oni devus
 esprimi: io ekster la ordinara, io trans la ordinara.

»Treti de unu piedo sur la alian«: tion ĉi leginte mi
 imagis, ke oni tretas de unu piedo de iu homo sur la
 alian piedon de l' sama aŭ de alia homo, do — ke oni
 promenas sur fremdaj piedoj. Mi diras: »stariĝi de unu
 piedo sur la alian.«

»Laboristo falis de sur trabaro kaj mortigis sin« —
 oni kredus ke li, krom la falego, faris ankoraŭ memmor-
 tigon. Kvankam la tradukintoj volis esprimi simple, ke
 li mortis.

Poste troviĝas multaj eraroj pri la artikolo. Ekzem-
 ple: »Scivolaj manoj de Hora...« Tio estus ĝusta nur,
 se Hora havus multajn manojn, kaj temus pri kelkaj el
 ili. Sed ĉar li havas nur du manojn, kaj temas pri ili

ambaŭ, devas esti »la scivolaj manoj.« Sur la sama paĝo troviĝas »la emociita Mila« (ĝuste) kaj »scivola Mila« (kial mankas la artikolo?). Oni devas diri aŭ »la scivola Mila alpaŝis la muron«, aŭ »Mila scivole alpaŝis la muron«, aŭ, eble, »Mila, scivola, alpaŝis la muron...« Aliajn, ne malmultajn erarojn pri l' artikolo mi nun ne volas citi.

Fine, mi ne povas kompreni, kial la tradukintoj insistas pri la dividisigna uzo de la apostrofo. La apostrofo ja havas sian difinitan funkcion en E.: ĝi signas la elizion de la o-finaĵo kaj la elizion de la a-litero de l' artikolo. Ĝi do ne kunligas vortojn, sed markas finon de vorto. Por kunligi ni havas, la streketon. Mi ne povas imagi, kial estus pli bona la nekutima *demand'esploris* ol la kutima *demand-esploris*. La tuta esperantistaro kutimiĝis al la ligostreko, kial do alpreni kutimon novan, kiu prezentas nenian avantaĝon kaj povas eĉ esti konfuzon momentan dum lego. Per la zamenhofeco de la apostrofa kunligo oni ne povas argumenti. Zamenhof ja uzis ĝin nur plejkomence, kiam oni ankoraŭ apartigis ĉiun vortelementon al kutimiĝi, sed post la forlaso de tio neniam plu.

La libro estas zorge eldonita, plaĉe bindita. Ĝi certe meritas vastan interesigon.

F. Szilágyi.

JAPANAĴ FABELOJ. Tradukis anoj de J. E. S.: Takekiĉi Aramaki, Naosuke Hamada, Micue Jamagata, Micuru Macubara, Takao Minami, Noburo Simoda kaj Joŝiŝi Simomura; konsilis Jozefo Major. Eldonis Koku-bunŝa, Tokio, 1933. 38 paĝoj.

La fabeloj ne tro diferencas de la eŭropaj. Estas interese, kiel similas la fantazio de tre diversaj popoloj: en ĉi tiuj fabeletoj temas same pri puniĝo de malico, rekompenco al bonuloj, heroa forto per kiu nin surprizas malgrandulo: la samaj motivoj, kiujn ni renkontas ankaŭ en niaj infancambroj. Tamen, ili ne malhavas specialan japanan aromon, pro kiu oni legas ĉi tiujn fabeletojn kun aparta intereso.

Simomura interese rakontas en la Postparolo la historion de la kolektiva tradukado. Li iom plendetas pri tio, ke la japanismojn ili ne povis traduki fidele, ĉar la eŭropanoj, al kiuj la libro estas dediĉita, ne komprenus la japanan »etoson«, tiom kiom la japanoj la eŭropan. Nu, ĉi-rilate mi opinias, ke la japanaj esperantistoj ne devas blinde imiti la eŭropanan stilon. Ili devas alproprigi nur la specialan spiriton de la lingvo. Kaj, se ili tion jam faris, nenio malhelpas, ke ili riĉigu la lingvon ankaŭ per japan-aromaj esprimformoj. La alproprigo de l' lingva spirito necesas nur por povi prijuĝi, ĉu tiuj esprimoj estas vere asimileblaj de la lingvo, aŭ ili restos ĉiam fremdaj al ĝi. Mi aludas pri la ekzemplo de hungaraj esperantistoj, kiuj faris sukcesajn provojn ĉi-rilate.

La traduklingvo estas tre bona kaj glata. El tiuj plumoj ni povas esperi ankaŭ pli grandpretendajn verkojn.

(xy)

J. ISIGURO: PRAKTIKA GVIDO DE KORESPONDO EN ESPERANTO. 306 paĝoj.

Belege eldonita, luksampleksa libro, kiu instruas — korespondi. Vere, la japana movado devas esti viglega, se ĝi ebligas la eldonon de tia verko. Mi kredas, ke la vera celo de l' verko estas ne tiom la instruo de l' korespondo mem, kiom la lingva komentario, kiu estas tre vasta kaj detala ĉe la unuopaj leteroj. Do, la verko ree montras, kiel malfacila estas Esperanto por japanoj: en neniuj Eŭropa lingvo oni sentus la neceson de tia libro. Sed mi kredas, ke la vera malfacileco de E. por la japanoj konsistas ne tiom en la vortoj, kiom en la frazstrukturo, kiu estas, kiel mi vidas en la japanlingva kurso de Oomoto, funde diferenca de la okcidentlingvaj.

Kaj mi kredas, ke alpropriginte la spiriton de Esperanto, japano tute ne lernas novan radikon pli malfacile ol ekzemple hungaro, estono, finno, slavo lernas tian vorton, kiu ne ekzistas en lia lingvo. Foje ni jam petis niajn japanajn samideanojn pri ĉi-koncerna artikolo: tio certe multe pli klarigus la aferon ol rezolucioj.

Mi trovis en la libro la interesan mallongigon »Zamennasko« anstataŭ »naskotago de Zamenhof«. Ĝi ŝajnas al mi disvastiginda.

(y)

PRI L' MODERNA ARTO. Verkis Jan Brzekowski kaj S. Grenkamp-Kornfeld. Formo 23.5×15.5 cm. 32 teksto- kaj 68 klišopaĝoj kun 74 klišoj. Dukolora kovrilo, senligna papero. Prezo broŝ. 7.— svfr, bind. 9.— svfr. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Por AELA anoj la kvara libro de 1933.

Post la forpaso de l' tempo, dum kiu la arto kontentiĝis per la plejble proksima imitado de l' naturaj belajtoj, tuj kiam la artistoj ekprovis enigi en siajn verkojn novajn konceptojn (ekz. ke la artaj belajtoj povas esti, kaj fakte estas, sendependaj de la naturaj), inter ili kaj la publiko, eĉ klera, ekestis miskompreno, kiu ĝis nun daŭras kaj lastatempe, nome de post la milito, naskis akregajn kverelojn, kiuj ankoraŭ ne finiĝis — verŝajne ne finiĝos.

Notinde estas, ke tia miskompreno ne estas io nova. Ĉiam oni ĝin vidas, rigardante ĉu al la literaturo, ĉu al la muziko, ĉu al la pentroarto. Kiam, ekzemple, ni relegas nun artikolojn de iamaj kritikistoj, kiuj kelkajn jarojn post la morto de Beethoven skribis pri ties lastaj komponaĵoj, interalie pri la IX-a Simfonio, tiu admirinda kaj emociiga ĉefverko, ĉu ni ne estas mirigitaj de la riproĉoj iam direktitaj al la genia produkto? Ŝtonigite de mirego ni legas la vortojn »brua, sovaĝa, ne pli ludebla kaj kantebla ol aŭdebla muziko« uzitajn por karakterizi verkon, kiun nun ĉiu konsideras kiel klasikan, eĉ ĝistede klasikan! Ankaŭ la epoko, kiam parolante pri la Wagneraj operoj oni ne ŝparis similspecajn epitetojn, ne estas tre malproksima: tamen nun tiuj operoj estas konsistigaj partoj de la ordinara repertuaro de la muzikteatroj kaj ne malofte oni povas aŭdi aŭ legi, ke ili fariĝis »gurdaĵoj«. La samajn konstatojn ni rajtas fari pri literaturaĵoj aŭ pentraĵoj. Rilate tiujn lastajn, la miskompreno estas eĉ pli profunda kaj la kvereloj, kiuj ekestas inter malsame opiniantoj, montriĝas la plej akraj. Tio ja estas komprenebla, ĉar por sin esprimi la pentristo, vole-nevole, uzas formojn, kies modelojn ĉiu konas, eĉ kiam tiuj formoj rilatas al pure geometriaj figuroj. Sekve al la rigardanto altrudiĝas la neceso, ke la naturajn belajtojn, pli-malpli klare de li rekonitajn, li apartigu de la artaj, pri kiuj diskuto estas ĉiam ebla. Plie, tiu diskuto ne ĉiam estas serena, kiel decus por tiaj demandoj, ĉar ne ĉiu kapablas, eĉ se li agnoskas ties saĝecon, agi laŭ la konsilo de la franca literaturisto Gustave Flaubert: »Kiam oni intencas kritiki art-verkon, tiam oni forgesu ne kion oni scias, sed kion oni ŝatas«.

Pro tio — kaj ankoraŭ pro aliaj motivoj — atentinda kaj utila prezentigas la libro verkita de nia bone konata amiko S. Grenkamp-Kornfeld en kunlaboro kun la ŝatata artkritikisto d-ro Jan Brzekowski. Ĝi alportas multe pri la novaj »ismoj« de la pentroarto kaj en densa, drasta formo plej taŭge konigas ĉion, kion estas necese scii pri la diversaj tendencoj, kiuj konsistigas, kion oni nomas, pro manko de pli ĝusta esprimo, la »moderna arto«. Per objektivaj klarigoj ĝi difinas — tiom almenaŭ, kiom estas eble pri tiuj aferoj — la ĉefajn karakterojn de la diversaj »ismoj«,

kiuj sin intersekvis de ĉirkaŭ la jaro 1908 (kiam en Okcidento kreigis *kubismo*, kiel reago kontraŭ la ĝis tiam triumfanta *impresismo* kaj eble, iagrade, kiel unua rezulto de la futuristaj manifestoj de la itala poeto Marinetti), ĝis *surrealismo*, kiun la aŭtoroj montras kiel laŭkronologie la lastan kaj iom arbitre kiel hodiaŭ ankoraŭ tre popularan direkton.

Post ĝenerala alrigardo al la evoluo de la pentro-arto inter la ĵus cititaj limoj, la libro enhavas pli detalajn informojn pri la batalo inter la du realoj, kiu konsistigas la arton, »la realo de l' ekstera mondo kaj la abstrakta realo, ekzistanta kaj montriĝanta en la elsentemo de l' artisto«; pri la tendencoj de l' moderna arto (deformismo, konstruado, literatura esprimo) kaj ties interpenetrado; fine, pri la stato de la nuntempa pentroarto. Prave la aŭtoroj diras, ke nun »regas malpli da teorio kaj pli da praktiko; venis tempo de plena praktika elprofitado de la teoriaj valoroj, kiuj estis enkondukitaj«. Tamen ne ŝajnas, ke »regas normigado kaj stabiligado«, almenaŭ laŭ la *ismoj* priparolitaj. Fakte neniu el la »sko'oj« studitaj en tiu ĉi libro povis konsistigi »finon en si mem«. Ĉiuj, pli malpli akcentite, estis nur reagoj kaj provoj, cetere utilaj. Per neniu el ili povis, nek povas kontentigi la artsento, kiun, pli malpli klaran kaj »tuseblan«, portas en si ĉiu homo. Kaj tion pravas la nuna »moderna renesanco«, aŭ »nova klasikismo«, kiu elprofitanta la serĉojn kaj la trovojn de kelkaj sinceruloj, kiel nome Picasso, liberigas la artistan individuecon kaj direktas ĝin denove al la naturo, ĉiama kaj sola fonto de belo por ĉiuj artoj kaj -precipe por la plastikaj.

Tiu aŭ alia konkludo ne troviĝas en la libro, kies leganton pli instrui ol influ i tencis la aŭtoroj, kiuj pro tia intenco estas laŭte laŭdindaj. Laŭdindaj ankaŭ pro la sobro kaj komprenebleco de siaj priartaj klarigoj. Tiel ilia verko multe utilos al la »mezinteligenta konsumanto« por kompreni la novajn bazojn de l' pentroarto. Al tiu kompreno helpas la kolekto de 74 kliŝoj faritaj laŭ pentraĵoj de la plej »originalaj« *istoj* el la menciitaj *ismoj*. La lingvo de la verko, malgraŭ la malfacilo de la temo, estas klara, flua kaj pura. La libron, bele prezentitan kaj plaĉe presitan, devus havi en sia biblioteko ĉiu scivululo.

Georges Avril

KANTOJ DE AMO KAJ SOPIRO de EUGENO MIHALSKI. Eldonis: N. Sapiro, Warszawa, 1934. 48 paĝoj. Formato 13×18 cm. Prezo: broŝ. 0.70 svfr.

La kajero entenas poemojn el la jaroj 1917 kaj 1918. Tio starigas la recenziston antaŭ ne facilan situacion. Se li volas esti rigora, se li volas kritiki ĉiujn malperfektaĵojn, li povas ricevi la respondon, ke tiuj poemoj ja estas fruktoj de periodo, kiun la poeto jam delonge transpasis, evoluinte al multe pli alta nivelo de inspiro kaj tekniko. Kaj vere, tio ja estas fakto. Sed — ĉi-okaze, kial la poeto publikigis ĉi tiun volumon? Ĉu nur kiel kontribuoj al la historio de sia spirita evoluo?

Nu, la poeto mem malkonfesas siajn iamajn kantojn en manuskripta poemo:

Akordojn de l' sentimentalato
komencis ŝanĝi rava lir'
kaj mi, el amo-kavalir'
fariĝis bardo de batalo.

Mi plu ne dronas en imagoj
de anemia am' al In,
mi sane amas, sen karmin'
kaj sen emfazaj dirzigzagoj.

Sed, ŝajne li tamen ne povas tute rifuzi sian patran senton al tiuj infanoj malkonfesitaj:

Mi tial amas rememori
legante versojn de l' naiv',
kaj tagojn de l' pasinta viv'
per viva sperto traesplori.

Mi povus diri, iom krude, ke la leganto, kaj precipe la recenzanto, ne povas senti tiel varme pri tiuj ĉi poemoj, ke li eksentu en ili ankaŭ tion, kion ili ne enhavas, kaj kion al la poeto sentigas nur liaj rememoroj kroĉitaj al la poemoj per la forto de asociado. La recenzisto devas esti influita nur per la poemoj mem, kaj tiu ĉi influo — plejparte ne estas tro forta. La poemoj estas simpatiaj en sia junuleca ŝvelo de vortoj kaj en siaj junule aŭdacaj teknikjonglaĵoj. Oni povas en ili vidi ĝermon de talento, promeson de venontaj plenumigoj. Ĝi estas kolekto, kian ĉe la fino de kolektitaj verkoj de grandaj aŭtoroj oni vidas sub la titolo »Junulaj provoj«. Kaj — por forigi miskomprenon, mi emfazas, ke ĉi tiu juĝo rilatas ne al la temo de l' poemoj (amaj poemoj, eĉ naivaj amaj poemoj povas ja esti grandiozaj majstroverkoj), sed al ilia ellaboro, arta kaptado, esprimovo, prezentmaniero.

La »leonaj ungoj«, kiuj oni povas ekvidi en tiuj ĉi versoj, estas la facila versado, la ofte spritaj rimoj (kvankam al la rusmanieraj »radikrimoj« mi sentas nevenkeblan antipation), la perfekta lingvouzo (kvankam »kiseco« ŝajnas al mi enigma; »tiame agu vi aroĝe plej« estas tro fakasita vortordo). Ofte nin surprizas bela impeto de facil-kura verso, kiun spronas danca ritmo kaj riĉaj rimoj.

Resume: la poemoj estas ne seninteresaj provoj de poeta studtempo, sed la libro mem ne estas literatura evento.

G. Karczag.

TEO JUNG: »LA ARGENTJUBILEA KONGRESO«. (Eld. Heroldo de Esp. Köln. 51 p. Prezo: GM 0.50.) Kroniko pri la jubilea kongreso. Plej interesa parto de la kroniko estas motivado de la speciala situacio, en kiu la kongreso okazis. Mi rememoras la anekdoton pri la juĝisto, kiu diris al ambaŭ procesuloj: Vi pravas. Kaj tiam la advokato atentigis lin, ke samtempe du kontraŭuloj ne povas pravi. — Ankaŭ vi pravas. — diris la juĝisto. En la kontraŭdiroj de la Esp. okazajoj ni sentas nin similaj juĝantoj.

F. Szilágyi.

ISE-KALENDARO 1934 — Internacio de Socialistaj Esperantistoj, Wien, XXI. Augererstr. 14 — 1933 — 64 paĝoj — 11,5×15 — Prezo: ŝil. —.60 Agendeto kun pluraj interesaj informoj.

BUKEDO. Elektitaj rakontoj skribitaj en Esperanta Stenografio Duployé-Flageul. Eldonejo de E-a Stenografio. 9. Bd. Voltaire. Issy-Les-Moulineaux, Seine, Francujo. 16 paĝoj. 11×16.5 cm. Prezo: fr. fr. 1.50 (1 respondu-pono).

A. CERNIĤ: REKORDO. Tradukis: V. Fuks, I. Krolík, V. Bobrov. Eldonis Ekrelo, Leipzig, 1933. 2/4 paĝoj. 15×21 cm.

Novelo traktanta pri la socialisma konkurado en la kadro de domkonstruado dum la kvarjarplano. Bona traduko, escepte la uzon de tiu malbenita artikolo.

ELDONEJO »HELMOND« — Afiso — Eldonis Eldonejo »Helmond«, Helmond. 60.5×39.5 — 1934 — Bele presita reklamilo.

G. P. DE BRUIN: GVIDILO TRA LA ESPERANTO-MOVADO. Eldonis SAT, Parizo. 48 pĝ. 12×19 cm. Prezo broŝ. fr. fr. 4.

Konciza sed tre bone skizita trarigardo tra l' E-a movado neŭtrala kaj laborista, precipe pri la lasta. En la preparolo de la neŭtrala movado la aŭtoro montras laŭdindan objektecon, kiel ankaŭ ĝenerale li preferas doni taŭge registritajn faktojn ol subjektivajn sinesprimojn. Nur en la preparolo de la skismo inter SAT kaj SEU li ne povas sin deteni de kelkaj fortaj esprimoj malfavore al la lasta.

La libreto estas tre bele eldonita, havas agrablan eksterajan.

RECENZOTAJ LIBROJ

ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO, Unua Volumo — L. Kókény kaj V. Bleier — Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Mester ucca 53/V — 1934 — 272+112 paĝoj — 23.5×15.5 — Prezo: Du volumoj, broŝ. svfr. 30.— bind. 34.— plus 10% por sendkostoj; pagebla en du partoj. Por anoj de AELA la du volumoj faras la 6-an verkon de 1933. La novaj aliĝintoj rajtas ricevi unu ekzempleron por svfr. 14.—

ARTHISTORIO — Anton Hekler — Tradukis: K. Kalocsay — Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Mester ucca 53/V — 1934 — 212 paĝoj — 23, 5×15.5 — Prezo: broŝ. svfr. 13.—, bind. svfr. 15.— plus 10% por sendkostoj.

Internaciaj someraj Esperanto-kursoj en Stockholm

23. Julio — 2. Aŭgust 1934.

La Prepara Komitato de la 26-a Universala Kongreso kaj la Sveda Esperanto-Instituto decidis komisi

D-RON F. SZILAGYI L. K. (BUDAPEST)

kies speciala instrumetodo (iniciantoj: F. Szilágyi kaj Tibor Czitrom), la t. n. lumbildmetodo vekis pro siaj moderneco kaj avantaĝoj specialan atenton, por organizi

DU 10-TAGAJN KURSOJN

antaŭ la Kongreso (ĉiutage po 2 horoj).

La unua kurso estos **KOMENCA KURSO**, sed ĝi bonege povos servi ankaŭ por tiuj, kiuj finis nur mallongan kurson, kaj donos multe da okazoj por paroli (kun kaj sen lumbildoj), la dua kurso estos aranĝita por **PROGRESANTOJ**, (instrukcia kurso por instruontoj), kaj el ties materialo ni mencias la parolekzercojn kaj metodinstruadon kun lumbildoj, la historian kaj literaturan parton, organizajn pritraktadojn ktp. Kunlaborantoj: T. Czitrom, (Budapest), E. Dahl (Uddevalla) kaj H. Seppik (Tallin).

Kurskotizo: Svedaj kronoj 10.— (aŭ egalvaloro), post la 10-a de julio 12 sv. kr. Sendu al: Poŝtĉeka konto 2012.

Malmultekostaj loĝejoj, manĝado.

Ekskursoj, amuzoj.

Petu informojn.

**Someraj Esperanto-kursoj
Stockholm, Box 698.**

FINE MI KOMPRENIS LA RADION — E. Aisberg — Literatura Mondo, Budapeŝt IX., Mester ucca 53/V — 1934 — 140 paĝoj — 23×15.5 — Prezo: broŝ. svfr. 4.50, bind. svfr. 6.— plus 10% por sendkostoj.

IVANS: LA VIRO EL FRANCUJO. Aventuro de Geoffrey Gill, detektivo. El la nederlanda lingvo tradukis W. Versteeg Graafdiĵk. Kontrolita kaj rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. Populara Esperanto-Biblioteko, Amsterdam. Elandstraat 177—179. 21×15.5 cm. 2/4 pĝ. Prezo bindita: guld. 2.50 + sendkostoj.

AMO DE TOOJUUROO kaj Du Aliaj Teatraĵoj — Kan Kikuĉi — Tradukis: Joŝiŝi Simomura — Literatura Mondo, Budapeŝt IX, 53/V Mester ucca — 1934 — 88 paĝoj — 13.5×20 — Prezo: svfr. 1.20 plus 10%. Por AELA-anoj nur 0.60 svfr. afrankite.

TURSTRATO 4 — H. Weinhengst — Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Mester ucca 53/V — 1934 — 176 paĝoj — 20×13.5 — Prezo: broŝ. 3.50, bind. svfr. 5.— plus 10% por sendkostoj. IV.-a volumo de AELA 1934.

EL LA NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO — K. R. C. Sturmer — Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Mester ucca 53/V — 1934 — 125 paĝoj — 20×13.5 — Prezo: broŝ. svfr. 2.50, bind. svfr. 4.— plus 10% por sendkostoj. Por AELA-anoj broŝ. svfr. 1.20 bind. 2.10 svfr. afrankita.

METROPOLITENO — CK SEU, Moskvo. Varankin Romano.

PRESISTO KAJ KLIENTO — Eldonis Esperanto-Presejo kaj Eldonejo Ant. Prazak, Jablonné n. Orlici — 16 paĝoj — 16.4×10.2 — 1934. Kelkaj koncizaj konsiloj al tiuj, kiuj rilatas kun presejo; modeloj de la pres-tipoj.

LA TRAVIVAJOJ DE LA BRAVA SOLDATOSVEJK DUM LA MONDMILITO — J. Hašek — J. Stadler — Sennacieca Asocio Tutmonda, 23, rue Boyer, Paris 20 — 1934 — 152 paĝoj — 13×18.5 — Prezo: frfr.: 12.50 — 10% sendkostoj.

GRANDA RUS-ESPERANTA VORTARO — V. Kolĉinski, E. Izgur, Lingva Komisiono de SEU — CK SEU,

J. B. SEVERAC: **LETEROJ AL BRIGITO.** La socialista partio, ĝiaj principoj kaj taskoj. Eldono de ESFIO, 12, rue Feydeau, Paris 2. 1933. 212 pĝ. 12×19 cm. Prezo: fr. fr. 10.

LA INFANOJ DE BETLEHEM — Selma Lagerlöf Oscar Frode — Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Fako 698 — 1933 — 32 paĝoj.

SKIZOJ EL ESPERANTUJO — Franz Ulrich — Eldono de la Aŭtoro — 1933 — 32 paĝoj — 11.5×15. Prezo: Kr. ĉ. 4.50.

WAT IEDER VAN ESPERANTO WETEN MOET — G. P. de Bruin — F. L. E. Amsterdam o Postbus 50 — 1934 — 27 paĝoj — 13.5×19.5.

CAPAJEV — CK SEU, Moskvo. Romano.

LA INSTRUO DE KARL MARKS — CK SEU, Moskvo.

F. KARINTHY: VOJAGO EN FAREMIDON kaj **DU ŜIPOJ.** Noveloj. El la hungara: L. Totsche. 84 paĝa. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Prezo: sv. fr. 1.20 + 10% por sendkostoj. Por AELA-anoj 0.60 svfr. afrankite.

PRI PIEDPILKLUDANTO de Victor van Nispen; kun desegnaĵoj de St. de Reuder. El la nederlanda lingvo tradukis: Frater M. Bartholomeus. Eldonejo: Piet Smits, Tilburgo. 96 paĝoj, formato 19×12 cm. Prezo: 1.30 nederl. guldenoj.

Informoj al membroj de AELA

En la nunaj tagoj ni sendas al niaj membroj, pagintaj la kotizon por 1934:

la duan libron de 1934: Antono Hekler, Arthistorio. Volumo I. kaj kiel ekstericajn librojn:

K. R. C. Sturmer: El la Notlibro de Praktika Esperantisto,

Kan Kikuĉi—Joŝiŝi Simomura: Amo de Toojuuroo.

La sumo, pagenda por la Sturmer-libro estas broŝurita 1.20 svfr., bindita 2.10 svfr. por la Kikuĉi 0.60 svfr.

En la samaj tagoj ni sendas al ĉiu, kiu ne sendis al ni sciigon pri neemo al superpago, la unuan volumon de *Enciklopedio de Esperanto*. Bedaŭrinde la kompostado kaj presado daŭris multe pli longe, ol ni iam ajn supozis. La kaŭzo estas tre simpla: la de ni ne atendita grandeco de la materialo, pro kio ni devis apliki 20% pli densan komposton, ol ni efektive intencis. Tial ni esperas, ke niaj membroj pardonos al ni tiun prokraston. Ni scias tute certe, ke ili estos tre kontentaj pri la enhavo kaj volonte superpagos por broŝurita eldono svfr. 3.— por bindita svfr. 4.—, membroj kun rekomendo pluan sumeton de svfr. 0.50.

La dua volumo jam estas kompostata, sed ĝi certe (ĉefe pro la multe da tempo, necesa absolute por la korektado) ne aperos pli frue, ol post tri monatoj. Por tio ni petas pluan paciencon.

Tiuj, kiuj ne deziris superpagi ricevos ambaŭ volumojn kunbroŝuritaj.

Estas multaj membroj, kiuj ne elektis ion anstataŭ la kvina libro de 1933. Laŭ specialaj kondiĉoj ni konsentis al multaj ŝanĝon tiel, ke ili povis reteni por si la Radio-libron, sed ne ankaŭ la Karinthi-verkon. Sed neniu-okaze ni povas akcepti peton, ke ni akceptu anstataŭ superpago la ellason de la kvina libro. Neniu forgesu, ke efektive por tiu kvina libro la membroj ne pagis pli ol 1.20—1.50 svisajn frankojn kaj la monon, kiun ni petas kiel superpagon por la Enciklopedio, ni nepre bezonas, por ke ni povu peti ne pli altan sumon ol 3.— frankojn por ilustraĵoj de 100 paĝoj kaj teksto de ĉ. 300 paĝoj. Ni esperas, ke ĉiuj niaj membroj bone komprenos tion.

Suldo de niaj membroj.

Al ĉiuj membroj, kiuj ŝuldas, ni nun kunsendas ankaŭ fakturon kun indiko, kie kaj kiel pagi. Ni kalkulas ŝuldantaj ankaŭ tiujn membrojn, kiuj ne deklaris ĝustatempe sian eksigon, sed ankoraŭ ne pagis la kotizon por 1934. Ni petas ĉiujn membrojn, pagi sian ŝuldon kaj ĉefe la nepagintojn de 1934. Ni fiere konstatas, ke se eĉ malfrue pro teknikaj kaŭzoj, ni liveras al niaj membroj pli ol ni promesis. Sed al nia laboro ni nepre bezonas, ke ĉiu membro pagu orde sian kotizon, ke ni sciu kun kia nombro kalkuli kaj pro tio ni nepre devas insisti pri la pago de kotizoj kaj ŝuldoj. La membroj nepagantaj orde faras al ni malfacilaĵojn, certe senvolajn, sed tre dolore sentatajn. Neniu povas deziri, ke li havu la samajn rajtojn, kiel aliaj, sen la samaj devoj.

Ni esperas, ke tiu ĉi alvoko kaj la fakturo sufiĉos por memori niajn malfruantojn je siaj devoj, akceptitaj senescepte de ĉiuj per la subskribo de la regularo.

Kompreneble ne temas pri la ĝustatempe eksigitaj.

Al la ŝuldantoj, ne pagintaj eŭropanoj ĝis 15-a de julio kaj ekstereŭropanoj ĝis 1-a de septembro, ni sendos perleterajn fakturojn, samtempe postulante por ĉiu letero 0.50 svfr., niajn kostojn.

ATENTIGO

La redakcio kaj la administracio respondas iun ajn demandon aŭ informpeton pri Lingvo Libro nur, se ĝi estas akompanata per respondkupono. Neniu atendu respondon je letero, ne tiel ekipita.

Abono kaj prezo.

Aŭstrio 10 groŝojn, Belgujo 60 centimojn, Britujo 1 penny, Bulgarujo 2 levojn, Ĉeĥoslovakio 0.60 helerojn, Francujo 0.50 centimojn, Germanujo 8 fenigojn, Hispanujo 20 centim., Hungarujo 10 filerojn, Jugoslavujo 1 dinaron, Latvolando 0.10 laton, Litvujo 0.10 litovan kronon, Estonujo 0.10 kronon, Danio 10 öre, Nederlando 5 cendojn, Norvegujo 10 öre, Polujo 10 groŝojn, Rumanujo 3 leojn, Svedlando 10 oerojn, Svislando 10 centimojn, Usono 3 cendojn, Italujo 0.30 liron.

Tiuj prezoj validas nur, se oni mendas kaj pagas samtempe almenaŭ 3 ekzemplerojn. Mendante nur unu, oni devas sendi duoblan sumon, ol la supre menciitaj. Ni akceptas respondkuponojn el kiu ajn lando, kiam unu respondkupono egalvaloras la koston de kunaj tri ekzempleroj, aŭ por respondo afrankitan eksterlandan poŝtkarton (neadresitan) por la pago de unu ekzemplero.

Abonojn por unu jaro ni akceptas por la kvaroblo de la supraj sumetoj.

Felelős szerkesztő: Bleier Vilmos — Felelős kiadó: Bleier Vilmosné
Pestvidéki Nyomda Vácon (F. ű. v.: Békik Gyula)

Por etkvanta monsumeto
Pleniganta librobreto!
AELA!

Sen literatura gazeto

ne povas vivi iu ajn literaturo

Literatura Mondo

estas la sola pure literatura revuo en Esperanto!

Ĝia enhavo kaj aspekto povas konkuri kun multaj samspecaj naciaj revuoj. — Sed por povi vivi ĝi bezonas ankaŭ vian abonon

Se vi konas ĝin, abonu. Se vi ne konas ĝin, petu tuj senpagan prospekton aŭ specimenon kostantan unu respondkupono de la administracio
Budapest, XI. Mester-utca 53. V. 5.

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mester-utca 53. V. 5. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kostas nur 0.30 sv. fr. aŭ egalvaloron. aŭ proksimuman egalvaloron.

Aperas kvaronjare • Nro 3. 1934

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Sveda literaturo en Esperanto

— Paul Nylén —

Multaj personoj, kiuj scias fremdajn lingvojn kaj studas fremdan literaturon, ne povas imagi al si, ke Esperanto, tiu lingvo artefarita, posedus ankaŭ literaturon. Ili eĉ ne esploras nek demandas pri tio, kio estas por ili aksiomo. Kiam ili tamen vidas per siaj propraj okuloj la multajn literaturajn verkojn de Esperanta biblioteko, ili do tuj konkludas: Sed ion valoran tiu libraro neniel povas enhavi! Tiel kaptitaj de siaj propraj antaŭjuĝoj estas la homoj, ankaŭ tiuj homoj, kiuj kredas esti la plej kompetentaj kaj aŭtoritataj.

Tamen — Esperanto posedas literaturon. Ĝi eĉ posedas grandvalorajn juvelojn en tiu sia literaturo.

Unu el la plej indaj kvalitoj de la lingvo internacia Esperanto certe estas ĝia kapablo konigi al la tutmonda publiko la valorojn kaj trezorojn de la nacioj kies lingvoj estas malmulte sciataj ekster la limoj de tiuj nacioj. Pro tio oni diligente tradukas el naciaj lingvoj Esperante. Nur pere de Esperanto mi do ekzemple havis okazon ekkoni japanajn verkojn aŭ brazilajn aŭ eĉ la »Faraonon« de la pola Prus.

El la sveda lingvo niaj pioniroj en ĉi tiu norda lando frue komencis traduki verkaĵojn. En la unuaj tempaj gazetoj ni trovas ne malmulte da specimenoj el sveda literaturo, en »Lingvo Internacia« dum ĝia Uppsala periodo kaj ankaŭ poste dum la Pariza, en la franca L'Esperantiste, en la Revuo de Bourlet.

La unua tradukanto, kiu aperigis (1895) en formo de libro rakonteton de sveda verkisto, estis la granda nuna honora membro de SEF, pastro en paroĥo norde de la arĝta pohuscirklo Otto Zeidlitz, nome »La literaturisto kaj lia fianĉino« de Emilie Flygare-Carlén, kiu pledis, antaŭ preskaŭ cent jaroj, por la egalrajto de virinoj kun viroj verki — »blustrumpi«. Nu, tiu problemo jam perdis ja tute ĉian aktualecon.

Karakteriza por la situacio, kiu nuntempe regas, estas la fakto, ke Selma Lagerlöf*) ĝis nun de antaŭ trideko da jaroj estas la plej multe tradukita el svedaj verkistoj, ankaŭ Esperante. Interesa estas ankaŭ tiu fakto, ke ne nur svedoj — John Lundgren, Nylén aŭ la pseudonimo Sven kaj aliaj — sed ankaŭ francaj tradukantoj aperis; la Lyona Grupo esperantigis »Kiel Selma Lagerlöf pagis sian ŝuldon«, kaj L. le Joyant la kristnaskan rakonton »Vizio de l' imperiestro« (ambaŭ en Lingvo Internacia 1910). Sia unua granda verko »Gösta Berling« aperis en nunaj tagoj, laŭ traduko de Stellan Engholm. En lia traduko ni legis la rakonton »La mono de sinjoro Arne«. Antaŭ kelkaj jaroj sian popolmoran novelon »La junulino el Grand-

*) Tiu nomo konsistas el »lager« = laŭro, kaj »löf« = arbfolio (nun ortografata laŭ ĝia elparolo: »löv«).

marĉejo (»Stormyr«) « tradukis O. Frode, kiu ankaŭ esperantigis legendon pri »La infanoj de Betlehem«. — D-ro Selma Lagerlöf havis la bonecon subskribi kun SEF kontrakton pri tradukrajto de siaj verkoj laŭ plej favoraj kondiĉoj. —

Dum la herooj de Lagerlöf vivas en provinco je duone reala kaj duone fantazia vivo, je legenda optimismo, Aŭgust Strindberg estas mem ido de grandurbo kaj rigardas skeptike kaj pesimiste eĉ mizantropie la homojn kaj ilian celadon, ilian klopodon nesanan, febran. En »La konscienco riproĉas«, kiu esperantigis jam frue nia pioniro Backman, li pentras la militon kiel naŭzan aferon kaj frenezigan al homo humana. Specimenon de teatraĵoj de tiu naturalista aŭtoro donas »Fraŭlino Julie« (trad. Nylén) kaj »Pariao« (trad. B. Ström). Per »Insulo de feliĉuloj.« (trad. O. Frode) Strindberg parodias la modernan socion kaj kulturon artefaritan.

Dum la pasado de la jaroj kaj jardekoj ne malmultaj specimenoj de sveda literaturo sub esperanta vesto lingva aperis en niaj gazetoj; Hilda Cederblad, John Lundgren kaj aliaj tradukis ankaŭ laŭ klasikuloj kiel Amanda Kerfstedt, Oskas Levertin, Gustaf Fröding, aŭ laŭ modernaj verkistoj kiel Albert Engström (Nylén en ĉi tiu gazeto), laŭ humoristoj kiel Hasse Z, aŭ pli frue la kuriozulo »Falstaff Fakir,« ktp.

La populare scienca »Tra sovaĝa Kamĉatko« de d-ro Sten Bergman (trad. Birger Gerdman) montras la valoron de nia lingvo internacia por la diskonigo de tia verko. Samon ni povas diri pri la interesega monumento sur la arkte dezerta tombo de Andrée kaj liaj du kolegoj, velintaj en la jaro 1897 »Per balono al la poluso« kaj retrovitaj en 1930, niatempa Odiseado kvazaŭteatre rerakontita al ni de »jurnalistoj kaj scienculoj.

Resume ni povas nur diri, ke per Esperanto la malgrandaj nacioj, kiuj lingve restas sub la ombro, dum kelkaj »grandaj« ĝuas la plenan sunlumon per sia tutmonde konata lingvo, — ke la malgrandaj nacioj posedas per Esperanto bonan rimedon aŭdigi sian voĉon, konigi la perlojn de sia literaturo al ĉiuj aliaj popoloj de la mondo — des pli, ju pli la mondo komprenos la bonon kaj benon de Esperanto.

Huddinge 1 julio 1934.

Por prezo liliputa:
Biblioteko tuta:
AELA!

MOZAIKEROJ PRI PAŬLO NYLÉN

— F. SZILÁGYI —

64 jara junulo — jes, junulo — kun staturto kaj sinteno, kiuj sub la plena trankvila ekvilibro sentigas fort-on kaj temperamenton. Blankaj gigantaj lipharoj kaj akcentitaj densaj brovoj. Tamen la tuta aspekto estas miksaĵo de serena bonhumoro kaj seriozemo, kiu povas atingi la limon de la konvinka severo. Paul Nylén estas esperantisto de 1892., Lingva Komitatano de 1905. kaj akademiano de 1908., nun vicprezidanto de la Akademio.

*

Kiu estas Paŭlo Nylén?

La supraj indikoj mem jam sufiĉe klarigas al ni lian gravecon en nia movado kaj mi ja ne volas nun verki biografion, pretere doni portreton de vera kaj granda esperantisto, kiu bone konservis la heredaĵon de Zamenhof.

Ĉu li estas pedanto, konservativulo, obstina, nekonvinkebla batalanto, kiel oni volus kredi?

Mi kredas, ke ĉiuj, kiuj lin bone konas, respondos kun mi: *ne*, sed li estas Paĉjo, ĉarma, bonvola, eble kelkfoje grumbletanta patro, kies ĉiu pensero ligiĝas al la movado, al la juna generacio, kiun li sekvas ne nur per okuloj, sed per siaj junecaj movoj.

Jes, mi volas fari portretojn el mozaikeroj.

*

Kion kaŝas la militemaj lipharoj? Ĉu Paŭlo Nylén kapablas batali?

Antaŭ multaj jaroj, kiam la Ido-milito ekflamis, certe li travivis akrajn batalojn; certe li ne estis malmolmana soldato, ĉar unu el la ĉefaj svedaj idistoj, kiu tiutempe volis transigi la svedan Esperanto-movadon al Ido, solene promesis, ke li rompos la piedojn de Paŭlo Nylén, se ili iam renkontiĝos. La koncerna persono estis policisto kaj tiu ekzemplo bone montras la svedan mildon. Kiam en alia lando oni tre koleras iun, oni promesas kaprompon. — El tiu epoko restis en Paŭlo Nylén la tuja akriĝo, se temas pri Ido. Paŭlo Nylén estas pardonema homo, sed tiun malutilon, kiun la Ido-skismo faris al la movado, neniam li povas forgesi.

En tiu rilato, tamen li ne estas malobjektiva. Li ja ne komencis per Esperanto. En 1887. li jam estis volapukisto kaj kiel radika mondlingvisto li parolis bonege volapukon, eĉ havis interesan kaj malproksimlandan korespondadon. Sed en la jaro 1892. li ekvidis en Uppsala la »Duan Libron« kaj de tiam li estas debatanto, propagandisto, gvidanto, pioniro kaj heroo de nia movado. Gramatikoj, vortaroj, lingvaj studoj kaj tradukoj, amaso da adeptoj kaj disĉiploj asertas, ke Paŭlo Nylén faris indan laboron en Svedlando.

Antaŭ ne longe li finis sian bonegan Esperanto-svedan vortaron.

*

Kelkloke mi aŭdis, ke li estas senindulga konservativulo. Sed pli bone karakterizi lin mi ne povas, ol lin karakterizas la nova vortaro.

Oni ja ne povas diri, ke Nylén estas emfaza entuziasmo de neologismoj. Dekfoje oni pripensu, — laŭ li — antaŭ ol fari novan vorton en la lingvo. — Tre ofte la ŝajne internaciaj vortoj estas tre necertaj koncerne sian signifon en la diversaj landoj. — *Hospitalo* ekzemple en Svedlando signifas *frenezulejon*, kial do ne prefere uzi la pure Esperantan vorton, kies signifo ne povas esti pridubinda? (Mi mem spertis, ke la originala signifo de la t. n. internaciaj vortoj kelkfoje tute kontrastas en la di-

versaj lingvoj. *Semester* en la hungara studenta vivo signifas duonjaran labortempon, sed en la sveda lingvo ĝi signifas ĝeneralan *libertempon*, dum kiu oni ricevas salajron.)

Li do ne estas neologismema, sed li bone scias, ke oni ne povas ŝlosi sin en la kirason de la ortodoksio, kaj li protestas nur kontraŭ troigoj. Neologismoj nur por rimi, estas ludo kaj samtempe kulpo laŭ li.

Sed, kiam ni parolas pri la »Infero«, mi vidas, aŭ sentas, ke li preskaŭ emas doni absolvon al tiu, kiu talentente faras tion. Ĉiu vorto, kiun mi aŭdas de li, pruvigas, ke lian akran intelekton plaĉaj devizoj ne povas malmalmigi kaj lian pensmanieron, rilaton al la vivo, precize montras la ĵus menciita nova vortaro, en kiu vi povas trovi ĉiujn neologismojn, kiujn cetere li ne aprobas kaj mem neniam uzas. — Sed li ja havas la vidpunkton, ke li devis doni en la manon de la leganto vortaron, kiu vere helpas lin dum la legado; vortaristo ne povas esti partiano.

Eterne juna spirito. Ĉu vi ankoraŭ ne rimarkis, ke anakronismoj kaŝas ĉiam ligiĝon al la juneco. Kaj laŭ mi, tiu fakto donas la ŝlosilon de ĉiu originaleco, kiu karakterizas la eksteran aspekton de Paŭlo Nylén. Li volas esti juna kaj li eĉ sukcesas esti tia, sen tio, ke oni vere sentus, ke jen homo, kiu groteske fuĝas al la estinto, kie li kaŝas imagitajn trezorojn. — Paŭl Nylén donas alian impreson: »Mi estis iam kaj nun mi estas la sama.« — tio estas la frazo, kiun radias al ni lia eksterajo. Lin oni povas nur estimi, mi ripetas, kiel patron kaj li vere estas al ni tiom proksima, kiom proksima povas esti nur patro.

*

Mi rememoras la antaŭjaran kongreson de la laborista organizo. Interkonatiga vespero estis en eleganta stokholma restoracio. La svedoj kaj la eksterlandanoj kun la konata plezuro de l' kongres-febro donis sin al la sorĉo, kiu estas la plej kara trezoro de nia lingvo. — Oni mangiis, trinkis, babilis, dancis kaj kelkloke ekparolis ankaŭ la internacia lingvo de la junaj okulparoj.

Paŭlo Nylén sidis sur et-eta loko apud restoracia tablo kaj — ekzamenigis. — Kaj herooj ekzamenis.

*

La unua kaj dua kongresoj estas liaj elstaraj rememoroj. — La modesta persono de Zamenhof staras antaŭ mi: »la malgranda viro parolis, ĉiu vorto estis klare aŭdata, kore komprenata« — jen la ronda familio — kaj tuj poste: — »kun amuzo oni konstatis, ke la majstro lispas iom siajn «s«.

Mi demandadas lin pri la Majstro. Malalta viro, kiu plialtiĝas, homo, kiu estas ĝentila, afabla, kora, kiu transdonas sian tutan animon al la homaro, sed honteme kaŝas la turmentojn kaj dolorojn, kiujn la fizika vivo ordonis al li. — Maloftaĵo, kiam li ekveas: »Fajron sentas mi interne — vivi ankaŭ mi deziras...« Jen Zamenhof, proksima parenco de Paŭl Nylén.

*

— Ĉu la karaktero de la movado forte ŝanĝiĝis? — mi demandas nun.

— La respondo estas tre interesa. — Ni svedoj, diras Nylén, neniam pelis fatamorganojn. Ni ĉiam kalkulis kaj kalkulas reale. Mi neniam kredis, ke Esperanto kiel nova suno ekregos la ĉielon. Neniam mi kredis, ke oni atake povos la homojn perforti, devigi por akcepti nian ideon. La ideo mem iom post iom penetras en la homojn kaj la prikonono de la graveco formiĝas kaj riveliĝas en la nomo mem. — Mi do kredas, ke la evoluo de la movado estas tute natura kaj el la perspektivo de mia pasinto en la movado, mi povas diri, ke mi ne vidas ion kontraŭnaturan en ĝia evoluo. Kaj tial mi estas trankvila pri la estonto...

Paŭlo Nylén parolas ĉiam klare kaj kompreneble...

En la kriza epoko
Jen deviza alvoko
Ribela:

Librojn legi necesas,
Eldonegi ne ĉesas
AELA!

Interŭjuo pri la Sveda Antologio

— F. Szilágyi —

Foje iu diris al mi, ke la plej elstaraj »konstruaĵoj« de Stokholmo estas la Urbdomo kaj Rektor Jansson. (La titolo »rektor« signifas, parolante pri s-ano Jansson, liceestron.) — Jes, tio estas nur ŝerco, sed kun multe pli profunda signifo, ol la facile forĵetitaj ŝercoj. — Mi kredas, ke la Urbdomo same plenrajte reprezentas la beleĝan nordán urbon, kiel Rektor Jansson kun sia impona aspekto, kora bonvolo, afabla sinteno kaj nelacigebla laboro inde reprezentas Svedlandon kaj la kuraĝe antaŭirantan svedan Esperanto-movadon.

Multaj dokumentoj asertas la rezultojn de la movada laboro kaj ankaŭ en la »spirita movado« okazas de tago al tago, de jaro al jaro signifplenaj konkeroj en la sveda esperantismo. — Unu el la plej signifplenaj mejloŝtonoj estas la apero de la Sveda Antologio, pri kiu kelke da informoj ni petis de la afabla gvidanto, de Rektor Jansson, kiu preteme respondis al ni pri la grandega laboro, kiu estas vere estiminda, admirinda kaj gratulinda.

— Kio donis la impulson eldoni la Antologion? — estas nia unua demando . . .

— Unu el la plej gravaj taskoj de Esperanto — respondas Rektor Jansson — estas konigi al la tutmonda esperantistaro la kulturtrezorojn, kiuj sen Esperanto restus kaŝitaj. — Ni estas malgranda nacio, do la ideo, aperigi antologion, post la bonegaj hungara, belga, kataluna kaj estona antologioj, estis tute natura kaj ni komencis la laboron antaŭ unu jaro.

Mia dua demando estas: Kiel estis organizita la laboro?

— Nia antologio estas eble la plej demokratia el la ĝisnunaj. Ni vidis ion gravan, ion principe signifan en tio, ke la laboro estu kolektiva, kaj vere granda aro de la laborpretaj esperantistoj estis je nia dispono en la traduklaboro, kiuj honeste, fervore, talente plenumis sian taskon. La demokratio, pri kiu mi ĵus parolis karakterizis ankaŭ la revizian laboron. Ni ne skemigis. La antologio prezentas verkistojn diversajn kaj ankaŭ tradukintojn diversajn, kies verkojn ni, kiuj kontrolis, tuŝis nur »ganta-mane«, do povas esti, ke el lingva vidpunkto aperos pluraj esprimoj pri ŝajne sama ideo, sed ties kaŭzo povas esti mem la aŭtoro, aŭ tio, ke ni, inter la kadroj de la gramatika kaj internacia ĝusteco, volis lasi plenan liberecon al la tradukintoj. — Laŭ nia sento, la originalaj koloroj respeguliĝas en la tradukaĵoj kaj la libro donas varian, sed samtempe harmonian impreson. — Ni ne serĉis briligon, ni volis montri honeste la svedan animon, spiriton, kiu senmanke aperas eĉ tiam, se la verkistoj kelkfoje devenis el fremda, aŭ mikŝita raso.

— Kio karakterizas tiun ĉi spiriton?

— Tro multe mi ne volas malkaŝi el tio, — diras rideteme Rektor Jansson, — prefere legu la libron; tamen, estas fakto, ke la svedoj ŝatas la naturon, la liberon de la vasta maro, la silentajn montarojn, kie la vivo estas trankvila, memkomprenebla eĉ kiam ĝi montras sian teruran flankon, la kamparan simplecon, sed la svedo ne fremdas eĉ la urban viglon. Do, ankaŭ la literaturaj figuroj montras variecon: kuraĝuloj, herooj, timemuloj, »spiraluloj«, sed neniam arogantaj, aŭ intrigemaj fig-

uroj, kiuj estas tute fremdaj al la sveda spirito. Iom ĉefa motivo de nia literaturo estas la malkaŝo de la praa sveda animo: sopiro al brilaj aventuroj, sed rezigno kaj trankviliĝo en kvieti medio; varmaj sentoj sub la silenta, nemovigema surfaco, komprenemo al la fremda mondo sed samtempe konservo de la sveda individueco.

— Kiun epokon reprezentas la nun aperonta unua parto de la Antologio?

— La florepoko de la moderna sveda literaturo, kiu cetere jam estas rigardebla el ĝusta perspektivo, estas la tempo inter la jaroj 1880—1910. En tiu epoko, gigantaj talentoj aperis en nia literaturo, kiuj estas konataj en tuta Eŭropo; sed ankaŭ en tiu rilato nia Antologio fariŝ pluan paŝon. Ni eble donas pli kompletan bildon pri tiuj ĉi aŭtoroj, pli sisteman koncepton ni serĉis, ol unuopajn kaj kapricajn tradukojn, sed krome ni prezentas ankaŭ aliajn talentojn, kiuj, pro iu aŭ alia kaŭzo, ne povis graviĝi ĝis mondfamo, sed tamen estas indaj por ekkono kaj ekŝato. La mondmilito, malgraŭ ke nia popolo ne partoprenis ĝin, estas destina ankaŭ en nia literaturo. Poste venas alia mondo, pri kiu ni povos raportari per alia volumo de nia Antologio.

— Kion enhavas la Antologio?

— La enhavo estas tre varia. Sur 450 paĝoj aperas 75 verkoj de 20 aŭtoroj. La verkoj ne estas nur poemoj kaj noveloj, sed ni trovas en ĝi ankaŭ la dramatan artoŝpecon. — Ni kredas, ke nia elekto, kiu speciale favoris al la verkoj, en kiu estas io speciale sveda (medio, prezentmaniero ktp; tamen sub la kondiĉo, ke ĝi ne estu fremda de la universala homanimo) estas sufiĉe trafa. Pro tio ni petis la opinion de kelkaj eksterlandaj amikoj de nia movado. — Jam aperintaj verkoj ne troviĝas en la antologio, kaj ofte tradukitaj verkistoj ricevis malpli multan lokon.

— Kia estas la Antologio el lingva vidpunkto?

— La Antologio ne estas lernolibro. Povas esti, ke ĝi ne estos konvena al ĉies gusto. Eble troviĝos ŝajnaj paralelaĵoj en la esprimoj, pri kiuj mi jam parolis; ni rigardis la aferon el tiu vidpunkto, ke la esprimoj respondu al la originalaj esprimoj, inter la limoj de la internacia komprenebleco. Pri la loknomoj: se la originala formo estis tro peza, ni uzis ortografie pli simpligitan formon.

Nu, tiom mi eksciis pri la nova sensacio de Esperantujo. Kaj nun, popolo de Esperantujo, akiru la libron kaj legu ĝin, por plimultiĝi la plezurojn de via vivo, pliriĉigita de Esperanto.

CU VI SCIAS

ke ĝis nun en 32 lokoj ekzistas Zamenhof-stratoj kaj placoj?

CU VI SCIAS

ke la unua senfadena interparolo en Esperanto okazis inter samideanoj Fernandes (Brazilo) kaj Houhart (Paris)?

CU VI SCIAS

ke tiuj kaj multaj miloj da aliaj respondoj el la plej intima plej malnova aŭ plej nova partoj de la Esperantista vivo estas troveblaj en la granda Enciklopedio de Esperanto?

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO. Vol. I. A—J. Redaktis L. Kókény kaj V. Bleier. Kunlab. 107 esperantistoj. 272 pĝ. + 112 bildopĝ. 23×15 cm. Prezo kun la baldaŭa dua volumo, broŝ. svfr. 30.—, bind. svfr. 34.— plus 10% por sendkostoj. Pagebla en du partoj. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt.

Povas esti, estimata leganto, ke la multa antaŭreklamo pri la jena Enciklopedio de nia movado jam iom tedis vin, tiel ke mankas al vi arda deziro legi pri la verko, okaze de ĝia efektiva eldoniĝo.

Mi vin certigas tamen, se vi bonvolas akcepti certigon de iu, kies intereso kaj laboro por Esperanto estas rekonataj eĉ de personoj nesimpatiantaj al li, ke la grandega verko kies unua volumo nun fine aperis, estas ja *grandioza* verko, de valoro multe pli alta, ol povus kredigi ajna antaŭreklamo, aŭ plej entuziasma recenzo. Se do vi ankoraŭ ne posedas la verkon, rapidu ĝin akiri: se vi jam posedas, rapidu denove legi en ĝi por trovi ankoraŭ pli da informo kaj intereso.

Prave diras la antaŭparolo, ke la titolo impresas iel scienceme kaj seke. Efektive, tamen, eĉ tiu, kiu estas relative nova esperantisto, malmulte informita pri la movado, nepre trovos la verkon plena de intereso. Ne nur de intereso, ankaŭ de ekscito pri movado ampleksanta tiom da landoj, tiom da homaj medioj, tiom da diversaj homotipoj. Kaj ne nur de intereso kaj ekscito, ankaŭ de romantiko. Mi ne hezitas aludi ĉi tion; oni povas bone kredi, ke ĉiu homo senescepte havas en si romantikemon, kia ajn estas ĝia esprimmaniero en religio, politiko aŭ eroto, kaj kiu dediĉis sin jam en nia epoko al la estonte banala afero, internacia lingvo, ne hontu konfesi, ke per tio sin esprimas iom da romantikemo.

Ni, kiuj eble iom lacigis post plurjara laboro por Esperanto, kiuj perdis pri ĝi la miran ĝojon, kompanse havas pli internan vidon en la movadon, persone konas multajn el la biografiitaj homoj, apudestis multon el la kronikita historio, kaj havas nian propran intereson pri tia zorge kompilita enciklopedio. Kaj fine, tiuj, rajte sin taksantaj pioniroj de nia movado, kiuj laboris por Esperanto kiam mi mem estis bebo en vindtukoj kaj aliaj nuntempaj korifeoj de Esperantio apenaŭ aŭdis pri lingvo internacia, tiuj pioniroj devas havi ĝojon, ke bela monumento estas farita al la movado, kiun ili en fruaj kaj malfacilaj tagoj subtenadis sisteme kaj sinofere.

La verko ne estas, ne povus esti, sen etaj mankoj. Forestas kelkaj indaj nomoj, percepteblas tendencemo favore al SAT kaj malfavore al IPE, kiam temas pri la laborista movado, kelkaj artikoloj neproporcie pritraktas la concernajn flankojn de la movado.

Makuloj sur suno, cetere forigitaj en estonta eldono! La verko estas generale farita kun granda zorgo, de plej kompetenta kunlaborantaro diverslanda. Ĉu oni legas pri Cseh-metodo, pri Delegacio, pri Francujo (historio de tiea Esperanto-movado), aŭ pri Gazetaro, pri ĉiu grava afero de nia esperantista mondo, pasinta aŭ aktuala, oni trovas kolektita kaj interese redaktita plej detalan informon. Turnante sin hazarde al iu ajn paĝo, oni estas tuj kaptita pri iu trafa noto aŭ interesa ero pri gramatiko, literaturo aŭ historio de la lingvo. Trafoliumante la volumon, oni estas ĝojigata de la klaraj kaj interesaj fotografajoj, el kiuj multaj havas unikajn intereson, ekzemple tiuj de la unua kongreso en Boulogne, kaj aliaj montrantaj portretojn de mortintaj pioniroj.

Resume, kaj denove, grandioza verko, ege ĝojiga por ĉiu adepto de Esperanto, por la ĵuslerninto kaj por la spert-

ulo, por la literaturemulo, la gramatikulo, la historiisto, la idealisto. Estimata leganto de miaj vortoj, estu konsilata! Akiru la belan volumon, studu ĝin detale, samtempe aprezante ĝin el ekstera vidpunkto, kiel indan monumenton al la realigita romantiko de diligenta kolegaro.

K. R. C. Sturmer

F. KARINTHY: VOJAGO EN FAREMIDON kaj DU SIPOJ. Noveloj. El la hungara: L. Totsche. 84 pĝ. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Prezo: sv. fr. 1.20+10% por sendkostoj. Por AELA-anoj 0.60 sv. fr. afrankite.

Guste en la lastaj jaroj la Esp.-literaturo sajnse definitive forskui la milde-molajn infanŝuojn, por marŝi kiel same respektinda kamarado flank-ĉe-flanke kun la literaturoj de la kulturaj nacioj. La infana aĝo, kiun plej bone karakterizas la mirinde »bonkora« kritiko, scipovanta diri nur laŭdegojn kaj singarde ne senkuragiĝi kaj ofendi la »talentajn samideanojn«, kiuj ja »vere pliriĉigis nian literaturon«, estas nun dank' al Dio, jam post ni. Mi diras »dank' al Dio«, ĉar efektive ne la flegma, griza fluego de centoj da verkemuloj, nekapablaj akiri sukceson en sia nacia lingvo kaj ekvidintaj en Esperantujo la promesitan landon, kie laŭroj riceveblas favorpreze, turnos la atenton de l' mondo al la Esp.-literaturo, sed nur veraj talentuloj, kiuj same sukcese povus labori ankaŭ en iu ajn nacia literaturo. Du aferoj bezonatas, por eliri el la »literatura infanaĝo«: tempo (ĉar jaroj pasas ĝis apero de nova »stelo«) kaj serioza, objektiva kritiko, sensentimente apartiganta la verkistojn de la »verkistoj« kaj tiel liberiganta por la indaj pli larĝan vojon al la meritata rekono kaj — al la eldonejoj.

Tiujn ĉi pensojn vekis en mi la nova Karinty-volumeto — inda esperantigo de vere tradukinda verko, kiaj lastatempe plu ne estas maloftaĵo.

La unua novelo — »Vojago en Faremidon«, aperinta jam en »L. M.«, portas la leganton en landon vere neordinaran, »parolante pri tiaj fenomenoj, kiujn cetere — laŭ mia scio — neniu vojaĝpriskribanto notis ankoraŭ en sia taglibro« (p. 21). Oni admiras la nefacile konkureblan elpenskapablon de l' aŭtoro, la facilan flugon de lia fantazio. Sed eĉ pli, ol la kolorriĉaj, lertmane pentritaj fantazibildoj de Karinty-fabelisto, tuŝas nin la profundtemaj, pensigaj traktaĵoj de Karinty-filozofa. Jen staras antaŭ ni la homo, la »krono de l' kreitaĵo«, en sia tuta kompatinda nudeco, li, kiu »en ĉiu sia kreaĵo penis krei ankaŭ sin mem, krei nova kaj pli perfekta, por ke poste li mem ĉesu ekzisti, kiel superflua argilmodelo, en kiu oni fandis la metalon« (p. 24.), kiu »parolas pri sia cerbo, pri ĉi tiu simpla kaj sensignifa instrumento, kiu nur per sia uzo valoras iom, kvazaŭ ĝi estus mem la mondo« (p. 37.), kiu faras nenion alian, ol nur ĉiam starigas la demandon: por kio ni uzas la menson; pri kio ni pensadas? — kaj rompas al si la kapon pri tio, pri kio li rompas al si la kapon (p. 36.)... Ĉi tiun mizeran, en mallumo palpantan, vane voĵserĉantan (vane, ĉar plejofte li ja eĉ ne konjektas la ĝustan direkton!) »plej altan kreaĵon« starigas Karinty en la senindulge, sensente blankan lumon de logika pensado. Kaj mi kredas, ke ĉiu — ja ni ĉiuj estas homoj! — kun streĉa intereso legos la spritajn eksplikojn, kiuj, malgraŭ la serioza temo, neniel similas la kutiman »polvan« filozofion, do

AL SRO S. D. Vi, iom riproĉe, ne komprenas nian antipation kontraŭ unu, kiel nedifina artikolo, dirante inter aliaj, ke Zamenhof mem uzis ĝin, eĉ en la Ekzercaro, skribante: »Unu vidvino havis du filinojn«.

Je tio mi povas respondi al vi, ke en la unua regulo de la Fundamenta Gramatiko vi povas legi klare: »Artikolo nedifinita ne ekzistas«.

Estas do evidente, ke Zamenhof, versaĵne pro naci-lingva kutimo, ne obeis sian propramane faritan regulon. Sed ĝin obeis poste ĉiuj bonaj verkistoj E-aj, tiel ke la regulo iĝis vivanta kutimo. Jen ekzemple, ĉe Kabe, en la Faraono:

»Subite el la fundo de la intermonto eliris homo...«

»Post momento ekkuris kortega oficisto...«

»Homo veturis vespere de vilaĝo al vilaĝo...«

Cu vi vere kredas, ke oni devus en tiuj ĉi frazoj »enkorekti« la nedifinan artikolon? Kaj ĉu vi kredas, ke estus erare: »Vidvino havis du filinojn«?

Nu, eble vi kredas. Sed tio povas deveni nur de tio, ke vi ne sufiĉe sentas ankoraŭ la »guston« de la nuna lingvo, al kiu nedisigeble apartenas tiu ĉi manko de unu en la cititaj frazoj.

Estas vere, ke al ĉiu, kies nacia lingvo havas nedifinan artikolon, tiu manko ŝajnas komence stranga. Tio klarigas la multajn *iu kaj ia*, troveblajn en tradukoj. Preskaŭ ĉiujn oni povas simple forstrecki.

En »Nia Gazeto« mi legis lastatempe, ke *unu* ne estas nedifina artikolo, sed nedifina adjektivo. Tio estas lerta elturniĝo, sed tro ruza por esti prava. Unue, *unu* ne estas adjektivo, sed numeralo. Due, se en »unu vidvino« *unu* estas nedifina adjektivo, ankaŭ *eine* in »eine Witwe,« kaj *une* en »une veuve,« kaj *a* en »a widow« estas nedifinaj adjektivoj. Do — tute ne ekzistas nedifina artikolo, sole adjektivo. Sed tiamaniere — kian sencon havas do la regulo: »artikolo nedifina ne ekzistas en Esperanto?«

Cetere, tiu nedifina adjektivo, kiun »Nia Gazeto« serĉas, estas *ia*. Oni povus ĝin nomi eĉ *maldifina* adjektivo, ĉar ĝi ne nur ne akcentas la difinitecon, sed rekte akcentas la nedifinitecon. Do, oni ĝin devas uzi, kiam oni volas insisti pri tio. Ekzemple: »*Mi vidis homon sur la strato*« tio diras, ke mi vidis unu, nedifinitan homon. Sed: »*Mi vidis ian homon*« — tio diras, ke mi vidis homon, kies kvalito, aspekto, nomo, statur, kies tuta esto estas indiferenta. Oni povas elsentii eĉ nuanceton de ignoro el *ia* uzata tiasence. Same: *Mi legis artikolon pri tiu ĉi temo* (unu artikolon). *Mi legis ian artikolon pri tiu ĉi temo* (ne tro gravan; artikolon, pri kiu mi ne volas plu paroli). *Alvoku serviston* (unu serviston). *Alvoku ian serviston* (ne grave

kiun aŭ kian, por tiu ĉi tasko ĉiu servisto taŭgos). *Donu al mi ian libron por legi* (mi ne insistas pri speciala libro, mi volas legi nur por pasigi la tempon). *Donu al mi libron por legi* (unu libron, nedifinitan).

Nun, ni vidu, kiam oni uzas *iu*. Ĝi respondas je *kiu*. Sed kion signifas *kiu*? Evidente *kiu el*. *Kiu libro* — signifas: *kiu el la libroj* (difinitaj). *Kiun libron mi donu* — signifas: *kiun el la libroj* (estantaj antaŭ ni, estantaj en la ŝranko, havataj de mi). Sekve, *iu libro* signifas: *iu el la libroj* (estantaj antaŭ ni, estantaj en la ŝranko, havataj de mi, estantaj ĉe mi ktp.). *Iu* do estas nomebla »*duondifina*« artikolo. Ĝi ne difinas la unuopojn, sed difinas la grupon, trupon, aron, al kiu la respektiva unuopajo apartenas. »*Alvoku iun serviston*« — signifas: *alvoku iun el la certa, difinita nombro da servistoj, kiuj estas je nia dispo*no.

Ni vidu tri ekzemplojn. 1. *Donu al mi kraĵonon* (unu kraĵonon). 2. *Donu al mi ian kraĵonon* (egale kiun aŭ kian). 3. *Donu al mi iun kraĵonon* (iun el la kraĵoj, kiujn vi ĉehavas).

La samo rilatas ankaŭ pri *neniu* kaj *nenia*. Ekzemple: *Mi vidis neniun homon* (neniun el la homoj, pri kiuj temas, kiujn mi estus devinta vidi). *Mi vidis nenan homon* (mi tute ne vidis homon). *Vi faris neniun laboron* (neniun el la laboroj, kiujn fari estis via tasko). *Vi faris nenan laboron* (vi tute ne faris laboron).

Do, kiam oni volas akcente nei, anstataŭ *tute* ne oni povas diri *nenia*. Kiel ankaŭ Zamenhof skribis: *Estas nenia danĝero en tiu ĉi loko*.

Iun tagon, iun jaron, iun dimanĉon ktp. signifas: en *iu el la* (tiutempaj) tagoj, jaroj, dimanĉoj.

Kiel ni vidas, la supre montritaj tri eblaĵoj (*nenio, iu kaj ia*) plene kontentigas ĉian bezonon. Por *unu* — ne restis funkcio. Oni povas ĝin trankvile adiaŭi.

AL SRO K. P. Ne, ĉirkaŭ neniam estas adverbo, ĝi estas ĉiam prepozicio. La dua eldono de la Plena Vortaro erare distingas adverban ĉirkaŭ.

Sed kiel do klarigi la esprimon: *mi ricevis ĉirkaŭ ducent frankojn*? Nu, simple. *Ĉirkaŭ* tie ĉi rilatas ne al *ducent frankoj* sed nur al *ducent*. Oni povus ĝin skribi jene: *mi ricevis (ĉirkaŭ ducent) frankojn*. Aŭ: *mi ricevis frankojn ĉirkaŭ ducent*.

Tute sama estas la afero pri *po*. Logike, oni devas uzi post ĝi nepre akuzativon, eĉ se oni ĝin rigardas prepozicio, ĉar ĝi ja rilatas ĉiam al la numeralo: *Mi donis al la knaboj po tri pomojn*, t. e. *pomojn po tri*.

Efektive, la zamenhofa nominativo en tiaj okazoj rekte kontraŭas la lingvosenton. Kaj ĉar li diris uzeblaj ambaŭ formojn, *nenio* malhelpas, ke oni uzu la pli naturan akuzativan formon, kiel faris inter aliaj ankaŭ *Kabe*. Cetere *po* eĉ ne estas prepozicio, sed adverbo. (y).

ne iĝos transalti paŝojn ankaŭ tiujn, kiuj kutimas konsumi nur facilan, pordistran legaĵon.

La dua novelo — »Du ŝipoj« — kvankam temas pri tia historiaĵo, kiel la Ameriko-trova veturo de Kolumbo, estas iurilate tute aktuala. Ĉar ja ĝuste nun estas la tempo, kiam oni kredas nur tion, kion pruvis la sciencoj, kiam ĉio estas mezurita kaj elkalkulita, kaj antaŭ la fantazio fermiĝas la lastaj pordoj. Kaj la homo, la ĉioscianta homo ekvidas, ke la akiro de l' scioj faris lin multe, multe pli malriĉa: la fantazio estas enkarcerigita, la kredo mortis, kaj restis nur ĉie samformaj, enuaj muroj, kaj interne de ili — nur akvo kaj pano, tagmanĝo de prizonuloj, nenio alia (p. 69).

Pri la traduko mi antaŭ ĉio konstatu, ke ĝi nenu-loke impresas kiel traduko, do — estas tre bona. Iuj eble riproĉos, ke la tradukinto ne tre avaris en uzado de la t. n. »neologismoj« (*descendi, sinki, ekskuzi, prizonuloj* ktp.), sed al mi ŝajnas, ke ĝuste al ili la verko grandparte dankas sian facilan stilon, sian elas-

tecon; vortoj kiel *malsupreniĝi, malliberuloj* k. s. certe ne influas ĝin favore. Unu el la novaj vortoj — *retro* (p. 66.) tamen, laŭ mi, neniel akcepteblas. Se oni dirus *retre*, ĝi perdiĝus inter la ceteraj novaĵoj kaj ne tuŝus tiel malagrabla (kvankam bezonata la vorto ne estas; ja plene sufiĉas *reen, returne, revene*), sed kun ofinaĵo la vorto impresas monstre. Anstataŭ *je*, en »kompletigu sian ŝipanaron je militetato« (p. 10.), estus pli bone diri *ĝis, ĝis al*; anstataŭ *pri* en »mi rekonis ilin pri la ovala orkapo kaj pri la du lumaj vitrolensoj« (p. 31.) — *laŭ aŭ pro*. Nebona estas »*rektigi* eraron« (p. 35.). En la skribmaniero de kelkaj vortoj oni rimarkas certan senkonsekvencecon: oni legas jen *mekanismo*, jen *mehanika*; estas renkontataj *solasi-oj, solasi-j* kaj *solasioj*. Ĝion ĉi, same la kelkajn preserarojn, oni rimarkas tamen nur dum relego. Dum la unua lego oni ne havas tempon por tiaĵoj, — la interesaj aventuraj komplikaj, la plezurige kolorriĉaj priskriboj plene okupas la leganton.

Kaj finleginte, oni fermas la libron kun ĝoja kredo, ke definitive pasis la infanaĝo de l' Esp.-literaturo, ke niaj eldonejoj daŭre aperigos nur legindajn verkojn, nur bonajn tradukojn. N. Kurzens.

IVAN CANKAR: SERVULRAJTO. (Laŭ la slovena rakonto prilaboris Jakobo Stefančić. Eld. »La Suda Ste-lo« Slav.-Brod. 67 p. Prezo: 2 svfr. bind..)

Pri tiu ĉi libro ne estas facile skribi. Regule oni tradukas poemon per poemo, pli malofte poemon en prozo. Sed nun temas pri tio, ke la tradukinto katenas siajn manojn kaj piedojn kaj tiel li saltas en la akvon por naĝi. La originalo estas novelo, sendube unuaranga novelo, el kiu la tradukinto faris seskantan poemon. — La eksperimento estas kuraĝa kaj leginte la libreton ni devas konstati, ke la tradukinto, mirakle, ne dronis; tiu fakto pruvas certe neordinaran lertecon. Pri la rajto oni povus eble disputi, sed laŭ nia opinio la arta rezulto — kiel ajn oni ĝin atingas — povas ĉion pravigi en la lando de Literaturo. Kaj sen longa hezito ni povas ĉi tie konstati, ke la tradukinto ne malsukcesis. Do, eĉ se ni ne povas akلامي pro tio ke li ligis siajn manojn kaj piedojn (eĉ, ni estus sincere scivolaj pri la *originala* novelo) ni tamen povas gratuli la reverkinton, ĉar lian aŭdacon nepre pardonigas lia lerteco.

La aŭtoro de la novelo, Cankar devenis el malriĉa, granda familio kaj restis tagservutulo ĝis sia frua ftiza morto. En tiu sangŝvita vivo li trasuferas la turmentojn de siaj samsortanoj kaj lia senbrida justemo eksplodas en amara, sufoka flamo. — Kio okazas en tiu ĉiu verketo? Preskaŭ nenio kaj tamen tiom multe. Servulo, post multdekjara servado estas simple forigita el la mastra domo, — kiam lia vivo estas jam ruinigita, kiam li jam estas elsuĉita, kurbigita de la ŝarĝo, kiun la laboro kaj la maljuneco metis sur lin.

Kaj nun li ekmigras, serĉante kun amara animo la juston; kiel Samuel, la heroo de Sinclair, ankaŭ li, kun fidema naivo serĉas la diversajn instancojn. La unua grado estas la komunumestro, sed la rezulto estas tre ĉagrena. La komunumestro ne defendas, eĉ forpelas lin kun la dubinde bonvolaj vortoj: »Marŝu vojfelice!« — La servulo iras plu: »el la oriento venis ruĝo — de l' surira sanga la lunlumo; — tra branĉar' mallaŭte flustris muĝo, — mutis birdotriloj en noktumo.« (Belaj versoj, la nemotivita »umo« estas pardonebla.) — La juĝisto estas malgaja homo kaj proponas al la servulo serĉi la bonvolon de la mastro: »Havas vorton, kiu havas forton« — kaj ankaŭ tiu ĉi kanto finiĝas same, kiel la antaŭaj, per la malhela indigno de la servulo. Kial daŭrigi la konigon de la enhavo? La novelo finiĝas ĉe la pastro kun la vortoj de la servulo: »Mia rajto estas dia rajto!« Kaj ni denove rememoras la praplendon: »Domon mi konstruis kaj bienon. — Pensu, kaj al mi klarigu jenon: La pomarbon en ĝarden' susuran — ĉu aljuĝas vi al laboranto — ĝin plantinta, aŭ al heredanto, — kiu skuis pomon jam maturan?« Vere la socia indigno en tiu ĉi poemo trovas fortoplenajn vortojn kaj fine: La servulo rekte, helrigarde, — pluen paŝas malrapide, harde. — Lin ne premis plu ĉagren' en koro — nek esper'... Ekbatis lia horo.«

La libro estas tre bela ekstere-interne, nur kelkloke ni trovis eviteblan malklaron. (Ni ne forgesu, ke la reverkinto ne estis tre ligita al la originalo.) Sed felice, tiaj lokoj estas maloftaj, kaj same maloftaj estas la adasismoj: kiel — homulo, servulo, bruego, urbego. La neologismo »smei« oni ne smeus uzi; post longa pripensado mi favoras al la vorto »rajti« kaj se tio estas absolute neuzeb-la, oni pensu pri iu alia solvo, sed laŭeble jam ekzistanta.

Sed la libro donas tiom da rekompenco, ke oni volonte forgesas la menciitajn etaĵojn. F. Szilágyi

TURSTRATO 4 de H. Weinhengst. Eld. Literatura Mondo. Budapest IX, Mester ucca, 53/V.

1934 — 176 paĝoj — 20×13,5 — Prezo: broŝurita sv. fr. 3.50, bindita sv. fr. 5.— plus 10% por sendkosto. IV-a volumo de AELEA 1934.

Turstrato 4 estas t. n. »lukazerno« en laborista distrikto de Vieno. Jen la ĉefa medio de la romano.

Per simplaj sed forte impresaj vortoj la aŭtoro prezentas al ni tiun medion, ĝiajn eksterajn trajtojn kaj ĝian animan atmosferon. La aero estas densa de malagrablaj odoroj, la anima atmosfero estas plena de kverlemo kaj superregemo de malvastaj mensoj. Mizeraspekta estas preskaŭ ĉiu ekstera trajto de tiu domo de mizero, mizera kaj malluma estas la vivo de la homaj animoj.

Ankoraŭ pli malagrabla estas nia unua renkontigo kun la loĝantoj de la domo. Marta, juna oficistino venas hejmen vespere, iomete malfrue, ĉar ŝi faris promeneton kune kun junulo el la sama domo. La ebria patro riproĉas kaj insultas ŝin kaj komencas bati ŝin furioze. Najbaroj perforte forigas lin de lia viktimo, kaj policistoj kondukas lin al la arestejo. En la sama nokto li pendigas sin tie. Tro romanece kaj sensacie! vi diras. Mi opinias, ke ne. La patrino de Marta diras, ke li iam estis bela, energia kaj bonkora viro, sed la milito ruinigis lin. La ruinigon kompletigis la brando kaj la kondiĉoj, en kiuj li vivis. »La bela planto de homamo povas nur vegeti en tiaj cirkonstancoj.« En kelkaj okazoj ĝi tute forvelkas.

Poste ni interkonatiĝas kun la familio de la menciita junulo, Karlo Groner. Estas multe da homoj, malmulte da loko por ili. Estas simpatiaj kaj bonaj homoj, kiuj provas agrabligi la vivon unu al la alia. Diferencoj ekzistas inter ili tiurilate, sed esence ili faras agrablan impreson, precipe la patro kaj la patrino. Sola escepto estas Antonio, frato de Karlo. Li estas iom malagraba tipo, tamen ne malbona en si mem, sed la senlaboreco kreskigas ĉe li nur la malbonajn flankojn de lia karaktero je la kosto de liaj bonaj kvalitoj, kaj fine li eĉ suriras la vojon de krimulo.

Ankaŭ Karlo estas senlabora, senlabora fariĝas ankaŭ lia patro. La efikoj de la senlaboreco verdire estas la ĉeftemo de la libro. Kiel peza ŝarĝo ĝi premas la mensojn kaj donas enhavon kaj direkton al ĉiuj pensoj de la homoj. Ĉion ĝi regas, la detalojn de la ĉiutaga vivo kaj tion, kio devus levi la homon super la ĉiutagan vivon. La amo inter Karlo kaj Marta kreskas kiel rompigema floro — estas momenta sunbrilo, kiu ĝojigas, sed en kies lumo la mizero de la vivo samtempe konturiĝas ankoraŭ pli akre.

La premo de la senlaboreco kreskas pli kaj pli. Ĝi malfortigas korpojn kaj animojn, disigas familianojn, frakasas korojn, estingas vivojn. La rakonto finiĝas per tio, ke Karlo kaj Marta, solaj en la mondo kaj sen iu ajn espero pri la vivo, mortigas sin per gaso.

La rakonto do estas sufiĉe malgaja, io pli malgaja apenaŭ estas imagebla. Ĝi ne plaĉas, en la ordinara senco de la vorto, sed ĝi tamen estas bona libro. La aŭtoro volas montri al ni, kia estas la vivo en la mallumaj anguloj de nia socio. Kaj tiaj anguloj ekzistas ne nur en Vieno. Estas la nuntempa socio, kiu grandparte respuguliĝas en Turstrato 4. Kelkiuj eble riproĉos al la aŭtoro, ke li ne proponas ian solvon de la problemo. Li neniel propagandas radikalajn pensojn — rekte. Sed laŭ mia opinio tio ne estas necesa en tia speco verko. Faktoj pli forte parolas ol frazoj. Sed aliflanke vere sentiĝas la manko de pozitiva forto. Nun la libro preskaŭ donas impreson de plena rezigno, kaj tio certe ne estas la intenco de la aŭtoro.

Weinhengst bone rakontas, mortaj punktoj ne ekzistas kaj li ne perdiĝas en detaloj. En kelkaj nemultaj

La tri tentoj de Petro Ĝisost

Petro Ĝisost, fidele al sia nomo, estas vera ĝisostulo. Tia li havis en sia heroaj tempoj, kiam li rompis almenaŭ dekdu lancojn pri HEZITI. Li ja ne sukcesis ekstermi la Monstron, sed tamen, tio estis bela batalo!

Sed la Maliculo ne lasas trankvila eĉ tian fidelulon. Aŭskultu!

*

Tiutempe la Maliculo aperis antaŭ Petro Ĝisost. Kaj li havis en sia mano dikan libron. Kaj montrante ĝin al Petro, ki diris:

— Jen, mi donas al vi tiun ĉi libron. Legu kaj ŝangu vian koron.

Petro kaptis la libron. Ĝi estis granda, impona, dika volumo. Vortaro ĝi estis, kun zamenhofaj ekzemploj, sinonimoj, klarigoj, resendoj — vere tre apetitiva vortaro. Sed apenaŭ la okuloj de Petro tuŝis la titolpaĝon, li ek-siblis. Li ekvidis tie la nomon de la Malamiko! Jen estis lia feliĉo kaj savo. Li decide ĵetis la libron sur la plankon.

— Fi, mopenaĵo — li diris.

Disnebuliĝis la Maliculo.

*

Kaj ankaŭ duafoje aperis la Maliculo antaŭ Petro. Kaj li montris al li seriegion de libroj, bele presitaj, riĉaj, plenaj de arto kaj intereso. Kaj dum li rigardis ilin, la libroj antaŭ liaj okuloj ekmultiĝis. Svelis la libro-amaso, plenigis la ĉambron, atingis la plafonon, ĉiuj brilaj nomoj de mond-literuro troviĝis inter ili, originalaj romanoj, originala poezio, antologioj, sciencaj verkoj, revuoj, gazetoj svarmis kaj aglomeriĝis — kaj ĉiuj en Esperanto. Kaj la libroj jam premmalfermis la pordon, el-ruliĝis tra la ŝtuparo, en la straton, kaj la vento disportis ilin kaj la homoj kaptadis, legis ilin. Kaj urbon, landon mondon superversis tiu ĉi libro-inundo.

— Nu, — demandis la Maliculo — kion vi diras pri tio? Ĉu vi ne estas ravita?

lokoj la stilo tuŝetas la sentimentalman esprimmanieron de pli malaltklasa literaturo, sed ĝenerale ĝi estas libera de tiaj mankoj kaj estas sobra kaj trafa.

El pure literatura vidpunkto Turstrato 4 ne staras tre alte, ankaŭ ne malalte. Mi senhezite preferas ĝin al la laŭmodaj kvazaŭpsikologiaj kaj kvazaŭfilozofiaj nacilingvaj romanoj pri similaj aŭ parencaj temoj. Ili povas esti pli arte faritaj, sed tie ĉi troviĝas io, kio estas pli valora: honesta rakontado. Sed la plej grava ŝajnas al mi, ke la libro estas vere serioze kaj celkonscie verkita kaj havas celon kaj sencon. Tiurilate mi konsideras ĝin, malgraŭ ĝia manko de pozitiva forto, kiel la plej gravan belliteraturan prozlibron, kiu ĝis nun aperis en nia lingvo.

Stellan Engholm

LA INFANOJ DE BETLEHEM DE SELMA LAGERLÖF. Trad. Oscar Prode. 32 paĝoj. Eldonis Eldona Societo-Esperanto, Stockholm, 1933. Prezo ne montrita.

En tiu ĉi novelo de la fame-konata sveda aŭtorino tute ne temas pri la infanoj de Betlehem, kiuj sole en unu sceno ludas la rolon de komparoj, sed pri la Betlehema Infano Jesuo. La flugilumita fantazio de Lagerlöf ŝpinas belan rakonton bazitan sur la evangelia legendo pri la saviĝo de Sankta Mario kaj la Infano el la manoj de la sangavida Herodo. Estas strange, ke la genia verkistino, kies lingvo en la aliaj verkoj estas tiom kolorriĉa kaj dinamika, ne utiligis en sufiĉe alta grado sian talenton por tiu ĉi temo, tiom varia kaj dankinda. Eble pro tio ĉi la libreto ne postlasas en la leginto pli profundan impreson. Se biblia rakonto, mankas al ĝi la necesaj bibliaj koloroj kaj etoso. Se realisma rakonto, tiam mankas la necesaj

— Jes — diris Petro — sed diru, kiom da neologismoj troviĝas en tiu ĉi amaso da libroj?

— Ho, ne multe — respondis la Maliculo. — Eĉ ne tiom, kiom troviĝas kune en la Plena Vortaro kaj Parnasa Gvidlibro.

— Fi — kriis Petro kun ega abomeno. — Tuj mi scias, ke ĉio ĉi estas malutila aĉaĵo. For de mi, diablo! Mi restas ĉe mia Fundamenta Krestomatio!

Disnebuliĝis la Maliculo.

*

Kaj ankaŭ triafoje aperis la Maliculo. Kaj li kaptis Petron ĉe lia basko kaj flugis kun li sur altan monton.

— Rigardu — li kriis.

Petro rigardis. Kaj trupoj venis sub la monto en senfinaj dikaj amasoj. Ili marŝis sub verdstelaj standardoj. Ĉiuj profesioj, metioj, okupoj estis reprezentitaj tie, ĉiuj popoloj, rasoj, koloroj, aĝoj, ambaŭ seksoj. Etuloj kantis Esperantajn infankantojn, gejunuloj amindumis, plenaĝuloj intertraktis, maljunuloj filozofis — ĉiuj Esperante. La tuta homaro pretermarŝis tie en esperantista entuziasmo.

— Nu — kriis la Maliculo. — Kion vi diras pri tio?

— Nekredeble, mirinde, rave, ĉiele! — ekkriis Petro. La tento estis vere tre forta.

Sed nur momenton daŭris la sinforĝeso. La dubo lev-is sian kapon.

— Diru vere, — li demandis severe — ĉu nenia ruzo, malfidelo, trompo troviĝas en ĉio ĉi?

— Nenio, vere nenio — respondis la Maliculo. — Estas ja vere, ke ili ĉiuj uzas io anstataŭ ujo, sed pro tia bagatelo...

— Bagatelo! — ekhurlis Petro indigne. — Bagatelo! For de mi, Satano!

Disnebuliĝis la Maliculo.

*

Tiel savis sian animon Petro Ĝisost.

Kaj li reiris al sia skribotablo, por kolekti la duan milon da adjektivoj postmetitaj kaj neakordigitaj kaze kun sia substantivo.

M. Alice Pirk

kunligo de kaŭzoj kaj sekvoj.

Tamen tiu ĉi rakonto havas simblan signifon eĉ por tiuj, por kiuj la biblio ĉesis esti aŭtoritata. Nek ĉi per-sekutoj de la sangavida Herodo, kiu igis forbuĉi la infanojn de Betlehem, povis haltigi la eventoplenan antaŭeniradon de la Historio, nek — pli frue — la kanibaleco de la biblia Faraono, kiu ordonis ĉiun hebrean knabon ĵeti en la riveron, povis evitigi la historie konsekvencajn saviĝon de Moseo kaj lian pli postan agadon. La historio eterne ripetigas, kaj ĉiu epoko havas sian Jesuon kaj Moseon. Ilian alvenon malhelpas nenia buĉado, nek dronigado.

La lingvo de la traduko estas ĝenerale bona. La lingvaĵo estas flua, glata kaj facila, kio sendube igas la libreton rekomendinda.

S. Lejzerowicz

D. FURMANOV: ĈAPAJEV (Trad. Devjatnin, Eggers, Fedotov. Eld. Ekrelo. Amsterdam).

* — Ho, nia kompatinda generacio! Kiam ni naskiĝis, vere niaj gepatroj plaĉe vidis en ni la estontajn, kontente bonajn burĝojn, ornamojn de la trankvila socio kaj ni fariĝis vagabondoj, aŭ aventuristoj aŭ herooj, ĵes ankaŭ tiuj, kiuj ne devenis el tiom romantika pariĝo, kiel Ĉapajev, en kies deveno oni konstatas ciganan kaj altrangan sangon. Ni, kiuj iom ŝafare erarvagadas en tiu ĉi freneza mondo, nerveme pensas pri tio, ĉu tuj, aŭ nur morgaŭ venos kuglo, gaso aŭ lavango, kiu forviŝos de la terglobo nian sensencan kaj mizeran vivon. — Ho, Ĉapajev! Via batalplena historio, plenigita de antaŭmarŝado, sango, militplanoj, atakoj, triumfoj nur tiam povas ekinteresi

* Ne havebla ĉe ni

nin, kiam la historio igas homa, kiam anstataŭ la fiero aperas la tragedio, la morto. Ni estas literaturistoj, kiuj serĉas literaturon en la libroj kaj ni trovas tion fine de la epopeo, kiam la — iom unutona — rakonto larĝiĝas kaj koloriĝas per la profundaj nuancoj de la morto. — La aliaj ĉapitroj de la rakonto ne ekflamigas nin; oni povas — kompreneble — pravigi por si ĉiun militon, sed fine nin devas tedi, naŭzi ĉiu priskribo, kiu aposteriore popularigas sangverŝon, batalon, masakron. Kelkfoje la unuopaj homoj, eble eĉ landoj, nevole estis puŝitaj en tiajn aventurojn, sed estas plej bone, se oni poste hontas kaj silentas pri tiuj aventuroj, kiuj, kiel ajn ni turnadas la aferojn, ne estas indaj al la homoj. Se la atakito devas sin defendi, bone, li faru tion, sed poste neniu sin gloru per la sukceso, kies motivo iuflanke estis senjusta. — El la libro de Furmanov mankas la trankvilo; tion ni ne povas riproĉi, sed tiu maltrankvilo iom trokonstantiĝas en la verko kaj tiomgrade kutimigas nin al tiu ĉi tono, ke ni apenaŭ povas vidi la verkon pro la literoj.

Plezuron ni tamen povas senti kelkloke, kie la arto de la verkisto eternigas amasscenojn, kies vera artisto li estas kaj — ni ripetas, la fino de la libro alte altiĝas super la unutona ebenaĵo de la aliaj partoj.

Pri la traduko; la tradukintoj bone faris sian malfacilan laboron, tamen ne tute senerare; kelkaj plumeraroj restis en la libro. (Ekz. sur la 57-a p.: »Dekstre post la rivero Usenj staras kirgizaj aŭloj. — ?) Kelkloke ni trovis superfluaĵn sufiksajn, kiel *ravigitaj, turmentigi, aŭ superfluaĵn formojn*. Kelkloke la stilo estas tiom konciza, ke ni ne povas kompreni. Ekz. »La atakado estis organizita tiamaniere, por aperi apud Slomihino apenaŭ komenciĝos tagiĝo. (52 p.) Kaj la artikolo! Kia ricega vario de eraroj! Sed, escepte de ĉi lasta punkto, oni povas legi la libron sen lingva ĝeno. — c.

LINGVA KOMISIONO DE SEU I. IZGUR KAJ V. KOLCINSKI: GRANDA RUS-ESPERANTA VORTARO. Kontrolis kaj kompletigis V. Polakov kaj N. Hohlov. Moskvo 1933. Eldono de C. K. de SEU. Pĝ. 720. Form. 12×17 cm. Prezo broŝ. 3 rb., bind. 5 rb. Eldonkvanto: 5.000 ekz.

De kiam en la jaro 1910 aperis la granda Rusa-Esperanta Vortaro de Dro Korzlinŝki, Mencil, Smirnov kaj Stupin triarĝardita de la Majstro, pasis jam preskaŭ kvaronjarcento. La vortaro, siatempe entuziasme akceptita de la rusaj samideanoj, jam delonge estas plene elvendita. Laŭ nia scio ne aperis post ĉi alia simila vortaro rusa malgraŭ la sukceso de la Esperanta movado en Sovetlando kaj malgraŭ la neceso kompletigi la vortmaterialon, entenatan en la vortaro de Korzlinŝki.

Nun tiu manko estas forigata per la apero de la nova vortaro, kompilita de la Lingva Komisiono de Sovetrespublikara Esperantista Unio.

La kompilintoj en ampleksa antaŭparolo klarigas, kiel ili komprenis sian taskon. Ili opinias, ke »venis la tempo kontraŭstarigi al la ĝisnuna laboro de unuopaj esperantaj leksikografoj la estontan kolektivisman laboron de la amasoj, uzantaj esperanton praktike kaj vastskale«. Ne neante la gravan rolon de la unuopuloj en la mekanika procedo de vortfarado (enslipigo de vortoj, kontrolo de proponoj ktp.), la kompilintoj asertas, ke »la lastan opinion devas nepre esprimi la amasoj«.

Post tiu ĝenerala teoria deklaro devus veni praktika elmonro de la laŭŝajne nova vojo, aplikata de la kompilintoj. Anstataŭ tio ni legas, ke »oni devas ellabori la estontajn praktikajn formojn de la nomita amaskontrolo«.

La nova vortaro do ne estas farita laŭ la propra recepto de la kompilintoj. Ne okazis do ia »demokratia memkritike lingvoplebiscito« en Sovetlando, kies celo estus aprobi la apartajn vortarerojn.

Se la kompilintoj, kies bona volo kaj granda, persista laboro estu de ni ĉi-loke laŭde substrekitaĵ, ne volus

nepre esti revoluciaj eĉ tie, kie ne estas necese, kaj ne volus »pro principeco« fermi la okulojn antaŭ la granda (ne nur mekanika) laboro de unuopuloj (eĉ se ili estas la tiom malsataj »aŭtoritatoj«), ili malkaŝe konfesus, ke la tiom aspirata de ili vojo de evoluo de nia lingvo jam estis delonge montrita en la »Fundamento« (ĉu ankaŭ reaktacia) de la Majstro. Cu ne per amasa uzado eniras nian lingvon vortoj, prove uzitaj de apartaj esperantistoj? Cu ne foriĝis delonge el nia memoro vortoj, kiuj ne trovis aprobon ĉe la vasta publiko kaj sekve ne akiris la rajtojn de lingva civitaneco?

La nepra deziro trovi iajn novajn verojn kondukis la kompilintojn al veraj strangajoj. Ekz. dezirante pruvi la neceson akcepti la finaĵojn »io« por landoj anstataŭ »ujo« ili asertas »ujo kvazaŭ estas ligita kun la naciisma, poseda, eĉ imperialisma percepto pri landnomoj«. Kaj jen estas ekzemplo, citata de la kompilintoj por sia aserto: »Tiel la nova faŝisma reĝimo de Sudslavio elvokis kaj subtenas la monstran formon Jugoslavujo«. Sed vere, la monstreco ja kuŝas ne en la finaĵo, sed en la komenco de la citita vorto: devas kompreneble esti »Sudslavujo«, ĉar »jug« estas la slava signifo de »suda«. Cu la faŝismo nepre bezonas la formon »Jugoslavujo« mi permesas al mi dubi.

Se ni akceptus la originalan teorion pri la politika signifo de »ujo«, ni havus vere ĝenan ilon por senfaŝistigi la ŝtatojn. Do, Italio estas tiam sennaciisma, eble eĉ revolucia simpatia por sovetanoj lando, sed Sovetujo estas danĝera »naciisma, poseda, eĉ imperialisma« lando. Cu vere ne estas tro da honoro atribui al la senkulpa, bona, maljuna fundamenta »ujo« tiom da mondoskua forto?

La vortara parto mem entenas sur preskaŭ 700 paĝoj abundan vortmaterialon, konsciencie kolektitan. Ne estas tro da novaĵoj en ĝi. La aŭtoroj do feliĉe mem ne atentis sian antaŭparolon. La enhavo de la vortaro povus tute bone aperi en ĉiu alia (»burĝa«) vortaro. Estas nur iom da speciale sovetaj mallongigoj laŭ la maniero, aplikata nun en la rusa lingvo, ekz. »komjunuloj« — junaj komunistoj; »labkoroj« — laboristaj korespondantoj. Estas dubinde, ĉu ĉiuj mallongigoj estas necesaj kaj utilaj. Ja Esperanto estas lingvo internacia, kiu devas esti komprenata de ĉiuj. Cu ni faru el ĝi lingvon de krucenigmoj aŭ rebusoj? Cu ni devas postuli de »burĝoj« esperantistaj, ke ili divenu, ĉu »esperkoroj« estas laŭ klarigo de la rus-esp. vortaro »esperantaj korespondantoj« aŭ nur esperplenaj koroj? Aŭ ĉu ni havu la kuragon peti la sovetajn amikojn, ke ili konsideru la — certe baldaŭ en Germanujo laŭ tiu recepto enkodukotan — vorton »es-ulo« nepre kiel »S. A.-Mann« sed ne kiel kozakoficiron (*esaulo* — rigardu la rus-esp. vortaron).

Ke mankas en la vortaro indiko, kiuj radikoj estas fundamentaj. Zamenhofaj aŭ uzitaj de eminentaj lingvokompetentuloj, estas komprenebla sekvo de la principa deklaro de la kompilintoj. Sed ĉu vere tia indiko estus signo pri »blinda flata adorado por la aŭtoritatoj«?

Resume ni tamen diru, ke forigante la — cetero ne tre grasan — politikan saŭcon, la vortaro estos bone uzbla de la vastaj amasoj. Ĝi estu ankaŭ laŭdata pro sia kompleteco.

Tion sincere konfesas la recenzanto, kiu petas la estimatajn kompilintojn de la vortaro, ne konsideri lin terura naciisto, imperialisto kaj posedemulo pro lia favoro al la terura »ujo«.

J. Sapiro

PRI PIEDPILKLUDANTO de Victor von Nispen; kun desegnaĵoj de St. de Reuder. El la nederlanda lingvo tradukis: Frater M. Bartholomeus. Eldonejo: Piet Smits, Tilburgo. 96 paĝoj, formato 19×12 cm. Prezo: 1.30 nederl. guldenoj.

Mi rakontu la mallongan (kaj tamen tutan) enhavon de l' libro.

Joĉjo ricevas piedpilkon. Li kunportas ĝin eĉ en la liton kaj songas pri ĝi, ruinigante dum la sono la

enlitaĵon. Sekvatage li ludas kun sia amiko per la pilko; ili malpurigas. Alian tagon la pilko de la strato en la ĉambron de l' geonkloj, renversas la kaĝon de l' kanario, la kanario elflugas. La geonkloj volas kapti la birdon, dum la ĉaso-bruo ĉio rompiĝas. La saman vesperon la pilko flugas — ree tra fenestrò — en iun kontoron, Joĉjo postrampas ĝin; oni fermas la kontoron kaj Joĉjon en ĝi. Li volas liberiĝi, telefonas, venas fajrobrigadistoj, policistoj; post kelkaj klarigoj ankaŭ la situacio klariĝas: Joĉjo ree estas hejme kaj abomenante sian pilkon — kiu ja propre estis kaŭzo de ĉio ĉi — fordonacas ĝin.

Nenio mankas! Kaj tiu enhavo, mi pensas, estas iom malgranda por plenigi 96 paĝojn. Pri la moral-lectionoj, kiuj plenigas la paĝojn, mi ne estas speciale ravita. Akcenti tiel gravvoĉe religiajn ordonojn kontraŭ petola miskonduto de infanoj, al mi ŝajnas: pafi sur paseron per kanono (ne eklezia sed milita). Entute, mi kredas, ke la aŭtoro rigardas la niatempajn infanojn tiel naivaj, ke tio atestas pri lia propra naiveco. Sed estas eble, ke nur en mia lando ili estas tro mal-naivaj por tiu ĉi libro.

Nun, kelkajn liniojn pri la lingvo. Mi opinias ke la parolturnoj de la nederlanda lingvo tre similas al tiuj de la hungara. Mi nome abunde trovis hungaris-mojn en la teskto. Ekzemple: »tiun pilkon mi ankoraŭ ne reekhavas« en la senco de: »povas okazi ke mi ne rehavos tiun pilkon«. Tia uzo de »ankoraŭ« estas unu el la plej delikataj ebloj de mia gepatra lingvo, sed mi timas ke ĝi ne tradukeblas laŭvorte esperanten.

En la libro svarmas la novekreitaj sonimitaj vortoj (tuta linio: »pats, hots, bots, rits, klats, klats, bons, bum, bots«), ne ĉiam feliĉaj (kiel videble). Kelkaj el ili konsistas el literoj fremdaj al esperanto (la hundoboj: »waf, waf«). Kelkloke okazas kulpoj kontraŭ la akuzativo (ekzemple en la antaŭvorto: »mi dankas la kuraĝa eldonisto«).

Malgraŭ tiuj eraretoj, la lingvo ĝenerale estas kontentiga. La aŭtoro foje uzas eĉ simplan pasivon »eluzitus«. Kaj imitinde li aplikas la vorton »jes« en la sintaksa rolo de »ne«. (»Vi ne faros tion!« — »Tamen, mi jes faros.«)

La libro estas bele eldonita. G. Karczag.

CURSUS COMPLETUS ESPERANTI de Sac. Jacobus Bianchini. Eldonejo: Typographia A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italia), 1934. 168 paĝoj, formato 18×12 cm. Prezo: 10.— ital. liroj.

La libro estas sendube por homoj, kiuj havas pli altan kulturon kaj instruitecon. Tion jam pruvas la bazolingvo, sed ankaŭ la metodo aplikita en la libro. Tiu metodo ne estas nepre facila, sed neniu pensu, ke tio estas malavantaĝo! Male, ni jam tro satas pri libroj fanfaronantaj pri trofacileco kaj erarigantaj la komencantojn promesante al ili miraklojn, kiujn sobramense ili neniam kredus sen tia mistifikado. Tio ja ofte kondukas al senreviĝo. Konsciencan kaj pedanta gramatikado multe pli utilas ol tia »rapidkuirilo«, kies rezultoj poste montriĝas en esperantistaro nescianta apliki la akuzativon.

Du riproĉindajoj tamen troviĝas en la gramatika parto. La aŭtoro traktas preskaŭ ĉiun prepozicion unue kiel verboprefikson, kaj nur poste kiel prepozicion. Tio kontraŭas la fundamentan principon de la pedagogio: iri ĉiam de la facila al la malfacila.

La alia, tre grava manko estas: nemencio pri l' ad-verba formo de l' predikata atributo en frazoj sen substantiva aŭ pronoma subjekto. Tiel estiĝas esperantistoj, por kiuj »estas bona ke vi venis« sonas, kiel ĉiela horo.

Post ĉiu leciono troviĝas komparaj notoj. Tie la kompilinto detale kaj tre interese klarigas la devenon de la esperantaj gramatikeroj. Por plifaciligi (?) la studadon li ne timas kelkloke eĉ perfortaĵojn tiacelajn. Por pruvi, ekzemple, la ekziston de l' sufikso »-ing-« en la germana lingvo, li citas la vorton »andr-ing-en« (!). Same li procedas por pruvi la komunan devenon de la lingvoj, kio estas verŝajne tre vana klopodo.

Pri la dogmatikaj partoj, troveblaj en la komparaj notoj, mi ne volas diskuti. Tamen mi permesas al mi demandon: ĉu la aŭtoro opinias, ke Zamenhof kompilis baze de tiaj pripensoj la lingvon, aŭ feliĉa kunludo de diversaj cirkonstancoj igis ĝin dogmatike neŝancelebla konstruaĵo.

La aŭtoro pledas por speciala prefikso signanta la virsekson. Mi, iom timeme en ĉi tiu granda kontraŭneologisma tempesto, samopinias kun li. Vere, en E. mankas vorto por la angla *male*, franca *mâle*, itala *maschio*, germana *Männchen*. Por signi la insekson, ni havas la vorton *ino* (kiun apliki al respektinda virnestaĵo, kiel oni faras kelkfoje, estas simple insulto). Sed *viro* estas dusignifa; ĝi signas ne nur individuon virsekcan, sed ankaŭ individuon sekse maturan; tia estas ĝia signifo en la vorto *virino* (el seksdifina vidpunkto, ŝi ja estas kvazaŭ antipodo, la malo de *viro*, kaj ne ĝia *in-formo*). Krome, *viro* havas eĉ trian signifon, ĝi signas ankaŭ individuon fortan, energian, agpretan. Tute mankas do vorto, kiu, aplikita al virsekca homo, emfazus lian troakcentitan virseksecon, kiel la vorto *ino* emfazas, aplikita al virino, la troakcentitan ineksecon. Ĉe traduko foje tio jam malesperigis min.

Sed la proponita prefikso *ars* ne ŝajnas bona. Unue, mi ne povis ĝin trovi en la greka lingvo, de kie ĝi devenus laŭ la aŭtoro. Due, ĝi farus terurajn konsonant-karambolojn, ni pensu nur la vorton *arsstruto*.

Mi konfesas, ke ne estas facile trovi taŭgan solvon. *Maskul* estas tro *longa*, maskl *kaj* masl donus neelparoleblajn kunmetojn, *mask* kaj *mas* kaj *mal* havas aliajn sencojn. Eble taŭgus *mak* (hispana *mache*)? Eble *maŭk*, aŭ *maŭ*, aŭ *ma*? Eble (eventuale prefikse la sufikso *uk*, kiun faris de *Saussure* en sia Nov-Esperanto? Eble la sufikso *rik*, prenita el la germana *Gänserich*, *Enterich*, *Tauberich*? *Uko* ankaŭ memstare ne estus malbona vorto. Sed — Dio gardu min de propono!

Kien mi deflankiĝis?! Finante mian raporton, mi mencias ankoraŭ, ke la gramatiko estas tre bone kompletigita per partoj el la Lingvaj Respondoj, leteroj de Zamenhof kaj per vortaro, kie la aŭtoro ne montras sin malamiko de neologismoj. En gramatiko oni devus eĉ pli ŝpari pri ili.

La libro havas plaĉan eksterajn kaj meritas plurajn eldonojn. G. Karczag.

IVANS: LA VIRO EL FRANCUJO. Aventuro de Geoffrey Gill, Detektivo. El la nederlanda lingvo tradukis W. Versteeg Graftdijk. Kontrolita kaj rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. Populara Esperanto-Biblioteko, Amsterdam. Elandstraat 177—179. 21×15.5 cm. 244 pĝ. Prezo bindita: guld. 2.50 + sendkostoj.

La libro, kiel diras ankaŭ la antaŭparolo, ne pretendas havi altan literaturan valoron. Ĝi estas detektivromano laŭ la maniero de Wallace: en ĝi okazas ekscitaj aferoj, murdoj, detektivesploroj en streĉita atmosfero kaj fine malkaŝiĝas surprize, ke la krimulo estis tiu persono de la romano, kiun ni malpleje suspektis. La morala mondordo venkas.

Do ĝi estas kriminala romano. Sed kiel tia, ĝi estas certe bone verkita, ĝi povas esti eksciton kaj streĉon, kaj ĝin povas konservi, eĉ pliigi ĝis la fino. Krome, ĝi ne malhavas ankaŭ bonajn karakterpentrojn.

Rilate al la traduko, *generale*, ni povas eldiri laŭdojn. La stilo estas glata kaj flua; la tradukintino, kies nomon ĝis nun mi ankoraŭ ne renkontis, montras surprize bonajn konojn lingvajn. Estas vere, ke la traduko ne donis al ŝi tro malfacilan taskon, ĉar la romano estas rakontita en simpla kaj travidebla stilo, sed ŝia debuto certe rajtigas nin plekti belajn esperojn pri ŝia plua evoluo.

Tamen, troviĝas en la traduko kelkaj esprimoj kaj vortoj, kiuj ŝajnas al mi pli-malpli nekorektaj. Ĉiujn, senescepte, mi notas tie ĉi, la stilo de l' tradukintino ja meritas tian miniaturan kritikadon.

Cagrenite mi renkontis la nederlandan idiotismon: *mi neeble povas*. Mi kredas, ke ĉiu nehollandano ĝin trovas stranga. Kaj kial ni bezonus ĝin? Ĉu ne sufiĉas: mi ne povas, ne kapablas, mi neniel povas, mi tute ne povas, al mi estas neeble, al mi estas tute neeble, neniel eblas al mi, tute ne eblas al mi, ktp?

En *kaprompiga* kaj *surpriziga* la sufikso *ig* estas superflua, ĉar *rompi* kaj *surprizi* estas transiraj verboj. Same malĝusta estas la vorto *»kapturnigis«*, ĉar kio estas *kapturna*, tio *kapturnas*, do okazigas *turnigon de kapo*.

Malagrade tropreciza estas la vorto *porvespertualeto*, mi vere ne komprenas, kial la tradukinto ne kontentas je la nemiskomprenbla *vespertualeto*. Se ni volus esti tiel precizaj, ni devus ja diri: pervaporŝipo, porpoŝtkarto, pormangotablo, traerŝipo, ktp.

Same la troprecizemo kulpas pri la esprimoj *ekde longe* kaj *ekde tiam*. *Ekde* estas tre bona vorteto, por distingi inter la tempa kaj la loka aŭ poseda *de*, sed oni ĝin uzu nur kiam tio estas necesa. En la supraj ekzemploj ĝi estas evidente superflua.

Mi legas: *»li sentis sin sufiĉe bona«*. Nu, mi komprenas, ke li prijuĝis sin morale, kaj laŭ tiu prijuĝo li sentis, ke li estas sufiĉe bona. Sed la tradukintino volas diri, ke li sentis bona sian *sanstaton* aŭ *animstaton*. Do ŝi estus devinta skribi: *»li fartis sufiĉe bone«*, aŭ *»li sentis sin sufiĉe bone«*.

Returnen kaj *renkonten* ĝenas per sia superflua n-finaĵo. Ili jam en si mem signifas *direkton*, do estas superflue tion aparte signi. Por mi ili estas same malkorektaj, kiel *al la domon*. *Returne* kaj *renkonte* sufiĉas.

Anstataŭ *naskita anglino*, mi dirus *denaska anglino*.

La esprimon *vila barbo*, mi ne komprenas. Ĉu *densa* barbo aŭ *hirta* barbo aŭ *nezorgita* aŭ *senorda* barbo?

Progresia paralizo ne ŝajnas feliĉa esprimo. *Progresio* ja estas matematika termino. Se oni ne volas diri *progresiva*, oni diru *progresanta*.

Mi legas: *»Mi ne tion sciis«* kaj komprenas: ne tion, sed ion alian — ĉar neata estas la vorto *tion*, antaŭ kiu staras la vorteto *ne*. Same: *»Tio ne al vi estas bonvena...«* — mi kompletigas: *»sed al iu alia«* — ĉar neataj estas la vortoj *al vi*. Oni devas diri do: *»Tion mi ne sciis«* kaj *»Tio ne estas al vi bonvena«*.

»Spite sia kutimo« estas arkaika anstataŭ *»spite sian kutimon«*, aŭ *»spite al sia kutimo«*. Ĝin oni uzis en la tempoj, kiam *spite* estis kvazaŭ prepozicio. Sed nun *spit* estas verba radiko (*spiti*), do *spite* estas *adverbo*. Kaj adverbon oni ne povas uzi prepozicie; la tradukintino ja certe ne skribus: koncerne tio, konsidere tio, rilate tio.

»Li estis inter tri-kvardekjara« estas tro neglekte farita frazo anstataŭ *»li estis inter tridek kaj kvardek jaroj«*, aŭ *»li aĝis inter tridek kaj kvardek«*.

»Nek mi komprenas tiun vorton« devus esti *»ankaŭ mi ne komprenas tiun vorton«*, ĉar *nek* estas uzata nur kun alia *nek* (*nek mi*, *nek vi*), aŭ kun alia *neo* (li ne estis tie, nek volis iri tien).

Laŭ mia opinio *»neniu novaĵo«* estas nekorekta; oni

devas diri *»nenia novaĵo«*. Ĉi tiun opinion mi ne bazas sur hungarismo (kiel iu diris), sed parte sur la zamenhofa kutimo, parte sur la strukturo de la Tabelo-vortoj. *Neniu* respondas al *kiu*. (Kiu libro — neniu libro.) Nu, kion signifas *»kiu libro«*? Evidente: *»kiu el la libroj«*, do *»kiu el certaj libroj«*, *»kiu el difinita, limita nombro da libroj«*. *Neniu* aŭ *iu libro* do estas, konforme, *iu* aŭ *neniu* el certaj libroj, el difinita, limita nombro de libroj. Tio donas eĉ eblon al delikata distingo. Ekzemple: *»Mi ricevis neniun libron de mia amiko«* signifas, ke mi ricevis neniun el la libroj de mia amiko, neniun el la libroj nombre limitaj per tio, ke ili apartenas al mia amiko. Male *»Mi ricevis neniun libron de mia amiko«*, signifas, ke mia amiko tute ne donis al mi libron, nek el siaj libroj, nek el fremdaj libroj. Same: *»mi ricevis iun libron de mia amiko«* (iun el liaj libroj) kaj *»mi ricevis ian libron de mia amiko«* (mi ricevis de mia amiko libron). Estas vere, ke *ia* kaj *nenia* enhavas ankaŭ la sencon de *kvalito*. Tamen, tio malpli gravas, ol ke *iu* kaj *neniu* enhavas la sencon: *iu* aŭ *neniu* apartigita el certa difinita nombro. Se oni diras: *»donu al mi iun cigaron«*, mi komprenas *»donu al mi iun el certaj cigaroj«*. Sed *»donu al mi ian cigaron«*, signifas *»donu al mi cigaron, egale de kie«*.

Ofte mi trovis superfluan akuzativon en fragmentaj frazoj. Ekzemple:

»Post kvin minutoj G. G. ree staris antaŭ mi.«

»Nenion« — li diris . . .

Kial ne simple: *»Nenio«*.

Same: *»En la fino de Marto, komprenable! Sed ĉu la ĝustan daton?«* Mi skribus: *»Sed la ĝusta dato?«* — sen *ĉu* kaj sen akuzativo.

Same:

»Do neniun novaĵon pri li?«

»Neniun.«

Mi skribus: *»Do nenia novaĵo pri li?«* *»Nenia.«*

Aŭ: *»Do nenio nova pri li?«* *»Nenio.«*

La modo post *kvazaŭ* ne estas unuece uzata. Kelkaj (francoj, germanoj, italoj, hungaroj, katalunoj ktp.) uzas kondiĉan modon, aliaj (angloj, nederlandanoj) uzas indikativon. Zamenhof uzis jen unu, jen alian. Mi kredas, ke estus bone ĉi-rilate havi unuecon de lingvo-uzo. Kaj al mi ŝajnas senduba, ke la usmodo estas nepre preferinda.

La us-modo ja signas, ke la diro ne respondas al la realo. Ekzemple: *»Se vi estus farinta vian taskon, mi vin rekompencus«* — ĉi tie estas dirite, ke la tasko ne estis farita, ke la supozo pri tio estas fiktiva. Nu, la sama fikтивеo kaj nerealeco estas dirata ankaŭ per *kvazaŭ*. Ekzemple: *»mi sentis, kvazaŭ mia kapo rompiĝus«* — ĉi tie tute ne estas vere, ke mia kapo rompiĝis, mi diras nur, ke *»se mia kapo rompiĝus, tio estus simila sento, kiam mi havis«,* *»mi sentis, kiel mi sentus, se mia kapo rompiĝus.«* *Kvazaŭ* kiel konjunkcio do signifas *kiel (... us)*, se. Do: *»li parolis, kvazaŭ li estus freneza«* signifas: *»li parolis, kiel (li parolus), se li estus freneza«*.

Dum la konjunkcia *kvazaŭ* postulas kondiĉan modon, la adverba *kvazaŭ* ne havas sintaksan funkcion, ĝin do sekvas indikativo. La adverban *kvazaŭ* oni povas rekonii per tio, ke ĝi estas ĉeffrazo, aŭ, se ĝi estas en dependa frazo, tie troviĝas krom ĝi ankaŭ konjunkcio. Ekzemple: *»Li kvazaŭ frenezis.«* *»Mi vidis, kiam li kvazaŭ frenezis pro la ĝojo.«*

Per ĉi tiu distingo iĝas superflua la komplekso: *estas, kvazaŭ, ofte renkontebla, sed, laŭ mia opinio, ne bela*. Ekzemple: *»Atmosfera de suspekto pendas super Stockton Court; estas kvazaŭ ĉia reciproka intimeco foriĝis.«* Al mi ŝajnas pli elegante: *»kvazaŭ foriĝis ĉia reciproka intimeco«*.

En la libro troviĝas kelkaj nemultaj vortoj netroveblaj en la Plena Vortaro (joviala, bruska, hororo, sinekuro, butlero), ili plejparte estas klarigitaj en piednotoj. Al mi ŝajnas pli oportune ilin klarigi en la fino de la libro, ĉar tiel oni ne devas pene serĉi la piednoton, se oni forgesis la sencon de la vorto kaj trovas ĝin duafoje. La vorto *barbiero* estas malĝusta; *barbiero* estas oficiala. Antaŭa *ŝofero* al mi pli plaĉus *ŝoforo*, aŭ italmaniere *aŭtisto*. Estas strange, ke la tradukintino klarigis la oficialan vorton *sekura*, dum *sinekuro* restis sen klarigo. Anstataŭ *turmentegilo* mi preferus *torturilo* (zamenhofa radiko).

Nun mi vidas, ke mia recenzo iĝis terure longa, kaj ĝi konsistas preskaŭ el nuraj riproĉoj. Mi devas do ripeti, kion mi supre jam diris, ke la stilo estas flua kaj glata, kaj ke mi surpingligis senescepte ĉiujn pli-malpli nekorektajn lokojn, kiujn mi trovis per zorga esploro. Oni ne kredu do, ke ili svarmas en la teksto, male, ili tute perdiĝas en la 242-paĝa libro, kaj la leganto, kiu havas la agrablan plezuron ekscitiĝi kaj interesiĝi kaj ne la malagrablan taskon esplori kaj recenzi, certe apenaŭ rimarkos ilin.

La libro estas tre bele eldonita kaj bonege bindita.

(y)

SANTANDER, Teritorio — Historio — Kutimoj — Monumentoj. Arangita, tradukita kaj verkita de Julio Mangada Rosenörn. Eldonita de Hispana Esperanto-Asocio dank' al monhelpo de la Nacia Patronaro por Turismo, Madrid, 1933. — 128. paĝoj.

Ni povas gratuli la Hispanan E. A. pro tiu ĉi valora gvidlibro tra la provinco Santander, prezentiganta antaŭ ni sur bona papero kaj per klara preso laŭ diversaj flankoj kaj kun multaj belaj bildoj, fotoj kaj desegnaĵoj. Sed estonte oni ne difektu recenzekzemplerojn per stampo kaj surskribo! Ĝi ne estas simpla gvidlibro, sed malfermas antaŭ ni la pejzaĝon, morojn, vivon, arton, literaturon, popolpoezian, kantarion en priskriboj kaj specimenoj. Ni promenas tra riveroj, super pitoreskaj pontoj, inter krudaj ŝtonegoj, ni vizitas altmontaron, urbojn, grotajn, marbordon, silentajn monaĥejojn kaj prahistoriajn signojn. Apud fremdultrafikaj kaj vojaĝaj sciigoj estas interesa la priskribo pri la vivo de la loĝantaro kun poemoj, muziknotoj. Ni ekkonas la verkistojn kaj artistojn de la provinco, legas detalajn sciigojn ankaŭ pri la Internacia Universitato. S-ano Rosenörn faris valoran kaj bonan laboron, la lingvo kaj stilo estas korekta, nur kelkloke la multaj konstrufakaj esprimoj malhelpas la fluan legadon. Mi trovis inter aliaj »ambiente«, kiu certe estu »ambono, galerio«. La vorton »lintelo« mi ne komprenas. »Partikulara« signifas certe »aparta, speciala«. Mi miras, ke en Hispanujo oni ĉaspafas ne nur leporojn, sed ankaŭ kuniklojn, kiuj ja estas dombestoj. En la frazo »La absido, kies volbo estas forna ...« mi ne komprenas la vorton »forna«, en Esperanto forno estas fajrujo. Eble la ĝusta vorto estus »fornika« (sinonimo de volba) — Ankaŭ la sufiksojn »ig« »ad« kelkloke oni trovas, laŭ mia opinio nenecese, ekzemple: rimarkiginde, enskribigo, graviĝadis, prosperadis, regadi, funkciado, gvidado. Sed ĉio ĉi ne ĝenas por deklari, ke la libro estas, kiel geografia, folkloraj kaj turisma gvidilo, perfekta, interesa, leginda, do rekomendinda. — P. B.

KIO ESTAS OOMOTO? 5-a eldono. Oomoto Centra Oficejo, Kameoka Kioto-hu, Japanujo. Prezo sv. fr. 1.— 96 paĝoj.

La konstantan progreson de la Oomoto-movado pravas, ke la populara kaj interesa priskribo pri ĝiaj ori-

gino, doktrino, instruoj kaj celadoj aperas pliampleksigite jam en la kvina eldono. Per la bonaspekta kaj bele presita libro ni ekkonas la lokojn, kie ekĝermis tiu ĉi nova religi-filozofia movado, la vivon de la gefondintoj, la ĉefajn instruojn la misteron de komuniko kun spiritoj kaj la organizon de la Oomotanoj. Skribante pri la libro »Fundamento de Animo« sur paĝo 112 de Literatura Mondo, jaro 1932, mi jam mallonge klarigis, kio estas Oomoto. La libro certe donas sciindajn detalojn, ĉar se oni fidus al la verkintoj, oni ekscios, ke ankaŭ nuntempe okazas »mirakloj« kaj la materialismo de la nuna mondo devos cedi iom post iom sian lokon al spiritualismo. La vortoj el la verkoj de la Majstro de Oomotanoj, *Onisabro Deguĉi*, estas profundsencaj kaj morale instruaj. Sed por eŭropanoj — kaj eble ankaŭ por aliaj legantoj — certe ne estas senkondiĉe akceptebla la aserto — neniam de Deguĉi mem, sed nur de liaj entuziasmaj adeptoj — ke li estas la Mond-Savanto, kion ili provas prui ankaŭ el antaŭdiroj de *Baha'u'llah*, profeto de la Bahaa Movado. Certe interesa estas lia multflankeco: li diktis jam 72 volumojn pri la spirita vivo, li eldonis naŭ volumojn kun siaj poemoj, ĉiuj po 450 paĝoj kaj 1000 poemoj, li verkis ankaŭ perpoeman esperanto-japanan vortaron, en kiu 4500 poemoj klarigas esperantaj vortojn en japana lingvo. Li estas artpentristo kaj desegnisto kaj amas ĉiujn kreaĵojn; per mirinda povo li eĉ sanigas malsanulojn. — La stilo estas generale bona, flua, certe zorge tralaborita, tamen kelkloke la vortoj ne sekvas unu la alian kun sufiĉa facileco, kio ja ne estas mirinda en verko parte filozofia. (Nedifinita artikolo ne ekzistas en Esperanto, do frazo, kiel: »En unu tre varma tago li marŝis ...« devus esti sen »unu«. —) Oomoto profetas havi la potencon ŝangi la nunan mondon. Pri tio ni ne povas diskuti, sed la ĉefajn devizojn kaj principojn povas akcepti ĉiu bonvola homo, kiu kredas pli Altan Forton kaj la progreson de la homaro. P. B.

ĈE LA PIEDOJ DE LA MAJSTRO DE ALCIONE (J. Krishnamurti) trad.: W. W. Mann. Paris, Esperantista Centra Librejo, 11 rue de Sèvres, 11, 1928. Prezo fr. fr. 3.— 64 p. Prezenta Parolo de A. P. Warrington. Antaŭparolo de Annie Besant. Decembro 1910.

Jen libreto, enhavanta la esencon de la moralaj instruoj de la teozofoj. Se oni konsideras, ke tiuj instruoj, — kaj ankaŭ tiuj de aliaj similaj movadoj, — la verkintoj donas sendepende unu de la alia, oni devas kun miro konstati, kiel egalas en ĉiuj la samaj moralaj, spiritalaj veroj. Jam tiu ĉi fakto devas logike prui, ke ne la hazardo kreis la vivon kaj speciale la homon sur la tero. Ĉar ne sciante unu pri la alia, el la fundo de la animo ĉiuj elĉerpas la saman altan moralon progresante al la bono kaj amo, helpemo kaj altruismo. Se la pensado estus simpla laboro de la cerbo, la homo povus pensadi nur en sia propra intereso, do egoiste, neante supran moralon, se tiu ĉi malhelpas lian propran bonfarton kaj plezuron. Sed eĉ tiuj, kiuj supraĵe tiel pensas, havas en sia animo germon pri pli alta moralo.

Multaj pensoj kaj instruoj de la libreto — laŭ konseso de Krishnamurti venintaj de la nevidebla Majstro, kiu lin spirite gvidas — estas troveblaj per aliaj vortoj en la instruoj de *Jesuo*. Mi eĉ kuraĝas la verketon kompari al la verko de *Kempis*: »La sekvado de Kristo«. Vere ĝi povas esti konstanta legaĵo por tiuj, kiuj ŝatas mediti, konscie pensadi, provi evoluigi sian animon. »Vi devas esti ĉiam milda kaj bonkora, modera kaj komplezema, lasante al la aliaj tiun saman liberecon, kiun vi bezonas por vi mem.« »Studu unue tion, kio al vi plej helpas helpi aliajn.« »Vi devas lerni esti entute vera, en penso,

parolo kaj ago ... ne pro la espero vidi la rezultaton, »ne pro rekompenco...« ... malbona penso... mem estas krimo.« — »Vi devas elporti vian karmon gaje, kia ajn ĝi estas.« Jen kelkaj pensoj kaj instruoj. Ĉu ni ne ekpensas pri la homo, kiu en sia vivo realigis — eble tute ne konante la doktrinojn de teozofio — tiujn ĉi noblajn instruojn: pri dro *Zamenhof*? — La stilo estas bona, flue legebla, la eldono zorga, la eksterajo plaĉa, la papero kaj preso la kutima de la Centra Presejo Esperantista en Parizo. En la klarigoj mankas io pri la »*Logos*«, uzita en la teksto, kvazaŭ ĝi estus en tiu ĉi formo esperanta vorto. —

Mi opinias la libreton perlo por ĉiuj profundsentaĵoj kaj profundpensaj kredantoj. P. B.

LA-SAMANTA -MUKHA-PARIVARTO aŭ Evangelio de Avalokiteŝvaro. Elsanskritigita kaj komparita kun ĉinlingva traduko de Kiuci Nohara. — Japana Budhana Ligo Esperantista 1933. 35 paĝoj.

Capitro el la Budhismo sankta skribaĵo, Saddharma-pundarika-sutro. Ĝi entenas virtojn kaj agojn de Bodhisatvo-Mahasatvo. Avalokiteŝvaro, reprezentanta la *sanktan amon*, superas eĉ aron da Budhoj. Kredo en li kaj adoro al li helpas la homojn en ĉiuj malhelpoj, atakoj, danĝeroj. Krom la Budhanojn ne estas verŝajne, ke la libreto interesus modernajn homojn, eble nur tiujn, kiuj okupiĝas pri kompara teologio kaj pri diversaj religifilozofiaj sistemoj. Tial eble ne estas riproĉinde, ke la traduko estas farita verŝajne laŭeble tro laŭvorte el la sanskrita originalo kaj el la ĉinlingva traduko. Pro tio ĝi estas ofte peza, eĉ nur pene komprenebla. Duoble uzataĵoj prepozicioj kelkloke ĝenas: »alkondukata al ekzekutejoj« »li ne subiros sub la reĝon de l' akvo« k. t. p.

Kion signifas »trimil grandmil mondoj«? Jen frazparto ». . . , amasaĵo de l' merito estas ne facile pereigonta en la daŭro de centmil-dekmilion-miriadoj *kalpoj*.« Ĉu vi tuj komprenas? Al demando: »Ĉu mi donu donacon?« la respondo estas: »Faru, se vi pensas esti ĝustatempe.« Ne estas klara, ĉu la donacado estas ĝustatempa aŭ la donacanto estas en ĝusta situacio, (tempo) por tiu ĉi ago. 11 paĝoj estas la sanskrita kaj ĉinlingva reproduktaj de la versa parto el la originalo. La paroloj de la sanktulo estis tiel efikaj, ke — mia langa lamas, sed legu la originalon: — »... okdekkvarmil vivantoj el la aŭskultantaro ricevis en la koron la senkomparan plejsuperan plenvekiĝecon.« La samon mi deziras al ĉiu pia leganto. P. B.

BES-A ADRESARO DE ESPERANTISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ. 1934. 12-a eldono. Prezo 1.— sv. fr. BES, Potštejn, Ĉeĥoslovakujo. — 108 paĝoj, inter ili 7 kun portretoj de anoncantoj.

Ĝi ne estas literatura libro, ni devas tamen laŭde menciigi ĝin, ĉar ni ne povas forgesi apud la literatura kaj lingva parto de nia lingvo la praktikan flankon, kiun plene kaj bone servas tiu ĉi adresaro, enhavante pli ol 1000 adresojn el ĉiuj mondpartoj. Diversaj profesioj deziras korespondi pri plej diversaj temoj. Menciinde estas, ke aparte estas signifaj, kiuj ĉiam respondos. Ĉu do la aliaj ne estas devigataj nepre respondi, almenaŭ unufoje? La oftaj ne respondoj laŭ propra sperto *seniluziigas multajn novajn esperantistojn*, kiuj pro tio forlasas la movadon. Oni devus publikigi sub *pilorio* la nerespondintojn. El la 1000 adresoj nur 22 deziras korespondi pri literaturaj temoj, kaj nur 14 estas redaktoroj kaj ĵurnalistoj. Kion laboras la »skribistoj«? 24 Esp. redaktoroj kaj 14 Esp. verkistoj troviĝas en la kajero. Nur sesono kolektas poŝtmarkojn. La adresaro estas valora kompletigo de la UEA-ĵarlibro, ĝi meritas la atenton de ĉiuj, kiuj serĉas daŭran interligon kun alilingva homfrato. P. B.

PETRO DANOV: LA NOVA EVO. Biblioteko Nova Kulturo. Tria Serio. 1. Burgas 1933. Atanas Nikolov, Sevlievo, Bulgarujo. 87 paĝoj prezo sv. fr. 1.50. Antaŭparolo de Georgi Radev.

Tiu ĉi kajero estas la triono de la serio pri *La Nova Evo*. Ĝi entenas tri predikojn de la bulgara »majstro« Danov. La unua temas pri la ĉefaj leĝoj de la Biblio: »Amu la Eternulon« kaj »Amu vian proksimulon«. La dua pri la baptado per akvo de Johano kaj pri la neceso dua baptado — en la animo. La tria pri necesa interna novnasko de la homo. Ĉiuj religiaj predikoj prezentigas en populara formo kun multaj profundaj veroj, kiuj grandparte baziĝas sur okultaj sciokaj. Tamen la prelegoj estas iom tro longaj. Ili eble volas simili la parolojn de Jesuo, ĉar multaj aferoj estas klarigitaj per ekzemploj. Sed mi pensas, ke la simpla popolo, por kiu tiuj — ofte ŝajne naivaj — paroloj estas direktitaj, ne povas sekvi la enhavon kaj pro la multaj interrompoj por klarigi dum la parolado kelkajn menciitajn vortojn kaj esprimojn, la aŭskultanto kaj la leganto forgesas, kio estis en la komenco. La kaŝitaj veroj perdiĝas en la amaso de ekzemploj kaj klarigoj. La samaj aferoj ŝajne estas tre ofte ripetitaj. Danov ofte deflankiĝas de la temo, enmetas temojn, ŝajne ne apartenantajn al la ĉefa, kvankam ĉiuj havas komunan interrilaton. La klarigoj ofte estas tre simplaj, ofte — eble parte pro la ne ĉiam perfekta traduko — ne bone kompreneblaj. La ĉefa enhavo por mi estis, ke oni devas pli alten levi la virinon el sia nuna stato, ĉar ŝi helpas savi — spirite — la mondon. (Jam en la Biblio estas profetaĵo, ke la virino subpremos la serpenton). Sed ankaŭ la viroj devas fariĝi — interne, en nobla senco — virinoj, kiuj naskas agojn por la eterneco. La celo estas: servi al aliaj, helpi, forviŝi larmojn, labori por la plibonigo de ni mem kaj de niaj proksimuloj.

Neniu rajtas vivi nur por si mem. Oni devas akordiĝi kun la Dieco: kun la plej altaj idealoj, por ke venu nova homo sur la teron.

Kelkaj pensoj estas notindaj (parte malnovaj veroj): »Kiu donas, tiu riĉiĝas.« »La valoro de la homo dependas de tio, ĉu li interesiĝas pri la Unua Kaŭzo de la aferoj.« »Lumaj personoj estas tiuj, kiuj konstante el-lasas lumon, t. e. ili senĉese donas.« »Vera lumo estas tiu, kiu donas vivon, kiu portas pacon kaj ĝojon al la homoj.« (Sed estas ankaŭ strangaj frazoj, kiel »Dio memoras la malbonon nur 100 jarojn.« »La malbonulo malbonodoras.« Danov eĉ ripetas la alvokojn de la feministoj kaj virinaj pacifistoj plej energie: »Estas unika forto, kiu povas nuligi la militon kaj enkonduki la pacon. La virino.«

El supraj ekzemploj oni povas konstati, kia estas la stilo de la libro. Tamen estas bedaŭrinde ankaŭ pli malbonaj partoj. Oni devus estontajn eldonojn iom kontroli antaŭ presado. Infinitivo estas uzata por ordona verbo: (... ke la homoj profiti la bonajn pensojn... »anstataŭ« ke la homoj profitu...)

En frazoj post »ke« la subjekto estas forlasita, (»ili opinias, ke estas asekuritaj«: ... ke ili estas asekuritaj.)

Simile post »sen« necesas »ke« (Tiam li elirados, sen iu lin rimarku: ... *sen tio*, ke iu lin rimarkos.)

Al mi ne plaĉas la uzo de *alies*, k. t. p. kiel pronomo.

La pronomo »sia« estas ofte ne uzata, kiam necesus.

Ofte estas uzata pasinta tempo anstataŭ kondiĉa modo kaj ofte *si* estas uzata anstataŭ »unu la alian«, kio povas eĉ kaŭzi miskomprenon. (»ni devas ami *nin*« anstataŭ »ni devas ami *unu la alian*« »Perfortas *sin*« anstataŭ »perfortas *unu la alian*«. Pri Kain kaj Habel: »Ĉu eblas, ke du fratoj *sin* mortigu.«) Al mi ne plaĉas la uzo de »*ĉe*« anstataŭ »*al*«. La tradukinto ĉie uzas »*ĉe*«, kiam oni iras *al iu*, sed en tia okazo oni devus almenaŭ uzi kun akuzativo. (»Venis *ĉe* mi iu sinjoro.« »Iras *ĉe* ĝiaj deponejoj.« »Iu iras *ĉe* Dio.«) Kial »*Ĝiamu* Dion.« »*Ĝiamu* la proksimulon?« Ĉu nur komenci ami aŭ daŭre, ĉiam ami? »*Amu* Dion« sufiĉas kaj pli multon esprimus.

Alvoko pri Nova Krestomatio

La plej grava kaj valora verko de nia tuta literaturo, unua fonto de l' lingvo kaj skolo de perfekta Esperanta stilo, estas sendube nia

Fundamenta Krestomatio.

Eldonita de d-ro L. L. Zamenhof en la jaro 1904, ĝi enhavas la plej eminentajn literaturajojn de la unua epoko, lingvan ekzercaron, legendojn kaj rakontojn, popular-sciencajn artikolojn, artikolojn pri Esperanto, poeziojn. Ĝi estas ne nur legaĵo kaj lingva konsilanto de ĉiu bona Esperantisto, ĝi estas io pli: *fundamenta ŝtono sur la sojlo de nia literaturo.*

Car kun la momento de l' apero de la Fundamenta Krestomatio nia lingva evoluo kaj literatura produktado apenaŭ komenciĝis: nur tiam venis *la internacia periodo en la historio de Esperanto*; de tiam ĉiuj popoloj komencis kontribui al la komuna lingvo-trezoro kaj en nia de tiam konstante kreskanta gazetaro aperis en la daŭro de la laste pasintaj 30 jaroj (1904-1934) multaj juveloj laŭ lingvo kaj enhavo.

Kie oni povas ilin akiri, legi kaj ĝui?

Ho ve, ili ne estas aĉeteblaj. Ili kuŝas ankoraŭ disjetite kaj forgesite en la flavigantaj jarkolektoj de Esperantaj gazetoj (el kiuj multaj jam delonge ĉesigis sian aperadon), en antologioj elĉerpitaj, en ne plu reeldonitaj libroj kaj broŝuroj. Eta parto da ili troviĝas en la bibliotekoj de malnovaj Esperantaj kluboj.

Prezenti karakterizan elekton de la lingve, historie aŭ literature plej rimarkindaj verkaĵoj prozaj aŭ poeziaj, literaturaj aŭ sciencaj, originalaj aŭ traduktiaj el la lasta kvaronjarcento en unu 480-paĝa, ankoraŭ en 1935-a jaro aperonta volumo, estas la redaktora tasko de la subskribintoj. La titolo de la verko estas

Nova Krestomatio

de la lingvo Esperanto

Spegulo de ĝia lingva kaj literatura evoluo dum unu kvaronjarcento (1905-1930)

Ĝi estos digna historia kompletigo de nia unua *Fundamenta Krestomatio*, al kiu ĝi similos ankaŭ ek-

stere, per sia amplekso kaj arango de la tekstoj.

Ĝi estos inaŭgurata de »*Nova Ekzercaro*« enhavanta laŭ gramatika ordigo lingvajn ekzemplojn eliratajn *ekskluzive el la kompleta verkaro de d-ro Zamenhof* — de »Hamleto« ĝis »La Biblio« kaj »Originala Verkaro«.

El la du redaktoroj, kiuj ambaŭ partoprenis persone en la tuta Esperanta movado de l' lasta kvaronjarcento, transprenis la unua la redaktadon de l' materialo ĉefe el la vidpunkto de la *nomoj* de la merititaj pioniroj, literaturistoj kaj verkistoj tiuepokaj, la dua el la vidpunkto de la *verkaĵoj* ĉefe publikigindaj. La kunigo de ambaŭ labormetodoj donas kelkan garantion, ke neniu vere grava nomo, neniu vere eminenta verkaĵo estos preterlasita en la »Nova Krestomatio«.

Car nur per aktiva kunlaboro de l' tuta Esperantistaro kaj precipe per *kolektiva kunlaboro de spertaj longjaraj samideanoj* la granda kaj grava tasko povos esti perfekte solvita.

Al ili do ni turnas nin kun la sekvanta peto:

Bonvolu serĉi en la disponeblaj al vi bibliotekoj taŭgan materialon kaj komuniki al ni kun absendo de l' koncerna kontribuado kaj preciza font-indiko, kiu literaturajo — ĉu en prozo aŭ en poezio — devenanta el la nomita epoko, laŭ via opinio nepre meritas esti envicigita en la »Nova Krestomatio«.

*

Ĉiu samideano, kiu sendos al ni valoran, de ni uzotan materialon, ricevos senpage por la tuta jaro la bibliografian gazeton »Lingvo Libro« kaj post la apero la »Novan Krestomation« kun 40% rabato.

Ni estas certaj, ke pli ol ĉia premio kaj espero je rekompenco, la sola konscio kontribui por tiu grava kaj necesa historia verko, stimulos ĉiujn kompetentajn bonvolulojn akceli nian laboron.

D-ro Kolomano Kalocsay,
Budapest.

D-ro Emil Pfeffer,
Wien.

La materialon oni sendu al:

»Literatura Mondo« Budapest IX, Mester u. 53/V/5.
(por »Nova Krestomatio«)

Cu post »oni« ĝustas »ili« (»ke oni prenu tiom, kiom al ili estas necesa) »Plej« estas uzata anstataŭ pli (»Plej poste ili kulpigis« :pli poste. »Li koleriĝas kaj plej rezignas...«

Malĝusta estas la uzo de »al« anstataŭ »pri«. (»Vi miras al mia menso«, mi miras al la via.) Kion signifas »utinam« »linio-direktriso« »Jambo«?

Kion signifas: »Ne estas grave ekbrili la instruiteco de la homoj?« Eble estu: »Ne estas grave, ke ekbrulu la instruiteco...« »Kiam ricevos la leteron ĝis ŝia amiko...«?

Kial »fingringo« anstataŭ »fingroringo«.

Kelkloke la akuzativo ne estas ĝuste uzata (»Kion vi faras en la kavon?« »Unue ĝi devas ellerni en sian vivon la leĝon de la harmonio«.)

Preseraroj estas tre malmultaj. Mi eble iom tro detale recenzis, sed libro destinita por la popolo devas esti simpla, facila, gramatike korekta kaj komprenebla. La teksto mem jam donas sufiĉan penon, por kompreni la altajn pensojn. Ilin oni povus ofte pli simple, pli rekte esprimi kaj klarigi. P. B.

TIROLO-Aŭstrio — ilustrita faldprospekto — eld. Landesverkehrsamt für Tirol, Innsbruck — Bela propagandilo de bela regiono.

WAT IEDER VAN ESPERANTO WETEN MOET (Kion ĉiu devas scii pri E) broŝuro de G. P. de Bruin. Eldonejo: Federatie van arbeiders esperantisten, Amsterdam. 23 paĝoj, formato 19×12 cm. Prezo 0.05 nederl. guldenoj.

Tre belaspekta, bone redaktita kaj bonstila broŝuro pure en nederlanda lingvo pri esperanto, movado, organizacioj. Ĝi enhavas la jenajn ĉapitrojn: estiĝo, strukturo, gramatiko, evoluo, disvastiĝo, organizacioj kaj gazetaro, literaturo, kongresoj, esperanto en praktiko, esperanto en laboristaj medioj.

La aŭtoro, kvankam li estas laboristo-socialisto, plej objektivite pritraktas la burĝajn, eĉ la religiajn societojn. Ankaŭ la prievolua vidpunkto de l' aŭtoro estas laŭdinde sobra.

G. Karczag.

VERKOJ DE DRO NAKAMURA. Eldonis Japano Esperanto-Instituto. Sin' oĝaŭa-maĉi, Uŝigome. 104 pĝ. Formato 19×13 cm. Kun la portreto de l' aŭtoro.

La libro, enteninta verketojn kolektitajn de Dro Nakamura, iama patrono de l' japana E-a movado, estas eldonita kiel pia memoraĵo por la honoro de l' mortinta karmemora Maljunulo. Inter la verketoj ni trovas interesajn meteorologiajn kaj sismologiajn studojn, vastan konatigon de l' kalkulmaŝino Sorobano, krome paroladojn,

kiuj prezentas tre simpatian bildon pri la grandmerita mortinto, kaj rakontojn, versajne tradukadojn el ĉinaj klasikuloj, elspirantajn interesan orientan aeron.

La stilo estas bona. Citi la kelkajn lokojn, kiujn mi preferus alimaniere formitaj laŭ stilo, mi vere ne trovas oportuna, ĉar per mencio de malgravajoj mi ne volus esti kruda rompanto de la pie solena sento, kiu diktis al la Japana Instituto la noblan agon de l' eldono. (xy)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. — Hans Jakob. — Eldonis: U. E. A., Genève — 1933 — 11 paĝoj 11.5×16 — Historia skizo 1908 — 1933.

XIV. KONGRESO DE SAT VALENCIA, Hispanio, 3—8. VIII. 1934. Grandforma, bela, impresa, moderna afiŝo.

ESPERANTO KATALOGUS de Libro Servo F. L. E. N. Amsterdam-O. Postbus (O) 50. 40 paĝoj inkl. kovril. Holandlingva detala katalogo pri Esperantaj libroj, insignoj. Bone, travideble aranĝita, kun kelkaj ilustraĵoj pri libroj.

PRI LA POSTKONGRESO EN TALLIN Esperanto en Estonio. 5 paĝa flugfolio pri postkongreso 12—14. VIII. en Tallin post Stokholmo. La programo estas vere alloga.

TURISMI TEATAJA. Estonlingva turisma gazeto monata, januara numero 1934. La lasta paĝo estas Esperanto-rubriko. La presejo montris, ke per la duoblaj literoj oni povas presi esperante eĉ sen supersignoj. Tamen post »u« ekzemple en »almenauh« ne necesas la »h« litero, ĉiuj komprenos sen ĝil Teksto cetere korekta.

JARLIBRO 1933—1934. Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris, 23 rue Boyer. 1934 — 28 paĝoj — Enhavas adresojn de la SAT-perantoj.

FRATECO. Monata gazeto por Frateca Vivo, Atanas Nikolov, Sevlievo, Bulgarujo. (Por tuta jaro 1 sv. fr.) — 2 paĝa. Tiu ĉi gazeteto estas disvastigilo de la ideoj de »Blanka Frataro«, mistika, okultisma religia movado en Bulgarujo kaj precipe de la paroloj — ofte iom naivaj, tro populare tenataj — sed esence veraj de majstro Petro Danov. La movado — kaj la enhavo de la gazeto — iom similas al la japana »Oomoto«, nur ili ne pretendas — kiel la oomotanoj pri Majstro Degučĉi, — ke Majstro Danov estas la ĉefa Savanto de la Mondo. Tio estas bela trajto. — Stilo, teksto bona.

AL AUSTRIO — Prospekto — Steiner, Wien (Internacia Esperanto-Muzeo). Eldonis: Federacia Ministerio por Komercio kaj Trafiko, Varboficejo por fremdultrafiko, Wien I — 1934 — 22×10,2 — Senpaga — Riĉe ilustrita, faldebla folio, presita sur dika papero kaj enhavanta ta detalan geografian karton; eldonita okaze de la »Internacia Konferenco« en Wien.

WIEN KAJ NIEDERÖSTERREICH — ilustrita faldprospekto — eld. Komisiono por Fremdulfrakvento, Wien VII. — Bela taŭga propagandilo por fremduloj.

RICEVITAJ LIBROJ

PLENA VORTARO DE ESPERANTO — E. Grosjean Maupin, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien — Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris 20, Av. Gambetta 67 — 1934 — 511 p. — 15×20.5 cm.

LA TRAVIVAĴOJ DE LA BRAVA SOLDATO SVEJK DUM LA MONDMILITO — J. Hašek — J. Stadler — Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris 20, Av. Gambetta 67. — 1934 — 152 p. — 13×18.5. — Prezo: fr. fr.: 12.50 + 10% sendkostoj.

MEIROPOLITENO — Varankin — CK SEU Moskvo AMO DE TOOJUUROO kaj du aliaj teatraĵoj — Kan Kikuĉi — J. Simomura — Literatura Mondo, Budapest — 1934 — 88 p. — 13.5×20 — Prezo: svfr. 1.20 + 10% por senkostoj.

EL LA NOTLIBRO DE PRAKTIKA ESPERANTISTO — K. R. C. Sturmer — Literatura Mondo, Budapest — 1934 — 125 p. — 20×13.5 — Prezo: svfr. 2.50 + 10% sendkostoj.

SKIZOJ EL ESPERANTUJO — Franz Ulrich — Eldono de la Aŭtoro — 1933 — 32 paĝoj — 11.5×15. Prezo: Kr. ĉ. 4.50.

LINGVA KVARONHORO — Paul Nylén — Eld. Societo Esperanto, Stockholm — 1934 — 39 p. — 18.5×12 — sv. kr. 1.—.

PER KIO NI AMUZU NIN? — Rosenberg/Malmgren — Eld. Societo, Stockholm — 1934 — 39 p. — 18.5×12 — Prezo: sv. kr. 1.—.

TEATRA KORBO — J. Baghy. FOR LA VIANDON — V. Rákosi — Ladislao Spierer — Ant. Prazák, Jablonné n/O. — 1934 — 45 p. — 10.5×16 — Kč 5.—.

BASIC ENGLISH — C. K. Ogden — Dr. O. Vačadlo — Pokorný a spol., Brno — 1934 46 p. — 14.5×20.5 — Kč. 3.90.

PETRO — SAT Paris 20, Av. Gambetta 67 — 1934 — 112 p. — 12×17 — frfr. 6.— + 10% sendkostoj.

SKIZOJ PRI FILOZOFIO DE LA HOMA DIGNO Paul Gilles — E. Lanti — SAT Paris — 1934 — 148 p. — 13×19 — frfr. 12.— + 10% sendkostoj.

PERPOEMA VORTARO ESPERANTO—JAPANA — O. Degučĉi.

PRAKTIKA KONVERSACIO ESPERANTA — S. Inoue — Esperanto Propaganda Asocio Kameoka, Kiotohu — 1933.

ABSOLUTISMO — E. Lanti — SAT, Paris 20, Av. Gambetta 67 — 1934.

MIMI PINSON — A. de Musset — Rethel — Esperanta Instituto, Venlo; deponejo ĉe UEA, Genève — 1934.

MULTIPLIKA TABELARO — J. Rosenberg — Aŭtoro eldono, Tallinn — 1934.

EVANGELIO DE BELISMO volumo I—IX — Belisma-Koopera-Kulturejo — Okamoto Rikici.

Informoj al la membroj de AELA

Libroekspedo.

Kune kun tiu ĉi numero ni ekspedas al vi la verkojn nrojn 5 kaj 6 por 1934:

Engholm: Infanoj en Torento

Slonimski: Mia vojaĝo en Sovetio.

Diversaj informoj.

Car Lingvo-Libro proksima numero aperos nur en oktobro 1934. ni jam nun informas vin, ke

a) Cezaro de Jelusiĉ pro teknikaj kaŭzoj estos ekspedata nur en aŭgusto

b) kune kun Cezaro al la membroj, dezirantaj ricevi ekstervicajn librojn, ni sendos ekzempleron de la interesa verko:

T. Herzl: La juda ŝtato.

Detalojn kaj prezojn pri tiu libro ni sciigos al vi en aparta cirkulero.

c) La 8-a libro de la ĉijara serio Ĉeĥoslovaka Antologio aperos nur tre malfrue en decembro. Dume en oktobro aperos kiel la 7-a libro de 1934. du verkoj: Originala la novelaro de Hendrik Adamson, kies nomo estas bone konata antaŭ legantoj de Literatura Mondo kaj originala poemantologio de esperantistaj verkistoj, kiuj ĝis nun ne havas propran volumon de poemoj. La verkon redaktas K. Kalocsay kaj ĝi entenas la elektitajn poemojn de dekdu poetoj, ofte prezentataj sur la paĝoj de Literatura Mondo. La punkvaloro de la Adamson-novelaro estas 3, tiu de la poemaro 2.5 kaj ĝi estas libere ŝanĝebla ĝis 1-a de oktobro.

En la jaro 1933. ni dissendis al kelkaj centoj da bone konataj esperantistoj ekzempleron de Hungara Antologio por rigardi ĝin kaj ekzameni, ĉu ne estas inde alĝi al AELA. Samtempe ni petis, ke okaze de neplaĉo oni bonvole resendu la libron kaj je simpla poŝtkarta informo ni sendos la kostojn, kiom estas la resendo.

Tamen, malgraŭ OKFOJA perletero alvoko ankoraŭ kelkdek samideanoj nek respondis ion, nek resendis la libron. Eĉ troviĝis tia, kiu akceptis la antaŭsenditan monon por resendo, sed la libron retenis.

Ni nun sube presas la liston, kiuj ne bonvolis resendi je nia OKA letero la libron ĝis la 15-a de julio ĉijara. Ni esperas, ke dum la pasinta tuta jaro ili havis sufiĉe da

tempo por finlegi la libron kaj per tio sin kompensi por la vojo, kion ili havas de la loĝejo ĝis la poŝtoŝeĵo. Ni kredas, ke en la proksimaj tagoj post la dissendo de LIBRO-LINGVO (kiun numeron ni nun sendas en 6000 ekzempleroj) troviĝos amikoj de la nomitoj, kiuj lin atentigos pri tiu ĉi alvoko. Ni opinias absolute komprenebla, ke ni ricevos de ĉiuj nomitaj la libron kaj ke ili ne resendis ĝis nun nur, ĉar ĉiuj niaj ok leteroj survoje perdis. Tial ni nun havas nenion alian por diri krom tio, ke la resendon danke ni konfirmos sur la kolonoj de LINGVO-LIBRO kaj pri tiuj, kiuj malgraŭ ĉi tiu publika alvoko ne resendos la libron, ni presos alvokon ankaŭ en aliaj gazetoj kaj klopodos rehavigi al ni la libron per ĉiuj eblaj rimedoj. Ni scias, ke neniu intencas de ni forŝteli la libron kaj tial ni ricevos ilin plej baldaŭ. Jen la listo:

Listo de personoj neresendintaj la libron „Hungara Antologio“ kaj nerespondintaj je niaj 8 alvokoj

FRANCLANDO:

S-roj Bailly — Comte frères
Morbier (Jura)
S-ro Bérenguier Paul
Toulon
S-ino Bischel Juliette
Paris 9
S-ro Blanc Régis
Marseille
S-ro Dannemüller Charles
Annecy
S-ro Delanoue Georges
Levallois-Perret (Seine)
S-ro Disdier Léon
Gap (Hautes Alpes)
S-ro Domec Joseph
Arbis (Gironde)
S-ro Dru
St. Gratien (S. & O.)
S-ro Dupont J.
Trouville (Calvados)
S-ro Faucher Léon
Gap (Hautes Alpes)
S-ro Floret J. M.
Tarascon (B. d. Rhône)
S-ro Fur, Roger le
Le Havre
S-ro Guézéquel Guy
Embrun (Hautes Alpes)
S-ro Girard Maurice
La Rochelle
S-ro Hély Georges
Athis Mont (S. & O.)
S-ro Janvier Léon
Oyonnax (Ain)
S-ro Kawada Sangi
Paris 15
S-ro Lamant Louis
Limoges
F-ino Lapp L.
Pont de Beauvoisin (Savoie)
S-ro Lécuru Paul
Compiègne
F-ino Lique Hélène
St. Maur La Varenne (Seine)
S-ro Llech Jean
Perpignan (Pyr. Or.)
S-ro Maillard Gaston
L'Hay les Roses (Seine)
S-ro Mielle Marcel
Radonvilliers (Aube)
S-ro Moussier André
Vienne (Isere)

S-ino Niel Jeanne
Cagnes sur Mer
S-ro Petit André
Paris 12
S-ro Philippe
Arras
S-ro Pion Joseph
Sallanches (Haute Savoie)
S-ro Poumureau Edmond
Mainxe (Charente)
S-ro Tison Emile
Thomery (Seine et Marne)
F-ino Tissot-Dupont E.
Vernaison (Rhône)
S-ro Roche P.
Fleury les Aubrais (Orléans)

S-ro Soudan
Cheddes (Haute Savoie)
S-ro Dardel Jean
Aix les Bains

NEDERLANDO:

S-ro Beus Otto de
Culemborg
S-ro Boltjes E.
Winschoten
S-ro Heilker P.
Hoofddorp
S-ro Jonge H. de
Bergen op Zoom
S-ro Jonker S.
Drieberg
S-ro Kaastra D.
Huizum
F-ino Kloet T. van der
Breda
S-ro Kwak L. A. J.
Nijmegen
S-ro Lepper H. de
Nijmegen
S-ro Middag A.
Giessendam
S-rino Muller N.
Zeist
S-ro Roskes C. W. M.
Breda
S-ro Schuphoven
Winschoten
F-ino Simonis D.
Schiedam
S-ro Vrakking T. H.
s' Hertogenbosch
S-ro Weerd H. van der
Bergen op Zoom

S-ro Weijts L.
Gendt
S-ro Wolterbeek A. J. J.
Breda

GERMANUJO:

S-ro Eberler Otto
Berlin
S-ro Heidenfeld Joachim
Berlin — Schöneberg
F-ino Margot Rudolf
Berlin — Baumschulweg
S-ro Schiff Ludwig
Berlin

SVEDLANDO:

S-ro Andersson Harry
Nol
S-ro Bannbers Ola
Stockholm
S-ro Ericsson Eric
Uppsala
S-ro Eriksson Otto
Frösthult
S-ro Hällén Bror
Uppsala
S-ro Hällstg K. E.
Skövde
F-ino Hemberg Hanna
Stockholm
S-ro Holm Axel A.
Arlöv
S-ro Hultén K. A.
Hästveda
S-ro Kyrning Stig
Stockholm
S-ro Larson A.
Appelwiken
S-ro Larsson Knut
Kävlinge
F-ino Lindhal Margareta
Jönköping
S-ro Lindstedt Herbert
Jönköping
S-ro Olsson Adolf
Lysekil
S-ro Skog Narald
Ystad
S-ro Svensson Bror
Jönköping
Skara
S-ro Torgny E. G.

Al kelkaj membroj.

Vi skribas, ke vi ne povas, eĉ iuj, ke ne volas pagi la kotizon por 1934. Ni volas al vi ĉi tie per afablaj vortoj klarigi, kial ni ne povas akcepti vian deklaron. Nome ni faris duflankan kontrakton: Ni kontraktis liveri por via kotizo certan nombron da libroj. Ni plenumis la kontrakton. Vi kontraktis krom pagi la kotizon, ankaŭ informi nin pri via eksigo, okaze se vi ne volas esti membro en 1934. plej malfrue antaŭ 1. oktobro 1933. Tamen, ni propravole plilongigis tiun tempon tri monatojn, ni

atentigis vin dufoje, anstataŭ unufoje, laŭ nia kontrakto. Neanoncante vian eksigon, vi ebligis al ni fari kalkulon por 1934. en kiu rolis sur la enspezo-flanko ankaŭ via kotizo. Se ni rezignus pri tiu via kotizo, ni ne nur rompus la kontrakton kun niaj aliaj membroj, al kiuj ni promesis, ke ĉiu havas egalajn rajtojn kaj devojn, sed ankaŭ mankus grava monsumo. Se pro tiu manko ni ne povus iel plenumi nian programon en 1934. la pagintaj membroj rajte nin nomus friponoj kaj vi pravigus eble vian nepagon per tio, ke »mi ja ne pagis, ĉar mi ne volis perdi«.

Ni akceptis la devojn, kiujn ni plenumas, malgraŭ tio, ke ni bone konis la krizan situacion. Ni plenumas niajn promesojn honeste, malgraŭ tio, ke la situacio eĉ pli malboniĝis. Ne estas do aŭa eblo por vi, ol plenumi VIAN DEVON same honeste, kiel ni plenumas tiujn al vi. Tiun devoplenumon ni bedaŭrinde estas devigataj ne nur peti, sed eĉ postuli de vi. Ni esperas, ke apartaj procedoj ne estas necesaj. Vi rajtas eĉ tiuj diri, ke vi ne plu volas esti membro en 1935, sed la kotizo por 1934. Iau kontraktito estas pagota kaj ni neniel preteriras la postulon kaj enkasigon de tiuj kotizoj.

Ni esperas, ke vi absolute komprenas niajn motivojn, same kiel ni komprenas viajn motivojn, se vi eksigas por 1935, ĉar vi ne plu navas monon, aŭ unas ne navi mon en tiu jaro.

Kun salutoj viaj

AELA

MALALTIĜO DE LA KOTIZO!

ELDONO DE FLURAJ SERIOJ!

Estos la tria jaro, ke funkcias nia organizo. Ĝis nun ĝi ne nur plenumas la esperojn kaj montrigis inda je la ludo de la samideanoj, sed ĝi farigis la plej granda granda hidroedona centro. Per ĝia sistemo farigis ebla eldoni librojn, kiaj estas inter aliaj Enciklopedio de Esperanto. La komedio de Dante, hungara Antologio, Hecker Artistorio, Ĉeĥoslovaka Antologio. Estas pruvite, ke la esperantistoj tamen ankoraŭ ĉiam povas subteni seriozan hidroedonon agadon.

En la tria jaro ni kuraĝas iri antaŭen pluan paŝon. Ni malaltigos la kotizon, eldonos pli da libroj kaj simpligos la regularon.

1. La fundamenta kotizo, pagota de membroj, pagintaj antaŭ 1-februaro kune kun sendkostoj estos svfr. 10.— Tiu kotizo prialtigas al 11.— respektive 12.— frankoj, se la membro pagas la kotizon antaŭ la 1-a de junio aŭ 1-a de decembro, por brosuritaj libroj.

2. Por tiu kotizo la membro rajtas ricevi unu serion el la tri eldonotaj dum 1935., kies pagonombro varias inter 1000—1300 paĝoj lau la speco de la libroj, kaj formato 13.5×20 cm. Se la formato estas pli granda, la pagonombro malaltiĝas. Same malpliigas la paĝojn ilustrita volumo.

3. Ĉiu membro rajtas pagi ankaŭ du aŭ tri seriojn kun diversa enhavo. En la okazo, se la membro pagas pli ol unu serion, li ricevas du seriojn por 19.—, tri seriojn por 27.— sv. fr. Por pagantoj post 1. februaro proporcie pli multa.

4. La kotizo estas pagebla ankaŭ en partoj. Minimuma partopago 5.— svfr. En okazo de partopagoj la kotizo estos kalkulata kiel pago en la dato de lasta partopago. Do pagante la lastan kotizparton post 1-a de julio, estos kalkulata la kotizo de 12.— frsv.

5. Ĉiu nova membro rajtos pagi kotizojn ankaŭ por la antaŭaj jaroj. La kotizo por la libroj 1933. afrankite estos 35.— svfr., tiu por la libroj 1934. estos 30.— frsv., ĉiuj serioj de 1935. en la postaj jaroj kostoj 18.— svfr. En tiuj kotizoj la ekstericaj libroj de 1933 kaj 1934. ne estas enkalkulitaj.

6. Ekde 1935. ne estos eldonitaj ekstericaj libroj.

7. Ĉar en ĉiu serio estos maksimume 4—5 sam-specaj libroj, ankaŭ la ŝanĝrajto de la membro ĉesos.

8. En neniu serio estos envicigitaj jam aperintaj libroj (krom eblaj reeldonoj de jam delonge elĉerpitaj libroj, kiel ekz. *Cu li de Vallienne*)

9. Krom la supraj rajtoj ĉiu membro rajtos aĉeti po unu ekzemplero el la jam aperintaj libroj per rabato de 40%.

10. Ĉiu rajtas preni apartan malmolan bindon por tuta serio.

Por ĉiu serio kostos la bindo tiomfoje 1.— svfr. kiom da volumoj la serio entenas.

11. Rekomendo por ĉiu sendaĵo kostas 0.50 svfr.

12. Ĉiuj aliaj ĉi tie ne menciitaj punktoj el la malnova regularo restas validaj.

Listo de la tri serioj, eldonotaj en 1935.

ARTA, SCIENCA:

PRIVAT: *Interpopola paco* 200 pg. Originala prezo 5.— fr.

HEKLER: *Arthistorio vol. II.* Prezo de la hungara eldono 12.— svfr.

VAN LOON: *Rigardu la teron*, trad. de G. Saville, tradukinto de la Fera kalkanumo kaj Jimmi Higgins.

La verko estas tre sprita ekonomia geografo, kun multaj ilustraĵoj tute originalaj. La stilo ĝin montras ne seka scienca legaĵo, sed kvazaŭ majstre verkita romano pri la tero kaj ĝiaj logantoj. La verko de la nederlanda verkisto aperis ĝis nun en proksimume 20 lingvoj. Prezo de la eldono germana 20.—

La tri bonegaj libroj, kies originalaj prezoj estas sen sendkostoj 37.— frankoj, kostos 10.— frankojn KUN SENDKOSTOJ en la Esperanta eldono, se vi pagas vian kotizon al AELA antaŭ 1. februaro 1935.

LINGVA

PFEFFER—KALOCSAY: *Nova Krestomatio* 480 paĝa.

Pri la verko vi trovas detalojn en la nuna numero de Lingvo-Libro. Ĝi estos grandioza legobro, nepre necesa por ĉiu lernemulo.

2. KALOCSAY—WARINGHIEN: *Plena Esperantogramatiko, vortfarado, sintakso, kun plenaj klarigoj pri la prefiksoj, sufiksoj esperantaj.* La plej detala gramatiko kaj instrulibro en Esperanto, ĝis nun eldonita. Proksimume 400 paĝa.

3. EUGEN WÜSTER—E. PFEFFER: *Esperanto, kiel normolingvo por elektoscienco.* En ĉi tiu verko nia konata vortaristo vicigis tian amason da argumentoj pri la uzo de nia lingvo en la scienco, ke ĉi tiu libro farigis nepre necesa manlibro de serioza propagandisto. La malgrandigita, ducentpaĝa eldono kostas en la germana lingvo 11.— svisajn frankojn sen sendkostoj.

4. PETRO STOJAN: *Evoluo de Esperanto* ĉ. 150 paĝa.

La libro enhavas interesegajn pensojn pri nia lingvo kaj ĝiaj uzantoj.

La kvar libroj kostos aparte aĉetataj proksimume 30.— svfr. afrankita. La serio kostas 10.— svfr., same kiel la supra.

BELETRISTIKA

4—5 libroj, entute 1300 paĝoj formato 13.5×20 cm, aŭ malpli da paĝoj kun pli granda formato el la jenaj libroj:

POLA ANTOLOGIO,

JEROME K. JEROME: *Tri homoj en boato*

VALLIENNE: *Ĉu li?*

STRINDBERG: *Historiaj monografioj*

KÖRMENDY: *Aventuro de Budapest*

LEWIS SINCLAIR: *Arrowsmith*

AXEL MUNTHE: *Romano de San Michele*

STEFAN ZWEIG: *Amok*

GAILIT: *La perloserĉanto*

Originalaj noveloj de JAKOB SAPIRO

El la verda Biblio de I. LEJZEROWICZ

Originalaj romanoj de H. WEINHENGST kaj F. SZILÁGYI.

Tradukantoj la plej konataj esperantistoj-tradukistoj. Ankaŭ el la supra listo 1300 paĝoj kostos 10.— svfr. afrankite.

Ni kredas, ke tiu ŝanĝo plene gajnos vian plaĉon. La definitivan titolon — precipe ĉe beletristikaj verkoj — ni publikigos en la sekva numero de LINGVO-LIBRO. Ni notu, ke via ĉijara membreco — se vi ne eksigos ĝis 1. okt. — vin devigas nur por la pago de unu serio.

Ni volonte vidos eventualajn rimarkojn de ĉiuj amikoj por ankoraŭ plibonigi la organizon.

A. E. L. A.

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mes-
ter-utca 53. V. 5. Hungarujo.
Aparte aĉetebla. Unu numero
kostas 0,20 sv. fr. aŭ egalvaloron.
Tri numeroj kune ekspedataj
kostas nur 0,30 sv. fr. aŭ
aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare Nro • 4. 1934

La nova Plena Vortaro *

Gojo kaj funebro alternas en mi, kiam mi fo-
liumas la duan eldonon de la trezorvalora Plena Vor-
taro. Gojo, ĉar nia granda leksikografo E. Grosjean-
Maupin finis la tralaboron de sia grandsignifa verko,
ĝin poluris, perfektigis, kompletigis kaj el la kruda
juvelŝtono de la unua eldono li faris brilan juvelon,
kies facetoj respiegulas al ni la tutan vivantan lingvon.
Funebro, ĉar tiun trezoron li postlasis al ni kiel sian
testamenton, ne povante ĝisvivi ĝian aperon. Li heredi-
gis al ni sian grandan vivo-verkon, sed li mem forpasis,
kaj lasis post si malplenan, kiu ĝis nun ŝajnas tute
nekompansebla.

Ni skribis en la recenzo pri la unua eldono:
»Vere, oni povas kelkloke legi la Vortaron kvazaŭ
interesan lingvan studon pri la ĝusta kaj larĝa uzo
de ĝi aŭ alia elasta vorto, La fleksebleco kaj esprim-
riĉeco de nia lingvo ree montriĝas mirinde en la mult-
kolora esprimaro. Oni povas klare rekoni, ke ni jam
havas mirindan instrumenton en nia lingvo, oni ĝin
devas nur bone koni kaj lerte uzi. Kaj por ĉio ĉi jen
oni havas bonegan gvidanton en tiu ĉi libro.«

Tiuj vortoj ankoraŭ pli trafe taŭgas pri la dua
eldono. Ĝi ne estas simpla »dua eldono«, sed estas
tralaborita plene kaj zorgege, kompletigita kaj pliriĉ-
igita admirinde. Precipe la zamenhofa lingvouzo estas
eksplicitaj per ekzemploj, ke tio forigas ĉian dubon.
estas precizege klarigita la ĝusta kaj ofte plurflanka
uzebleco de ĉiu vorto. Tiuj ekzemploj estas plejparte
zamenhofaj, tiel ke la tuta zamenhofa lingvo-uzo estas
tie fiksita, registrita, alirebligita por ĉiu per tre mal-
multa peno. La uzo de la prepozicioj estas tiel klare
eksplicitaj per ekzemploj, ke tio forigas ĉian dubon.
Sagaj rimarkoj lumigas lingvajn problemojn. Nekonsi-
lindajn formojn kaj esprimojn markas speciala signo.
La libro devas esti vere la brevierio de ĉiu esperantisto,
kiu detale kaj konscienco volas okupiĝi pri la lingvo,
kaj neniam povas iĝi bona verkisto sen la diligenta
studado kaj ĉiutaga foliumado de tiu ĉi trezoro.

Gravega estas la signifo de la verko por la fikso
de la literatura vortprovizo. Ĉi-riate niaj lingvaj Insti-
tucioj troviĝas en ne malgranda embaraso. Tiu vigla
literatura vivo, kiu en la lasta jardeko ekfloris en nia
lingvo, kunportis abundon da novaj vortoj, tiel ke la
oficialigota vorto-stoko ŝvelis en grandegan amason
de vortoj. Oficialigi ilin ĉiujn oni ne povas pro la
persista kontraŭstaro de konservativaj elementoj (oni
ja memoras pri la granda disputo, kiu eksplodis pri

la oficialigo de nura parteto de ili), sed aliflanke oni
ne povas ilin neniigi, nei aŭ prisilenti, ĉar ili ja estas
ĉiutage uzataj en libroj, gazetoj, revuoj, kaj apartenas
same tiom al la vivanta lingvo, kiom la vortoj oficialaj.
Nu, la Plena Vortaro helpas pri tiu embaraso; en ĝi
tiuj vortoj estas registritaj, fiksataj, elserĉeblaj. Mi
kredas, ke de nun la Akademio devus tute ĉesigi la
pluan oficialigadon, ĝi povas ja toleri tiujn »duon-
oficialajn« vortojn, kaj ĝisatendi, ĝis la rajto de kutimo
donos al ili la plenan karakteron de ĝeneraleco. La
plej granda avantaĝo (kaj ĉefa motivo) de oficialigo,
nome la unueca uzo, ja estas garantiata per tia inter-
nacia registrado.

La dua eldono enhavas plurajn vortojn novajn,
kiuj mankis en la unua eldono: altruismo, beata, cen-
tafo, damni, elo, erudi (erudito), erupti, evento, falto,
fatamorgano, gimnasto, incendio, janiĉaro, kampanjo,
kimono, kiosko, koheri, koaguli (pli bona estus koagli),
konjunkturo, libido, majonezo, mapo, masakri, mest-
tizo, miraĝo, monitoro, mulato, nano, nervoza, nocio,
plejdo, rakedo, rara, rekvieto, relikvo, remizo, ruŝo,
sakri, sekestri, siesto, situo, skolto, sledo, slojdo, snobo,
staplo, stoko, stompi, stumbli, suplemento, ŝagrino,
ŝminki, taŭro, telepatio, tiktako, tranco, zeloto ktp.
Kiel oni vidas, temas precipe pri sufiĉe ofte uzataj
(parte zamenhofaj) vortoj. Mankas tamen kelkaj vortoj,
kiuj estas same ofte uzataj; mi mencias nur: nababo,
jubili, mesaĝo, pakto, reflekso, uzino, vagabondo, vol-
uto. Ankaŭ *trista* ŝajnas al mi almenaŭ tiel necesa kiel
la (oficiala) *stulta*. Aliparte mi trovas nenecesaj la (kvankam
zamenhofajn) *gentlemano* (gentilhomino) kaj *ŝlako*
(*ŝtorio*; same zamenhofa kaj multe pli uzata). Ne pla-
ĉas al mi *damaĝi*; tiu unuilitera diferenco inter ĝi kaj
domaĝi ŝajnas al mi erariga. Mi proponus preferi *noci*
(Grabowski), aŭ la vorton *domaĝumi*. Se oni registras
la du formojn *klaŭstro* kaj *klostro*, kial ne doni al la
lasta la sencan *monaĥejo*? Anstataŭ *razeno* mi preferus
gazono (Grabowski), anstataŭ *grapolo* la vorton *traŭbo*.
Se enestas *deltoido*, devus enesti ankaŭ *bicepso*. Ansta-
taŭ *prestidigitoro* pli taŭgas *prestidigiti* kaj *prestidigi-
tisto*. Ĉe *genro* mankas, ke ĝi signifas ankaŭ specon
de pentraĵo. *Sinkopo* havas ankaŭ sencan muzikan. Mi
bedaŭras, ke oni forigis la mallongan formon *sponta*
(spontanea). *Stigmo* havas ne nur botanikan signifon,
sed signas ankaŭ markon sur korpo (stigmo de sankt-
tuloj). *Limbo* signifas ankaŭ la lokon de nebaptitaj
senpekuloj en la infero. Anstataŭ *konkubino* pli taŭgas
konkubulino, ĉar tiel oni havas ankaŭ la vorton *kon-
kubo*. La vorto *difterio* estas elmodiĝinta en la medi-
cino, oni diras: *difterio*. Anstataŭ *dumpingo* pli kon-
venus la verbo *dumpi* (kial la angla sufikso?). Mi pre-

*Verkita de Prof. E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S.
Grenkamp-Kornfeld, Prof. G. Waringhien. Eldono de
SAT, Paris 20. 67. Avenue Gambetta. Prezo: bind. 60.—
fr. fr. plus sendkostoj.

REVUO DE REVUOJ

— G. Karczag —

La revuorecenzisto estas baldaŭ tedata de sia profesio. Li elĉerpas baldaŭ la epitetojn uzeblajn, kaj kun iom da honto li ripetas ilin refoje kaj refoje. Tial mi decidis, ke mi ne plu tenos min al la ĝisnuna maniero de recenzo. Mi ĉesos aparte raportoj pri gazetoj kaj revuoj; mi menciigos nur rimarkindajn artikolojn kaj literaturajojn, ilin konigante, interpretante, taksante. Tiel mi havos pli multe da loko por tio kaj certe ankaŭ la legantoj estos pli kontentaj.

Sed, por ne fari tiel grandan ŝanĝon dum la kurenta jaro, mi aplikos tiun metodon nur ekde la sekvanta numero, kiu aperos jam en 1935. Por la hodiaŭa okazo mi prenos el mia sako la malnovajn epitetojn, klopodos ilin iom poluri kaj ciri, kaj aplikos ilin al la gazetoj ĉi jare ankoraŭ ne preparolitaj, aŭ antaŭlonge menciitaj.

Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista distingiĝas per preso kaj aspekto. La stilo ĝenerale estas tre bona; s-ro Sirk direkte modelas en sia traduko »La kurbigita mondo«.

Flandra Esperantisto, tre bone redaktita. Troestimo de l' akuzativo estas frapanta. Post »kiel« senindulge sekvas akuzativo, ĉu necese, ĉu ne.

Belga Esperantisto enhavas ĉefe movadajn informojn. La literatura parto estas malgranda — ofte tute mankas — sed kontentiga kaj de nivelo alta. La traduko de s-ro Jaumotte pri la Rodenbach-poemo »La vivo de l' ĉambroj« (oktobra numero) estas sukcesa.

Franca Esperantisto estas tre distra legaĵo. La ĉefartikoloj de s-ro Couteaux ĉiam estas interesaj kaj aktualaj. En leginda kaj imitinda maniero ili plenumas duoblan taskon: levi la intereso-nivelon de l' gazeto kaj pritrakti la planojn, farotajojn, sukcesojn de niaj francaj samideanoj. Ligi agrablon kun utilo: jen dankema, sed malfacilega tasko; tamen ĝia solvo en la manoj de s-ro Couteaux estas perfekta.

Ne necesas prezenti al la legantoj d-ron Corret, kies gramatikaj skribaĵoj meritas nepran atenton. Ankaŭ liaj novaj kajeretoj de titolo: »Zamenhofa Esperanto« rekomendeblas al lernemuloj. Oni povus diri, ke en tiuj artikoloj temas pri tro simplaj, memkompreneblaj aferoj, kiujn klarigas ĉiu bona lernolibro, sed la sperto montras, ke ne estas superflue pri ili speciale atentigi.

La informoj kaj sugestoj de s-ro Wariughien pri la instruaj aferoj estas pleje observindaj kaj pripensindaj ankaŭ de nefrancoj.

La bonhumoraj artikoloj de l' simpatia piratsipestro Raymond Schwartz (kiu en la kolonoj de Franca Esperantisto escepte dejoras civile) estas kutime spritaj kaj menciindas precipe pro la senriproĉe bonega stilo, kiu distingas ĉiujn liajn verkojn. Eble ĉe neniu esperanta prozisto mi trovis la lingvon tiel viva kaj natura, kiel ĉe

Schwartz. La atendanta ankoraŭ sian naskigon granda literaturhistorio Esperanta certe rekonos liajn ĉi-rilatajn meriteginojn.

Sennacieca Revuo publikigas en sia aŭgusto-septembra numero tre interesan artikolon: »Alkoholo kaj preĝado«. En la sama numero la sceno el la libro »La malamo« de H. Mann estas tre frapanta legaĵo. Objektiva recenzo pri la nove aperinta Sturmer-libro. (Objektivaj kritikoj tiel maloftiĝis en nia literaturo, ke ili devas esti aparte menciitaj). Oktobre mi legis interesan raporton pri Leningrada vojago kaj mallongan recenzon pri Enciklopedio de Esperanto.

Laborista Esperantisto enhavas plejparte movad-rilatajn novaĵojn, tamen la konstanta rubriko »Ons Taalblad« estas leginda por ĉiuj, kiuj komprenas la nederlandan lingvon.

Proleta Literaturo eliris en junio sub redaktado de Mihalski kaj Bourguignon. Pluajn numerojn mi ne vidis. Ke R. Rolland kaj H. Barbusse akceptis honoran komitatanecan, tio estas aparte menciinda fakto.

Uŝe-Eho prezentas agrablan surprizon al la leganto. La stilo tute senriproĉa. La inteligenta artikolo de s-ro J. Csapó: »Ni diferencigu ankaŭ sur lingva kampo« (junio) estas leginda, same kiel la septembra artikolo »Kakemomo, tokonomo...«

En *Danske Esperantist* post multpromesaj esperantaj titoloj ĉiam sekvas pure danaj tekstoj. Tial mi havis malmultan plezuron pri ĝi.

La Juna Vivo (dusemajna organo por la junularo) eliras depost 1. de julio en Nederlando. Laŭ la programo ĝi servas por junuloj de 7—16 jaroj. Mi kredas, tamen, ke la gazeto taŭgas maksimume por 10-jaruloj, sed por tiuj — tre bone. La kvanto de la ekzempleroj — 7000 — estas mirinde granda kaj atestas pri granda fido de la eldonejo.

Internacia Pedagogia Revuo de kiam ĝia redaktado transiris en nederlandajn manojn, evoluis rimarkinde. La tradukita parto el la libro: »The great offensive« de M. Hindus »Lernejoj en Sovetunio« estas tre interesa kaj riĉa je informoj.

Internacia Polica Bulteno raportas pri faka movado. Se mi rajte povas juĝi pri tia faka gazeto, kies fakon mi tute ne komprenas, mi diras, ke la gazeto estas lerte redaktita kaj riĉenhava.

La Praktiko: tre bela aspekto, bonegaj ilustraĵoj, multe da interesa legaĵo. La facile komprenebla stilo igas ĝin tre rekomendinda al komencantoj; la instruplena kaj distra teksto ankaŭ al malnovaj esperantistoj.

La Semanto (monata gazeto de svisaj laboristaj esperantistoj) hektografita sur entute du paĝoj. Tial oni ne povas multon pretendi. La stilo bona. Interese, ke la

ferus la *formojn* bakhanalo (bakanalo), *Bakho* (Bako), *budhismo* (budaismo), *bullo* (z) (buleo); neniu uzas *eskludi* kaj *eskuzi*. Tre mankas *brutto* (z) kaj *regatto* (z), krome *kokko* (coccus). Zamenhof uzis *villo*, ne *vilao*. *Sero* kaj *serumo* havas la saman sencan, kaj neniam ĝi signifas vakcinon aŭ artefaritan medikamenton, sed ĉiam nur *seron* de aktive imunizitaj bestoj, uzatan por kuracado. *Ganglio* ne signifas limfoglandojn, nur nervoplektaĵon.

Goje mi vidis plurajn korektojn: *empiemo* (anst. enpiemo), *pario* (anst. pariao), la korektitan difinon de *gapi*, la distingon sencan inter *sugesti* kaj *sugestia*.

ŝoforo anst. *ŝofero* (sed prefere aŭtisto), la forlason de la 3. senco de JA, *prostituitino* (anst. prostituistino), *dubasenca* (anst. dubesenca), *sama kiel* (anst. sama ol), la ŝanĝitan pritrakton de KVAZAU ktp. ktp.

Ke en tiel granda verko, oni povas trovi nur la suprajn malmultajn kaj negravajn neaprobeblaĵojn, tio plej bone montras tiun grandan, zorgan, konsciencan laboron, kiun E. Grosjean-Maupin kaj liaj kunlaborantoj dediĉis al tiu ĉi unike valora libro. E-o havas sian vortaron, riĉan, konfidindan, grandiozan. Tio estas unu el la plej grandaj kaj goĝigaj eventoj de nia postmilita movado.

Modelo de kritikoj

Objektiva kritiko? Ba! Elmodiĝinta ŝimaĝo! Kritikisto devas montri sian animon. Se tiu animo estas nigra, tio ne gravas; ĉiu povas montri nur tian animon, kian li havas.

Mi insiste avertas ĉiujn verkistojn, ke en tumulto ili paŝadu singardege. Kiu scias? eble ili tretos hazarde sur kalan piedfingron de kolombgala kritikisto, kaj poste, se ili riskas verki libron, ili havos ja surprizon! Jes, ili eble ricevos tian recenzon, kia estas la suba, kiun ni interpretas iom libere laŭ la originalo legebla de ĉiuj en la lasta (oktobra) numero de la FOTOMOTO INTERNACIA.

Jen, legu, kia estas io, kio estas, laŭ la FOTOMOTO, Literatura Kritiko.

MOTKRIBRO DE TAKTIKA VESPERKANTISTO de T. B. C. *Tempester*. 128 pg., prezo svfr. ktp.

Mi vokas al la konscienco de l' mondo, al la ostoj de niaj karmemoraj pioniroj, al la Ligo de Nacioj, al ĉiuj Saloficejoj de la terglobo, al la tuta mizere baraktanta homaro kaj homaranaro, al la Domo de la Homaro, al ĉiuj, kiel oni diras angle, *everybody*. Mi alvokas, alkrias, alhurlas ilin, ke ili indignu kaj protestu kontraŭ la neeldirebla honto kaj abomena krimo kaj satana animmurdo kaj malnobla malhonoro kaj apokalipsa abomeno, kiu frapis ilin alvange kaj kiu minacas pereigi nian kulturon verdan kaj malverdan, la pacon de la mondo kaj niajn esperojn je pli bela estonteco. Miaj haroj starigas, frosto trakuras mian spinon, kiam mi eldiras la apenaŭ eldireblan naŭzajon: aperis fiega filibro el la malpura kaj malnobla plumo de la kretena fripono T. B. C. *Tempester*. Ve, ke troviĝis papero, kiu toleris sian malpurigon; eldonejo kulpega, kiu akceptis; kompostisto, kiu kompostis; maŝino, kiu malice presis, bindisto, kiu aŭdacis bindi ĉi tiun aglomeraĵon de koto, muko kaj puso.

Por montri la senfundan kaj nesondeblan maron da malico, malnoblo, malpio, malhonesto, malpravo kaj malbravo en kiu naĝas tiu prikraciinda kaj piedpuŝinda *Tempester*, dronante en ĝi ĝis sia malpura kolo, mi mencias nur, ke en la nedigestebla putra saŭco, kiun misintence, false kaj fie li prezentas al ni kiel »libron« (haha-ha! mi ridegas amare!), do, en tiu »libro« troviĝas plurfoje la nomo de *Ivan Sull*. Nu, foje mi parolis kun tiu *Ivan Sull* pri la vermo *Tempester*, kaj li — aŭdu — trifoje palpebrumis!!! Karaj legantoj, vi sufiĉe ja ekzer-

cis vian cerbon per la lego de miaj erudiciaj pritraktadoj filozofiaj (mia modesteco min manhelpas laŭdi ilin), por ke vi tuj vidu kaj rekonu, kian piramidan misecon de la malhomo *Tempester* pruvas tiuj 3 (tri) palpebrumoj. Kio povus pruvi pli klare kaj evidente ke li, pliguste ĝi estas senhonta arogulo, impertinenta azeno, hirudo kaj vipuro, arkifripono kaj protokanajlo, rompŝtelisto kaj voluptmurdisto? Kiu bezonus pli evidentan pruvon pri tio, ke ĝia libro estas krimo kontraŭ la plej noblaj aspiroj de l' homaro kaj humaneco?

Mi absolute rifuzas recenzi tiun libron, mi ne scias ĝin recenzi, ĉar la plumo rompiĝas inter miaj spasmaj fingroj, mi entute ne scias recenzi. Sed ne recenzon oni bezonas nun, sed la signalon S. O. S. Sola eblo kaj sola savo ekzistas por ni, sola rimedo nin povas savi de tiu vermo, kiu lasis sian malpuran mukon sur tolerema papero kaj nomas tion »verki libron« — oni devas elbati liajn putrajn dentojn kaj naŭzajn okulojn, eltranci la siblan langon, trapiki la malnoblan koron, kapti la gorgon, kiu haladzas pereon, distreti la pusan korpon, sendi la malutilan malpuran animon en la inferon kien ĝi konvenas. Ekstermi! Ekstermi! Ekstermi!

Kaj se vi, legantoj, ne konsentus kun mi, se vi, eĉ post la klaregaj pruvoj de mia pure objektiva kritiko ne kraĉas sur la favan kapon de tiu honto de l' jarcento — mi havas mian opinion ankaŭ pri vi. Tiaokaze ankaŭ vi mem estas simplaj friponoj-kunkulpuloj, escepte se vi estas abonantoj de nia gazeto. Nome, kiel abonantoj vi absolvas vian punon per inda kaj peza pentofaro, per la lego da miaj erudiciaj artikoloj. *Majorano Origana.*

*

Kiel ni diris, la recenzon ni interpretis iom libere, ĉar ni ne emas represi artikolojn aliloke presitajn. Sed — ni garantias, ke nur la instrumentado ŝanĝiĝis, la melodio restis. Restis la originala (vere originala!) objektiveco kaj logikeco, restis la INTENCO kaj FURIOZO, ili estas nur iom pli verve esprimitaj. Kaj tiu furiozo neniel estas pli motivita tie, ol en nia interpreto.

Se post tio ĉi ni tamen ne turnas la supre legeblajn ekstermodezirojn kontraŭ la ŝatata recenzisto (?), ties kaŭzo ne estas, ke li tion ne meritis, sed sole nia eksterordinara kaj ekstrema mildo, bonvolo kaj indulgemo. *M. Alice Pik.*

esperanta movado, kiu ĝis nun havas sian centron en Svislando, ne povas evolui tie grandskale.

Katalana Esperantisto publikigas kolorriĉan raporton de R. Cabeza pri la 26-a. En la ĉapitro bibliografia: leginda kritiko pri »Gösta Berling«.

Meritus pli longan traktadon *Nia Vivo*, kiu en siaj kvar paĝoj prezentas modelan stilon kaj bonan enhavon. »Patrina Ordondeko« tradukita de s-ro Coderque: senriproĉa laŭ enhavo kaj lingvo.

Orientaĵoj, kiuj inundas: La Verdemulo, La Lumo Orienta, Aganto, Bulteno, La Revuo Orienta, Esperanto en Japanujo, Verda mondo, Bona Amiko, Esperanto, Esperanto-Lernanto, Amikoj de Esperanto, Esperanta Literatura.

Oomoto Internacia. El la protokolo del l' lasta redakcia kunsido de Literatura Mondo:

Konsiderinte,

ke la redaktoro donis en la gazeto lokon al artikolo, en kiu la bonvola verkinto publike postulas bojkoton

kontraŭ Literatura Mondo kaj ĝiaj eldonaĵoj;

ke s-ro Major en sia kritiko pri la *Sturmer*-libro amasigis nurajn insultojn kaj vulgaraĵajn personajn atakojn, ne zorgante eĉ pri la ŝajnigo de tiu minimuma objektiveco, kiun ni rajte povas pretendi de la recenzanto de niaj eldonaĵoj;

ke nin jam tedas, ke *Oomoto Internacia* konstante ofendas nin publike kaj poste pardonpetadas en privataj leteroj;

ni decidis:

rompi ĉian interrilaton kun *Oomoto Internacia*, ĉesigi alsendon de recenz- kaj ŝanĝekzempleroj, ne recenzi ĝiaj eldonaĵojn eventuale alsendotajn,

ĝis en la redaktado de *Oomoto Internacio* okazos tia ŝanĝo, kiun ni povas rigardi garantio de pli deca konduto. »Literatura Mondo.«

Al tiu rezolucio mi havas nenion por aldoni. Kiuj legis tiujn du artikolojn, tiuj nepre nin pravigos. Tia tono en E-o ne estas toleribla.

ENCIKLOPEDIO DE ESP-O. Ia Volumo. A-J. Je la momento komenci tiun ĉi recenzon, mi haltas, iom hezite, iom time, antaŭ tia monumento, kiel la Enciklopedio de Esperanto. Kunigi en du volumojn la tutan historion de Esp-o de preskaŭ 50 jaroj, resumi tiun vastan socian movadon, kiu prezentas tiom da aspektoj, tian diversecon kaj disvolvigis en tiom da landoj, inter tiel variaj cirkonstancaroj ekonomikaj aŭ politikaj, tio estas entrepreno, antaŭ kiu oni ne povas stari sen miro kaj admiro.

La ideon de tiu grandiozaĵo ni ŝuldas al Ivan Sirjaev, kiu eĉ komencis la efektivigon: li sendis en 1931 sian verkon, kiu estis ankoraŭ pli skizo ol finitaĵo laŭ la instigo de J. Baghy al Literatura Mondo, kies eldonisto Bleier, kun sia kutima klarvido kaj spiritalerto, tuj eksentis la gravecon de la projekto kaj ĝian nekalkuleblan utilecon. Sed li antaŭvidis ĝin multe pli granda kaj kompleksa. Kun la helpo de Sirjaev (kiu bedaŭrinde mortis antaŭ la efektivigo de sia revo) de Kókény kaj Kalocsay, li starigis vastan demandaron kaj turnis sin al ĉiulandaj esperantistoj por akiri ilian kunlaboradon. Kaj la rezultaton, la unikan rezultaton ili liveras al ni en tiu ĉi senprecedenca verko.

La unua volumo, kiu estos sekvata de la dua post 3 aŭ 4 monatoj, havas ekstere la aspekton de vortaro; fakte, en tiu serio da alfabeto ordigitaj vortoj, oni povas distingi kvar apartajn, kvankam intermiksitajn partojn. La unua estas propre socia: ĝi prezentas sumon da pli malpli gravaj informoj, tuŝantaj proksimume ĉion ajn rimarkindan en la movado; tiuj informoj estas alfabeto vicigitaj sub la vorto, kiu plej klare signas ilin, ekz-e la aŭstria movado sub *Aŭstrio*, la ĝenerala priskribo de la gazetaro sub *Gazetoj*, la ido-skismo sub *Delegitaro*, *Ido* ktp. Nekredebla estas la nombro da sciigoj, kiujn la kompilintoj akiris per sia serĉemo kaj persisto: mi memoras, interalie, tabelon de la edziĝoj inter geesperantistoj, okazintaj de la komenco de la movado, liston de la jam fabrikitaj gramofondiskoj, de la ekzistantaj Antologioj ktp, ktp. Trezoro ne nur por la arkivisto aŭ historiisto, sed por la simpla propagandisto, kiu tie ĉi trovos, sub ĉiu rubriko, plej abundan amason da utilaj detaloj. Mi opinias, ke de nun la tasko de vigla kaj inteligenta propagandisto estas simpligita en ne atendita mezuro; anstataŭ devi traserĉi en pluraj, ofte malfacile akireblaj libroj, li apertu nur sian enciklopedion kaj certe trovos tie pli multe da aferoj, ol kiom li serĉis. Tio estas vere ilo, kiun vivanta grupo ne povas rezigni. Eĉ se nur du librojn ĝi povas aĉeti al si, tio devas esti la Fundamento kaj la Enciklopedio; aliaj verkoj estas bonvenaj, utilaj, agrablaj, dankindaj; tiuj ĉi du estas nepre necesaj. Mi ne povas citi ĉiujn legindajn artikolojn; sed almenaŭ mi volas diri, ke en ĉiu granda lando la eldonistoj trovis kompetentan kunlaboranton, kiu scipovis klare kaj precize resumi materion, kiu estas ofte, ekz-e ĉe Francujo kaj Germanujo, terure vasta kaj ampleksa. Nur pri kelkaj artikoloj oni povus deziri kompletigon; ekzemple mi estus ŝatinta trovi la ĝustan tekston de la fama »mistera kontrakto« inter Zamenhof, De Beaufront kaj Hachette; ĉar ni nun posedas ĝin; estus tre utile publikigi tiun monstraĵon; nenio pli bone prilumas la regemajn intencojn de Beaufront kaj klarigas unue lian disputon kun Bourlet, due lian perfidon en 1908. Rilate al la dua kongreso en Antverpeno, la artikolo indikas, ke la ĉefa traktita temo estis »E. en radio«: eble, sed la ĉefa demando estis la akuzo de Delanoue kontraŭ la administrado de UEA kaj la sindefendo de Privat; estas iom strange, ke eĉ ne enestas la nomo de Delanoue, kiu tamen estis ĉe la komenco de la vojo, kiu kondukis al la, ankoraŭ pli ŝajna ol reala, unuigo de nia movado. Pri alia artikolo, tiu de IALA, mi estus dezirinta, ke oni klare montru la veran celon de tiu asocio: starigi novan »delegitaron« por denove elekti plej bonan internacian lingvon; jen la ĉefa ideo de S-ino Morris, kaj ne estas neutila averti pri tio niajn samideanojn.

La dua parto de la Enciklopedio estas priliteratura; ĝin konsistigas kolekto da rubrikoj pri la iam ekzistantaj aŭ nun ekzistantaj gazetoj kaj pri ĉ. 450 libroj. Precipe tiu ĉi lasta fako estas io tute nova kaj tre interesa: ĉar ne ekzistas ankoraŭ kompendio de la Esp-a literaturo, oni ĝis nun malfacile povis sciigi pri la eldonjaro de iu malnova libro, pri ties enhavo kaj la valoro de ties lingvo aŭ stilo. Ĉio tio estas nun praktike prezentita al ni per tre simpla rimedo: la kompilintoj eltiris karakterizajn notojn el recenzoj aperintaj en gravaj gazetoj. Ĉar la fontindiko ne mankas, oni povas ĉiam reiri al la uzita gazeto kaj trovi tie pluajn detalojn.

La malavantaĝo de tiu agmaniero estas, ke iafaje, precipe dum la unuaj jaroj la verkoj estis tiel malmultaj, ke la recenzistoj estis tre indulgemaj, kaj emfaze laŭdis eĉ malbonstilajn, nekorektajn verkojn. Krome kelkaj el ili ne zorgis koncize resumi la temon kaj preferis nebulan, senfundamentan juĝon, evidente pli facile verk-eblan. Pri tiuj verkoj estintus pli oportune, se unu el la kunlaborintoj estus mem verkinta mallongan recenzon. Sed eble tio estus tro longa kaj teda tasko. Tamen, ĉar la eldonisto antaŭvidas eventualan duan eldonon, mi konsilas al li rebaki kelkajn el tiuj bibliografiaj notoj, kaj uzi pliofte citaĵojn el tiu sagaca viro, kia estas R. Baham (mi vane serĉis lian nomon en la Enciklopedio: ĉu, kiel pri Kabe, oni uzos nur lian pseŭdonomon Robo? Vere strange, ke la nomo de tiu bonega kritikisto kaj redaktoro de la organo de Aŭstria Esp-a Asocio, »La Suda Kruco«, troviĝas eĉ ne en la artikolo pri Aŭstrio, eĉ ne en la artikolo pri la Aŭstria Gazetaro! Plej bedaŭrinda kaj maljusta manko!). Konvenus ankaŭ kompletigi tiun parton, ĉar iom miriga min la foresto de noto pri la Fundo de la Mizerio, la Interrompita Kanto, la Faraono tradukitaj de Kabe, la Fabeloj de Lafontaine tr. de Vaillant, Cielo kaj Tero de Byron tr. de Dro Noël ktp. Inverse, pri kelkaj verkoj, kiel Iliado, tr. de Kofman, estus honeste informi, ke la traduko estas nur parta (la 7 unuaj kantoj.) Tiuj ĉi rimarkoj estas ne kritikoj, sed simplaj sugestoj por esperata nova eldono; mi scias tre bone, kiel en tia giganta laboro oni estas elmetita al preterlasoj kaj forgesoj.

La tria parto estas kolekto da biografioj de konataj esp-istoj. La tuta verko entenas ĉirkaŭ 1.500 da ili. Tiu cifero per si mem montras la amplekson de tiu esplorado. Ĉar oni ne devas opinii, ke facila afero estas trovi informojn, eĉ la plej simplajn, pri la unuaj pioniroj de nia movado: el malnovaj gazetoj oni ofte povas ĉerpi nur magrajn sciigojn, kaj aliaj fontoj ne prezentigas tiel multnombro. Mi scias eĉ, ke ankoraŭ vivanta eks-eminentulo de nia movado rifuzis al la petanto ĉian ajn precizigon pri sia aĝo, naskiĝloko, ktp. Malgraŭ tiuj baroj, la kunlaborantoj de la Enciklopedio sukcesis kunigi impresan nombron da biografioj. Kaj estas vere kortuŝa legado, kiam la rigardo traĝlitas inter tiom multaj nomoj de mortintaj aŭ vivantaj samideanoj, kiam el la malvarmaj paĝoj levas sin la fantomoj de tiom da sindonemaj, sinforĝesaj, entuziasmaj kumbatalintoj, aŭ la bildoj de amikoj, karaj al ni pro siaj verkoj aŭ faroj, sed kiujn ni persone ne konis. Certe, movado, kiu batigis tiom da bravaj koroj, kiu estigis la sindediĉon de tiom da belaj animoj, estas io nobla, io forta en la historio de la homaro. Al ĝi estas destinita la venko.

Ankoraŭ sur tiu kampo ne ĉiam oni povus konsenti kun la verkintoj; ekz-e pri la biografio de De Beaufront, mi estus pli malfidema ol Sro Bastien al la vasta lingvokono kaj vojaĝoj en Azio de tiu fantaziema fanfaronulo; eĉ pri la ekzisto de Adjuvanto iu eminentulo, kiu bone kaj persone konis Beaufronton konfidis al mi, ke li multe dubas; la kelkaj tekstoj, kiujn la Ido-patro siatempe liveris al la publiko, ne kongruas inter si, kaj la mirakla perejo de la fama en »forta kofro« enfermita manuskripto ne malgravigas la suspektojn. Sed tio estas iel

bagatela, kaj nenion deprenas de la unika valoro de tiu biografiano.

La kvara parto tuŝas min pli rekte: ĝi estas lingvistika. Kaj tamen mi devas tie ĉi konfesi, ke mi dubas pri ĝia utilo. Se la Enciklopedion celus esti nepre kompleta pri ĉio, kio rilatas al Esp-o, oni ja devus enmeti la tutan gramatikon kaj sintakson. Sed tion la eldonistoj ne faris, kaj tute prave, ĉar neniu aĉetus enciklopedion por lerni la lingvon. Alian vidpunkton oni povus allasi, la historian. Oni povus pritrakti la ĉefajn demandojn, kiujn la evoluo de la lingvo metis antaŭ la esp-aj verkistoj, kaj la diversajn, variintajn manierojn, kiel ili provis solvi ilin; ekz-e elnombri la sinsekvajn rimedojn uzitajn aŭ proponitajn por distingi la objektan signifon de la prepozicio DE disde la subjekta en frazoj kiel »mortigo de Petro al Paulo = mortigo de Paŭlo fare de Petro«. Sed ankaŭ tion ĉi vojon la redaktoroj ne sekvis. Enestas ekz-e artikolo pri la Akuzativo, sed ĝi tuŝas nur la uzadon de akuzativo kun infinitivo; pri la duobla akuzativo oni devas serĉi sub Duobla; sed nenio enestas pri la uzado de akuzativo post prepozicioj (kaj ĝi estas ofte malĝuste uzata post EKSTER ktp). Ekzistas artikolo pri la uzado de LA (sub vorto: artikolo), pri tiu de DA (ne sub vorto: prepozicio), sed nenio pri DE, AL, EL, kiuj levas tamen sintaksajn demandojn. Ekzistas artikolo pri Aglutina karaktero de Esp-o, sed ne pri Derivado (ĉe nur por substreki, ke ĝi ne ekzistas en Esp-o.)

Restas do apartaj rubrikoj, sen granda kohero inter si kaj ŝajne disĵetitaj en la Enciklopedion por plenigi manklokon. Tio cetere ne malhelpas, ke aparte konsiderite, ĉiu el ili estas ĝusta kaj interesa. La fakto, ke plejparte verkis ilin Kalocsay estas certiga garantio. Mi signas precipe la artikolojn pri la esp-a prononco, pri la uzado de la artikolo, pri la interelementa rilato, kiel tre bonajn en sia koncizo.

Mi ne parolis ĝis nun pri la ilustrado: ĝi prezentas la ĝis nun plej riĉan kolekton da vidaj dokumentoj pri Esp-o, ties verkistoj kaj literaturo. Facile estus kritiki pri la neprecizo de kelkaj reproduktaj: sed oni devas memori, en kia stato ofte troviĝas la originalaj dokumentoj, malbonaj fotoj en malkaraj pragzetoj ktp. Ni devas multe danki al la kuraĝa eldonisto pro la rikolto kaj konservado de tiaj valoraj maloftaĵoj.

Kaj nun, kiam mi priskribis al vi la tutan libron — mi restas penseme antaŭ mia recenzo; mallerte mi faris mian taskon; mi ne scipovis redoni al vi la impreson de ĝoja fiero, kiun mi sentis, kiam la unuan fojon mi apertis kaj trafoliis la Enciklopedion. »Do, de nun, ankaŭ ni havas nian Enciklopedion! Ankaŭ nia movado estas sufiĉe forta, sufiĉe vasta, sufiĉe malnova, ke oni povas publikigi pri ĝi du plenajn volumojn, plenajn — ne je frazoj kaj vantaĵoj, sed je faktoj kaj realoj«. Tiel parolis en mi; kaj oni devas konsenti, ke tiu verko kolektiva estas kvazaŭ glora krono, kiun oni nun surmetas al nia kara E; ĝi estas kvazaŭ eternigilo de tiuj unuaj 47 jaroj, la plej duraj kaj malfavoraj al nia kresko. Sed ĝi estas ankoraŭ io plia: tia resumo de la pasintaj penoj estas kuraĝigo al estontaj; tiu rakonto pri niaj estintaj luktoj estas alvoko al venontaj. Ĝi estas pli ol konstato de la faritaj progresoj, ĝi estas promeso al farotaj. Tiu, laŭ la vortoj de la redaktoroj, »grandega epopeo de nia movado de esperantoj« devas eĉi en niaj oreloj kiel militkanto al la proksima venko. Kaj oni ne povas pridubi la triumfon de movado, kies anoj estis sufiĉe konsciaj kaj fidelaj por ebligii la konstruon de tiu verko kaj ĝian eldonadon. Bleier kaj Literatura Mondo indas la dankon de la tuta esp-istaro.

G. Waringhien.

EUGENO AISBERG: FINE MI KOMPRENAS LA RADION! Bibliografiaj detaloj: 140 paĝoj da teksto kun 245 bildoj kaj desegnaĵoj. Eldonejo: Literatura Mondo, Budapeŝt, 1934. Prezo: broŝ. svfr. 4.50; bind. 6.— + 10% por sendkostoj. AELA-anoj en 1934 ricevas la verkon kun rabato de 60%.

Eldonante ĉi tiun libron la eldonejo akiris grandan meriton. En duobla rilato: rilate al Radio kaj rilate al

Esperanto.

Rilate al Radio la aŭtoro mem diras en sia antaŭparolo (p. 6): »Nepardoneble estas nunepoke malkoni la principojn de Radio, eĉ se speciale oni ne okupas sin pri tiu fako. La lando de Radio estas pasiĝe interesa.« Kaj 12 liniojn antaŭ la fino (p. 140) li skribas, ke la nescion de la ĉefaj elementoj de Elektro kaj Radio »devus honti ĉiu kultura homo«.

Pri tio oni devas konsenti kun la aŭtoro. Pli kaj pli fariĝas postulo de komuna klereco, ke oni estu informita pri la tekniko, almenaŭ en grandaj trajtoj. De matene ĝis vespere, hejme kaj surstrate, laborante kaj ripozante, en la urbo kaj en la kamparo, — ĉie oni renkontas la teknikon; ĉie ĝi aperas kiel afabla helpanto, ĉie ĝi verŝas sur nin abundon da bonfaroj. Se jam ĝis nun oni deziris, ke ĉiu kultura homo estu ĝenerale informita pri la naturo lin ĉirkaŭanta, — hodiaŭ estas egale necese, ke li estu iom informita pri la tekniko, per kies helpo la homo servigas al si la naturon.

Plie, devus esti eĉ pli memkompreneble, koni la teknikon ol koni la naturon. Ĉar la tekniko estas nia propra spirita infano. En la naturon la homo estas enlokita sen sia kunagado; li estas eta ero de ĝi, kaj multfoje ĝi eĉ estas al li malamiko. La tekniko, kontraŭe, provante, studante, elpensante, konstruante, konstruante estas kreaĵo de liaj spirito kaj korpo, ĝi estas karno el lia karno, kaj spirito el lia spirito. Per la tekniko li, eta pigmeo, igas la gigantan naturon sia amiko, sia helpanto, sia servanto. En longaj tempodaŭroj li mem kreis sian teknikon per senlaca laboro, observante, esplorante, ordante, kaj funkciigante. Pro tio devas esti plezuro por ĉiu hodiaŭ vivanta, koniĝi la teknikon.

Unu el la plej mirindaj donacoj, kiujn faris al si la kreanta homa genio, estas la Radio (radiokomunikado). Ni posedas ĝin nur de post unu homa generacio; sed jam ni ne povas plu imagi sur nia planedo vivon sen ĝi. Ĉiu konas ĝian signifon, preskaŭ ĉiu uzas ĝiajn servojn, kaj multaj volas penetri ĝiajn sekretojn. Tial ĉiu provo estas salutinda, kiu celas malfermi al vastaj rondoj komprenon por tiu branĉo de la tekniko. Kaj Eugeno Aisberg, la aŭtoro de la nova libro, estas gratulinda, ĉar tiom brile sukcesis lia provo.

Li verkis originale en Esperanto amuzan kaj popularan enkondukon en la radioteknikon, en la formo de dialogoj: Radio-ingeniero faras ekskurson kun sia nevo en la belan regionon de Radio kaj klopodas en 16 babiladoj (p. 9 ĝis 140) klarigi al li la ĉefajn problemojn de la radioscienco. La unua parto, ampleksanta 9 interparolojn (p. 9 ĝis 78), informas la leganton pri la elementaj fenomenoj de elektro, pri la fundamentaj eroj de la radioaparatoj kaj fine pri radiosendado. En la dua parto enhavanta 7 babiladojn (p. 79 ĝis 140), la principoj de la riceviloj estas pritraktataj.

La aŭtoro komencas, popularigante necesajn sciojn el la moderna elektrona teorio: pri la elektronoj, pri la elektra fluo — kontinua kaj alterna — kaj pri la radioondoj. Jam en la dua kaj tria babilado la onklo-ingeniero klarigas la transiron de elektronoj en dioda kaj trioda radiolampoj. La sekvantaj du babiladoj komprenigas la rolon kaj funkciadon de kondensiloj kaj bobenoj, la fenomenojn de kapacito kaj indukto, la memindukton kaj la oscilcirkuiton konsistantan el kondensilo kaj bobeno.

Post tiaj preparaj interparoloj la aŭtoro klarigas en la sesa babilado kiamaniere kontinua osciloj naskiĝas per la heterodino, t. e. per la radiolampo uzata kiel generatoro. Kun tio estas konigata la skemo de radiosendilo por telegrafio.

La sekvantaj tri babiladoj kompletigas la antaŭajn mallongajn sciigojn pri oscilcirkuito, pri la bobenoj, pri ilia memindukto kaj memkapacito kaj, laste, pri la modulado de la altfrekvencaj fluoj per la mikrofona influo.

En la deka babilado la aŭtoro komencas komprenigi la ricevon kaj la ricevilojn. Li pritraktas unue la resonancon kaj priskribas la diversajn formojn de antenoj. En la dekunua la diversaj agordarangoj estas klarigataj, en

L I N G V O

PRI AS KAJ IĜ.

Al *sro Ojasson*. Ne koleru, ke ni ne publikigos vian longan artikolon, sed ni nur resumus ĝin por povi publike ĝin respondi.

Vi proponas, ke oni ekuzu la verbajn finaĵojn anstataŭ la *est*-formoj (do: as, is, os, us, u, anta, inta, onta) kaj ke oni ne plu uzu la sufikson *iĝ*.

En via artikolo vi estas parte prava, parte ne. Prava en la konstato, malprava en la konkludo.

Vi estas prava pri tio, ke la *est*-formoj estas pezaj. Precipe la kompleksaj verboformoj (estas farinta ktp.) estas longegaj kaj maloportunaj. Ciuj naciaj lingvoj havas pli mallongajn formojn. Sed, se tiuj formoj estas pezaj, ili estas ankaŭ klaraj, facile kompreneblaj. En E-o, kiu estas nenies gepatra lingvo, tio estas gravega. Eble iam poste, kiam E-o estos ĝenerale akceptita, oni sentos la neceson de malpezigo, kaj tiam certe oni iros vojon similan, kian vi proponas. En la poezio, kie la mallongo ofte estas trudita neceso, oni ja aplikadas jam tiujn formojn malofte. Sed en la parolo, ju pli longe, des pli klare. Tion vi certe rekonos, se vi parolos antaŭ E-a publiko. Krome, E-o povas tute bone malhavi la kompleksajn formojn (vidu Zamenhof kaj Kabe). Eble la sola formo *estus -inta* ne estas evitebla. Kaj tie oni vere povus uzi pli ofte la formon *estintus, farintus*.

La alia punkto, la ekstermo de *iĝ*, ŝajnas al mi kruelaĵo. Ĝia uzo fariĝis E-a idiotismo, kies elimino senigus la lingvon je interesa trajto. Mi kredas, ke eĉ se oni diros foje *fermatis* oni ne ĉesos diri *fermiĝis*. Inter ili ja ekzistas diferenco. Ĉe la unua oni komprenas, ke iu ion fermis, ĉe la dua, ke io fermiĝis per si mem. Krome, *iĝi*, laŭ mia sento, ne estas malbelsona. Eĉ en *ruĝiĝi* kaj *ŝanĝiĝi* mi sentas nenion malbelan.

Fine, E-o estas vivanta lingvo, kiun oni ne povas

ŝanĝi per proponoj. Ĉio nova povas en ĝin eniri nur iom post iom. Kaj tiel grava ŝanĝo ja aliĝus la tutan aspekton de la lingvo. Do, kvankam via propono temas nur pri alimaniere uzo de E-aj elementoj, ĝi evidente havus la signifon de reformo. Kaj jen, kio ne estas ebla en E-o.

Kiel malfacile oni akceptas ion novan en vivanta lingvo, tion bone montras la ekzemplo de la prepozicio DE. Ĝi havas 11 sencojn (vd. Plena Vortaro), kaj per tio ofte estigas konfuzon aŭ necesigas komplikajn frazkonstruojn, ligitan vortordon ktp. Multaj proponoj jam provis helpi pri tiu malbonaĵo, sed neniu prosperis, ĉar temas pri ofte uzata elemento, do la ŝanĝo tro aliĝus la aspekton de la lingvo. Tial prefere oni uzas nun anstataŭ la aga-subjekta DE la pezan formon FARE DE ol la pli malpezan formon PAR, aŭ la ankoraŭ pli oportunan FAR, kiu estus prepozicio farita el FARI, kaj havus al ĝi la saman rilaton, kian havas PER al PERI (*per* estas *pere de*; *far* estus *fare de*). Proponi oni apenaŭ povas plu en E-o. Oni povas ekuzi ion, kion oni trovas necesa aŭ utila kaj se oni trovas eldoniston, kiu eldonas, legantojn, kiuj ne forjetas la libron; verkistojn, kiuj imitas la novaĵon, oni eble sukcesos ĝin vivigi. Malfacila kaj malmultŝanca vojo, sed tio estas ja la libera evoluo.

-y.

ALDONAJ BALBUTVORTOJ PRI LA PROBLEMO DE L' NEDIFINA ARTIKOLO. Anatole France konsciigis al ni, ke alparoli gazete traktitan demandon havas fiksan celon: plikompliki la problemon. Tamen, ne tiacele mi alparolas la ŝupre skribitan temon, alude al la samtema artikolo en la lasta numero de L. L., el la plumo de -y.

La senco de la nedifina artikolo esence diferencas de l' numeralo r. Estas nur idiotismo, preskaŭ hazarda, ke en multaj lingvoj ili havas la saman formon. La angla lingvo jam ĉesigis tiun unuformecon. Ĝi havas la numeralon *one* kaj la nedifinajn artikolojn *a* kaj *an*. Sed mi atentigas pri primitiva lingvo, pri la *suheli*

la dekdua la kristaldetektoraj riceviloj kaj la mekanismo de telefona ricevilo. En la dektria la lampaj detektoroj estas priskribataj, en la dekkvara speciale la reaga detektoro kaj ĝia fajfado, poste la lampo kiel amplifilo kaj la rezistanca amplifilo. En la dekkvina sekvas la aliaj amplifiloj, kaj en la lasta babilado la aŭtoro antaŭeniras ĝis la klarigo de la anodo-krada kapacito kun ĝia neŭtraliĝo en la neŭtrodino kaj de la superheterodino kun ĝia frekvencoŝanĝo.

La babiladoj estas amuze verkitaj kaj tial facile legeblaj. La aŭtoro scias trovi por aferoj, kiujn oni ĝis nun rigardis apenaŭ popularigeblaj, analogiojn kaj komparaĵojn trafikajn kaj parte surprizajn; tiel li komprenigas la problemojn al legantoj ne antaŭ-instruitaj. La aŭtoro ja ne celas fari siajn legantojn specialistoj de radio aŭ domi al ili instrukciojn por memfarado de ricevaraparatoj. Li nur volas komprenigi al ili, en ĝeneralaj trajtoj, la funkciadon de la radio-aparatoj. Tial nur de malproksime li montras la belan regionon, ne malkaŝante la apartajn arbojn de matematikaj formuloj, tiom abundajn en la radiolando. Tiamaniere li evitas la danĝeron, ke pro multo da arboj la scienculo ne vidas la arbaron.

83 klaraj figuroj en la teksto komentas la klarigojn. Krome preskaŭ sur ĉiu paĝo estas unu aŭ kelkaj desegnaĵoj marginaj, faritaj de J. Guilhac; per la sprita originaleco, kun kiu ili bildigas la analogiojn de la aŭtoro, ili multe kontribuas, ke la leganto povu facile sekvi la rezonojn de la aŭtoro. Tamen la aŭtoro neniam forlasas la sciencan bazon. Al atenta leganto, kiu fidas al lia gvido, li donas solidan fundamenton, kapabligante lin per uzo de pluj radioteknikaj lernolibroj penetri pli

profunden en la misteran kaj tamen allogan landon de la radiotekniko.

En kelkaj lokoj la aŭtoro aldonas en piednotoj mallongajn matematikajn esprimojn »por kontentigi matematikulojn« (p. 125) aŭ »por ne ofendi ilin« (p. 61), ekz. la formulon de Thomson (p. 61), la impedancon por serio kaj por paralele konektitaj bobeno kaj kondensilo (p. 125 kaj 127).

La granda taŭgeco de la libreto estas pruvita jam per tio, ke de post la unua presigo de la teksto (en la volumo 1926 de »Internacia Radio-Revuo«) ĝi estas tradukita el la esperanta originalo en 13 (ne malpli!) naciajn lingvojn. Tial estas superflue, ke la recenzanto direktu specialajn rekomendojn al la leganto.

La multaj tradukaĵoj samtempe donas sugeston, kian signifon Esperanto havas jam hodiaŭ por la scienco kaj tekniko kaj kiom tiu signifo povos kreski en la estonteco. Tiel la aŭtoro faris per sia verko gravan servon ankaŭ al nia internacia helpa lingvo. Ni esperu, ke la eldonejo sukcesos — konforme al siaj intencoj (p. 7) — trovi pluajn aŭtorojn, kiuj verkos en same modela maniero popularenciencajn verkojn, kompreneblajn por ĉiu homo. Ankaŭ ili prenos sian vojon — tra la komunumo de la esperantistoj en la naciajn lingvoteritoriojn. Estas la tasko de la esperantistoj, subteni la eldonejon kiel eble plej forte en ĝia entrepreno.

Jenajn preserarojn mi rimarkis:

Sur p. 21 en fig. 8 la litero P, kiu estas flanke de M, devas esti ŝanĝata al B.

Sur p. 53 en fig. 3o mankas la litero T.

Sur p. 100 en fig. 63b ĉe »la kurento-mikrofono«

(marborda branĉo de la bantuazanzibara ngeezi-negra lingvofamilio), kiu esprimas la nedifinecon per la *ripeto* de l' substantivo (ekz. *njumba*: la domo; *njumba-njumba*: domo). Tiu lingvo de esprimas la nedifinecon ne per *unu*, sed kvazaŭ per *du*. La suaheli-logiko certe rezonas jene: Se oni nomas objekton unufoje, tio signas unu certan, difinitan aĵon; sed se oni nomas ĝin dufoje, tio signas, ke oni povas laŭplaĉe elekti, do la objekto ne estas difinita. Tia rezonado estas apenaŭ atakebla. Vere *unu* povus tute bone signi certan, nepre difinitan unu objekton. El tio sekvas stranga afero. Ĉar en la Fundamento klare estas esprimite, ke nedifina artikolo ne ekzistas, la uzo de *unu* tiacele ne estas *logike* aplikita, sed estas simpla naciismo, eĉ rompo de fundamenta regulo.

Cetere kontraŭ *una* kiel nedifina artikolo, parolas ankaŭ ĝia formo. La plej malfacile prononcebla vokalo estas *u*, oni devas por ĝia prononco tute pintigi la buŝon. Nu, *unu* enhavas du tiajn vokalojn, granda malavantaĝo ĉe ofte uzenda elemento.

Poste, la artikolo estas adjektivo. Certe pro tio elektis Zamenhof la a-finan *la* por difina artikolo, kaj ne *il*, *li*, *le*. Do ankaŭ la nedifina artikolo devus finiĝi je *a*. Estas tre interese, ke tia formo ja povas esti trovata en la lingvo, ĝi estas nenio alia, ol la adjektiva finaĵo *a*, kies senco (tute nedifinita kvalito aŭ aparteno, rilato) tute kaj absolute koincidas kun la senco de nedifina artikolo. Krome ĝi konformas al la angla formo. Vere, tute bone aspektus: *a bona homo; mi vidis an birdon; a homo venis al mi*.

Cu mi proponas tiun solvon? Ne, tute ne. Mi ja diris, ke mi nur balbutadas iomete. Kaj mi volas nur rimarki, ke tiun perfektan solvon Zamenhof certe estus trovinta se li volus krei nedifinan artikolon en E-o. Se li neglektis la solvon, tio montras nur, ke li ne intencis doni al ni tian artikolon kaj per la peza formo de *unu* li metis kvazaŭ malhelpon kontraŭ ĝia tiacela uzo. Vere, kiel diris -y en sia artikolo: »...la tri eblajoj: nenio,

ia kaj iu, plene kontentigas ĉian bezonon. Por nedifina artikolo — ne restas funkcio.«

Mi legis ie grandan riproĉon kontraŭ la anti-unuistoj. Nome, ke ni kritikis la lingvo-uzon de Zamenhof. Tiu riproĉo ŝajnas al mi malprava. Ni atentigis nur pri Fundamenta regulo. Aliaj estis, kiuj argumentis per la ekzemplo de Zamenhof. Sed eble ankaŭ la 16 reguloj estas zamenhofaj. En teksto li povis erari, ĉar ĉiu homo povas erari. Sed en tiuj reguloj li certe ne eraris; tie li ja faris plej zorge la *skeleton* de la lingvo, tie li certe esprimis sian decidatan intencon. Ni do persistas pri la zamenhofa intenco, la unuistoj pri la zamenhofa erareto. Ne povas estis dubo, kiu elektis pli bone. G. Karzog.

TRISTA KAJ AŬSTRIO EN LA KRESTOMATIO DE KABE.

El la nunaj legantoj multaj ne konas la »Internacian Krestomation« elektitan kaj tradukitan de Kabe, kiu libro aperis en 1907 en Varsovio kaj apartenis al la unuaj, lingve kaj stile modelaj literaturaj verkoj de nia movado. Se ni foliumas en tiu ĉi malnova libreto, ni ekscios kun miro, ke la ofte atakata vorto »trista« estis uzita unue — de Kabe. Estas ja eble, ke Kabe transprenis la vorton de iu alia, sed li uzis ĝin en suprenomita libro sur paĝo 3. en la traduko de ĉapitro el »Tri Musketeroj« de A. Dumas. (Mi pensas, nun oni jam ne skribus »Musketeroj«.) Tie ni legas la frazon »Ĉi tiuj pensoj estis tamen tristaj.« Menciinde estas, ke Kabe ne enmetis la vorton en sian poste aperintan faman vortaron, kaj ankaŭ aliaj esperantistoj tiutempaj ne transprenis tiun ĉi »dangan« neologismon. Tio kompreneble ne signifas, ke oni facilanime kaj nenecese proponu novajn vortojn. En la libro estas ankaŭ aliaj interesajoj. Ekz. Kabe uzas la esprimon: »Anno Aŭstria« por la nomo de edzino de franca reĝo Ludoviko XIII. Se Kabe esperantan formon donis al la virina baptonomo »Anna«, logike »Aŭstria« estas esperantigita formo, adjektivo de la ŝtatnomo »Aŭstrio« kaj ne Aŭstrujo, kiel multaj postulus. P. B., Budapest.

Sur p. 57 en la lasta linio devas esti 2 anstataŭ Y, estas intermiksita la ciferoj 2 kaj 3.

Sur p. 113 en la grase presita titolo devas esti la vorto »estis« anstataŭ »estise«.

Sur p. 127 en la malsupra formulo anstataŭ (...) 2 devas esti (...)².

Sur p. 136 la teksto sub fig. 81 ne akordas kun la desegnaĵo.

Du dezirojn terminologiajn mi devas eldiri:

1e La esprimon »galvanometro« mi rigardas kiel arkaan kaj eviteblan. Sur p. 21 kaj 39 — kiel preskaŭ ĉiam — ĝi povas esti anstataŭata per »fluometro« (ampermetro).

2e Ŝajnas al mi necese, forlasi la sensencan »cm« kiel mezuron por la kapacito. Oni malaprobu ĝin tute malkaŝe kaj ne nur tiel honteme, kiel faras la aŭtoro sur p. 34 kaj 35.

J. Herrmann, em. prof.
pri elektrotekniko, Stuttgart.

ARTHISTORIO I. de Antono Hekler, profesoro de la Universitato en Budapest. La esperanto-eldonon prilaboris A. Kampiss. Tradukis K. Kalocsay. Eldonis: Literatura Mondo, Budapest, IX., Mester-u. 53. V. 5. 104 tekst- kaj 112 bildopaĝoj. 23.5×15.5 cm. Prezo: broŝurita 13.— svfr., bindita 15.— svfr. plus 10% por sendkostoj. La dua verko de AELA 1934.

»La bezono al artĝuo estas same nedisigebla de la morala vivo de l' homo, kiel la bezono al nutraĵo estas nedisigebla de la materia ekzisto.«

Tiujn vortojn de Eugen Gugel en lia verko: »Historio

de la konstrustiloj« mi tuj memoris legante la anoncon en Literatura Mondo pri la supre nomita Arthistorio.

Tamen la artĝuo ne nur estas bezono por la kreskado de la morala vivo, ĝi estas necesa ankaŭ por la altiĝo kaj plinobligo de la homa spirito.

Ja nenia homo rajte povas diri esti civilizita en la plena signifo de l' vorto, nehavante pli-malpli scion pri la arthistorio.

Tial estas laŭdinda faro de la sinjoroj A. Kampiss kaj K. Kalocsay en kunlaborado kun la eldonejo Literatura Mondo pliriĉigi nian literaturon per la verko de prof. A. Hekler kaj doni al la tutmondaj esperantistoj la okazon proprigi al si la konon necesan por plena klerigo.

Vere, ni ĉi havas atentegindan verkon, ne nur pro la pritraktita temo, sed ankaŭ pro la maniero, je kiu la materialo estas prilaborita.

Ne facile estas, el tia riĉa superfluo da bildoj elekti tiujn, kiuj povas doni al laiko ĝustan rigardon sur la tuton, kaj egale malfacile estas en kelke da paĝoj koncize rakonti tion, pri kio arthistoria studento devus streĉe labori plurajn monatojn. Nu, ambaŭ taskojn oni vidas ĉi tie plenumatajn.

Por la bela lando de la Arto nun ekzistas esperanta gvidilo, kiu kondukos laikojn kaj interesulojn tra la mirinda regiono, en kiu la spirito senhalte povas ĝui la plej bonan kaj plej belan el tio, kion postlasis la elektitoj inter la Majstroj de la antaŭaj jarcentoj.

Jam la unua ĉapitro pri Egipto tuj pravas, ke la verkinto regas la materialon. En apenaŭ kvin paĝoj li klare pritraktas tiun artepokon tiel, ke laiko kun helpo de dekunu da bildoj povas akiri supervidon kaj sufiĉe

klaran ideon pri tiu originala kaj profundsenca arto.

En la ĉapitro pri Greklando la aŭtoro kondukas nin inter la artverkoj kaj rakontas pri la artistoj de tiu riĉbenita teritorio, kaj li faras ĝin kiel gvidisto en bone de li konata lando.

Dum la legado min entuziasmigis la priskribo de la famaj artverkoj de la skulptisto Phidias, viditaj de mi antaŭ jaroj en la »British Museum«, kaj kiuj malgraŭ treega difektiĝo ĉiam ree ĝuigas la nekompareblan belegcon de la greka skulptarto.

Ne malpli bone estas pritraktitaj la verkoj de la aliaj grekaj artistoj, kies nomoj brilas kiel lumantaj steloj en la historio de la homaro. Eĉ pri la malgrand-arto (vazpentrado, juvelarto, ĉizitaj kaj reliefaj ŝtonoj) la aŭtoro malteĉe kaj instrue rakontas, same pri la greka teatro kaj la pentroarto de l' klasika epoko.

Poste sekvas Italio.

Ne malpli interesa ol la Greka, la Romana arthistorio forte tiras la atenton de ĉiu civilizita homo. La Roma arto kvazaŭ asimilis kaj absorbis la Grekan, kiu enfunde estas religia, por redoni ĝin en tute alia formo, pli aplikita je la reala, ĉiutaga vivo.

En mallonga artikolo estas montrata, ke post la apero de la Kristanismo, la pezocentro de la pozitivisma ekzisto ŝanĝiĝis kaj ŝoviĝis de la materialo al la spirito, de l' korpo al la animo; sed ankaŭ, ke kvankam la kristana vivideo sin deturnis de la antikva civilizo, la arto de la unua kristana tempo ekĝermis kaj kreskis sur la fundamentoj de la antikva arto.

Iom pli detale la aŭtoro pritraktas la mirindajn konstruaĵojn de la frumezepoka kaj gotika periodoj kaj atentigas nin pri la riĉaj, sublimaj kaj subtilaj konstrupartoj de la kvazaŭ punte ornamitaj preĝejoj, kiuj ŝajnas ŝtoniĝintaj sopiroj al transcenda vivo.

En la lasta ĉapitro ni trovas entuziasmigan priskribon de la artverkoj de la italaj artistoj Giovanni Pisano kaj Giotto, per kiu apoteozo li finas la unuan volumon de tiu ĉi por Esperanto grandvalora verko.

La ekstero, preso kaj la 146 belegaj bildoj tuj vidigas, ke ni enmane havas teknike bonan libron, kvankam la kompostisto jen kaj jen faris erareton, forgesante presi literon en kelke da vortoj; sed tio preskaŭ ne ĝenas la leganton profundigintan en la legadon.

Nur sur unu loko li tro multe donis, metante sur paĝo 73 supre, du liniojn, kiujn li jam presis sur la antaŭa paĝo.

Tiuj malgrandaj nekorektaĵoj tamen ne malhelpas al ni diri, ke tiu ĉi eldono estas ĝojiga aperaĵo en nia literaturo, ne nur pro la taŭga prilaborado, sed ne malpli pro la kerna, brila kaj flua traduko.

La tradukanto trovis sur sia vojo malfacilaĵojn de aparta speco. Nekutiman materialon kaj esprimojn el la arta teritorio li devis prilabori; sed li faris ĝin tiel, ke mi ne povas sufiĉe laŭdi lian kapablecon.

Nur unu demandon mi faras al s-ro Kalocsay. Kie mi povas trovi la ĝustan signifon de la vorto »membri« uzita i. a. sur paĝo 13—10 malsupre, paĝo 51—8 supre, paĝo 36—7 malsupre k. aliaj.

Fine mi kore gratulas la aŭtoron, la tradukanton kaj la eldoniston kaj egale la estontajn posedantojn de tiu ĉi belega libro, kiu certe instigos multajn al pli profunda studo.

M. J. Wessel.

INFANOJ EN Torento de Stellan Engholm. Eldonis Literatura Mondo, Budapest, IX., Mester-u. 53. V. 5. 1934. 112 paĝoj, 13×20 cm. Prezo: broŝurita 2.— svfr., bindita 3.50 svfr. plus 10% por sendkostoj. La kvara verko de AELA por 1934.

La nova libro de la sveda verkisto Stellan Engholm portas senpretendan subtitolon; sur la kovrilo troviĝas la modesta vorto »skizo«. Kaj tamen tiu ĉi skizo estas pli profunda kaj pli pensiga ol la plejmultaj dikaj volumoj, kiuj en la lastaj jaroj honoris nian lingvon. »Skizo«, laŭ unu el la difinoj de la Plena Vortaro, estas »literatura verko ne prezentanta plendetale la temon, sed resumante ĝin per ĉefaj trajtoj«. Laŭ tiu difino, *Infanoj en Torento*

INTERNACIA JURNALO ENKONDUKAS ESPERANTON

La semajna ĵurnalo »EUROPEAN HERALD« eldonata en Londono kaj ĝis nun redaktata en la angla, germana, franca, hispana kaj itala lingvoj, decidis aldoni Esperanton al la lingvaro uzata. La Esperanta sekcio naskiĝis kun la numero de 28 Septembro, kaj redaktas ĝin S-ro Fred Wadham, L. K., Brita Cefdelegito de U. E. A.

La enhavo de la ĵurnalo estas interesa por ĉiu Esperantisto, kaj lingvistoj trovos ĝin tre utila. La Esperantan sekcion oni daŭrigos nur, se montriĝos intereso flanke de la samideanoj. Okaze de forta subteno, oni pligrandigos la Esperantan parton.

»European Herald« estas vendata de gazetvendistoj en preskaŭ ĉiuj landoj. Tiuj, kiuj ne sukcesas ĝin aĉeti, sendu respondkuponon (poŝtan aŭ de U. E. A.) al »European Herald«, 110 Fleet Street, London, E. C. 4.

estas plene sukcesa artverko, en kiu per artista interpreto de vera poeto prezentigas la infana vivo, el psika vidpunkto, kiel ankaŭ la ĝenerala homa vivo, el objektiva vidpunkto, en la urbo Torento, loko kiu en la lasta jarcento estis kampara, sed en ĉi tiu epoko de altteknika kapitalismo englutigis en la faŭkon de la industriismo.

Povas esti, ke leginte la verkon unufoje, oni sentos sin iom nekontenta, malgraŭ la averta subtitolo »skizo«; ĉar la libro apartenas al tiuj verkoj, kiuj ne tuj kaptas la leganton kutimigintan al romanoj kuntenitaj per firma rakonta fadeno, per vigla priskribo de sinsekvaj incidentoj. Sed jen kaj jen iu konturo kaj bildo restos en la memoro, kaj logos al relego: kaj la leganto konstatos, ke li havas verkon, kiu ne tuj donas sian riĉon, kiu nur iom post iom revekos sentojn kaj impresojn el la propra pasinto. Kaj li fine konkludos, ke nur tre riĉa animo, kiu perceptas tre subtilajn psikajn impresojn kaj scias redoni ilin fresaj, povis naski tian skizon pri la fruaj jaroj de la vivo.

Kiel skizo pri psika vivo de ĝeinfanoj, la verko estas funde vera en tio, ke ĝi montras, kiom malmulte la plenaĝuloj partoprenas aŭ okupas la infanan vivon. Kaj kiam ni atentis la priskribojn pri plenaĝuloj, ni kvazaŭ vidas ilin laŭ pli ĝusta perspektivo, ili ne plu estas tiom imponaj kaj gravaj: ilia statur malaltigas kontraŭ la fono jen de la infanaj psikoj, jen de la vastaj ekonomiaj influoj kiuj eligas nin, ĉiujn unuopajn homojn.

Oni rajtas plendi, kiel pri aliaj verkoj de Stellan Engholm, ke la libro estas tro unukolora; la aŭtoro kvazaŭ kapablas verki en nur unu humoro de iom trista simpatio al la homa vivo kaj al ĝiaj streboj kaj aspiroj por anima kontento. Certe oni kelkloke bedaŭras, ke la verkanto tro bridis sian evidentan kapablon por satiro, kaj ne montras aprezon pri la humuro de la ĉiutaga vivo. Tamen oni facile rezignas pri tio, kaj konfesas, ke neniu artisto kapablas ampleksi ĉiujn fortojn, kapablas doni la tutan kalejdoskopon el la koloraro de la anima okulo, kiam temas pri propra artverko: kiel homo la verkisto eble povas ĉion ŝati, la belon kaj la komikon, la brutalon kaj la teneron, la eton kaj grandon, kiel artisto li estas alia, kaj plejofte devas sin limi. Jam oni publike esprimis bedaŭron, ke Stellan Engholm ne pli individue kaj aparte pentras siajn karakterojn: kaj tamen eblas kredi, ke la individuecigo de la moderna romanisto estas grandparte falsa, ke la homoj finfine estas kneditaj el unu pasto, kaj anime estas malpli unuopaj, ol volas kredi multaj individuismaj artistoj de la nuntempo. Stellan Engholm mem loĝas for de la grandurba vivo, tamen la nova urbeto Torento, kiun li priskribas, kune kun la apuda kampara pejzaĝo, kies belon li trafas metas antaŭ nin tra la mensoj de siaj karakteroj, donas al li eblon desupre rigardi la homan vivon de nia jarcento. Kaj komprene, senpartie kaj simpatie, li bildigas al ni la etoson de la diversaj edukoj kaj de la pluraj generacioj, kiuj formas nian epokon. La nuna kristanismo kaj la nuna komunismo, la

Oficialaj sciigoj de la Akademio

(N-ro 5. — Oktobro 1934.)

1. Pro sia elekto kiel prezidanto de UEA, s-ro generalo Bastien rezignis pri la ofico de direktoro de la Sekcio «Komuna Vortaro». S-ro W. Bailey estas elektita de la Akademio por anstataŭi lin.

2. La Akademio elektis korespondantino fraŭlinon Lidja Zamenhof, kaj korespondantoj s-ron inĝenieron d-ron Orengo, direktoron de la Sekcio «Teknikaj Vortaroj», kaj s-ron R. Kreuz, direktoron de UEA.

3. La Kongreso de Stokholmo, laŭ propono de la prezidanto de L. K., unuvoĉe esprimis la deziron, ke la naciaj asocioj klopodu por prezenti, kiel reprezentantojn de sia nacia lingvo en la L. K., la plej kompetentajn, kaj fidelajn al la Fundamento, el siaj samnaciuloj; ke la eldonistoj de periodaĵoj sendu unu ekzempleron de ĉiu numero al la Prezidanto de la L. K. kaj al la direktoro de la Sekcio de Kontrolo; ke la Akademio ricevu subvencion almenaŭ egalan al tiu, kiun ĝi ricevis de I. C. K. antaŭ la reorganizo de UEA (Laŭ tiu ĉi deziro, la nova komitato de UEA decidis daŭrigi la subvencion al la Akademio.)

4. Dum la kongreso de Stokholmo okazis kunsido de la L. K. Ceestis s-roj generalo Bastien, Bonnevie, d-ro. Couteaux, s-ino Dresen, s-roj inĝ. Isbrücker, Jung, Lundgren, prof. d-ro. Migliorini, Nylén, d-ro. Orengo, Rousseau, Setälä, d-ro Szilágyi. Prezidis s-ro Nylén, vicprezidanto de la L. K.; protokolis prof. d-ro. Migliorini, vicprezidanto de la L. K. Estis aprobita prezentado de la deziroprimoj al la kongreso; estis pridiskutitaj la periodeco de la aldonoj al la Universala Vortaro, kaj la Teknikaj Vortaroj.

5. La Sekcio de Kontrolo klopodis por trovi kunlaborantojn, turnante sin al la recenzistoj de la esperantistaj gazetoj, sed ne multe sukcesis. — Ĝi starigis *normajn lingvajn diplomojn*, kies celo estas determini relativan valoron de la lingvaj diplomoj disdonitaj de la naciaj asocioj aŭ institucioj. Tiuj ĉi valoroj estos publikigitaj en la jarlibro por 1935.

6. La jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio por 1934 aperis. Ĝi entenas la liston de la L. K.-anoj, arangitan laŭ nacioj. Al la nomo de ĉiu L. K.-ano estas kunigitaj la datoj de lia naskiĝo, de lia esperantistiĝo, de lia elekto al la L. K., kaj eventuale de lia elekto al la Akademio. — Por ricevi tiun ĉi jarlibron sin turni al la *Centra Esperantista Librejo* (II, Rue de Sèvres, Paris); prezo: 2 Fr. Frk.

La Prezidanto:
M. Rollet de l'Isle.

junago, kaj la junago de la nun maljuna generacio, en tiu ĉi poezia skizo miksiĝas kun subitaj linioj de kruda incidento, kun trafaj bildoj de la kampara belo, kun multe da subtilaj impresoj de sentema animo, por entute formi artan verkon kies riĉiĝo al la originala literaturo de Esperanto estas dankinde granda.

K. R. C. Sturmer.

*UPTON SINCLAIR: JIMMIE HIGGINS. Tradukis el la angla: Karl Fröding. 1934. Eldono de SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. 369 pg.; 13×19 cm. Prezo: broŝurita frfr. 22.50, bindita frfr. 29.— + 10% por sendkosto.

La libro estas epopeo pri malgrandulo Jimmie Higgins, malgranda homo, simpla laboristo, sed kun grandaj idealoj. Inter la homoj li stumbladas naive kaj entuziasme, sed tiujn idealojn li tenas ĉiam alte super sia kapo. Teruraj sortobatoj lin trafas, la mondhistorio kvazaŭ tragalopas sur lia korpo, sed li obstine persistas, ne cedas,

(N-ro 6. — Novembro 1934.)

La Akademio decidis entrepreni — kaj se eble daŭrigi ĝis tuta fino — la verkojn kaj studojn proponitajn de esperantistoj aŭ de si mem, kiuj ĝis nun ne estis realigitaj.

Jen estas la farotaj verkoj kaj solvotaj demandoj, pri kiuj kunlaborado de la kompetentaj esperantistoj estos danke akceptata:

VORTARO:

Kritika esploro de la Komuna Vortaro — *Inventaro* de nia vortrezoro;

Listo de ne-oficialaj vortoj, komune uzitaj en la jam presitaj verkoj aŭ naciaj vortaroj;

Listo de internaciaj vortoj, kiuj troviĝas en la tri vortaroj esp.-angla, esp.-franca kaj esp.-germana;

Vortoj kun malsama ortografio aŭ formo, kaj sama senco;

Pseŭdo-sufiksoj (aci', ici', ktp.) — *Sufikso end*;

Propraj nomoj (landnomoj esceptitaj).

GRAMATIKO:

Gramatika karaktero de la radikoj;

Gramatika konkordanco de la Zamenhofa verkaro;

La 16 Zamenhofaj reguloj, kun mallonga komentario kaj klarigoj ĉerpitaj el la Zamenhofaj respondoj kaj uzado de la Majstro;

Korekta uzado de *po* kaj *de*; de la participoj *ita* — *ata*;

DIVERSAJ:

Preferindaj aŭ nerekomendindaj formoj;

Naciaj proverboj, komparoj kaj metaforoj, enkondukotaj en Esperanton;

Sistema esplorado de la verkoj de D-ro. Zamenhof, koncerne dubajn aŭ neklarajn lingvajn demandojn;

Interpunkcio — *Oftaj mallongigoj*.

La esperantistoj — lingva-Komitatoj aŭ ne — kiuj okupiĝis pri kelkaj el tiuj temoj, *sciigu, kiel eble plej baldaŭ, la Prezidanton*, kiu ĝustatempe invitos ilin, komuniki al la Akademio ilian verkon.

La Prezidanto:
M. Rollet de l'Isle

ĝis fine lia spirito montriĝas malpli forta ol lia volo; li freneziĝas sub la torturoj, sed li ne malkaŝas la sekreton, kiun oni volas de li elpreni.

Sinclair eble en tiu ĉi verko estas la plej granda artisto. La tendenco estas evidenta, sed tamen ĝi ŝajnas nur fono. Antaŭe staras Jimmie, tiu simpla animo, tiu naŭva heroo. Grandioze kaj kun akra satiro estas pentrita en la verko la usona vivo dum milito, la artifikoj, per kiuj oni regas kaj laŭplaĉe turnas la publikan opinionon. Kaj grandioza estas la humoro de la libro. La figuron de Jimmie ni sekvas sur lia vojo kun konstanta rideto, sed kun larmo en la okuloj. Mi mencias nur la interparolon de la vundita Jimmie kun la vizitanta angla reĝo; ĝi estas vere plej alta majstraĵo.

La traduko de Karl Fröding havas difektojn. Svarmas la kompleksaj verboformoj. La verbotempoj de eksplikaj kompletivoj estas malĝustaj, ekz.: *Mi pensis, ke estis bone eliri* (anst. *estas*). En nereкта parolo la verbotempoj montr-

as pasintan tempon, eĉ se la parolanto parolas pri aferoj nuntempaj. La modoj estas konfuzitaj. La uzo de la prepozicioj estas malcerta. Oni diras, ke ne ekzistas E-a sintakso. La tradukinto klare pruvis, ke ekzistas. Li montr- as, kiel malagrabla estas, se oni ne obeas la konvencian regulon. Urĝe necesas, ke tiuj reguloj estu fiksitaj kaj registritaj!

Ĝis la 80-a pago mi ruĝe substrekis ĉiujn erarojn, ĝis tiu pago kvazaŭ sangas mia ekzemplero. Sed nun mi vidas, ke en la pluaj pagoj ne troviĝas plu ruĝaj strekoj. Ĉu la tradukinto subite pliperfektigis? Ne! La torento de la rakonto, la ĉarmo, verve, katenanta intereseo de la libro forgesigis al mi la recenzistan devon. Versajne ankaŭ la leganto agos same: komence li ĉagrenigos, poste li forgesos ĉion kaj glutos, glutos. Sed tio estas la merito de Upton Sinclair kaj ne ekskuzas la tradukinton.

Ĉu la eldonejo ne havas kompetentan korektiston, kiu funkciigus sian ruĝan krajonon antaŭ la eldono?

V. K.

NORDA LITERATURO. Kolekto de literaturaj verkoj el Norda Eŭropo. Redaktas T. Indra. Eldonas K. Štrazde, Jelgava, Latvio, p. k. 51. I. Kajero. pĝ. 84; 14×20 cm. Prezo: Lato 0.65.

En tiuj ĉi kajeroj la eldonisto volas prezenti majstro- novelojn de nordaj (latvaj, litovaj, estonaj, ktp.) verkistoj. Pluraj kajeroj estus kunbindeblaj, kaj tiel oni povas kvazaŭ partopage aĉeti valoran volumon. Gratulinda entrepreno. Sed mi ne tute komprenas, kial oni volas kun- preni ĉiujn nordajn literaturojn; ili ja estas tiom dife- rencaj inter si. Mi kredas, ke pli bone estus resti ĉe la latva literaturo, aŭ eble ĉe la litova-latva.

La unua kajero estas tre bona. Sajne la latvaj verk- istoj estas speciale eminentaj en la mallonga novelo. Pri tio oni cetere povis konvinkiĝi ankaŭ per Literatura Mondo. Ankaŭ la tradukoj estas bonaj, precipe tiuj de N. Kurzens kaj H. Seppik. Ĉe la pseudonima Ko So oni trovas kelkajn strangajn esprimojn, ekz-e *eksami* (ne ami plu), *ne sinĝenu* (ne ĝenu vin) ktp. Sed ankaŭ lia stilo estas vigla kaj bona.

V. K.

CHARLES DICKENS: LA VIVO DE NIA SINJORO. JESUO. Tradukita de *Montagu C. Butler*. London, The Esperanto Publishing Co. Ltd. 1934. Ilustrita. Prezo: bindita 6 ŝilingoj plus 6 pencoj por sendkosto.

Jen granda surprizo ne nur por la angla, sed ankaŭ por la tutmonda literaturo! Oni kredis havi jam la kom- pletan verkaron de la mondfama angla verkisto Charles Dickens, kaj 64 jarojn post lia morto aperas nova, ĝis hodiaŭ nekonata libro de la verkisto. Dickens skribis la *Vivon de nia Sinjoro* dudek unu jarojn antaŭ sia morto ne por la publiko, sed por siaj infanoj. Li estis tiam trideksepjara viro, jam konata verkisto, kiu travivis la plej profundajn misterojn de la vivo. La suferoj infanaĝaj altiris lian animon al la granda *Suferanto*, al *Nia Sinjoro*. La malhelpoj kaj persekutoj de la sorto apertis liajn animon kaj koron por la granda *Persekutito*, kiu ne bezitis morti por siaj amikoj, por ĉiuj homoj. Tiu emo al Jesuo inspiris la mondfaman Dickens, la bonkoran patron, ke li rakontu al siaj infanoj la vivon de Jesuo. Li volis altiri la koron de siaj amataj idoj al *Nia Sinjoro*, al kiu lia koro estis altirita per la pasintaj suferoj. Tiu cirkonstanco klarigas la stilon kaj la formon de tiu ĉi nova libro, kiun ni ricevas en nia lingvo tuj post la eldono de la originala, en la bonega traduko de nia jam konata kaj simpatia samideano Butler.

La originala verko estis verkita en 1849, en simpla, nepolurita malneto. Dickens volis konservi siajn rakontojn al siaj infanoj, kaj eĉ ne pensis pri publikigo. Post la morto de Dickens la manuskripto restis la propraĵo de lia bofratino, f-ino Georgino Hogart, kiu lasis ĝin kiel hered- aĵon al Sir Henri Fielding Dickens, filo de Charles Di- ckens. Sir Henri ne volis eldoni la verkon pensante, ke lia patro skribis ĝin nur por la familio. Sed en sia testamento li rajtigis la heredantojn eldoni la lastan nepublikigitan verkon de lia patro.

La vivo de nia Sinjoro Jesuo ne estas grandstila

konceptaĵo. La historion de Jesuo eltiritan el la biblio Dickens simpligis tiom, ke ĝi estu komprenata de liaj mal- grandaj infanoj. Li penis esprimi la ameman, mildan, homaman karakteron de *Nia Sinjoro*. Majstre li skizas la spiritan superecon de Jesuo. Ne tiel feliĉe li sukcesis desegni lian Dian mision. La koro de Dickens estas ĉiam tuŝita, kiam li parolas pri la amo de Jesuo al la malriĉ- uloj, malsanuloj, kaj suferantoj. Je tiuj momentoj de la vivo de Jesuo montriĝas lia granda verkista talento. Sed intence li evitas ĉion, kio povus eksciti disputojn religiajn. Li volas nur rakonti, simple kiel la animo de infanoj estas simpla kaj naiva. Tiun naivecon ni trovas en la verko, sen ke oni povus indigniĝi pri ĝi.

La traduko adaptiĝis al la formo kaj stilo de origi- nalo. Simpla, flua, agrabla. Inda je la famo de l' traduk- into. Kelkaj prezeraroj ĝenas ja la leganton, sed entute la belaspekta, lukse bindita eldonaĵo de la Brita Esperanta Asocio estas plenalvora donajo al la Esperantistaro, kaj granda gajno de nia lingvo.

Profesoro F. Erdey.

ANTONI SLONIMSKI: MIA VOJAGO EN SOVETIO. El la pola tradukis S. Grenkamp-Kornfeld. Eldonis: Literatura Mondo, Budapest, Mester-u. 53. 1934. 142 pagoj. 13.5×20 cm. Prezo: broŝurita svfr. 2.70, bindita 4.20 + 10% por sendkosto. La kvina libro de AELA por 1934.

Multegaj estas la vojaĝrakontoj pri Sovetio: Sovetio aperas al la kapitalista mondo, kiel alia, fremda, preskaŭ sovaĝa kontinento, kiun nur esceptaj homoj povas esplori, kaj pri kiu oni neniam povas eksci la veron, inter tiom da belaj rakontoj el trans la montoj. Unuj el tiuj esplori- stoj revenis kun plenaj valizoj da statistikoj, aliaj kun la nudaj impresoj de senpakafa turisto. Slonimski apartenas al tiu dua kategorio: li opinias, ke bonaj okuloj kaj kri- tika spirito pli taŭgas por malkovri la realon, ol ĉia konado de ĉiaj ciferoj. Kaj eble li ne malpravas, ĉar liaj vido kaj subtilo estas tre akraj. Li precipe kalkulas kun psiko- logiaj faktoj, kaj volas juĝi civilizon laŭ la grado de mem- kontenteco, kiun li rimarkas ĉe ties anoj. Bela metodo, sed iom malfacile praktikebla.

Mi ne bezonas resumi tie ĉi la libron: ĝi ampleksas ĉiujn kutimajn temojn pri Sovetio, la fremdul-hotelojn, la vic-atendantojn ĉe butikoj, la propagandon, la G. P. U., la teatron, ktp., ktp. (sola embaraso estas, ke oni nenie ekscias, kiam la vojaĝo okazis kaj estis rakontita; saĝnas, ke inter 1924 kaj 1932, sed tiu precizo estus necesa por juĝi pri la hodiaŭa valoro de multaj detaloj). Cetere mi povas diri, ke la libro estas tre vivanta; la verkisto, kiu estas metia kritikisto kaj teatraĵisto, havas la humuron, la fantazion, la eltrovemon, kiuj permesas al li logi la leg- anton, piki ties scivolon kaj konduki lin senhalte ĝis la fino de la libro. Plej agrabla kaj facila legaĵo estas tiu odiseado en la ruĝa lando.

La traduko estas bona kaj tre flua. Nur kelkaj punk- toj estas kritikindaj: la prefiksa uzo de *pri* sufiĉas por transformi ne transitivan verbon en transitivan; »prilum- igitita« (100) estas do erara anstataŭ »prilumita« (aŭ: lum- igitita); same en »primensogumita« (107) *um* estas pleo- nasma, ĉar *um* = *pri* en tiaj okazoj (Vd. Plenan Vort- aron, sub PRI); fine la frazo »ŝi kondukis min al ŝi« (88, versajne prezeraro anstataŭ: al si), estus pli klara sub la formo »ŝi kondukis min al sia ĉambro«. Sed tio estas nur ĉikanetoj. Kaj oni povas danki al s-ro Grenkamp kaj al L. M., ke ili liveris al la esperantistoj tiel aktualan kaj interesan raportadon.

G. Waringhien.

KATALOGO DE LA ESPERANTO—GAZETARO. Kompilis kaj komentaris D-ro Jozefo Takács. Reviziis kaj kompletigis Paŭlo Tarnow. Eld. Ant. Prazák, Jablonné N. Orł., Ĉeĥoslov. Prezo 15 Kč. 168 pagoj.

Du malnovaj esperantistaj kolektantoj donis la manon unu al la alia por pretigi tiun ĉi valoran kompletigon de la »ENCIKLOPEDIO«, kiu ja ne havas lokon por tia detala statistiko. Ĝi estas ne nur utila, valora, necesa dokumenta, sed ankaŭ interesa. Ni trovas la titolojn de la esperantistaj gazetoj kaj folietoj, de gazetoj, kiuj en-

havis esperantajn rubrikojn kaj de gazetoj de la diversaj mondlingvoj. Eble nur la cirkuleroj mankas. Oni povas aparte trovi, en kiuj lokoj kaj landoj aperis la nomitaj kaj statistikon pri 1276 gazetoj el 59 landoj kaj 459 lokoj. (Ĉu ili ĉiuj estis »urboj«, mi forte dubas.) Tamen estas multaj mankoj, kion la kompilanto ja ankaŭ anoncas en sia detala antaŭparolo. Tio estas memkomprenebla ĉe la esperantista gazetaro, kiu ŝanĝiĝas de tago al tago. Tamen, se jam ĉe la preso estis preta la aldono — en manuskripto —, kial oni ne tuj alprenis ilin? Krome, mi ne trovis, *kiun tagon* ni rigardu, kiel *aktualan* por la publikigitaj indikoj. Ĉar mi mem trovis ĉe multaj gazetoj la signon, ke ili aperas »*ĝis hodiaŭ*«, kvankam mi scias, ke ili ne aperas jam de jaroj. Jam ĉe la gazetoj menciitaj en la Bibliografio de *Stojan* mankis la indiko, kiom da numeroj aperis el la nomitaj gazetoj (el kelkaj ja eble nur unu aŭ du). Certe estus grandega laboro kompletigi tiujn mankojn, sed eble iam oni atingos tion. Ŝajne la lingvo estas bona kaj neriproĉebla. (Tamen, unu rimarko: Se oni skribas, ke la statistiko »*malfermas* la katalogon«, oni ne metu la statistikon al la *fino* de la katalogo — aŭ oni ne rajtas kritiki tiujn, kiuj proponas neologismojn anstataŭ la *mal-vortoj*.) — La libro estas valora por kolektantoj, propagandistoj, societoj kaj por ĉiuj, kiujn interesas dokumentoj pri nia lingvo. P. B. Budapest.

*V. VARANKIN: METROPOLITENO. (Originala romano. Eld. Ekrelo, Amsterdam, 200 p. Prezo: 3.— svfr.)

La libro estas renkontejo de grandaj kontrastoj. Amo, politiko, (kiu malsatas la ruĝan koloron, ne legu ĝin) Berlin kaj Moskvo en 1928 kaj 1929, nova mondkoncepto kaj heroo romantikismo miksiĝas altbligite tiamaniere, ke la legaĵo estas ne ĉiutage ŝablona kaj speciale malofta en nia ankoraŭ ne plenforta originala literaturo. Jam la formo, kiu estas esenca tiurilate, estas originala kaj delikata. La verkisto kurigas du historiojn paralele; la unua estas taglibro de verkisto, la dua: romano, kaj la du vojoj unuigas tiam, kiam la verkisto ne povas plu sekreti, ke la romano estas lia plej interna, vera travivaĵo. En tiu ĉi rilato la romano estas unu el la plej interesaj individuismaj verkoj kaj la analizo de la sentoj, la delikata desegno-arto, per kio la verkisto prezentas la ĉiam pli kaj pli fortigantan influon de la vera vivo al la romana plano, la lerta arango de la rakonto, la arta dozado de la efik-faktoroj pravas la neordinaran talenton de la verkisto. — La efektoj estas ĉiam tre fortaj, ĉu temas pri priskribo de atencoj, ĉu pri politikajtoj, ĉu pri la poezio de la virina korpo, al kiu la verkisto dediĉas sinceran admiron; kaj la individua pasio regas kun viglaj koloroj en la romano, tiuj koloroj regas kaj nur kiam la ama paro fine renkontiĝas nur por unu pasia kaj arda nokto en la fino de la romano, nur poste estas donita la necesa imposto al la imperiestro, t. e. la pli altaj devoj, al kiu la heroo kaj la heroino subigas sin. Sed »nur unufoje... kaj tiu sola fojo prepariĝas dum la tuta romano, al kiu la kolektiva medio donas kadron, vere vivan kadron. Per tiuj vortoj mi volas nur diri tion, ke la verkisto solide staras sur siaj plandoj kaj ŝajne ne povas tro respekti dogmojn, li ĉiuokaze rakontas ĉion en tre interesa, kaj talenta maniero: ĉe li la arto de la prezentado estas tiomgrade grava faktoro, ke ĝi alte superas la tendencon, sekve: la legaĵo estas bona, aŭ, el la vidpunkto de tiuj, kiuj timas la lertajn propagandverkojn, ĝi estas ĉiuokaze pli danĝera, ol la malobjektivaj stultajtoj. Varankin estas tre inteligenta verkisto, kiu absolute bone konas siajn ne ordinaraĵajn kapablojn kaj povas tiel ekonomie dividi la spicojn, ke ili ne estas elsenteblaj el la preta specialaĵo.

Ankaŭ el lingva vidpunkto ni ne povas nei la talenton de la verkisto. Tamen li havas gravan difekton: li ja ne konas la rolon de la persona pronomo *ĝi*, kiun li misuzas. Ofte ni trovas tiajn esprimojn: »Alice telefonis, ke ŝi estas morgaŭ frumatene forveturonta. *Ĝi* estas malebla. (Anst.: Tio estas malebla.) Kelkfoje ni trovis intermikson de transitivaj kaj ne transitivaj verboj. Ekz.: ... la vivo konvinkigis lin. (Anst. konvinkis lin.) Ne nur

li, sed ankaŭ aliaj verkistoj volonte uzas nur la duonon de la nek... nek paro, en la senco: eĉ ne... Ekz. Nek unu virino estis preterlasita. (Anst. eĉ unu virino ne estis preterlasita.) Mi kredas, ke la jena frazo nenion perdis, se la vorto »unu« mankas el tio: Mi rememoras feinson el unu malnova germana fabelo. — Ali'oke mi trovis malgustan vorton: tulpano, anst. tulipo. Kaj kelkaj aliaj rimarkoj, kiuj tamen rilate al 200 dense presitaj paĝoj estas tre malmultaj. Interesa formo estas la senprepozicia uzo de la akuzativo ĉe direkto-esprimoj. Ekz. ... vi obstine rifuzas translogiĝi provincon. Mi preferus eble la formon *provincen*, se ni ja ne povas kontraŭstari la *ŝpar-sopiron*. m. f.

*LA TRAVIVAĴOJ DE LA BRAVA SOLDATO SVEJK DUM LA MONDMILITO de Jaroslavo Hašek. (La dek unuaj ĉapitroj de la granda verko tradukitaj en esperanton.) El la ĉeĥa lingvo tradukis: Jozef Stadler. Eldonis: SAT kaj ADLEL, Paris, 1934. Formato: 18×13 cm. 152 pĝ. Prezo: Frfr. 12.50.

Kiel la enparenteza klarigo diras, la libro estas fragmento de l' granda verko pri la aventuroj de Svejko. Kvankam fragmento, la libro tamen estas unueca kaj finita, kaj prezentas, eĉ memstara, plene ĝueblan legaĵon.

Rilate la mentalon de l' aŭtoro: en la libro strange miksiĝas naciismo kaj internaciismo, kaj kulminas en ardan antimilitarismon, al kiu ambaŭ ja povas baze servi se ili kompreniĝas laŭ sia honesta senco, (kaj ĉe Hašek, se mi rajtas juĝi baze de tiu sola libro, ili tiel kompreniĝas). Versajne tiu senkondiĉa antimilitarismo igas komprenebla la fakton, ke SAT kaj ADLEL entreprenis eldonon de libro, en kiu troviĝas nemiskompreneblaj naciismaj aludoj.

La maniero, laŭ kiu la aŭtoro prezentas siajn opiniojn (etaĵ laŭ formo kaj supraĵa pririgardo, sed profundaj kaj multsignifaj laŭ enhavo) estas tute individua. Kelkloke, vere, li permesas al si enmiksiĝi per interjetita rimarko, sed plej ofte li kaŝas sin malantaŭ la oficiale konstatita idioleco de nia Svojk, kiu, neforgesebla figuro, estas la enkorpiĝinta malo de ĉio heroo kaj martira, sed ankaŭ de ĉio aplomba, bombasta kaj blaga. Lia sobra kaj impertinenta »simplula« mensio kun netrompebla instinkto malkovras la stulton, blagon kaj mensogon. Li ne estas »ideala« figuro, sed lia stulto, kaj ankaŭ lia senmoraleco estas nur ŝajna. Per sia stultaspekta rikano, sagaca malsprito li prezentas inferan mokon pri la freneziginta mondo. Bongustaj anekdotoj, kiajn li ĉiam havas pretaj, grandioze ridigaj scenoj kaj situacioj abundas en la libro. Estas certe, ke ĉi tiu libro same ne perdiĝos, kiel ĝiaj grandaj antaŭuloj, la verkoj de *Cervantes*, *Swift*, kaj *Rabelais*, kaj la trankviliĝinta postepoko ĝin nomos inter la ĉefverkoj de la satiro.

Nun kelkajn vortojn pri la traduko. La lingvo ĝenerale estas bona, kaj nekoniderante kelkajn malglataĵojn, preskaŭ senripoĉa. En unu mia »Revuo de revuoj« mi jam plendis kontraŭ la stranga kutimo de l' laboristaj esp-istoj: transskribo de la propraj nomoj laŭ esp-a ortografio. Impresas tre nekutime la sekvaj: Grinŝtajn (Grünstein), Bretŝnajdr (Brettschneider), Botcenhajm (Botzenheim), ktp. La virinnoj ankoraŭ ĉiam finiĝas per »o«, kvankam la vortoj »Jesuo Maria« (pĝ. 9) atestas pri la pli bona komprenemo de l' tradukinto. Kelkloke estas uzata »unu« kiel nedifina artikolo, multloke »iu«, kiel ties surogato (tute superflue). La akuzativo de la familinomoj estas ankaŭ forte konfuza (Svejk-on, Svejko-on, Svejko). (Ĉi-rilate mi proponus la *fakultativan* uzon de »on« kiel prepozicio: on Svejk; se la loko mem ne sufiĉas por konstati ke temas pri akuzativo.) Konstanta uzo de »prosperi« anstataŭ la ĝusta »sukcesi«. Piednota malkonsilo pri uzo de l' verbo »rodi«; tamen, uzo multloka. Nu, tiuj estas, kiel mi diris, kune kun la nemenciitaj, malglataĵoj, kiuj malaperos el certe sekvonta dua eldono.

Eksterajo plaĉa: bindo iom malforta.

Enkonduke mi diris: la libro prezentas eĉ memstara plene ĝueblan legaĵon. Sed oni ege bedaŭras, ke tiu legaĵo

ne daŭras almenaŭ duoble plu. Espereble: la kromaj partoj sekvas post nelonge, kaj en pli grandaj dozoj.

G. Karczag.

WADDINGTON »LEXICON« KARTLUDO de Agiszo. En luksa kartono, kun kajereto enhavante la »Regularon«. Prezo 2 ŝ. 6 p. Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn London W. C. 1. Anglujo.

Originale angla kartludo, adaptita por Esperanto. Per kunmeto de literoj oni povas formi novajn vortojn (ankaŭ neologismojn) kaj tiu gajnas, kiu plej frue senigas de siaj kartoj. Jam du personoj povas ĝin ludi. Rekomendinda novaĵo, taŭga esperantista donaco. La regularo estas sufiĉe klara, senerara. Per pluraj kartaroj povas ludi samtempe multaj grupetoj kaj konkursi unu kun la alia. La prezo iom alta por la poŝo de la esperantistoj, sed ne alta pro la bela, eleganta eldono. P. B.

✓ ROLLET DE L' ISLE: L' INITIATION A L' ESPERANTO. Dua eldono. Eldonis Belga Esperanto Instituto, 11, rue du Petit Chien, Antwerpen. 1934. 77 paĝa. 13.5×21 cm. Prezo ne montrita.

Kun ĝojo ni salutas la duan eldonon de tiu ĉi valora franclingva propagandilo el la plumo de unu el niaj plej kompetentaj samideanoj. Detala klarigo de Esperanto, ĝia historio kaj tiu de la Majstro, la organizo kaj nuna stato de la movado, la celoj kaj rimedoj de la propagando, ĉio estas prezentita kun konvinko kaj objektiveco. La moderateco de la argumentoj, kiu atestas pri klarvida intelekto, certe varbos multajn adeptojn en la kleraj rondoj. Entute konscienca kaj saĝoplena libro, kiu devus esti modelo por la tiaspecaj verkoj ofte bombastaj aŭ nekorektaj. H. V.

ALFRED DE MUSSET: MIMI PINSON. Tradukis M. de Rethel. Eldonis Esperanto Instituto, Venlo, Fako 81. Deponejo ĉe UEA, Genève, 1 Tour de l' Ile. 48-paĝa. 15×20.5 cm. Prezo: ned. guld. 0.60 + 10% por sendkostoj.

Esperanto posedas ankoraŭ malmulte da traduka literaturo el la franca romantika epoko kaj ĉiu nova konkero sur tiu kampo estas atentinda. La aŭtoro estas sendube la plej delikata infano de la franca romantiko kaj tiu lia verko apartiĝas de la ceteraj per ĝia brila gajeco. Simpla rakonto el la vivo de studentoj kaj »kudristinetoj, kiuj ne ĉiun tagon estas riĉaj«. La tradukinto pravis sian talenton uzante simplan lingvon kaj konservante la petolan ĉarmon kaj senperan vervon de la originalo. La teknika parto kaj ekstera aspekto de la libro montras la kutiman indecon de la nederlandaj eldonejoj. Estas dezirinde, ke la verko havu en Esperantujo tiom da sukceso, kiom en ĝia devenlando. H. V.

W. SIEROSZEWSKI: MARSALO JOZEF PILSUDSKI. Tradukis kaj komentaris B. Strelczyk. Eldonis Pola Esperanto Asocio, Warszawa. 1934. 77-paĝa. 13.5×21 cm. Arta kovrilo. Kun portreto de la marsalo.

Malavara incensado al tiu, kies triumfon kaŭzis la »historia justeco« inundas la verkon. Tamen per lertaj kaj viglaj skizoj disvolviĝas antaŭ ni la biografio de la nuna gvidanto de Polujo. Infanaĵaj suferoj pro la rusa jugo, junulaj entuziasmoj por socialistaj tendencoj, kvinjara ekzilo en Siberio, febra agado dum la milito estas vivpecoj, kiuj preme impresas la leganton. La stilo de la traduko estas ĝenerale flua, escepte de kelkaj slavismoj, kiaj: Li elektis el demoralizitaj per la reveno vicoj pli fortajn, plej parte legionajn batalajn unuojn, kunigis ilin kaj dislokigis tiamaniere, ke ili formis kaptilon, en kies internon ĉiam pli profunden eniris kuraĝintaj dank' al facila venko ruĝaj militistaroj. Kial la jenaj lingvaj fantazioj: huragano, diamento, bravureco kaj egzotiko? Preso, papero, aspekto rimarkinde belaj. H. V.

FOR LA VIANDON. De Viktoro Rákosi. El la hungara Ladislao Spierer, 46 p. Eld. Ant. Prazák, Jablonné n. Orł., Ĉeĥosl. Prezo 5 Kč., aŭ 2 resp.

Viktoro Rákosi estis ŝatata humoristo kaj Ladislao Spierer estas diligenta tradukisto el la hungara literaturo.

Jen en japana gazeto aperas liaj tradukoj, jen — en Ĉeĥoslovakujo. Oni povas gratuli al li pro lia lerteco kaj mi esperas, ke iam li tamen trovos la vojon ankaŭ al *Literatura Mondo*; li ja loĝas en la sama domo.

La libreto estas plaĉa, la iom malnovmodaj humorajoj estas amuzaj. Estus bone ĉe tiaj okazoj almenaŭ mallonge skribi ion pri la verkisto mem. La eldono estas zorga, preseraroj estas eble nur du, la preso bela. Pri la traduko mi devas rimarki, ke Spierer ofte imitas la hungaran vortordon. Ĉe personoj, kiuj por alilandanoj (sed eĉ por nuntempaj hungaroj) ne estas ĝenerale konataj (kiel Ehrlich, Morzsányi) necesus klariga noto, aŭ oni devus tute elasi ilin. »En la tramo« estas pli rekomendinda, ol »sur la tramo«, oni ja ne sidas sur la supro de la tramo. Anstataŭ »Majesteco« plene sufiĉas »Majesto«. Temas pri persono, ne pri ia kvalito! »Mi diris kun sentema voĉo«, ĉu ne »per sentema voĉo?« »Karno de vegetara besto« = ĉu ne »viando de vegetara besto«. Mi pensas, ĉiuj komprenas »el la personaro«, nenecesas »el inter la personaro«. Kion signifas »prafortikaĵa giganto«, ĉu giganto el pratempoj aŭ el tomboj de ia prafortikaĵo. Aŭ (mi ne vidis la originalon) el amuzejo iama de antaŭmilita Budapeŝto, nomita hungarlingve »Pra-buda-fortikaĵo«, sed tiam necesus klariga noto. Mi ne volas detale menciigi ĉiujn tiajn ŝangeblaĵojn. Kun aŭ sen ili — la libreto facile legebla kaj amuza, bonege taŭgas distri la leganton kaj forpeli enuon. P. B.

AMO DE TOOJUUROO KAJ DU ALIAJ TEATROJ: Kan Kikuĉi, tradukis Joŝiŝi Simomura, Eldono de Literatura Mondo, Budapeŝto, 1934. 20×13.5 cm. 80 paĝoj. Prezo 1.20 svfr. + 10%.

Jen aperis japana literaturaĵo tute altvalora kompare kun la ĝisnunaj tradukaĵoj de Sro Simomura, kies nomo de tradukinto talentplena jam estas iugrade konata de ne-japanaj espistoj, precipe de la legantoj de »L. M.«, en kiu aperis liaj tradukaĵoj: »La Miraklo« (1932), »Pli bone ol vengi« (1933) kaj »La printempo furiozas« (1934). La nova libro enhavas tri dramojn, »Amo de Toojuuroo« kaj la du unuajn menciitajn, de Kan Kikuĉi, plej fama kaj populara literaturisto en la nuna Japanujo. Do, dank' al ĉi tiu traduko, la kontinentaj samlingvanoj havas nun la okazon ĝui iom el la moderna literaturo de Nippon. La okcidentanoj vole-nevole alte taksos ĉi tiun libron, konatiĝante kun la orientaj vivo, moralo, religio, tiom fremda kaj stranga al ili, tamen tiom simila en multaj detaloj al la ilia. Kaj mi kredas, ke ankaŭ la lingvo de l' traduko altiros la intereson de la eŭropanoj: en bela, freŝa kaj simpla stilo, ili trovos novajn esprimojn kaj nuancojn, kiujn ili preskaŭ neniam rimarkis, kaj per kiuj ili certe konvinkas sin pri la estonto de nia lingvo disvolviĝonta. La tradukinto laŭeble konservis la laŭvortecon de la originalo, kiom tion la naturo de Esperanto permesas. Ekz. p. 49. »larmoj en la okuloj de diablo« (ŝtona koro); p. 45. »trinkante venenon, oni ĝin eltrinku ĝis la lasta guto« (pli laŭvorte, ĝis la telero); p. 57. »kiel rigardi la sunon tra la trueto de kudrilo«; p. 27. »klabo el densaĵo« (pli fidele, ligna bastono el bambuaro; abrupta, neatendita frapo, apero, okazaĵo); p. 49. »kiel milio al malseka mano«, ktp., al kiuj certe oni trovos similan aŭ koincidajn diraĵojn en sia lingvo. (Troa laŭvortecon ne oftas. Ekz. p. 52. »morto de hundo« (malhonora morto, vana sinmortigo). Aliflanke s-ro Simomura evitis neologismojn kiel eble plej, tradukinte aŭ laŭvorte, aŭ laŭsence; tamen, kompreneble, ni vidas kelkajn: p. 32. »ŝoguno«; p. 47. »samiseno« (preferinde, samiseno), ktp. Sed, mi pensas, ke li estus povinta uzi neologismojn pli kuraĝe. Ekz. p. 54. »militisto« (samurajo); p. 38. »rizbrando« (sakeo); p. 32. »vasalo de ŝoguno« (hatamoto), kaj p. 35. »estis sin mortigonta tratrancante la ventron« (estus harakironta, intencis harakiri*).

Traleĝinte, mi rimarkis kelkajn forigendajn, korektindajn, aŭ pliguste dirite, netrafte tradukitajn vortojn. Ekz.

* Estas troveblaj en Ishiguro: Moderna Esp-Jap. Vortaro, 1933.

p. 33. *niŝugin-aj moneroj*, p. 39. *du ŝuoj*, p. 48. *argentaĵaj moneroj* (*ni* = du, *ŝu* = monunuoj antikva, *gin* = argenta, do *ni-ŝu-gin* estas speco de monero, *du-ŝua* (argenta monero). P. 39. *Higano* (laŭ la kalendaro ĝi estas la ekvinox-tago, sed tiu ĉi nomo estas laŭbudhisma laŭ japana sono). Parolante pri budhismaj terminoj, kiujn oni trovas en la libro, kaj kiuj estas parte familiaraj al japanoj, li preskaŭ ĉiam literadis laŭ la sonoj de la japana lingvo. Ekz. p. 66. *Emma* (Jamao, p. 7. Jamo); p. 83. *Bosacu* (Bodhistativo); p. 56. *Kanzeon* (Avalokiteŝavaro), ktp. Ĉar ili estas fakvortoj, estas tute egale por plejmulto da legantoj, ĉu li uzas ilin, aŭ ne, sed ofte li laŭsence tradukis ankaŭ klarige. Ekz. p. 65. *Sankta Skribaĵo* (Avalokiteŝva sutro), ktp.

Al mi ŝajnas, ke li entute tro ŝparis pri la klarigaj notoj, per kiuj la legantoj estus pli bone komprenintaj la enhavon. Ekz. antaŭ ol legi »Pli bone (noble) ol venĝi«, estus dezirinde, ke la legantoj havu konon, ke venĝi sian patron aŭ mastron estis rigardata kiel plej nobla devo por Samurajo en la feŭda Japanujo, kaj oni sentos la mankon de klarigaj vortoj ĉe: p. 14. *Mandajuu* (teatro); p. 12. *Cikamacu* kaj p. 14. *Monzaemon* estas la sama persono; p. 14. *taseto* (da sakeo); p. 50. *boteton* (da sakeo) sur la plado (pleto), p. 26. (vulkano) *Asamagatake*; p. 77. *La Budaĵoj* (budho-servantoj), ktp. Kaj mi timas, ke la legantoj ne bone komprenos la esprimon »hararo aranĝita en la formo de bambua te-kirtilo« (nomata *ĉasen*-harararanĝo, kion la tradukinto laŭvorte interpretis) en p. 11.; kaj la vorton *Joroo-ĉapo**, kiun li tradukas sur p. 11. »kamparana ĉapo kaj sur p. 81. »ĉapelo de katamito«, kaj pri kiu li eraretis pro manko de funda kono pri japana antikva moro. Mi substrekis: p. 81. *tiu ĉi junulino ... ŝia nazo* (devis esti, junulo ... lia); p. 41. *la oka horo* (dua); 33. *konkubulino* (p. 32. konkubino); p. 20. *liaj okuloj* p. 48. *la sepa horo* (kvara), ktp. Mi krome notis p. 15., *solaj* (nur liaj du okuloj); p. 39. *mortinto* (mortigito); ktp. Certe la du unuaj apartenas al prezeraroj kune kun: p. 35. *sun* (sur) *unu genuon*; p. 39. *Jahubara* (Jabuhara); p. 69. *malplatojn* (manplatojn); p. 78. *kiam* (kian); p. 82. *mezo* (meso), ktp. Jene mi volas menciĝi pri mislegoj de l' tradukinto: p. 27., 28. *sangoroo* (sanĵuroo), kaj ĉiujn *Saburobjoe* (Saburobej), kaj *Sukan* (Suukan).

Fine mi kuragas aldoni ankoraŭ kelkajn vortojn, pardonpetante mian maldecan avarecon al la esperantiginto meritplena. La tradukaĵo estas altnivela japana literaturo moderna kaj pri tio ĉiu leganto samopinias, sed mi preferus, se la tradukinto dankmerita estus anstataŭiginta »La Miraklon« per alia pli alte taksata el la verkoj de la sama aŭtoro, kaj tradukinta la prozan rakonton plimajstran »Trans Vengemon«, aŭ »La Serena Regno trans Furiozo« anstataŭ la dramigita »Pli bone ol venĝi« (Parton de la proza rakonto ni jam legas en diversaj legolibroj, eĉ en la nacia legolibro por popollernejo en Japanujo). La samon mi rajtas diri pri la proza »Amo de Toojuuroo« pro la patoseco, kiam ni ĝin komparas kun la dramigita.

Kaj mi bedaŭras, ke s-ro Simomura nur naive tradukis la plejparton de la antaŭparolo de Glenn W. Show, tradukinto en la angla lingvo, en siaj antaŭvortoj.

»Kritiki estas facile, sed fari estas malfacile«, japana proverbo diras, do mi rezignas la al mi nekonvenan taskon, atendante novajn ellaboraĵojn de nia multpromesa s-ro Simomura kaj aliaj sekvantoj, kaj mi sincere esperas, ke la fekunda eldonejo Literatura Mondo naskos pli da valoraj literaturaĵoj de la Lando de la Leviganta Suno.

Y. R. O.

SEXTON BLAKE: LA NIGRA KATO. MODERNA ALHEMIISTO. Tradukita kaj komentariita de H. Haji. Eldonis Esperanto Kenkju-Sa, 1933. 38 pg. 13x19.

Du detektivnoveletoj, plie laŭ la maniero de Conan Doyle, ol laŭ tiu de Wallace. Videble, en Japanujo oni tre ŝatas tiun specon, do la eldono, helpe de komentarioj, espereble akcelos tie la emon legi Esperante. La stilo de

* Verdire, faldita mantuko, kiun oni metas sur la kapon, kiel kapveston.

la traduko estas tiel bona, ke oni vere bedaŭras, kial ne dediĉas sro Haji sian lingvoscion al la traduko de pli valoraj verkoj. La vera japana literaturo ja estas tiel malgrase reprezentita en Esperanto. (xy)

WILLIAM GEORGE ADAMS: PIRAMO KAJ TIZ-BEO. Burleska tragedio verkita en E-aj versoj. Presita kaj eldonita de Presejo E-ista de Seattle, Washington, Usono, 1934. 16 paĝoj. 11x17.5 cm. Prezo 10 cendoj aŭ 2 respondkuponoj.

La verketo estas libera versa transplantado de la konata epizodo el la Songo de Somermeza Nokto. La ŝanĝoj ne tro plibonigis la originalon, multo perdiĝis el la senbrida burleskeco. Sed la tradukinto montras sufiĉan lertecon, precipe en la mallongversa lamento de Piramo, por ke oni povu atendi de li ankoraŭ lertajn laborojn. (xy)

JULIE SUFICHOVÁ: ESPERANTO-LERNOLIBRO POR ĈEHOJ, 4-a eldono, formato 18.5x11.5, paĝoj 128, eldonis Solc a Šimáček spol. s r. o., Praha.

La komencantoj en Ĉeĥoslovakujo povas vere ekgoji pro apero de tiu ĉi plibonigita kompleta lernolibro, kiu ne lacigante la lernanton, kondukas — eĉ tiun, kiu ne ŝatas la »sekan« gramatikon — al bona scipovo de la lingvo. La tre zorgeme kaj bone elektitaj frazoj igas la lernanton scivola, samtempe devigante lin *pensi* en Esperanto. La libro kapablas interesi kaj altiri la memlernantojn al pli vasta studado, ĉar ĝi donas al ili ne nur necesan scion, sed ankaŭ komprenon. La tutan lernolibron karakterizas la jenaj vortoj el antaŭparola regularo, kiuj garantias ĝian vastan uzadon: »Gramatikajn regulojn uzi nur kiel helpilon kaj ne lerni ilin parkere.« K.

KATALOGO de Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Fack 698. 1934. 10-paĝa. 14x21 cm. Eldonita okaze de la 26-a Kongreso. Ilustrita kaj presita sur bela papero.

LA KVAKERISMO: W. E. WILSON. Eldonis Kvakeria E-ista Asocio, Olton near Birmingham, 66 Kineton Green Road. 1934. 11-paĝa. 12x18 cm. Prezo: 2 pencoj afrankite. Resumo pri la principoj de la kvakerismo, la religio sen ritoj.

ULLI (Franz Ulrich): SKIZOJ EL ESPERANTUJO. Eldonis la aŭtoro. Bürgstein, Villa Esperanto (Ĉeĥoslovakio). 32-paĝa. 11.5x15 cm. Prezo: 4.50 Kč. aŭ 2 internaciaj respondkuponoj.

En tiuj ĉi mallongaj skizoj la aŭtoro sin montras delikata kaj trafa observanto de la diversaj tipoj en nia samideanaro. Foje tro sentimentalaj, sed ĉiam emociplenaj estas la temoj. Lingvo bona krom kelkaj stilaj apartaĵoj. H. V.

CHRISTIAN HOUGAARD: EL LA NEBULO, tre facila legolibro. Eldonis Dana Esperanto Librejo, Aabyhøj, Frodsvvej 21. 1934. 28-paĝa. 11.5x17.5 cm. Prezo: svfr. 0.50.

Bone gradigita legaĵo, iom simila laŭ formo al »Karlo« de Ed. Privat, kaj tre taŭga en kursoj. La libreto rakontas per simpla, sed viva stilo la travivaĵojn de esperantista familio kaj starigon de esperantista kolonio sur fora insulo. Ĝi apartenas al la speco de edukaj kaj agrablaj instruiloj. Bona preso, plaĉa eksteraĵo. H. V.

JAKOB ROSENBERG: MULTIPLIKA TABELARO, 2 oble 1 ĝis 150 oble 100. Eldonis la aŭtoro, Tallinn, 11-4 Hollandi. 1934. Deponejo ĉe UEA, Genève. 149-paĝa. 10x13 cm. Prezo: bindita svfr. 1.20.

Oni ne devas akcenti la apartan utilon de tia verko, kiu povas anstataŭi kalkulmaŝinon ĉefe por personoj laborantaj eksterdome, sed tiu ĉi estas speciale praktika pro la dukolora preso. Bona papero kaj oportuna formato.

P. A. SMIRNOV: LA KIRGIZOJ. Tradukis Bazilo Averin, korektis Karl Fröding. Eldonis Amerika Esperanto Instituto, Madison, Wis. USA. 20 paĝoj. 11.50x15 cm. Prezo: 10 usonaj cendoj.

Jen en dudeko da pagoj tio, kion oni devas scii pri la moroj kaj kutimoj de la kirgizoj, nomadoj de la centraziaj stepoj. Okupoj, kostumoj, manĝoj, festoj, karakterizaj trajtoj. Tre facila lingvo, sed bedaŭrinde multaj preseraroj.

MIECZYSLAW GUTERMANN: ENCYKLOPEDYCYZNY SLOWNIK ESPERANTO-POLSKI (Enciklopedia Vortaro E-Pola). Kajero I. Eldonis Esperanto por ĉiuj, Warszawa, Nowolipki 36. 16-paĝa. 12.5×17 cm. Prezo: por 3 sinsekvaj kajeroj 2 zlotoj, por la tuta vortaro antaŭpage 10 zlotoj.

La kompleta vortaro ampleksos proksimume 600 pagojn kaj la unua kajero de A ĝis AL-igi promesas tre interesan sekvon. Ĝi enhavas rimarkindan nombron da neologismoj kaj fakaj vortoj kun aparta signo koncerne ilian uzindecon. Esperantaj mallongigoj, kiaj AELA estas ankaŭ troveblaj. Pro ĝia zorga ellaboro kaj klara preso la verko estos certe tre favore akceptata de la polaj samideanoj.

DEKLARACIO FIDELA PRI LA VERO ELMONTRATA LAU LA SANKTA BIBLIO. Dua eldono. 51-paĝa. Senpage ricevebla ĉe s-ro C. C. Walker, 21 Hendon Road, Sparkhill, Birmingham aŭ ĉe s-ro J. Bell, Regent Hall, Regent Street, Sydney NSW. Aŭstralio.

Kolekto da eltiraĵoj el la Sanktaj Skriboj pri la Vero, alia ol la popola kredo, kiu konsistas ofte el fabloj, kiel antaŭdiris la apostolo Paŭlo. Unua parto pri la Dia regno, dua parto pri la Nomo de Jesuo Kristo.

✓ **PER KIO NI AMUZU NIN?** Societ- kaj dancludoj. De Jakob Rosenberg kaj Ernfrid Malmgren. Eldonita en serio de Sveda Esperanto Asocio; No 4. *Stockholm*, Eldona Societo Esperanto. Prezo 1 sv. krono. 40 pagoj.

La kajero estas taŭga kaj interesa kolekto de ludoj, aplikitaj por esperantistoj kunvenantaj tiel en ĉambro,

ĈU ĜI MERITIS LA FIDON?

El la »Praktiko« de s-ano Cseh ni prenas la jenan »averton«:

AVERTO

Ni ricevis plurajn gravajn plendojn de konataj kaj honorindaj Esp-istoj (F-ino Lidja Zameenhof, f-ino L. Briggs, s-ro K. Minor, s-ro. F. W. Wadham kaj Brita Esp-ista Asocio) kontraŭ la firmo »Populara Esperanto-Biblioteko« en Amsterdam, pro nepago de kontraktitaj tradukistaj honorarioj, nelivero de aŭtoraj ekzempleroj, nerespando je leteroj kaj neplenumo de mendoj. Kun la nomita firmo, kiun ankaŭ ni helpis, akirante al ĝi la manuskripton de »Quo Vadis?« kaj rekomendante ĝin en niaj kursoj, ankaŭ ni havis tre malbonajn spertojn. Tial ni sentas, ke estas nia devo, baziganta sur la necesa solidareco inter la honestaj Esperantistoj, averti kontraŭ la nomita firmo. — Aliaj gazetoj estas petataj represi.

Hago, 30. oktobro 1934.

INT. CSEH-INSTITUTO DE ESP.

Ni tre bedaŭras tian fakton, ĉar ni ĉiam ĝoje salutas honestan entreprenon, kiu volas kaj kapablas helpi la evoluon de nia literaturo. Tamen kun certa fiero ni memoras la bonvolan atentigon de nia ŝatataj amikoj en Nederlando, kiuj afable altiris nian atenton al nova »konkuranto«, timante, ĉu ĝi ne malutilos nin. Kvankam ili kopiis nian ideon, kio ĝis nun tamen estis nekutima en Esperantujo, ni estis tre dubantaj pri tio, ĉu senspertaj entreprenistoj povos doni ian valoron al nia literaturo. Post apero de kelkaj volumoj ni jam emis jesi, sed nun ni refirmiĝas en la kredo, ke la esperanto-libro-eldonado bezonas ne nur certan monsumon, sed ankaŭ specialajn sperton, fidon kaj oferemon. En la okazo de PEB tiun oferemon reprezentas la tradukistoj, kion ni bedaŭras double.

Ni esperas tamen, ke en aliaj okazoj la bonfamaj esperantistaj firmoj ne rapidos doni siajn rekomendojn al entreprenoj, kiuj ankoraŭ ne pruvis sian ekzistkapablon, kaj helpos la jam elprovitajn per duobla forto.

kiel en libera aero. Parte ili estas la samaj, kiujn oni ludas en ĉiuj landoj, parte ankaŭ novaj, ne ĉie ĝis nun konataj. Ili certe bone servas la celon plivigliki kaj amuzi la esperantistojn, precipe junulajn. Ili ankaŭ aparte taŭgas por skoltoj kaj lernejoj. Domage la aldonitaj kantotekstoj estas preskaŭ ĉiuj laŭ svedaj melodioj, do nur de svedoj ili estas praktike uzablaj. La traduko estas bona, flua, klara, ĉe la kantoj oni ofte sentas la vervon kaj vigecon de la originalo, kvankam parto estas tradukita senrime, kio estas pli bona solvo, ol tiaj rimoj, kiel »lumadas — frostadas« aŭ »Nun hej o ho — Rondiras tute bo — Ne Anderson — kaj Peterson« ktp. Ĉu ankaŭ en originalo vortparo rimigas (bone)? Mi ne kredas. Ĉu estas facile kanti: »Estas ĵup' al panj — Belsurtut' al paĉj'? La kanteto »Patro Jakob« estas ŝajne internacie konata, la saman mi konis, kiel francon, sed ĝi enestas en hungara kantokolekto sub titolo »Onklo Joĉjo«. La kajero devus esti pli malkara kaj uzata en ĉiuj grupoj, kie volas junaj esperantistoj amuze ekzerci la lingvon. P. B., *Budapest*.

BONHUMORO (Bonne humeur) de *Paul Nyssens*. Esperantigita de la aŭtoro mem laŭ la originala franca verko. Eldonejo nesignita. Presejo: A. J. Wytteryck, Steenbrugge, Belgio. Formato: 14×20 cm. 173 pĝ. Prezo nesignita.

S-ro Nyssens kolektis en tiu ĉi verko kelkcent pensojn kaj citaĵojn pli-malpli rilatantajn al la bonhumoro. Multe da kontinuo ne ekzistas inter ili, tiel, ke la lego de l' multloke interesaj sentencoj iĝas iom teda, se oni volas la libron legi per unu fojo. Sed reprenante la libron plurfoje kaj legante el ĝi kelkajn pagojn, oni povas eltiri el la libro amuzon kaj eĉ utilon.

En la konkludo la aŭtoro promesas transformigon de nia vivo ĝis la fundoj de l' fundo (efike de la libro); tamen, mi dubas pri tiel granda rezultato. En sia bonhumoremo la aŭtoro riskas kelkfoje asertojn iom tro aŭdacajn. »Kia ajn estu via profesio, vi povas, per diligento kaj laboro, plibonigi vian situacion, beligi vian hejmon, havigi pli da komforto al via familio, amasigi provizon por la estonto.« — Tia eldiro en 1934 certe malhavas ĉian realan bazon.

La lingvo forte suferis pro tio, ke la libro tradukiĝis el la franca (kaj eĉ de l' aŭtoro mem). Francaĵoj abundas; kelkaj vortoj kripligas francan eĉ pli ol la originaloj (advantaĝo). Pluraj vortkunmetoj estas netolereblaj (ridsensulketiĝo, kredfido, elsubteni, transveturigiloj, ktp.) Ĉarna estas la frazkomenco »Ni vin diros...« kiu tradukigis el »nous vous dirons...«, tamen sen atento pri tio, ke »vous« ĉi tie rolas dative kaj ne akuzative. »Partigi« anstataŭ »dividi«, »repago« anstataŭ »rekompenco«. Kaj ankaŭ la sintakso kaj frazkonstruo estas iom tro franca. Ekzistas ja »stilo internacia« kaj »spirito de Esperanto«.

Entute, la libro estas valorajo, sed iom pene konkerbla por la leganto. G. Karczag.

✓ **GENTAJ FESTOJ** 1934. Eldonis la Reklamoficejo Atlaso, Strato S. Mihaelo, Gent (Belgujo). 32-paĝa. 14×21.5 cm. Enhavas la detalan programon de la Festoj kaj multajn reklamojn en lingvoj flandra, franca kaj esperanta. Komplete donacita de la Gentaj Esperantistoj. Eldonita en 10.000 ekzempleroj.

HANS JOACHIM PLEHN: SÄGEN-WÖRTERBUCH. Eldonis Verlag Internationaler Holzmarkt, Wien I., Tegetthoffstr. 7-9. 1934. 32-paĝa. 14.5×21 cm. Klariga vortareto pri mansegiloj por lignolaboro. Kvinlingva: germana, angla, franca, itala kaj esperanta. Tre valora helpilo por kompilado de fakaj katalogoj. Prezo: 1.75 svfr. afrankite.

G. SAPUNGIJEV: LA MONDO EN LA RADIOJ DE LA VERDA STELO. Eldonis I. Proikov, Varna. 80-paĝa. 14.5×21 cm. Prezo: 15 Levoj. Bulgarlingva propagandilo, donanta indikojn pri la stato de nia movado en ĉiuj lan-

doj. Pro nekono de la lingvo ni ne povas prijuĝi la enhavon, sed konante la aŭtoron, ni ne dubas pri la valoro de lia verko.

S. KASAI: INSTALADO DE STANGEFRAMITA FERTRABO PER SIPO. Tradukis H. Jajma. Eldonis Japano E-ista Ligo Fervojista, Tokio, ĉe S. Tanaka, Fervoja Ministerio. 1934. 12-paĝa. 19×26 cm. Prezo: 1 respond-kupono. Ilustrita broŝuro pri instalado de ponto laŭ nova kaj interesa metodo nun aplikata en Japanujo. 1-a kajero de la serio: Studoj pri fervojaj aferoj.

RICEVITAJ LIBROJ

LINGVA KVARONHORO — Paul Nylén — Eld. Societo Esperanto, Stockholm — 1934 — 39 p. — 18.5×12 — sv. kr. 1.—.

PETRO — SAT Paris 20, Av. Gambetta 67 — 1934 — 112 p. — 12×17 — frfr. 6.— + 10% sendkostoj.

SKIZOJ PRI FILOZOFIO DE LA HOMA DIGNO
Paul Gilles — E. Lanti — SAT Paris — 1934 — 148 p. — 13×19 — frfr. 12.— + 10% sendkostoj.

PRAKTIKA KONVERSACIO ESPERANTA — S. Inoue — Esperanto Propaganda Asocio Kameoka, Kioto-hu — 1933.

ABSOLUTISMO — E. Lanti — SAT, Paris 20, Av. Gambetta 67 — 1934.

EVANGELIO DE BELISMO volumo I—IX — Belisma-Koopera-Kulturejo — Okamoto Rikici.

FORPELATAJ HOMOJ: Can Hjokĉu. Tradukis H. Takagi. Eldonis Fronto-Sa, Tokio.

HEREZAJO: E. Lanti. Mendebla ĉe la aŭtoro, 141, Av. De Corbéra, Paris. 8-paĝa. Prezo: 0.10 svfr. por sendkosto. Hektografita letero al la malkontentaj legintoj de „Absolutismo“.

MONINGAID MOTTEID EESTI RAHVAVHISIST JA SELLE UURIMISMEETODIST: H. Tampere. Tallinn. 64-paĝa. 13.5×20 cm. Estonlingva primuzika broŝureto, kun esperanta resumo.

LA ESPERANTA LITERATURO: M. de Waard. Eldonis Internacia Cseh Instituto de Esperanto, Den Haag, 172, Riouwstraat. 64-paĝa. 13.5×20 cm. Prezo: guld. 0.75.

ĈU VI AUDIS TION?: S. Grenkamp-Kornfeld. Eldonis E-Instituto, Venlo, Fako 81. 48-paĝa. 13.5×20 cm. Prezo: guld. 0.60.

FLOREKSPOZICIO FLORA: Eldonis Tutmonda Florekspezicio de Heemstede (Nederlando). Ilustrita faldprospekto. 10.5×16.5 cm.

KANTFOLIO: Eldonis Presejo Esperantista de Seattle (Usono) 312, University Building. 4-paĝa. 13×21 cm. Prezo: 5 usonaj cendoj. Sen muziknoto.

LA FORTOJ EN LA VIVA NATURO: Petro Danov. Eldonis Nova Kulturo, Burgas, Poŝtkesto 6. 56-paĝa. 13.5×21 cm.

LA TRI FUNDAMENTOJ DE LA VIVO: Petro Danov. Eldonis Nova Kulturo, Burgas, Poŝtkosto 6. 72-paĝa. 13.5×20 cm.

CEZARO: Jeluŝiĉ. Trad. Ivo Rotkviĉ. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt, Mester-u. 53. 536-paĝa. 20×13.5 cm. Kun bela kovrilpaĝo. Prezo: broŝ. svfr. 9.—, bind. svfr. 11.— plus 10% por sendkosto. La tria libro de AELA 1934.

LA JUDA STATO: Theodor Herzl. Trad. B. Selzer. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt, IX. Mester-u. 53. 144-paĝa. 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. 2.50, bind. svfr. 4.20 plus 10% por senkosto. Por AELA-anoj respektive svfr. 1.40 kaj 2.30.

LETEROJ AL JUNA POETO: Rainer Maria Rilke. Trad. A. Münz. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt, Mester-u. 53. 48-paĝa. Formato 20×13.5 cm. Prezo: nur bindita svfr. 1.50. Por AELA-anoj svfr. 0.80.

Informoj al AELA-membroj

Kun ĉi tiu numero ni sendas al vi:

1. Hendrik Adamson: Auli kaj

2. Dekdu Poetoj

kiel libron nro 7 de la jaro 1934. Ni do ŝuldas al vi la libron okan (Ĉeĥoslovaka Antologio), kiun ni esperas al vi liveri en januaro, se la redaktoro transsendas ĉiun manuskripton laŭ sia lasta promeso. Al la membroj de 1933. ni ŝuldas la duan volumon de la Enciklopedio. Ĝi estas jam preskaŭ kompostita, sed ĉiam ankoraŭ mankas la rusa materialo, malgraŭ dufoja telegrama kaj kelkfoja ekspresletero informo pri ĝia baldaŭa sendo. Ni atendas ankoraŭ tiun materialon ĝis 1-a de decembro, nericevinte ĝin, ni kompilas mem bedaŭrinde manĥavan artikolon kaj ne plu atendos. Ni petas vian pardonon pri ĉi tiu afero, sed la pretiĝo de tia verko ne dependas sole de ni.

Al la membroj, akceptantaj ekstervicajn librojn ni sendas aŭ kune, aŭ post kelkaj tagoj la verkojn

Benito Mussolini: Vivo de Arnaldo kaj

Latvaj noveloj

La unuan tradukis K. Kalocsay, la duan N. Kurzens kaj aliaj bonaj latvaj tradukistoj.

Bedaŭrinde ni povis ekspedi Cezaron nur meze de novembro. Temis pri aŭtorrajtaj problemoj pro kio ni devis prokrasti ĝis nun la aperon de la verko. Ni esperas tamen, ke vi estos kontentaj vidinte kaj leginte ĝin.

Prospekto por 1935

ankaŭ estas sendata kun ĉi tiu numero. Ni esperas, ke la nova arango plaĉos al vi. Memoru, ke la prezo de 7.— frankoj por la lingvo-serio estas eksperimento, per kiu ni volas scii, ĉu plimultiĝus nia anaro, se ni malaltigis eĉ la nun jam sufiĉe malaltajn prezojn.

Rigardante la prospekton, vi eble rimarkos, ke la ŝanĝajlo de la membro ĉesas. Sed ni devis tion fari por tute simpligi la regularon. Tamen, ni kompensas tion alivorte. Nome vi devas pagi kiel minimuman kotizon svfr. 7.— anstataŭ la ĝisnuna 18.50. Kiel membro por 7.— frankaj, vi havas la rajton aĉeti kiun ajn el la aperantaj libroj per rabato de 40%. Ĉe la novaj libroj tamen tiu rabato fakte estas multe pli favora, ĉar ni malaltigis ankaŭ la prezojn de la vendataj libroj tiamaniere, ke la favora prezo por AELA-membroj estas tre proksima al la kotizo, pagota en serio. Ekzemple la Arto-Scienca serio kostas 10.— fr. La samaj tri libroj aparte aĉetataj kostas 27.50., do 40% rabatitaj nur 16.50 frsv.

Vi do povas konstati, ke kvankam AELA eldonas eĉ pli da libroj en 1935, ol ĝis nun, tamen vi, uzante la nunjaran sumon, povos aĉeti eble ĉion, pri kio vi interesigas.

Tion ni opiniis necesa klarigi pro kelkaj demandoj, direktitaj al ni.

Novaj favoroj por AELA-membroj.

Ni sukcesis havigi al ni limigitan nombron de la verkoj

Prus-Kabe: Faraono.

Stamatiadis: Nova Gramatika Libro.

La unuan verkon ni liveros al AELA-anoj por svfr. 5.— afrankite, ĉiujn tri volumojn kaj la duan por svfr. 5.— afrankite.

Krom tiuj ĉi libroj ni donas preskaŭ ĉiujn japanajn eldonaĵojn kun rabato de 40% al la membroj. Specialan liston pri ili petu aparte.

Ĉu vi scias?

Lau niaj informoj la verkoj de E. Aisberg: Fine mi komprenas la radion aperos ĉivintre en la lingvoj angla, nederlanda, norvega, pola lingvoj.

Esperanto-originala romano tradukata

S-ro Allen el Usono tradukas nun al la angla lingvo la romanon de Hans Weinhengst: Tur-Strato 4.

AELA JAM

por sep svisaj frankoj

vi fariĝas en 1935. plenrajta membro de la Aktivularo de Esperantistaj Libro-Amikoj.

Por tiu sumo vi ricevas la plenan lingvo-serion (proksimume 1200 normalaj libropagoj) afrankite, krome vi ĝuas rabatojn ĝis 40-50% el ĉiuj libroj, eldonitaj en la antaŭaj jaroj de Literatura Mondo kaj AELA.

Postulu nian detalan prospekton

Post la 1-a de februaro la kotizo plialtiĝos.

LITERATURA MONDO
Hungarujo, Budapest,
Mester-u. 53.

SENPAGE ni sendas al vi la 48 paĝan, dukoloran, ilustritan katalogon de LITERATURA MONDO kun

GRANDAJ PREZMALALTIGOJ

validaj por mendoj, faritaj plej malfrue la 15-an de decembro 1934. Post tiu dato mendoj estos plenumataj nur laŭ la malnovaj prezoj.

	Ordinaraj prezoj en sv. fr.	Malaltaj afrankite
J. BAGHY: Dancu Marionetoj	3.80	1.45
J. FORGE: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	4.40	1.85
F. SZILÁGYI: Trans la Fabeloceanon	3.30	1.85
F. KARINTHY-L. TOTSCHÉ: Vojaĝo en Faramidon (nur broŝ.)	1.32	0.72
K. R. C. STURMER: El la Notlibro de Praktika Esperantisto	2.75	1.45
ŜALOM AŜ-I. LEJZEROVICZ: La Sorĉistino el Kastilio	3.85	1.85
K. KALOCSAY: Lingvo, Stilo, Formo	3.30	1.50
K. KALOCSAY: Eterna Bukedo	9.90	4.80
GOETHE-KALOCSAY: Romaj Elegioj	2.20	1.20
DANTE-KALOCSAY: Infero	9.70	4.80
L. TOTSCHÉ: De Pago al Pago	2.75	1.45
E. AISBERG: Fine mi komprenas la radion	5.—	2.40

Ĉiuj prezoj por broŝuritaĵoj libroj. Por binditaĵoj oni devas aldoni por ĉiuj libroj po 1.— svfr. — Minimume mendebla kvanto la valoro de svfr. 3. — Mendojn plej malfrue ĝis 15-a decembro akceptas la eldonejo

LITERATURA MONDO
niaj reprezentantoj kaj ĉiuj esperantistaj librejoj.

LA SKURĜO

unua batala organo de la
Esperantistaj verkistoj kaj
literaturhelpantoj.

Ĝia celo: skurĝe instigi ĉiujn al la batalo, ĝis kiam Esperanto atingas la finan venkon per la belo kaj grandeco de sia literaturo, per la impono de sia teatro, per la ofteco de la radio- kaj filmprezentadoj.

Ĝi volas prepari eliton je sinofarado al la celoj de Esperanto, kaj per tio novan esperanto-generacion, el kiu eliru la estontaj poetoj, pensuloj, artistoj, herooj de la venka movado, utilaj al sia patrujo kaj al la homara kulturo.

Ĝi instigos la sentojn al kuraĝa kaj larĝvida kavalireco, ĝi donos movon al sango kaj vivigajn ideojn al menso. Ĝi forpelos la mortadon kaj inerton el niaj vicoj, ĝi realigos la bezonatan nevenkeblan armeon por la venko.

Aperos provizore kvarfoje jare.

Redaktas: Ugo Vinicio Pacini. Adreso de redakcio
U. V. Pacini, PRATO (Firenze) Casella Postale 92

Adreso de administracio: Literatura Mondo Budapest
IX. Mester-u. 53.

Jarabono: svfr. 1.40
por luksa eldono svfr. 2.80

Anoncu vian abonon. Monon vi devas sendi nur post la apero de la unua numero.

Atentu!

LITERATURA MONDO

Jarabono
nur svfr. 4.50

Ekde la jaro 1935 ni enkondukas kolektivajn abonojn. La abonprezo de la unua abono ne ŝanĝiĝas, la dua kaj ĉiu plua abono, sendata al unu sama adreso estas nur svfr. 4.50.

Specialaj favorprezoj ankaŭ el tiuj abonoj al kursosuferejoj landoj.

Skribu al niaj reprezentantoj

Liston vi trovas en ĉiu numero de Literatura Mondo, laŭ speciala peto ni sendos al vi.